

# Momo Karoro

(Момо Капор)

# UNA



Serbia Esperanto-Ligo  
Удружење есперантиста Србије



Удружење научних и стручних преводилаца Србије  
Reprezentativno udruženje u kulturi

Момо Кароро  
(Момо Капор)

UNA

SERIO de serba literaturo

*Tradukis*

Jovano Zarkoviĉo  
Zlatoje Martinov

*Provleganto*

Rade Uzelac  
Sofija Ďenĉinoviĉ

*La titolo de la originalo*

„УНА

*Eldonisto*

Удружење научних и стручних преводаца Србије

*Por la eldonisto*

Драгић Вукићевић

*Redaktoro*

др Милош Д. Ђурић

*Grafika aranĝo kaj pagaranĝo*

ДОО „Службени гласник“

*Eldonkvanto*

50

ISBN

978-86-917873-9-4

*Eldonjaro*

2026

Momo Kapoor  
(Момо Капор)

UNA

Beogrado, 2026



## ANTAŬPAROLO

La romano *UNA*, verkita de Momo Kaporo (1937–2010), estas unu el la plej ŝatataj kaj legataj verkoj de la serba literaturo, kiu ne nur kaptas la fantazion de siaj legantoj, sed ankaŭ persiste konservas sian rilatecon al la hodiaŭa socio. La verko traktas temojn kiuj estas ege gravaj kaj aktualaj kaj en la pasinteco kaj hodiaŭ, kaj la maniero kiel Kaporo pritraktas amon, socion, politikon kaj filozofion, faras la romanon ne nur leginda, sed ankaŭ meditebla.

Kaporo estas konata pro sia simpla, sed potenca stilo, kiu ne permesas al komplikecoj malhelpi sian rektan esprimon. Legante la romanon *UNA*, oni tuj sentas la konatecon de la rakonto – ĝi ŝajnas rakonti historion, kiun oni jam spertis aŭ aŭdis de proksima amiko. La rakonto pri la juna studentino Una, ŝia mezaĝa edziĝinta profesoro, kaj ilia pasia amo, estas rakontita tiel, ke ĝi reflektas la komplikajn emociojn kaj sociajn konfliktojn kiujn multaj legantoj povas kompreni kaj eĉ senti sur sia propra haŭto.

*UNA* estas ne nur rakonto pri pasia amo, sed ankaŭ filozofia, socia kaj politika meditado. Ĉi tio estas rimarkinda ĉar – malgraŭ siaj ŝajne romantikaj temoj – ĝi montras al ni la malfacilaĵojn de vivo en sistemo kiu limigas individuon, en ĉiu ĝia aspekto – de la aŭtoritataj rilatoj ĝis la sociaj atendoj. La ĉefaj roluloj – profesoro Babiĉo, lia studentino Una, kaj la pragmata prodekanano – reflektas la tri fundamentajn elementojn sur kiuj ĉiu sistemo estas bazita: *la konformismo*, *la ribelo*, kaj *la manipulado* de la leĝoj kaj nereguloj de la mondo, precipe tiu nedemokratia kaj aŭtokrata. Ĉiu el ili, kun siaj propraj dilemoj kaj deziroj, montras al ni ke tiuj kiuj vivas en la mondo de aŭtoritataj sistemoj, malgraŭ siaj klopodoj por aliri personecon, fariĝas nur partoj de la granda politiksystema maŝinaro.

Kiel verkisto, Momo Kaporo ne nur sukcesis priskribi la pasiojn de la ĉefaj roluloj, sed ankaŭ elmontris la abismojn inter iliaj internaj kaj la ekstera mondo en kiuj ili vivas. La profesoro Babiĉo, ekzemple, estas figuro kiu serĉas liberecon kaj novajn sferojn de sperto, sed samtempe lia ekzistado estas ĝenata de la norma, apatia ĉiutaga vivo kiu ĉirkaŭas lin. La romantika alfrontiĝo kun lia studentino Una estas ne nur fizika, sed ankaŭ ekzistenca,

kie la profesoro ekvidas sian propran nesekuran lokon en la mondo. Tiu ĉi dinamiko montras al ni kiel ligoj de amo povas trafi malfermitajn vojojn al la netuŝebla esenco de homo, la serĉadon de sinrezonado kaj libereco.

Kaj kion diri pri la titolo de la romano? La nomo *UNA* ne nur montras la virinon kiu ebligas la intrigon de la rakonto, sed ankaŭ simbolas unuecon – unuecon inter la pasioj kaj duboj de la homa spirito, inter la venkoj kaj perdoj kiuj nepre venos, se homo ne kaptos tiun specialan „Unuecon“ kiun li serĉas. La romano estas filozofia esploro pri individuo, sed ankaŭ traktas la neeviteblan repetiĝon de la homaj eraroj, precipe en socioj kiuj ne konas ajnajn ŝanĝojn.

Momo Kaporo uzis ĉi tiun rakonton kiel grundon por alfronti malmolajn sociajn realaĵojn – temojn kiuj estis tabuitaj dum lia tempo, la okdekaj jaroj de la 20-a jarcento en socialisma Jugoslavio. Lia skribo estas tiel honesta kaj ĝusta, ke ĝi devigas nin pensi pri la normoj, kiujn ni rigardas kiel akcepteblaj, kaj pri tiuj, kiuj estas forigitaj en la ombroj de niaj tutmondaj kulturoj. *UNA* estas kerno de socia kompreno, lumo sur la kontraŭdiroj de homa ekzisto.

Por ĉiuj tiuj kiuj volas enprofundiĝi en mondon de pasio, konflikto kaj profunda introspekto, *UNA* estas ne nur legado, sed sperto. Estas verko kiu ne nur rakontas rakonton, sed ankaŭ invitas al reala konfronto kun la malfacilaj veroj pri homo kaj lia loko en la mondo. Ĉi tiu romano estas unu el la plej fortaj atingaĵoj en la moderna serba literaturo, kiu daŭre resonas, ankaŭ post preskaŭ duonjarcento ekde ĝia apero.

Zlatoje Martinov



„Kiam mi la unuan fojon vidis ŝin, mia horloĝo haltis!“ rakontis poste la profesoro Miŝelo Babiĉo pri sia renkontiĝo kun Una en aŭtuno de la 1980-a jaro.

Al Una la pordon malfermis la edzino de la profesoro, jam preta eliri el la domo.

– Mi estas Una Vojvodiĉo... – prezentis sin la knabino, staranta ĉe la pordo, kaj apoganta sin jen al unu, jen al la alia piedo. – Mi havas anoncitan intervjuon kun la profesoro.

La edzino rigardmezuris ŝin kun milda suspekto. Una observis ŝian fajnmanan, rezerveman vizaĝon de flegata brunulino kaj apenaŭ videblan esprimon, vidigantan ke ŝi plene akceptis sian sorton; evidente, en ŝian domon al la profesoro venadis pli da homoj ol ŝi deziris.

– Li estas tie... – ŝi malprecize montris per la mano profundon de la loĝejo, kaj eliris sur ŝtuparon, samtempe vestante Burberry. Dum ŝi estis preteriranta, ŝian vangon tuŝetis la nigra, sovaĝe abunda hararo de Una. Per la fingroj ŝi tuŝis sian kvazaŭ brulvunditan vangon.

Una mole enpaŝis ŝian domon. Ŝi moviĝis singarde tra vastaj eksepokaj ĉambroj kun altaj tegmentoj; iliajn murojn remburis libroj kaj pentraĵoj. En duonlumo de unu el la ejoj ŝi preteriris knabon, kiu ŝin tute malatentis.

Li havis grandajn stereoauŝkultilojn sur la oreloj. Disko sur gramofono turniĝadis sense. Preterire ŝi enrigardis ankaŭ duonfermitan banĉambron, kiun ŝtopis boteletoj kun parfumoj kaj ŝminko. Sur spegulo ankoraŭ estis kondensiĝanta vaporo post ies banado. Finfine ŝi trovis la profesoron en miniatura kuirejo. En la pozo de ekzaltita alĥemiisto, li kliniĝis super profundan poton, el kiu estis leviĝanta vaporo.

– Mi estas... – ŝi volis prezentiĝi, sed la profesoro interrompis ŝin:

– Tenu ĉi tion! – ordonis li, kvazaŭ estus atendanta ŝian helpon, kaj donis al ŝi grandan kribrilon. Una kaptis ĝin per unu mano. En la alia ŝi havis ujon kun libroj kaj kasedilo.

– Ambaŭmane! – alkriis la profesoro, kaj ŝi obeis.

Li levis grandan poton, kaj unumove verŝis ĝian enhavon sur kribrilon. Ilin ĉirkauvolvis nubo de varmega vaporo. Kiam ĝi disiĝis, en ŝiaj manoj restis implikita amaso da gutantaj spagetoj.

– Elŝutu ilin en ĉi tiun pladon! – ordonis li. – Rap! Bone...

Li kaptis kaserolon kun jam preta saŭco, eretigitan viandon en ruĝa kondimento, kaj per kulero ŝutkovris la pastaĵon. Post tio, preninte malmoliĝintan pecon de Parma dura fromaĝo, li komencis raspi ĝin super la manĝaĵo. La profesoro tiom koncentriĝis al sia laboro, ke preskaŭ ne estis rimarkanta Unan, kiu ankoraŭ ĉiam sendecide staris meze de la kuirejo. Unuafoje ŝi vidis la profesoron Babiĉon elproksime. Li nun ŝajnis al ŝi tre malaltkreska. Lia grizeta hararo estis mole falanta sur la kolumon de griza kaŝmira ĵerzo kun ledaj flikaĵoj sur la manikoj. Antaŭe li ŝajnis al ŝi multe pli alta, kiam li nerveze promenitis de unu al la alia fino de la podio en la amfiteatro dum siaj prelegoj, impetmove farante desegnaĵojn sur la tabulo, dum kreteroj flugis dise-mise. Sed ŝi eraris pri la alteco de la profesoro; li estis nur iom pli alta ol ŝi, kiam li rektiĝis kaj levis siajn helajn, blujajn okulojn, kvazaŭ unuafoje iĝis konscia pri ŝia ĉeesto.

– Mi estas Una Vojvodiĉo... – rediris la knabino.

– Ho, tio estas vi, ĉu? – diris li portante la pladon kun spagetoj sur la sentukan tablon, kiun li evidente uzis kiel universalan tabulon por tranĉetado kaj pretigado de manĝaĵoj, kion konfirmis multnombraj posttranĉoj. Tiu tablo, farita el solida kaj dika ligno, ŝajnis konvena kaj taŭga. Li surmetis du telerojn, forkojn, pipromuelilon, paperajn buŝtukojn kaj du glasojn. El fridujo li prenis jam malfermitan botelon „Blanka Pinoto”. – Ĉu vi hieraŭ telefonis al mi?

– Jes... – konfirmis Una.

„Una Vojvodiĉo estas sur la telefono!” – diris ŝi tiam. – „Bone, unue malsupreniru desur la telefono, post tio ni interparolos!” respondis li. Nun ŝi estis ĉi tie, en lia kuirejo, kvankam ŝi atendis vidi lin en tute alia ĉirkaŭaĵo.

– Vi sendube opiniis, ke intelektulojn oni nepre intervjuas ĉe enciklopedioj! Aŭ almenaŭ ĉe labortablo, plenplena da manuskriptoj! Sed kial tion ne fari en kuirejo? La homo, sciuj, multe pli ofte troviĝas en kuirejo, ol en biblioteko, nu, mi eĉ ne mencios kion da tempo oni pasigas en la malpoezia loko! Senvestiĝu. Ne tute, kompreneble! Sidiĝu! Malstreĉiĝu... Mi ne manĝas studentinojn. Precipe ne kiel garnajon de triesteska pastaĵo kun saŭco el muelita viando.

Li helpis ŝin sensurtutiĝi. Ŝian sakon ŝi lasis ĉe la piedoj.

– Dankon – diris ŝi. – Mi jam tagmanĝis...

– Nu bone! Kiu diris: oni povas drinki kun ĉiuj, sed manĝi oni povas nur kun amikoj?

Una respondis, ke ŝi ne scias kies vortoj estas tio.

– Negrave! – diris la profesoro, tute ne atentante ŝian sinĝenon, kaj verŝis por ŝi aregon da spagetoj. – Ĉu vi volas, eble, iomete de pano?

– Ne, dankon!

– Tio estas kutimo de la malriĉularo.

Certan tempon ili manĝis senvorte.

– Kiel gustas la spagetoj, diru!

– Fenomene! – ridetis Una pale.

– Ĉu vi scipovas kuiri? – demandis la profesoro subite, kun la buŝo spagetoplena.

– Jes, mi scipovas.

– Tio estas bone! Tio estas tre bone... Sed, kion?

– Kion?

– Mi volis demandi, kion vi scipovas kuiri plej bone?

– Oho, ĉiaĵojn! – diris ŝi, penante ensuĉi pastfadenon, kiu gluiĝis al ŝia mentono. – Ĉefe ordinarajn manĝaĵojn: gulaŝon, fazeolon, terpomojn diversmaniere, brasikon kun sekviando, salatojn, krespojn...

– Plej grave estas kuiri simplajn manĝaĵojn! – la profesoro laŭdis ŝin. – Kiu tion lernigis al vi?

– Mia avinjo.

– Jes, la avinjoj estas la plej gravaj en onia vivo... Kio estas viaj gepatroj?

– La paĉjo estas pensiulo.

– Sed kio li estis antaŭe?

– Li laboris kiel diplomato...

– Kia estis lia laboro?

– Li estis sekuristo.

– Una! Kial vi ricevis ĝuste tiun nomon?

– Mia patro naskiĝis ĉe la rivero Unao.

– Unao... – rediris la profesoro pensodrone. – La rivero el krucvortenigmo. Kvar literoj horizontale. Unao. La nura. La sola. Oona O’Neill, la edzino

de Charlie Chaplin, la filino de la maljuna Eugene O'Neill, de la dramisto kaj ebrulo. *Longa vojaĝo en nokton*. Lo, ŝia patro estis samaĝulo de Chaplin. Li neniam pardonis al Chaplin, ke tiu forkondukis lian filinon. Kiom da jaroj havas via patro?

– Kvindek du...

– Kiom da jaroj havas vi?

– Dudek kvar.

– Kial vi elektis studi ĝuste amaskomunikadon?

– Via fakultato antaŭ tri jaroj estis tre laŭmoda – respondis Una.

– Kion signifas: laŭmoda?

– Ĉiuj opiniis, ke estas ŝike studi fenomenologion de amaskomunikado!

– Amaskomunikado kaj lakto... Sed kia situacio estas nun?

– Oni diras, ke tio estas „fakultato por posttagmezo!“

– Ili pravas! Sed min interesas, kion vi faros, kiam vi finos la fakultaton, ĉiuj vi, ĉiuj studentoj?

Ni esperas, ke ĉio glatos! Televizio, radio, filmo, gazetoj, sekretariejoj pri informoj, bultenoj, Tanjugo (*Telegrafa agentejo de nova Jugoslavio*)...

– ... ha, kvazaŭ ĉio ĉi ĝuste vin atendas!

– Nu, la knabinoj povas ankaŭ edziniĝi...

– Tio ja estas multe pli reala! – diris la profesoro. – Ni tostu je la sano de estontaj amaskomunikaj dommastrinoj!

Ili tintigis la glasojn.

– Kiun sekcion vi studas?

– La vian.

– Pardonu, mi ne konas ĉiujn studentojn persone...

– Jes, mi scias tion. Viajn prelegojn aŭskultas ankaŭ studentoj el aliaj fakultatoj... ĉiam ĉeestas homabundo. Vi eĉ ne scias, kiel malfacile estas trovi lokon en la amfiteatro!

– Tio estas pruvo, ke onigusto pli kaj pli malaltiĝas... – diris la profesoro rezigne.

– Ne, fakte... – Una estis dironta ion, sed la profesoro ne permesis al ŝi finkonstrui la penson.

– Kiu ne formanĝos ĉion, tiu ne povos intervui la profesoron Babiĉon! – dirinte tion, li verŝis al ŝi ankoraŭ unu glason da vino. – Je via sano! Ĝi ne estas malbona, ĉu ne?

– Al mi ĝi plaĉas, kvankam mi malofte trinkas vinon.

– Kion do vi trinkas?

– Koka-kolaon. Iufoje bieron.

– Vi eraras! – diris li. – Eraregas. Ĉu vi havas koramikon, mi opinias, ke nun oni tion tiel nomas?

- Kompreneble.
- Kio li estas?
- Li estas studento.
- Kion li studas?
- Nun li soldatservas.
- Ĉu vi kaj li longe geas?
- Nemaĵo...
- Ĉu li mankas al vi?

Una vespere mallevis la rigardon.

- Pardonu! - diris la profesoro mansvigante. - Lo, ankaŭ mi vivas kvazaŭ en frenezulejo. Jam multajn monatojn ĉi tie ni ne sidas kune ĉe la sama tablo, en la sama tempo... Ĉiu manĝas kiam alvenas. Kiaj homoj do ni iĝos je la fino?

- Mia familio matenmanĝas kune! - fanfaronis Una. - Sabate kaj dimanĉe kuna tagmanĝo ja estas nepra. Olga tion postulegas!

- Kiu estas Olga?
- La edzino de mia patro... - diris Una ruĝiĝinte.
- Ah, jes. Mi komprenas. Ĉu vi ne fumas antaŭ li?
- Ne! - Konfuziĝis Una. - Kial?
- Ĉu vi havas gefratojn?
- Ne, mi ne havas.

- Nu, jes! Una. La sola. Lo, homoj multe eraras pensante, ke la solinfanoj estas trodorlotitaj. Laŭ mia opinio, ili estas multe malpli dorlotitaj ol la aliaj. Ilia la plej grava sento, estas la sento de soleco. Vi ĉiam iun petas ludi iomete kun vi, aŭ dormi kune kiam vi timas, vi ja neniam scias ĉu la petato konsentos, aŭ ne konsentos, ĉu volos, aŭ ne volos. Krom tio, vi plejparte solas...

- Kiel vi tion scias?
- Mi ja estas solfilo.

Una malrapide fortrinkis la glason da vino. Al ŝi plaĉis sidi ĉe la kuirtablo tiel proksime al tiu interesa grizethara viro. Ŝi sentis sin sekura.

- Kun vi estas splende! - diris ŝi.
- Mi ĝojas, ke al vi ĉi tie plaĉas. Ĉu vi havas propran ĉambron?
- Jes, malgrandan. Malgrandegan.
- Mi povas veti, ke ĝi estas ĉe lifto, ĉu?
- Kiel vi scias tion?

-... en ĝi estas blanka librobreto (diru se mi eraras!), kelkaj ludiloj el viaj infantoj: urseto, domo, kateto, io simila, jes, ankaŭ malnova pupo, sur la muroj estas reklamafiŝoj. Atendu, mi divenu: eble Beatles?

- Janice Joplin.

– Bone, Janice Joplin! Krom tio, tie estas malgranda stereo-aparato, telefono, konektita al la ĉeftelefono en antaŭĉambro... Ĝi estas ruĝa, ĉu mi pravas? Kiam iu telefonas al vi, vi foriras en vian ĉambrom por interparoli. De tempo al tempo vi elrigardas, por certiĝi, ke neniu levis la alian aŭskultilon. Al vi oni telefonas plej ofte inter la sesa kaj la oka... kaj demandas, kion vi planas fari tiuvespere! Koncerne lankovrilon, ĝi estas kvadrumita. Tie estas ankaŭ afrika masko el Najrobio, aŭ ŝildo el Lagoso; via grandigita fotografaĵo, kiun antaŭ kelkaj jaroj faris via amiko – fotografisto. Anstataŭ lustro, kiun vi malŝatas, tie estas blanka ĉina lampiono el papero. Tio estas ĉio! Ĉu vi estas feliĉa?

Una rekonsciiĝis.

– Kion? Mi ne scias. Mi ne pensis pri tio...

Kliniĝinte por eligi kasedilon el sia sako, ŝi diris mense: „Ho dio, ŝajnas ke la vino konfuzis min!“ Ŝi metis la kasedilon sur la tablon apud malplenaj teleroj.

– Do, la intervjuo tamen estas neevitebla! – konkludis la profesoro. Li leviĝis kaj komencis kolekti glasojn, forkojn, buŝtukojn, pankrustojn. La vazaron li metis en lavujon, kaj fluigis varman akvon. Post tio li enverŝis lavpulvoron, kaj komencis lavi la telerojn.

– Ĉu mi helpu vin? – proponis Una.

– Ne, dankon! – rifuzis li. – La lavado de vazoj kvietigas min. Tio helpas min koncentriĝi. Ĉu vi ĉiam uzas ĝin?

Per la kapo li montris al la aparato „Sony“, staranta sur la tablo, kiel kvarangula blato.

– Ĉi tio estas la tria intervjuo en mia vivo... – konfesis Una.

– Mi diros al vi ion: ĉi tiu aĵeto estas ĝenilo! Ĝi estas malagrabilo. Limigilo. Frustrigilo. Maldiskretigilo.

– Kial vi opinias tion? – demandis Una, kolereganta kontraŭ si mem ĉar ŝi ne sciis kiel aktivigi la kasedilon.

– Jen kial: vi alvenis por intervjui min, sed fakte mi intervjuis vin!

Malgraŭ sapŝaŭmo sur la manoj, malgraŭ antaŭtuko sur la talio, li denove profesoriĝis. Lian mildecon anstataŭis preciza prononcado, preskaŭ skandado:

– Kial? Ĉar mi ne utiligis iajn ajn helpajn ilojn, por ion ekscii pri vi. Simpladire, mi interesiĝis pri vi, kaj tio estas la unua kondiĉo por supera intervjuo. Mi rilaksis vin, unue, mi malbremsis, malsovaĝigis vin. Vi estis butero en miaj manoj. Interalie, mi rimarkis, ke vi estas maldekstrulino! Kaj antaŭ ol vi ion ajn ekscii pri mi (krom la fakton, ke mi scipovas kuiru spage-tojn), mi ekscii ĉion pri vi! Do, ni resumu: Una, ĉiam sola. Dudekkvarjaraĝa. La gepatroj estas divorciĝintoj. Traŭmatoj el la infantoj: kaŝaŭskultado de noktaj amsonoj el la dormoĉambro de la patro. Perfidotimo. Dezirogo

elŝiriĝi el la averaĝo. Penopenetri en ĵurnalmondon. Iu diris al vi, ke plej bone estus komenci en „Studento“. Jes. Mi preskaŭ forgesis: krom ĉio ĉi – tre bela! Bedaŭrinde, via tempo jam forpasis! La profesoron atendas novaj, kvankam ne tiel plaĉaj farenaĵoj...

Li malligis la antaŭtukon, kaj malplenigis la cindrujon. Ŝpruclavinte ĝin, li remetis la cindrujon sur la tablon.

– Samkiel vi vidas, mi, fakte, estas bone dresita viro! Al mi estis tre agrable konatiĝi kun vi... – diris li, montrante al ŝi per la mano la pordon de la kuirejo. Una kolektis siajn aĵojn.

– Sed kion pri la intervjuo? – balbutis ŝi.

– Vi ja faris ĝin! Fakte, vi faris iaspecan malintervjuon. Se nenion alian, vi ellernis kiel intervjui...

Dum ili estis trairantaj la duonmalluman ĉambron, la knabo ankoraŭ havis stereo-aŭdilojn sur la oreloj. Li eĉ ne alrigardis ilin. Ankaŭ ili ne alrigardis lin.

– Atendu ĝis la mateno – konsilis la profesoro – tio, kion vi ne forgesos, tio estos la intervjuo! Ĉiujn kromaĵojn vi ne memoros...

Li helpoprete tenis ŝian surtuton. Ŝi provis rifuzi tion:

– Nebezonte, dankon!

– Mi apartenas al la malnova, formortinta virspeco. Al la ĝentilaj dinoŝaŭroj!

Ambaŭmane li elteris la kaskadon de ŝia nigra hararo, kiu restis sub la surtuto. Dum tempeto liaj fingroj tuŝis ŝian varman, glatan kolon. La momento de erotika konfuzo forfluis same rapide, kiel aperis, kiel ununura glimo, post kio li surtiris sian ventjakon el verda armea tolo, kaj haste enŝovis en la poŝojn ŝlosilojn, kraĵonojn, cigaredojn, alumetojn...

– Tamen, mi ja promesis al ili! – parolis Una, descedante post li laŭ la ŝtuparo. – Eble alian fojon?

– Eble... – dirinte tion, la profesoro forkuris al taksio kiu haltis antaŭ ruĝa haltlumo.

Tiun vesperon ŝi ellasis menstruan.

„... mi telefonis al P. kaj, laŭ nia interkonsento, petis intervjuon por la periodaĵo „Studento“. Li respondis, ke li estas tre okupita, ke jam delonge havas nenion dirindan al iu ajn, des malpli por „Studento“, de kiam „Studento“ havas novan redaktantaron. Ĉar mi insistis, li tamen konsentis akcepti min, sed nur mallonge, la sekvan tagon – la 21-an de oktobro je la 13,30 horo, en lia loĝejo. Lia edzino aspektis kiel persono sufiĉe senemocia, rezervema. Mi ne povis konkludi en kiaj rilatoj ili estas, sed P. interalie menciis, ke ili neniam manĝas kune. Li invitis min al tagmanĝo, kiun li mem pretigis. P. estis konsiderinde afabla, eble eĉ iamaniere bonvolema. Ŝajngante, ke li min vidas

unuafoje, li demandis en kiu grupo mi studas, kvankam mi plurfoje rimarkis, ke li dum prelegoj en la amfiteatro min rigardas atente. Cetere, mi ĉiam sidas en la dua vico. Li tute ne parolis pri politiko, nenion diris kontraŭ la reĝimo. La kolegojn li ne kalumniis. Kiam mi menciis, ke liajn prelegojn ĉeestas ankaŭ studentoj el aliaj grupoj kaj el aliaj fakultatoj, li ŝajnis sin modesta, dirante, ke „onigusto en la nuna tempo pli kaj pli malaltiĝas“. Mi ne sukcesis viziti la necesejon, kie troviĝas pentraĵoj kaj libroj, pri kiuj oni parolas en la fakultato. La menciitan intervjuon mi ne sukcesis fari, ĉar li hastis partopreni iun renkontiĝon. Mi havis impreson, ke la opinio de la publiko al li ne estas grava. Al mi ŝajnas, ke li estas homo, kiu scias kion volas, kaj kiu sian volon scipovas realigi. Tamen, al mi ŝajnas, ke en li glimas ia malkontento, kiun li sukcese kaŝas per cinikismo. La vizito daŭris kvardek kvin minutojn. Al mi ne ŝajnas, ke li estis suspektama. Aldonajn elspezojn, krom la prezo de taksia veturo, mi ne havis. Kvitancon mi almetas. La kasedilo kaj bendoj restos ĉe mi, pro ebla daŭrigo de la intervjuo. Mi provos ankoraŭ unu fojon. U.“ – Ĉu kafon? Aŭ sukron? – demandis la vicdekano, prenante aŭdilon.

Neniu respondis. Juna homo sidis senmove, vidalvide al Una, en fotelo kun leonaj piedoj. Kiam oni prezentis ŝin, li elmurmuris sian familian nomon.

Una rigardis la krurojn de la subdekano, kunigitajn kruce, meditante pri tiu speco de ruiniĝinta viro, kiu inter la finaĵo de siaj krurumoj kaj la supro de ŝtrumpoj vidigas sian nudan, blankan karnon, kiun surŝutis nigraj haroj. La ŝvelintaj piedoj, perforte enpuŝitaj en paron da multekostaj brunaj ŝuoj, pruvis ke lia deveno estas nedubeble vilaĝa. Sur la mezafingro li havis nigran orgarnitan ŝtonon. Senvesta li sendube aspektas terure. Proksimume cent dudek kilogramojn da gelatena karno, kiun surkreskis haregoj, estis surŝutitaj de ulceretoj kaj ekzemoj: ne, ne, al tiaj viroj oni vere devas malpermesi amoradon, se ne pro eblaj heredantoj, tiam almenaŭ pro estetikkaj kialoj! Tamen, ankaŭ lin iu sendube amas. Dank al dio, tio ne estas mi! Nu, amas ne nur princoj kaj manekenoj: ĉi-nokte pariĝos ankaŭ malbeleguloj kaj rabobestoj, kaj ĉiuj tion ĝuos.

En la aŭlo de fakultato aŭdiĝis voĉchaoso, kiu sukcesis penetri eĉ tra dika remburita pordo de la kabineto. Ŝi tre deziris esti tie, ekstere, kune kun siaj samaĝuloj, dum iu alia sidas ene! Kial ĝuste mi?

– Jen, ni plej multe fidus ĝuste al vi! – diris la vicdekano. – Mi estas vilaĝa infano, pri tio mi ne hontas; tiel mi parolas, tiel mi pensas, neniam mi eraras farante miajn vilaĝajn konkludojn: vi estas ido el bona familio. Vi ne estas ajnolino! Vi pruvis, ke vi estas kapabla knabinjo. Ni sekvis vian evoluon. Vi iras laŭ la vojo, kiu ebligas al vi iĝi utila membro de ĉi tiu socio. Kiun ĉi tie mi povas peti pri kunlaboro? Ĉu ĉi tiujn burĝidinojn, kiuj por ricevi iom da ŝminko, kaj kelkajn okcidentajn korpokovrilojn, pretas vendi eĉ propran patron? Ĝis nun ni estis kontentaj pri tio, kion vi faris por ni, ni tion aprezos,

kiam alvenos la tempo por tio. Nu, levu la kapon! Ĉu iu ajn memoras tiajn bagatelaĵojn el sia junaĝo? Sango bolas, juneco petolas! Ĉu mi pravas? Vi eĉ ne pensu, ke vi ankoraŭ ion devos fari por ni. Nun ni devas ion fari por vi...

Parolante al Una, la vicdekano oftfofte alrigardis sian silenteman gaston, kvazaŭ petante ies subtenon. Tamen, la vizaĝo de la juna homo vidigis nenion alian, krom paciencon kaj vomemon. Vestita diskrete, kun certa eleganteco, li impresis kiel aŭtoritatulo, kvankam li estis multe pli juna ol lia gastiganto. Ŝajnis ke li somnolas en la fotelo, sed tamen, ĉiufoje kiam ŝi turniĝis al li, Una rimarkis, ke ŝin atente kontemplas du drivantaj brunaj okuloj sur lia vizaĝo kun streĉitaj muskuloj. Senriproĉe svelta, butonumita, kun longeta, akurate flegita malhela hararo, ĉi tiu junulo povus esti akceptejestro, alta protokolisto, personalestro aŭ posedanto de picvendejo – io ajn, sed lia olivkolora vizaĝo ne vidigis troan dozon de firmeco kaj malestimo al ĉiuj, kiuj tion ne havis. „Se li estas edziĝinta, li sendube ne kokras sian edzinon“, mense diris Una, kontemplanter lin sub siaj okulharoj.

– Vi povas paroli libere antaŭ la kamarado... – kuraĝigis ŝin la vicdekano.  
– Antaŭ li mi havas neniajn sekretojn!

Tiam eniris bufedistino, kiu komencis disdonadi kafon kaj sukojn. Una rimarkis, ke la vicdekano ne trinkas el la samaj tasetoj kiel studentoj. Ĉi tiuj tasetoj estis faritaj el fajna fajenco, kun orrandaj teleretoj. Ili silentis ĝis kiam la bufedistino eliris el la kabineto.

– Tio povis okazi al ĉiu... Cetere, tio estas granda problemo por infanoj de niaj kamaradoj, kiuj vivis dise-mise en la mondo! – Nun li parolis al la junulo en la fotelo. – Unu lernoĵaro en Afriko, dua en franca lernejo, tria ĉe usonanoj... La infanoj perdas la kontakton kun la patrujo, la patroj estas, tion ĉiuj scias, trookupitaj, ili ne havas tempon. Jen! Ilin estas facile influi. Propagando. Nu, bone! Hodiaŭ tion ja neniu rimarkus, ni ja iĝis parto de la mondo, sed antaŭ ses jaroj, ni ankoraŭ ne estis al kutimiĝintaj al tio! Mi tion rakontas nur ĉar tiu problemo min interesas. Jen, antaŭ nur kelkaj tagoj, mia sampatrujano, iu...

„Kial li jam ne komencas paroli konkrete?“ – Una tordiĝis en la fotelo. „Kial li faras tiel longan enkondukon?“ Ŝi decidis elŝalti la sonon (klak!), sed la bildo ankoraŭ estis tie. La kabineto, meblita per multekostaj civilaj kiĉaĵoj, evidente ekzekuciitaj el iu eksministra domo, ekmovis siajn murojn, transformiĝante en premilon por pakado de kvarangulaj uloj. Gravuritaj libroŝrankoj similis al la portalo de Trogira<sup>1</sup> ĉefpreĝejo; pompa inkujo, farita el marmoro, sed delonge sekega (nuntempe neniu skribas per plumingo) – senviliĝinta persa tapiŝo, polvoplenaj fikuso, kaj super ĉio, kaj el ĉio, vastiĝis mucida fetoro de la administracia epoko (kiel Una ĝin imagis); fajna tavoloĝinta grizeca polvo kaj cindro,

1 Trogiro – urbo en Kroatio (tiutempaparto de Jugoslavio).

kvazaŭ estus kovranta kaj homojn kaj objektojn kaj spiritojn de dikaj maskloj en ledaj ĝisteraj surtutoj, kiuj iam establis sin sur ĉi tiu teritorio. Kvankam ĝi troviĝis en la konstruaĵo de fakultato – do, en la templo de scienco – la kabineto multe pli konvenus esti esploristejo el la libro de Nadeĵda Mandelštamo, kie superaj oficiroj proponas al akuzitoj cigaredojn el ora cigaredujo, sed poste ilin bategas en ĉambroj kun glataj ceramikaj muroj (sango sur glita blanka fono. Ŝtono!). Ĉu ankoraŭ ekzistas tiuodoro, kaj tiuj homoj; ĉu ili delonge ne formortis kaj translokiĝis en mitologian arĥivon? Tamen, malgraŭ la pompa stilo de eŭforia cizelaĵo, kies nekrofilia nigra-ora kombinaĵo pli konvenus al manĝejo de sepultejstro (Fajro, Flamo, Eternejo aŭ Konkordio?), io konfuzis Unan en la atmosfero de ĉi tiu vasta ĉambrego: unu verisme skulptita kaj kolorigita gipsa bovino rigardis sentimentale desur la supro de ŝranko, memorante, verŝajne gipse kaj bovinece, la tempon, kiam en ĉi tiu konstruaĵo troviĝis la Agrikultura fakultato aŭ la Plankomisiono pri evoluo de brutobredado. „Al la kamarado Miciĉo por imitenda humanismo dum la batalo por realigo kaj plusrealigo de la unua kvinjara plano de brutobredado. La kolektivo, 1949.“ Ankoraŭ io perturbis la stilan unuecon en la dominterno de la sinjorino Konkordio: sur muroj pendis iam nigraj-blankaj, nune jam sepiĝintaj fotoj, sur kiuj troviĝis grupoj de paliĝintaj viroj, en pezaj dikŝtofaj surtutoj kun larĝaj roversoj; la virojn sur disfositaj eksperimentaj kampoj sekvis malbonhumoraj personoj kun feltoĉapeloj sur la kapoj. Apud ili aroj da viroj kun akraj makzeloj, ĉiuj en malhelaj vestoj, kaj kun bantoj, rigardis streĉe al fotografisto dum ies doktoriĝo, kvazaŭ atendente ties reagon al sortdecida demando de la komisiono. Tie estis kaj marbordaj regionoj, kaj tabuletoj kun teksto „Dankon, ĉar vi ne fumas!“ kaj multobligitaj instrukcioj, sed pendis ankaŭ du jarojn malnova kalendaro kun foto de knabino en motorboato. Super ĉio ŝvebis grizeco, apenaŭ rimarkebla, netravedebla, amara; kvazaŭ la loĝantoj de ĉi tiu ĉambro ne konsciis la kadron, en kiu ili vivas – samtiel staras la blindulo, kiun iu alia vestas kaj ligas lian kravaton, la unuan kravaton, kiu estis trovita en murŝranko. Pro sia aĝo, Una, kompreneble, ne povis difini la devenon kaj esencon de ĉi tiu kancelaria scenografio – ŝi ricevadis ĝiajn mesaĝojn, elsendatajn de koloro, odoro kaj dismeto, kvazaŭ ĵus kaptita sciuro, fermita en la kaĝo de besta ĝardeno. Snufante la spurojn de objektoj, kaj ilian mallogikan dismeton, ŝi per sia sentiveco tamen antaŭsentis ke tio estas kaptilo. Ŝi denove funkciigis la tonon, kaj tra malproksima resonado ŝian aŭdsenton atingis interrompitaj fragmentoj de frazoj, elparolataj de la vicdekanano „etburĝa duonintelektulo... anarĥi-liberalaj maldekstraj dekliniĝoj... demagogia aliro al la juna generacio... aprobo de burĝa-okcidentama gusto... senkritika rilato al niaj atingoj... kritikamo... gvidamo... subminado de nia evoluo... disidenta konduto... kontaktoj kun malamikaj intelektulaj rondoj en nia lando kaj en eksterlando... ĉarmigo kaj delogado de studentinoj... cinika rilato

al nia realeco...“ kaj fine, unu nomo penetris la ŝirman ŝelon de la konscio de Una – Miŝelo Babiĉo! La kabineton kovris la kurteno de silento.

– Kial vi nervozas? – aŭdiĝis unuafoje la juna homo el la fotelo.

– Kion?

– Kial vi nervozas? – rediris li.

Una alrigardis sian malpurblankan tenisŝuon, kiu memvole sekvis iun, nur al ĝi konatan internan, malkonvencian ritmon.

– Ĉu mi? Mi ne nervozas. Kial vi demandas?

– Ĉu vi konas fremdajn lingvojn?

– Mi lernis la anglan... – diris ŝi, post kio la homo denove dronis en silenton.

Antaŭ Una krake kaj klake disiĝis du hemisferoj de la pomo-mondo, pri kiu ŝi longatempe naive kredis, ke ĝi estas unueca, tuta kaj nedisigebla. Ekstere bolis vivo, resonis ridado, ekstere tondris paŝoj de kuranta studenta grego, torentis duonfreneza, stulteta modo kun siaj neantaŭvideblaj tendencoj kaj kaprizoj, tie oni maĉis gumojn, estis naskiĝanta nova ĝu-ĝu-muziko, oni interŝanĝadis diskojn; ekstere estis sendeva amo, pasumado kaj klaĉado, feliĉa tempabundo – tute alia vivostilo, kiu kvazaŭ havus nenian rilaton al ĉi tiu, ĵus elfosita administracia katakombo, en kiu pastroj de jam delonge formortinta religio surhavas ankoraŭ ĉiam akuratajn grizajn vestojn, flegas siajn konduktregulojn kaj siajn sekretajn ritojn. Kvazaŭ ŝi, simile al Alisa en mirlando, subite ŝoviĝus tra breĉo en disfendiĝinta realeco, kaj konstatis, ke ĉi tiuj ridinde malserenaj personoj, se ili tion ekdezirus, tamen povus ŝanĝi la sortojn de la feliĉuloj, kiuj troviĝis ekstere; ĉi tiuj povis haltigi ilin, detrui, aĉeti groce kaj detale, rapidigi aŭ premii; malantaŭ ĉi tiu remburita pordo en la kabina tempomaŝino, kvazaŭ nenio estus ŝanĝiĝinta, tie vivis la gardistoj de la fakultata hierarkio, tute ne atentante naskiĝon de nova, aŭdaca kaj liberigita civilizacio; sennombraj eblecoj vastiĝis antaŭ ĉiu homo, havanta malpli ol tridek jarojn, krom antaŭ ŝi, antaŭ Una, kiu multe pli ol iam ajn antaŭe komprenis, ke ĉi tiuj homoj regas ŝin, ke ili, vere, eble, estas nur koŝmara sonĝo, sed ke ĝuste ŝi tion vidas dum sia maldormo. Ŝi devus, fakte, vekigi kaj alrigardi ilin surprizplene: „Oho, kion mi faras ĉi tie kun vi? Fakte, kiu vi ja estas?“ – kaj trankvile eliri tra ĉi tiu pordo; tio eble estus plej saĝa, nenio terura okazus, sed ŝi tre sciis, ke ŝi tion ne faros. Ŝi provos elegante liberiĝi de ili, uzante sian intelekton kaj ruzecon. Ankoraŭ iomete ŝi eltenos, longigante ĉion ĉi kiel maĉgumon, ĝis kiam ili ĉion forgesos, ĝis kiam ŝi finos la fakultaton, aŭ ĝis kiam iu ilin, eble, denove anstataŭos, venigos iujn aliajn, kun kiuj ŝi havos nenian kontakton. Pro tio ŝi koncentriĝos al la instrukcioj, kiujn ŝi ricevis, kiel tre bona, diligenta studentino, kiu pie skribas notojn.

Post tri tagoj ŝi sendis la unuan raporton, sekvante samtempe la instrukciojn ne eniradi, sen urĝa bezono, la kabineton de la vicdekano.



(La unua bendo)... unu, du, tri, unu, du, tri, unu, du, tri... Diru ion! Kion? Ion ajn? Bone. Unu, du, tri, unu, du, tri! Ĉu nun estas en ordo? Jes, nun estas en ordo! Mi opinias ke estas en ordo. Ĝi turniĝas.

– Antaŭ ol komenci ĉi tiun interparolon, kiu min, vere, lacigas, kaj kiun mi akceptis nur ĉar via persisto estis pli granda ol mi tion atendis, mi devas, bedaŭrinde, konfesi: mi tute ne ŝatas junulargazetojn!

– Kial?

– Lo, en la grandaj urboj de la mondo, en ĉiovendejoj, ŝajnas al mi, ordinare en iliaj teretaĝoj, ekzistas ĉirkaŭbarita spaco, kie plenkreskuloj lasas la infanojn, dum ili aĉetumas. La infanoj tie povas bone amuziĝi; je ilia dispono tie estas lignaj lulĉevaloj, pilkoj, ludiloj, kaj jen, tie ili havas ankaŭ gazetojn, por kiuj ili povas skribi kaj roli ĵurnalistojn. Tie al ili estas permesite kritiki la paĉojn kaj panjojn, mordadi iliajn krurojn, kaki sur plankokovrilojn, kaj sur ĉion alian, kio al ili ne plaĉas, ĉar tiu spaco, pri kiu mi parolas, estas parto de la ĉiovendejo en serioza konsumsocio – malgranda infana rifuĝejo.

– Jes, sed oni opinias, ke tiuj gazetoj nuntempe estas, tamen, la plej liberaj, ĉu ne?

– Sen dubo. Ĉar kiam la infanetoj troigas, aŭ kompromitiĝas, la plenkreskuloj ordinare diras: „Bone, vi ankoraŭ estas tro junaj, ni ekskuzos vin!“ Cetere, post unu aŭ du jaroj, vi ĉiuj finos vian studadon, kaj komencos vivi ribelemaj, kun longaj hararoj kaj barboj (kiujn vi post certa tempo, kompreneble, tamen mallongigos), kaj ĉe la elirejo vin atendos sinjoro Vivo persone, ĝi komencos vin sufoki per kreditoj, loĝejoj, salajroj kaj partopagoj, manĝaĵoj por beboj, polvosuĉiloj, malsanulaj libertempoj kaj naskiĝtagoj de beboj – vi metos kviete viajn belajn kapetojn en kaptomaŝojn, faritajn el pastfadenoj por dimanĉa supo! Kaj tiam, malrapide, via ribelemo deĝelos kiel glaciaĵo sub la suno. Nur kelkaj inter vi, nur kelkaj, kiuj estos tre bonŝancaj, aŭ malbonŝancaj, negrave, restos ankoraŭ frenezaj, ili protestos eĉ kiam maljunuliĝos. Do: la juneca protestemo estas, laŭ mia opinio, sama kiel ĉiuj aliaj infanaj malsanojn, kiujn oni devas trasuferi: mumpso, rubeolo, skarlatino, variolo, la unua amo... Tio, fakte, estas tute normala konduto!

– Ĉu oni ankaŭ vin sufokis per pastfadenoj, aŭ vi konservis vian ribelemon?

– Lo, vi estas, probable, jam dudeka generacio kiu min intervjuas. Dudekjaron mi respondas al la samaj demandoj, kaj tio jam tedas min. Mi havas kvardek kvar jarojn, mi havas dek unu jarojn pli ol havis Jesuo Kristo, mi ja vidis ĉiaĵojn. Mi ne emas koketi kun vi, kun la junaj...

– Cetere, kia estas via sperto...?

– Interese, mi rimarkis ke, ju pli aĝa mi estas, des pli belaj estas junaj damoj, kiuj venas intervjui min. Tiusence, ĉi tiu jaro estas rekorda...

– Vi ne respondis al mia demando!

– Pri kio?

– Pri la protestemo!

– Pardonu, mi jam estas en aĝo, kiam mi iomete forgesas aferojn. Lo, mi devas konfesi, ke mi neniam konsideris protestemon speciala mensa disciplino, aŭ io speciale kvalita. Cetere, tralegu kion pri tio diris la maljuna Seneko – kvankam mi dubas, ke iu ajn ankoraŭ legas liajn verkojn. Mi preferas toleremon, ol protestemon. Mi estas netolerema nur rilate al netoleremuloj! Vi ja vidas, kiel lerte kaj sprite mi respondas al viaj saĝaj demandoj!

– Kion vi opinias pri la protestemo de junaj homoj?

– Mi opinias, ke la protestemo, kiel dekoracia elemento, estas jam eluzita. Tion ĉi mi multajn fojojn vidis, tial mi nun iras dormi, kiam oni denove ĝin vidigas televizie.

– Kion vi opinias, kiel la junaj homoj sen protesto trovos kaj konkeros sian lokon en la vivo, kiam ĉiujn gravajn poziciojn ankoraŭ ĉiam okupas nejunuloj?...

– Ĉiam ĉion okupas nejunuloj! Ĉiam, en ĉiu tempo. Tamen, la juna homo devas havi eĝan motivon kaj fortan motoron por venki ilin. En la tempo,

kiam mia generacio trapuŝiĝis, kiel diri tion... Nu, bone, en tio, kio nomiĝas la publika vivo, ankaŭ tiam regis maljunuloj, sed niaj motoroj estis pli fortaj: ni trairis ilian blokadon, kiel Orienta-eksprestrajno trairas monton el kremkukoj!

– Kio, laŭ via opinio, povas esti uzata kiel igilo?

– Granda malamo, granda amo, granda senespero, foresto de alia elirejo... Kiel ribeli kontraŭ la kosmaj kondiĉoj? Tio ja estas malmoda monddoloro. Tamen, se oni ne havas egan motivon, se plenkreskuloj al oni jam en frua aĝo havigas ĉion, kion oni bezonas por komforta vivo; siajn malgrandajn ludilojn, sian gazeteton, Domon por junularo, avangardan teatron, vestindustrion nur por la junaj homoj, radio-programojn kaj gramofonajn diskojn, se oni jam havas siajn ĉambretojn, en kiujn oni povas libere venigadi oniajn koramikojn kaj koramikinojn, kial oni, je diablo, protestus! Ni devis trudpreni nian spacon, librojn, katedron... Kaj fine – rajton havi propran penson, kio ne estas malplej grava en ĉi tiu historio!

– Diru al mi ion pri la libereco de pensesprimo?

– La homo prenas tiom da libereco, kioma estas la kapacito de lia pulmo. Neniu al vi venos kaj diros: „Nu, de nun vi estos iomete pli libera! Diru kion vi volas, skribu iom pli libere...“ Tion vi devas mem akiri – kaj pagi pro tio diversmaniere. Memkompreneble, mi povas nombri ĝis dek, sed se vi estas vera homo, se vi estas denaska luktulo, se vi estas eltenema, vi rapide leviĝos desur la planko, kaj denove revenos en la ringon. Da libereco, do, vi havos tiom, kiom vi bezonas, kaj vi pagos tioman prezon, kioman vi estas preta pagi.

– Kiom vi estas libera en via laboro?

– Mi ne estas bravegulo, se vi opiniis, ke mi diros tion. Se mi bone pri-pensas, al mi ŝajnas, ke mi tute ne partoprenas ian ajn batalon.

– Tio eblas, ĉar vi jam venkis...

– Ĉu vi pensas tion? Ne! Tute ne! Plejofte, do, mi staras flanke, mi nur provas, kaj al mi, kaj al la aliaj, klarigi la fenomenon de amaskomunikado. Tio estas ĉio! Eble mi iam vere provis batali, sed mi jam delonge ne partoprenas tiun ludon. Ĝi min ne interesas!

– Ĉu vi pensas, ke eblas ĉiam esti supre, sube aŭ flanke? Tio estas, se vi permesas ke mi tion diru, sufiĉe komforta pozicio?

– Mi multekoste pagis tiun pozicion.

– Do, se mi bone komprenis, laŭ via opinio, tio estas...

– ... nur laboro de atestanto. La atestanto ne partoprenas persone iun ajn malfeliĉon. Li nur atestas. Do, li devas esti objektiva, se li deziras, ke oni kreu al li.

– Tamen, vi tre influas junularon... Tio estas fakto.

– Mi rifuzas ajnan respondecon pri tio!

– Viaj prelegoj estas la plej vizitataj... La amfiteatro ĉiam estas plenplena da tiuj, kiuj staras por aŭdi vin – ĉar mankas sidlokoj. Oni viajn prelegojn en la Fakultato jam nomas „amuzprogramo“! Kiamaniere vi klarigas tiun sukceson?

– Ĉu vi pensas, ke tio estas sukceso? Miaj prelegoj ne estas vizitendaj. Dum la prelegoj mi ne disdonas subskribojn. Min ne interesas, ĉu oni vizitos aŭ ne vizitos miajn prelegojn. Mi neniu invitas aŭskulti min, aŭ aplaŭdi. Mi ne klopodas persone plaĉi al iu ajn. Ĉu vi estas kontenta pri mia respondo?

– Mi estas, sed kontentaj ne estas multaj viaj kolegoj, kiuj eĉ tri studentojn ne povas aŭskultigi. Mi opinias, ke ili envias vin pro tioma via populareco!

– Neniu estas enviimuna. Jen, tio estas ĉio, kion mi povas diri kiel mian defendon...

– Vi ne estas akuzito!

– Ĉu vere?

– Ne, vi vere ne estas...

Ankoraŭ io: la studfako, kiun mi lecias, estas tre alloga, ĝi koncernas grandan kvanton da homoj, kaj komunikadon inter ili. Kial tio allogas ĝuste junajn homojn, tion mi malscias! Fakte, mi neniam faris eraron, koketante kun junuloj, nur pro tio, ĉar ili estas junaj. La juneco por mi havas nenan specialan valoron. Aĝo vin baldaŭ liberigos de tiu malhandikapo! Iuj miaj kolegoj timas, ke ili eksmodiĝis, ili timas, ke ili malaktualiĝis, pro tio ili flatas la studentojn, kiuj tion, simple, sentas kaj tial ne vizitas iliajn prelegojn. Aliaj, tamen, opinias, ke ili estas protektitaj dank al siaj funkcioj, oficoj kaj doktoraj titoloj, kvankam tio en la nuna tempo nur malmultajn povas impresi. Se ni aldonos ankaŭ, sen falsa modesteco, ke mi ne estas tro enuiga, jen tio estas iaspeca respondo al viaj demandoj...

– Mi preskaŭ forgesis: Miŝelo Babiĉo! Kial: Miŝelo?

– Tio estas klasika france-serba kombinaĵo. Vivu la aliancanoj! Mia patrino estis duonfrancino – la patro – Beogradano, unu avino estas el Topolo, la alia el Normandio. La avo, kuracisto, unu el mil kaporaloj, revenis el ekzilo kun edzino, kiu neniam ellernis komplete la serban lingvon. Ĝis la fino de sia vivo, anstataŭ cerbaĵon, ŝi demandis en viandejoj „saĝon de bovido!“ Ho, brila persono ŝi estis! Mi nomis ŝin Me-me, pro kio en Tria vira gimnazio, kie ŝi instruis la francan lingvon, la gelernantoj ŝin nomis Me-merka!

– Antaŭ ol veni al vi, mi konatiĝis kun via biografio; kiel okazis ke vi naksiĝis en Parizo? Hazarde aŭ...


– Lo, kvankam mia avino amegis serbojn, pro kiuj ŝi, cetere, eĉ forlasis sian patrolandon, familion, komencitan studadon, ĉion, ŝi havis fiksideon ke mi devas naksiĝi en Parizo. „Domoj forbrulas, bienoj pereas, monon oni ŝanĝas, bibliotekoj disfalas...“ – parolis ŝi al mia povra patrino – „sed la loko de naskiĝo

ĉiam troviĝas en la pasporto, negrave kien oni vojaĝas. Mi volas al mia nepo (do, al mi) donaci ion por la tuta vivo – la plej bonan lokon de naskiĝo en la mondo: Parizon!“ Kaj vere, unu monaton antaŭ la akuŝo, ŝi forveturigis mian patrion en Francion, kaj tial mi naskiĝis en Deksesa arondismento, pli precize en la familia domo de mia avino, en Rue des Belles Feuilles 75.

- Ĉu vi iam ajn vivis tie?
- De tempo al tempo...
- Kion vi opinias pri via vicdekano?
- Kiom da jaroj vi havas?
- Unue mi faris la demandon!
- Mi prefere ne respondos al tiu demando.
- Onidire, vi iam estis nedisigeblaj amikoj?
- Ĉu vi demandas por via gazeto?
- Ne. Tio interesas min, nu, tiel...
- Ni estas ĉi tie, por ke vi intervjuu min, ĉu ne?
- Pardonu!
- Negrave, negrave! Cetere, mi jam devas foriri...
- Ĉu jam?
- Ĉu vi havas ankoraŭ iun demandon?
- Mi ja nur komencis! Ĉu ni daŭrigos?
- Morgaŭ kaj postmorgaŭ mi estas absolute tempomanka... Telefonu vendredon. Sed, frumatene! Eble mi havos iun paŭzon...
- Kion, laŭ vi, signifas frumatene?
- Nu, ekzemple, je la deka horo!

**(La bendo ebligas sesdekminutan surbendigon)**

„Ŝajnas ke li logiĝis...“ **(frazo el la raporto de Una)**



Zen-ĉambro troviĝis sur la dudek kvara etaĝo de soleca ĉielskrapulo en la kvartalo Stelaro. Kaj vere, sur ĉi tiu monteto, Beogrado kvazaŭ estis la plej proksima al la steloj. La ĉambro ni povis atingi per lifto, sed ĝi ofte paneis. Ĝia ligna kabino, kiun iam plakis hela, lakiita ligno, kaj jam delonge rompigitaj speguloj, estis aŭtentika malgranda antologio de primitivegaj pornografiaj mesaĝoj, versoj, blasfemoj kaj obscenaj scenoj, enskrapitaj per poŝtranĉiloj, ŝlosiloj, najloj, ungoj, skribitaj per tuboplumoj, koloraj sprajoj, kaj eĉ per damaj okulkraĵoj. Sur la plafono prancis giganta faluso, sur kiun estis surpikita rondforma virineto kun disstaraj gamboj. Kvazaŭ la tuta prikaŝita kaj longe subpremata erotika ŝargo de ĉi tiu betona domegaĉo ŝprucis en la sekurejo de la knarema kaj klakema lifto -lasciva kapelo, kun nekonjektita impeto, dezirante per senbrida malmoraleco ekstermi kaj neniigi eĉ la lastan spuron de prudeco de siaj pasaĝeroj. Kiam oni devis supreniri laŭ ŝtuparo (en ĉi tiu urboparto elektro ofte mankis), tiam eblecon interkonatigi havis ankaŭ la loĝantoj de ĉi tiu tipa Beograda novdomo. El la kelo impete torentis fiodoro de enbarela acidbrasiko, miksitita kun la fetoro de malvarmiĝinta cindro kaj balaajoj; tiu odoro serĉis elirejon tra ventolaj aperturoj, ŝtuparsaktoj kaj liftujoj,

preskaŭ premata kaj portata de malfreŝa aero kaj fiodoro. Sur interetaĝaj platformoj, antaŭ pordoj en grandaj ladkestetoj kreskis plantoj – aŭtentikaj malgrandaj pendantaj ĝardenoj de la povra Semiramisa; kelkloke la pasejon ŝtopis ŝrankoj, neuzeblaj fridujoj kaj kestoj restintaj post transloĝiĝo; sur multaj skrapmatoj, faritaj el falditaj kamparanaj hejmkudritaj linkovriloj, ripozis trouzitaĵoj kotaj ŝuoj kaj lignosandaloj. Ĉion saturis la specifaodoro de grasfritita faruno, kiu, ŝajnis esti penetranta en ĉiun haŭtporon, kaj en ĉiun fadenon de la vestoj de vizitantoj. La loĝantoj – plejparte emeritiĝintaj fervojistoj, malaltrangaj oficiroj kaj poŝtoficistoj – ŝajne jam delonge kutimiĝis al la tradicia malbonodoro de la ĉielskrapulo; iliaj edzinoj, kies ŝultrojn kovris senformaj domaj roboj, kun kaptukoj, promenitis senzorge sur ŝtuparplataĵoj, lavis betonon antaŭ siaj pordoj, aŭ, fumante, interparolis; ili rigardis kun senkaŝa suspekto ĉiun, kiu alvenis en ilian fortikaĵon. Sed malŝlosinte la pordon de la loĝejo 69, oni tuj forgesis la penigan vojadon tra la ĉiutageco de ĉi tiu formikejo; en tiu momento oni kvazaŭ enpaŝus Aranjon de Rala-Hamio. Kvazaŭ iu malsane trosentema, perverseta infano, priŝtelante nekonatajn templojn, estus tie konstruinta sekretan kaŝejon, meze de malrida averaĝeco de la patra hejmo, por iel savi la animon. Absolute alia vivo flagris kaj fontis el ĉi tiuj muroj. Preskaŭ ne ekzistis malplena loko sur la oranĝaj muroj, el kiu ne elrigardis homaj kaj animalaj supernaturuloj – vera budisma poŝa templo sur Stelaro! Super malalta, komforta kuŝejo, kiun kovris same oranĝa teksaĵo kun granda flava cirklo en la mezo, orita Budao tranĉis per sabro sian hararon, dum du negrandaj Budaoj el nigra, glata ligno kuŝis en pozoj de nirvano. Ĉi tiu spaco enhavis ion eksteritorian; tamen, malgraŭ la troeco de la siama baroko, kiu implikiĝis en sin mem, la zen-ĉambro havis ion samtempe sanktan, asketan kaj puran. Iu tute nesimila al la aliaj, kaŝiĝis de la mondo, ŝajne, en ĝi.

Konsekritaj fingroj sentebliis sur rozario el grandaj, rondaj semeroj, sur polurita supraĵo de ĉiu malgranda statueto el elefantosto kaj bronzo, sur manĝbastonetoj, kaj sur ĉiu peco de modestaj kaj simplaj mebloj. Tamen, ĉar la zen-ĉambro estis parto de la tuta ĉielskrapulo en la strato Jovano Duĉiĉo (sennumera), estis perfekte klare, ke tia speco de fuĝo estas neebla. Antaŭ ĉio, pro la ĝenerala Balkana odor kiu, ŝajne enŝoviĝis en ĉiun parteton de la betonaĵo. Dum Una sendecide staris meze de la zen-ĉambro, snufante la spacon, en kiu ŝi subite kaj senprete aperis, la profesoro forpelis la ŝiman fetoron de la ĉielskrapulo, flamigante kelkajn bonodorajn incensstangetojn, kies nobla fumo jam post kelkaj minutoj fordrivas, kun la portempaj loĝantoj, en la misteran sanktecon de cejlona templo.

– Sidiĝu! – diris li al Una. – Mi devas unue telefoni...

Una observis la librojn, kiuj, mirinde, ne estis tre multenombraj. Ŝi eltiris el breto „Zen-rakontojn“, kaj senelekte malfermis la libron.

– Ĉu vi volas, ke mi montru al via la plej bonan? – demandis la profesoro kaj prenis la libron el ŝia mano. Li turnis dekon da folioj, trovis kion volis, kaj redonis la libron al Una.

Dum ŝi legis, li longatempe estis iun konvinkanta franclingve, forgesinte ke ŝi estas tie.

Fininte la interparolon, la profesoro kuŝiĝis dorse sur la kovrilon kun flava cirklo:

– Pardonu – diris li – mi estas lacega. Mi havis teruregan tagon...


Una estis kontrolanta, kiel funkcias ŝia „Sony“.

– Ĉi tiel ja ŝajnos, ke mi estas ĉe psikiatro. Mi esperas, ke mi ne devos rakonti pri mia knabaĝo, ĉu ne?

– Unu, du, tri... Unu, du, tri... – nombris Una.

– Veku min se mi ekdormos! – petis la profesoro. – Mi havas vespermanĝon je la oka.

„Mi ekzistas!“ tralegas Una mesaĝon sur malgranda slipo, najlita sur la muron, super la kapo de la profesoro.



**(La dua bendo)** „... fakte, ĉiu intervjuo estas siaspeca mensogo! Kaj la demandanto kaj la respondanto klopodas krei kiel eble pli pozitivan impreson pri si. Ili, fakte, esprimas sian opinion nur en harmonio kun tio, kion oni de ili atendas, ĉar ili estas publikaj personoj. Tiusence la plej mensogaj estas la intervjuoj, el kiuj sparkas mensofrapaj spritaĵoj. Ĉiu efekta, anticipa pripensita sprita demando kvazaŭ paralizas eblan respondon. Pro tio, tia intervjuo estas siaspeca duelo, ĝi pleje similas, verŝajne, la ĝenron de dupersona familia dramo. En mian kapon venis la ideo, ke la intervjuo povas esti ankaŭ siaspeca publika konfeso, (ĉar niaj nuntempuloj ne konfesdonas surgenue en preĝejo), sed pri ilia konfesdono ekscios multaj homoj, pro kio la intervjuato ne povas esti plene sincera, kaj nepre uzas memcenzuron. Kompreneble, la katolika eklezio, diference de la nuna gazetaro kaj televido, povas certigi pekliberiĝon, dum la publiko, male, se la intervjuo al ĝi ne plaĉas, ordinare postulas la vivon de la homo, kiu ne kontentigis ĝiajn esperojn, dirante ion blasfeman...

– Kia, laŭ via opinio, devus esti la vera intervjuo, se tia intervjuo entute estas ebla?

– Se tia intervjuo, entute, estas ebla, ĉu? Ŝajnas, ke mi tamen estas neplibonigebla optimisto. Mi diros al vi tion: mi opinias ke ĝi estas ebla! Mi ja nomus ĝin – totala intervjuo!

– Kiusence?

– Unue, tia intervjuo devus esti sufiĉe ampleksa, por enhavi ĉiujn aspektojn de la intervjuato. Tio signifas ke, krom tio, kion tiu persono mem

parolas pri sia percepto de la mondo kaj vivo, ĝi devas enhavi ankaŭ diagramon de verdetektoro, ekzemple tonan registron de voĉtempo, kardio-gramon, encefalogramajn raportojn, sang-analizon, ĉiujn informojn pri la korpopezo, konstitucio, okul koloro, informojn pri ties parencoj kaj amikoj, pri la loko kie la intervjuato vivas, pri la manĝaĵoj kiujn li konsumas, mallongajn noticojn pri la homoj kun kiuj li renkontiĝas, fotojn kaj faksimilojn de lia manuskripto, fingrosignojn, eble horoskopon, responditajn psikologiajn testojn, foton de la maldekstra manplato, liston de la plej gravaj libroj kiuj formis lian menson... kaj tiel plu. Ĉi-momente mi, tamen, ne memoras absolute ĉion, kio devas esti en ĝi, por ke ĝi estu totala!

– Tion neniu aperigus!

– Vi plene pravas! Mi ne parolis pri la gazetoj, aŭ pri iu revuo, ĉar ili, fakte, estas kvazaŭ ŝtonepoko de la amaskomunikado! Tiu intervjuo devus esti planita kaj realigita kiel multikomunika disciplino, kaj mi kredas, ke ĝuste al tiu tipo de intervjuoj apartenas la estonteco!

– Kio ebligas al vi fari tiun konkludon?

– Vi, samkiel mi jam rimarkis, uzas tiun aparateton senpripense. Al vi ŝajnas tutnature, ke sur la bendo estas notitaj miaj vortoj, kiujn vi poste reprodukos kaj transformos en iun formon de la Gutenberga galaksio. Do, vi uzas la kasedilon, tute ne pripensante, kiel ĝi funkcias, same kiel vi telefonas aŭ fotas. Sed mi, kiu estas dudek jarojn pli aĝa ol vi, kiu profesie okupiĝas pri esplorado de diversaj iloj por interhoma komunikado, ankoraŭ ĉiam flegas certan dubon rilate al tiu aparato, ĉar mi naskiĝis kaj kreskis antaŭ ĝia eltrovo. Antaŭ nur dek kvin jaroj la magnetofonoj estis maloftaj en nia regiono, la plej malpeza inter ili havis ne malpli ol dudekon da kilogramoj; ilin plejparte uzis speciale istruitaj sonreĝisoroj por radiostacioj. Nuntempe infanoj surbendigas eĉ siajn unuajn recitaĵojn. Desur la stratoj de Beogrado delonge malaperis fotografistoj – nur en la fortikaĵo Kalemegdano, se mi bone memoras, estis deko da ili! Kial? Ĉar nuntempe ĉiuj fotografas. Dank al la evoluo de foto-industrio, sur la merkato aperis milionoj da malmultekostaj fotiloj. Jam iĝis sence lerni sumigadon, dekalkuladon, dividadon kaj multobligadon, radikadon aŭ elcentadon; kalkulilojn, ne pli grandajn ol almetujo, utiligas eĉ bazlernejoj dum instrueroj de matematiko. Ĉio ĉi pensigas min ke ankaŭ la klasika intervjuo, kiu iam estis farata nur per kraĵono kaj papero (sed en via tempo, jen, oni jam uzas kasedilon aŭ televidan kameraon), estos multsente ŝanĝita; ĝin riĉigos granda aro da esprimaj kaj teknikaj iloj, kiuj baldaŭ estos je nia dispono. Tamen, ni eĉ ne unu momenton rajtas forgesi ke la esenco estas neŝanĝebla kaj eterna, ke la interparoloj, interalie ankaŭ la interŝanĝo de opinioj, okazas en tute sama maniero, en la formo de demandoj kaj respondoj, same kiel en la epoko de Platono, ekzemple, ĉar, samkiel

estas skribite en Genezo: „En la komenco estis vorto!“ Se la homoj ne estus kunparolantoj, la intervjuo tute ne estus ebla!

– Se mi bone komprenis, la totala intervjuo, laŭ via opinio, devas esti iaspeca dosiero aŭ skatolo, en kiu troviĝus ĉiaĵoj: bendoj, magnetofonaj kaj filmaj, lumbildoj, gramofonaj diskoj, diversaj raportoĵoj...

– Ne nur tio! Tio absolute ne sufiĉas por komplete kompreni kaj ekkoni iun personon!

– Kio ankoraŭ mankas?

– Mi opinias, ke la intervjuanto devus pasigi multan tempon kun la intervjuato. Tio, kompreneble, inkludas ankaŭ gedormon...

– Kion?

– Nu – amoradon; seksumon, tiel via generacio tion nomas, kompreneble, se temas pri personoj, kiuj apartenas al diversaj seksoj!

– Kion vi havas kontraŭ pederastoj kaj lesbaninoj?

– Absolute nenion. Pardonu, el mi dum momento ekparolis primitiva konservativulo...

– Kial vi pensas, ke ili devus seksumi?

– Nu, estas maleble komplete kompreni iun personon, ne tuŝinte ties haŭton (vi sendube mem rimarkis ke multaj homoj, interparolante kun vi, penas havi ankaŭ tuŝan kontakton – *body language* – ili senĉese tuŝas vian manon, genuon, frapetas aŭ tiras refaldaĵon), krom tio, oni devas priflari kaj ekleki ties haŭton; la hundoj snufas unu la alian, kiam ili renkontiĝas; oni devas iĝi malseka pro alies ŝvito, simpladire, oni devas penetri en la kvintesencon de alia estaĵo, kompreneble, tiom kiom la homoj tion kapablas.

– Do, en tiu dosiero devas troviĝi ankaŭ pornofilmoj, ĉu?

– Tion vi diris!

– Tamen, tiu via ideo ŝajnas esti sufiĉe bona...

– Ĉu ĝi al vi plaĉas?

– Komprenende... (Silento.) Nu, almenaŭ unu fojon mi estos la unua kiu tion faris!

(Malklaraj sonoj.)

– Mmmmmmmmmmm... Vi tion faras bone!

– Ĉu vi estas konfuzita?

– Nu, sincerdire – pli ol iom.

(Denove sonoj. Silento.)

– Kie estas banĉambro?

– Tie.

– Ĉu en ĝi estas varma akvo?

– Mi dubas pri tio.

(Silento.)

- Bela vi estas tiel!
- Ĉu vere?
- Venu!
- Mi estas malsata. Ĉi ĉi tie estas io manĝinda?
- Mi devas kontroli, kio estas en la fridujo.
- Nu, ni unue manĝu!
- Bone!
- Kial vi ne senvestiĝas? Ĉi tiel ni ne estas egalaj...
- Estas io perversa en ĉi tiu vidaĵo: nuda knabino kun vestita viro, kune manĝas krakpanon kaj maljunan fromaĝon! La sekreto de la erotiko – „Matenmanĝo sur herbo“ de Maneo...

- Tamen senvestiĝu! Hej, ĉu vi havas ian diskon?

- Ĉu vi ŝatas Cohen?

- Kiu estas tiu?

- Aŭdu...

**(Leonard Cohen: „Chelsea Hotel“)**

- Bone... Tiel estas multe pli bone! Kial vi konstante parolas pri via aĝo? Vi aspektas tute bone. Via korpo estas bone konservita...

- Ĉar mi neniam sportis... Ĉiuj eksĉempionoj rapide grasiĝas...

- Ŝmiru ankaŭ por mi!

- Bonvolu!

- Ĉu vi eble havas vinon?

- Ŝajnas al mi, ke restis unu vinbotelo.

- Ĉu vi ankaŭ antaŭe venigadis umikinojn ĉi tien?

- Vi estas la unua!

- Vera fablisto vi estas, ho Miloŝo! Oho, pardonu sinjoro! Nu, mi ne tre facile komencas alparoli homojn, uzante iliajn proprajn nomon.

- Ĉu ni trinkos ĉi tie, aŭ en la lito?

- En la lito. De kiam vi havas tiun cikatron?

- Depost interbatiĝo en miaj infantagoj.

- Ĉu tio multe doloris?

- Mi ne memoras. Verŝajne doloris. Vi havas vere negrajn brustmolojn!

- Kiaj estas la negraj brustmoloj?

- Ili estas ĝuste tiaj, kiaj etas la viaj: iomete pirformaj, kaj oblikvaj...

- Venu, ni faru la totalan intervjuon!

**(Amorbruoj. Leonard Cohen. La bendo daŭras 45 minutojn.)**



Apogita al la kadrumo de la banĉambro, li observis Unan, kiun karesis duŝaj ŝprucaĵoj; kiam li la unuan fojon vidis tiun scenon, kiam? Kiam? Kiam? Kiam? Kiam? Kiam? Li estis malvolvanta la komputilan bendon de sia memoro, kaj fine haltis sur malklara kvadrato, kie komenciĝis la sekvenco pri duŝado de nudaj sportistinoj en nebula novembra krepusko 1947, en la Ŝtata instituto pri gimnastiko, en tiu antaŭlonga jaro, kiam la juna ŝtato, en harmonio kun la sentenco: „Sana spirito en sana korpo“, decidis el malgrandaj, rakitaj Beogradaj individuoj fari fortajn socialismajn knabojn, similajn al tiuj, kiuj troviĝis sur monumentaj toloj de tiutempaj ŝtataj pentristoj: Puŝado de vagonetoj, Ramado de fostoĵoj, Konstruado de la fervojo Berĉko-Banoviĉo, Kolono I, Kolono II, Sturmuloj, La festotago, Fandforno I, Fandforno II. Pro tio la ŝtato enkondukis endan naĝadon en la ununura urba baseno, kies akvo fetoris je kloro sub la avara lumo de ĉi tiu malgranda lando, ekzistanta en la mondo, kiun saturis malama blokado, organizita de ĝiaj orientaj, sudaj kaj nordaj najbaroj. Li kun naŭzsento eniradis tiun akvon, similan al fluida malamiko. Krom tio, ekzistis oniminaco ke, se ili pisis en la akvon, ĝi tuj iĝos ruĝa ĉirkaŭ la pisinto, ĉar tio estis nova moderna ĥemia eltrovo. Tial li

naĝis sen ekzaltiĝo sur la akvosupraĵo, kiel kadavro kiu drivas sur formalino en la medicina fakultato; la baseno estis, memoris li, verdeta-griza-nigra, la betono sur ĝiaj randaĵoj estis fendiginta kaj disgrajniĝanta, ĝi servis, ŝajne, plejparte por ke la teamoj de „Filmaj novaĵoj“ por ŝtataj festotagoj surbendigu en la baseno gagegajn junulojn kaj pionirojn, kiuj ŝtaligas siajn korpojn laŭ la instrukcioj de siaj trejnistoj, distingindaj majstroj de sporto, kun privilegiaj biletoj por havigado de karbonhidratoj. Post la naĝado ili sin duŝis en banĉeloj, kiujn disvandis dika, malklara vitro, ne havanta kontakton kun glitigaj platetoj kaj plafono, lasante sube kaj supre nefermitan spacon, grandan proksimume kiel manplato, por ke varma aero povu cirkuli. Foje knaboj el lia klaso aŭdis ŝrikadon kaj inan ridadon en la ĉelo apud la ilia: tra la malklara vitro, firmigita per apenaŭ videbla drata reto, ili povis vidi rozajn movojn, kaj aŭdi tretsonojn de malsekaj, glitaj piedoj, kaj sonon da akvo, kiu ŝprucis sur haŭton, simile al tamburado de pluvo sur streĉita cimbalono; tiam, malkovrinte la liberan spacon ĉe la supro de la banĉelo kun duŝoj, ili grimpis unu sur la alian, farante el la manoj kun interplektitaj fingroj kvazaŭŝtuparon, kaj kiam estis lia vico grimpi kaj rigardi, li mutiĝis pro surprizo: li ekvidis agitiĝintan bulon el nudaj inaj korpoj (tio estis naĝantinoj, kiuj post ili trejnos en la baseno), kiun vualis vapora nuboj; lin fascinis tiu svarmo da hirtiĝintaj junaj koksoj, ĉar la knabinoj permane puŝadis kaj frapetadis unu la alian sur gluteojn, dum vipoj el malseka hararo skurĝis iliajn ŝultrojn. Ekscititaj kaj maltrankvilaj pro la apudeco de aliaj korpoj kaj trovvarma akvo, du nigrarulininoj apartiĝis, iliaj lipoj kungluiĝis en longa kiso, kvazaŭ dezirante ensuĉi unu la alian; iliaj fingroj delikatege karesis la vertebrojn, iliaj malhelaj vilaĵoj implikiĝis, la puboj frotis unu la alian; silkecaj viloj sub akvaj kaskadoj glitis sur ilia dorsosubo, sur la femuroj kaj tibioj, ĝis la piedoj. Li plenforte kroĉiĝis al la rando de la vitra muro, sed la aliaj penis tiri lin suben, ĉar lia tempo jam estis finita. Kiam ili lin tamen mallevis, kaj kiam aliaj surgrimpis lian lokon por rigardi (antaŭ liaj okuloj ankoraŭ estis la vidaĵo de inaj moviĝantaj korpoj, knabecaj kapoj kun la okuloj kiujn briligis adoleska volupto), li kuŝiĝis ventr-al-planke (la platetoj estis varmetaj), kaj rigardis iliajn maleolojn, sub la kruroj laŭ kiuj fluis akvo, mense vidante la korpojn, kiuj restis supre.

Una staris antaŭ li, nuda, kiel klara kaj perfekta ina animalo. Alrigardinte ŝiajn piedojn, li diris:

„Vi havas tiel longajn fingrojn sur la piedoj, ke vi povus per ili piani!“

Denove do, li vidis la malnovegan malseke-malklaran erotikan bildon, kiu estis, jen, jam pli ol tridek jaroj surfundigita, paciencie atendanta motivon aperi sur la surfaco de lia memoro – sed nun li ne staris sur la malfirma kvazaŭŝtuparo; li povis ĝui, ne timante, ke iu alia okupos lian lokon, por rigardi la junhaŭtan kaskadon. Li foriĝis de la pordo de banĉambro por lasi

Unan trairi, kiu kun amema senhonteco enpaŝis etkuirejon, kiel multjara nudistino, kvazaŭ tute ne konsciante, ke estas nuda, kvazaŭ la haŭto estas ŝia ĉiutaga vesto, kio ŝin tute ne miris. En ŝi ne estis eĉ spiro de taktika honto de matura virino (komence, kompreneble), kiu flirteme kovras sin per manplatoj, aŭ dum oblikva, salteta irado, tion faras per viŝtuko, kiu pli malkaŝas ol kaŝas, aŭ per littuko, aŭ mallevante kurtenon kaj rulĵaluzion – nenion el ĉioĉi ŝi faris: Una, ŝajnas, komplete apartenis al la nova, liberiĝinta generacio, kiu sin ne sentas malĉastigita kaj humiligita kiam sur si ne havas veston kiel kroman komunikilon (jen la neevitebla McLuhan!). Ŝi sidiĝis sur kuirejan seĝon, krucigis la krurojn, kaj komencis ronĝi krakpanojn surŝmiritajn de kaprofromaĝo, kiu, nur dio scias kial, troviĝis en la fridujo. Traglutinte la lastan peceton, ŝi alrigardis lin kaj trankvile diris:

– Splende! Nun ni seksumu!



„...tiu fraŭla loĝejo troviĝas en Stelaro, strato Jovano Duĉiĉo sen numero, la dudek tria etaĝo, loĝejo numero 69. Al P. ĝin lasis gardocele (liadire, li ĝin aerumas) lia amiko Minao Demajo, kies nomo troviĝas sur la enirporda tabuleto. Li antaŭ pli ol duonjaro forveturis, kiel gastprofesoro dela universitato en Kolombo, Cejlono, kie li prelegas pri la influo de budaisma folozofio al la individuisma Eŭropa spirito, aŭ ion similan. Tio estas malgranda unuĉambra loĝejo, aŭ grandeta fraŭla loĝejo, havanta proksimume tridek kvadratajn metrojn (dormoĉambro, banĉambro, etkuirejo, antaŭĉambro, balkono). Ĝi aspektas kiel budaista muzeo. Tie estas multaj malgrandaj kaj grandaj Budaoj, starantaj, sidantaj kaj kuŝantaj, muzikaj instrumentoj el Malproksima oriento, kaj fotografajoj de budaismaj pastroj. P. min tien irigis kun preteksto, ke lia magnetofono difektiĝis, kaj li devas resurbendigi iujn diskojn kun sonaj tekstoj por siaj prelegoj. Ĉar li ne havis tempon daŭrigi la intervjuon, li proponis, ke ni tion faru dum la diskoj estos resurbendigitaj. En zen-ĉambro (li tiel ĝin nomas) vere ekzistas havinda stereo-aparato. Dume li faris tri telefonajn interparolojn – numero 041-937. Mi ne komprenis pri kio li parolis, ĉar ili interparolis en la franca lingvo. Ŝajnas, ke li ĉi tiun telefonon uzas tempaltempe, ĉar li ne povas paroli, uzante la sian, hejman. Koncerne budaismon, pri kio ni multe interparolis, li konfesas, ke li persone tute ne sentas inklinon al ĝi; li opinias, ke la homo, kiu naskiĝis kaj kreskis ĉi tie, en Eŭropo, neniam povas komplete adopti tiun folozofion aŭ religion, ĉar la homon determinas lia deveno, klimato, tradicio, eĉ manĝaĵo, sed precipe kristanismo, eŭrocentrismo kaj antikva Grekio – lulilo de la okcidenta civilizacio. Kvankam multaj ekzaltiĝis pri zen-budhismo, li ĉion ĉi opinias

ĉi-momenta modo, aŭ turisma filozofio. Kiam mi demandis lin, kia estas la rilato interla marksisma filozofio kaj budaismo, li mansvingis kaj diris, ke „marksismo estas scienco pri 'feliĉa fino'!“ Kiel homoj el sango kaj karno, diris li, Marx kaj Engels al li estas tre simpatiaj, ĉar ili scipovis fojfoje esti tute batbluaj, per neĝbuloj celi stratajn lanternojn, ludi Bach per kvar manoj kaj postkuri inojn, sed la miksaĵo de socialismo kaj azia ortodokseco (laŭ Grosman) kiu perdis sanktulojn kaj sanktajn korprestaĵojn, anstataŭigis ilin per tiu duopo, versimile pro iliaj longaj grizaj barboj, kaj ĉar ili similas sanktan Nikolaon, tial oni portas iliajn bildojn dum procesioj, nu, dum paradoj, je la nomo de ilia scienco, pri kiu oni absolute nenion scias, sed oni per armeo kontrolas duonon de la mondo. Li ankaŭ diris, ke tre malmultas tiuj, kiuj komplete penetris la esencon de ilia scienca penso, kaj ke, same, malmultas homoj, kiuj tralegisla kompletan verkaron de Marx kaj Engels, enkalkulante ankaŭ ilian nekredible riĉan leteraron, kvankam multaj homoj ĉiujn kvin minutojn referencas al ili, kaj iliajn librojn tenas en siaj kabinetoj kiel tapetojn. Mi sukcesis surbendigi la intervjuon, sed P. ankoraŭ ne estas tute kontenta. Li promesis, ke ni la intervjuon daŭrigos, kaj ke post ĝia aŭtorigo, li helpos al mi aperigi ĝin en serioza revuo, kiu intencas dediĉi specialan numeron al li kaj lia verkaro. Mi opinias, ke li komencis tre interesiĝi pri mi. Li invitis min denove renkontiĝi kun li en la zen-ĉambro, la sekvan vendredon, je la kvara posttagmeze. Elspezoj por taksia veturo ne ekzistas, ĉar taksion pagis P.“

Tuŝante leĝere per la fingroj la glatan haŭton de Una, de ŝia sensema, roza areo, senfina kaj fascina, etendiĝanta senlime, perdiĝante en la vesperkrepuŝko de zen-ĉambro, la profesoro estis en la stato de neniom ĝenata harmonio, tute liberigita de propra pezo, ambicio, erotiko, volupto, sen iaj ajn deziroj. Una dormis kun sia kortuŝe elstaranta vizaĝo sur lia ŝultro. Ŝiaj naztruoj egalritme larĝiĝadis kaj mallarĝiĝadis, ondigante milde la haretojn sur lia brusto, sur kiu la mezaĝa aŭtuno makuligis la vilan prerion per grizaĵoj. Se li tamen ion ajn deziris, li volis preni cigaredon kaj alumetojn desur la tapiŝo apud la kuŝejo – ne vekante Unan per tiu movo. Li rezignis.

Jen, tio estas, do, la feliĉo, kiun oni dum tre longa tempo atendas! Kiel perplekse simpla ĝi estas! Mi ŝin povas tuŝi. Leki. Mordeti. Pripalpi. Flari. Pro ĉi tiaj belulinoj oni gvidis longajn, elĉerpigajn militojn; viroj interbatis kaj gloriĝis, laboris kiel sklavoj, tretis unu la alian, sed fine la plej granda parto da ili malfrue atingis sian celon, nur kiam iliaj kojonoj jam ŝrumpis. Mi ŝin ekhavis ĝustatempe! Mi ŝin akiris, uzante ŝparvojon, kondukantan al ŝia beleco, verŝajne tute hazarde, sed – mi ŝin havas! verdire, eble nemeritite, sed – mi ŝin havas! – ŝi estas ĉi tie, kaj tio, evidente, jam ne estas nur mia antaŭmatena revo.

Kaj tiel, kuŝante en la zen-ĉambro, la profesoro kun sento de supereco observis la koŝmaron ekster la kvar muroj, kies enhavon nobligis ĉi tiu

bela studentino; la kompleta tumulto kiu daŭras dudek tri etaĝojn sube; la universitato, akademio de sciencoj, luktado por katedroj kaj profesoraj postenoj, ĉiujaraj premioj kaj intrigoj, afekciaj ambicioj – li trankvile rigardis tiun grandan panoramon de ĉiua frenezo kaj furioza batalo por vivekzisto, por titolo, reputacio, potenco, por ĉio, per kio tiuj povruloj esperas foje akiri inon tian, kia estas Una.

Mi kvazaŭ estas penetranta en la trezoron de freneza maharaĝo; mi povas karesi Kohinoron tiom, kiom mi deziras, mi eĉ povas ĝin elporti en la poŝo, kaj teni ĝin la tutan tempon en mia mano, dum per la alia mi manpremas aŭ kroĉiĝas al tenilo en tramo. Mi povas ĉion! Ho Dio! Mi vere povas ĉion! Mi ricevis tiun damnitan bonŝancon en mia kvardek kvara jaro, la bonŝancon kiu, mi tion tre scias, vere malofte ridetas al la ordinara mortuloj. Ekzistas nur unu bagatelaĵo, kiu ĝin nebuligas: mi ĝin povas montri al absolute neniu! Matura, edziĝinta viro en mia aĝo, kompreneble, se estas saĝa, povas dum jardekoj havi amrilaton, pri kiu neniu ekscios, krom se ĉio ĉi lin stultigos, se li ne povas gardi tiun sekreton, kaj mem malkaŝos ĝin. Kio la virojn, je diablo, igas sian sekreton montri al la homo? Ĉu vanto? Ĉu deziro pruvi, ke ili ankoraŭ ĉiam kapablas gajni multe pli junajn parulinojn? Aŭ ilin tedas senĉesa kaŝiĝo, kaj ili eksopiras publikan kison en la centro de Beogrado? Pro tio, ordinare, ĉiuj amatoroj eraras. La profesoro sin kredis profesiulo. Li scipovos gardi sian sekreton. Lin ja helpas ankaŭ lia profesio: neniu suspektos studentinon, kiun li monitoras, aŭ kiu ricevas de li intervjuon. Li estos pli prudenta ol la aliaj, ol ĉiuj, kiuj faris tiun eraron. Verdire, parolis li al si mem, nun vi havas ŝin, vi, knabo, kaj neniu povos kulpigi vin; nun, subite, vin interesas nek mono, nek politiko, nek kariero, nek pasinteco, nek estonteco; vi indiferente foliumas gazetojn, vi ĵetas ilin en la plej proksiman forĵetaĵujon, ĉar la ekstera mondo vin ne plu interesas; neniu plu povas devigi vin partopreni iun ajn ludon, neniu plu povas varbi vin iĝi ano de lia teamo, neniu plu povas igi vin sekvi iun ideon, negrave kion tiu promesos al vi; vi estas sola, tute sola ŝtelanto de beleco, ĉasanto de bonŝanco, interesiĝanta pri nenio, krom pri la nova ebleco per siaj fingropintoj tuŝi la haŭton de Una, ĉi tiel, jen, ĉi tiel... Kompreneble, vi ja povas facile perdi ŝin – tion vi tre scias! Ne hodiaŭ. Ne ĉi-nokte. Bone vi tion priplanis, ho knabego! Vi renversis ŝin. Ekstreme disprenis. Ŝi ĝemplendis, ke ŝi ne povas plu elteni. Je la fino ŝi ekploris danke, ĉar finfine ŝi sentis ion tiom belan, post kio ŝi, elĉerpita, ekdormis kiel infano. Li dolĉe ekridetis, mense vidante, ke jam ĉi-vespere iu amatoro, deziranta teneron, konfuzege penos konkeri Unan, ne sciante, ke ŝi jam nenion deziras, kaj eĉ ne supozante, ke ŝi jam satiĝis. Vi havos ŝin, ĝis kiam vi kapablos ŝin dresi en la lito, sed samtempe esti milda, malkruela kaj decidema, perversa kaj violenta, lesbanino kaj parigisto samtempe; patro kaj instruisto, incestema frato kaj senegalano en *live*

*show* en Pigalo, kiu antaŭ spektantaro pistas, indiferenta, kiel ammaŝino, vi samtempe estos delikata kiel la plej bona amikino dum antaŭlonga somerumo en Makarsko<sup>2</sup> (unufoje ĉe la maro: glueca aerpremo, sala nokto en blankaj littukoj apud larĝe malfermitaj fenestroj), jes, kiel la plej bona amikino, tuŝanta la ŝvelintajn cicojn, timanta, ke tiu movo estos miskomprenita, je la rando de tabua amo; sed tio tute kaj absolute ne estas ĉio – li ja devas esti forta, li ja devas scipovi fari tiun dolorige-dolĉan finfrapon, pro kiu krevas la miringoj, kaj spermato fontanas kiel ŝprucaĵo el hosoj.

Li ĉasadis, ŝajnas al li, Unan, de kiam li scias pri si, pretigadis por ŝi embuskojn kaj enfalilojn, retojn kaj kaptilojn tegitajn per pluŝo, por ne lezi ŝin, li ĉasadis ŝiajn adoleskajn fantaziaĵojn, atendis kun senespera persisto de juna desperulo je anguloj de ventaj placoj, en antaŭnoktaj pordegoj, kiujn konas nur la homoj el tiu regiono, ĉasadis ŝin sur ŝtuparoj de grandaj loĝdomoj, kie kurento registriĝas zumante tiktakas, vidigante avaran lumon, ĉirkauitan de dratreto, por ke neniu povu pinĉi ampolon; li ĉasadis ŝin en malĝojaj akustikaj aŭloj de la fakultato, kie oni okazigadis dancvesperojn, ŝoviĝante kiel gvatisto inter dancgeoj, dispuŝadis blatulojn, priserĉadis balaaĵojn... Lin naŭzis la sopiro, kiam li, malrapide kaj sinbride, ŝajnigante sin promenanta, rondiris tra Beogrado, en kiu li vivis sen familio, pro aŭgustaj kolokvoj, vakanima, sen iu ajn. Li transiradis ĝian firston, ĵetante rigardon tra obskuraj stratoj, kiuj subite subeniĝis al la obtuza tondrado de la stratoj Dušana kaj Karaĝorga – al komplete dezertaj kaj sence angulecaj, malbelaj malpurgrizaj digoj, inter kiuj jam plurajn tagojn videblas polvonubo, atendante ke ĝin dispelu la unuaj aŭtunaj malvarmaj orientaj ventoj. Neniu alvenas de ie ajn, eĉ ebleco ne ekzistis, ke iu alvenos. Aŭgusto, antaŭ unu jaro, 1979...

Li, la regula profesoro de la Fakultato, Miŝelo Babiĉo, konata specialisto pri amaskomunikado, pri kiu oni opiniis, ke lin ne tuŝas la bagatelaĵoj, ekzemple la amo, staris senhelpe ĉe „Princo sur ĉevalo“<sup>3</sup>, kaj sopiris delire, dum lia stomako spasmas pro dezirego pri nedifinta knabino en blanka robo. Li kreadis ŝin el nenio, el aludoj, li povis precize vidi tiun fajnan drapiraĵon (nek tro leĝeran, nek tro pezan, eble Tajlandan silkon, aŭ iun delikatan teksaĵon el blankigita lino), sentis sub la fingroj ĝiajn larĝajn faltojn, vidis profundan, troan dekoltaĵon, elsub kiu libere gvatigis ŝlosiloj – la knabino estis maldikulino, kun tre malgrandaj brustmoloj, fakte preskaŭ sen ili – nur la cicoj, stimolitaj kaj ekscititaj pro la frotado de la nobla teksaĵo sur la nuda haŭto, pendolantaj dum paŝado, fortaj kaj karnaj suroj – sed li tamen povis vidi nek ŝian kapon, nek la formon de ŝia

2 Urbo ĉe la Adriatika maro.

3 La Monumento de Princo Mikaelo (1813–1868) la serbareganto, troviĝanta en la Beograda ĉefplaco.

vizaĝo, nenion alian li povis vidi; ĉioĉi restis en la ombro de lia malnova malsato kaj kaŝita rideto, en la ombro de ĉiuj malsukcesoj kiujn li eĉ ne memoris, ĉar ĉiuj ĉi malvenkoj transformiĝis en grandan nekontentigitan deziron, La deziron. Ŝi nepre devis havi migdalajn okulojn, iomete disigitajn, preskaŭ strabajn, fakte gape mirantajn, kaj esti invitanta pli al dorlotado, ol al malĉastado, pli deziranta sin defendi – ol deziri ke oni ŝin pistu; li vidis ankaŭ larĝajn, dismalfermitajn naztruojn, kiajn havas ekscitita ĉevalidino, sur ŝia nekredeble mallarĝa vizaĝo, kiu inter manplatojn lokiĝas facile kiel soleo, vangostojn pli elstarantajn, ol antaŭeniĝantajn, kaj delikatformajn orelkonkojn, en kiuj bruas petolado, kun miniaturaj orelingoj – 2-3 etaj ĝemelaj brilantoj; ŝiaj oreloboj estas, kompreneble, truigitaj, en tiu praa doloriga rito estas ja io tute sklaveca-ineca (mi vin amas, kiam via nura vesto estas viaj orelingoj!); li, fakte, ne povis scii, kian koloron devis havi la hararo de tiu nekonata knabino, kiun en tiu aŭgusto li kreadis el nebulvualo, varmego, polvo, el nenio, sed li sentis, ke ŝia hararo sur la blanka robo devas esti tre malhela, nigra, aŭ kun almenaŭ malhelega nuanco de kaŝtankoloro, kun faraona hena nuanco de rusto; tio estas hararo, tra kiu oni malfacila povas traŝovi la fingrojn, ĝi povas longi nur ĝis la ŝultroj, sed ĝi falas sur ŝiajn okulojn tiel, ke ili, duonkaŝitaj, helas de tie, el tiu amema ombro. Jes, li kreadis ŝin el nebulo kaj revoj. Lia distrita somnambula rigardo, dum li sen ia ajn kialo staris ĉe la bronza Princo, reflektadis kiel vitra okulo helan sparkaron de preterveturanta trolebuso numero dek unu. Ĝi estis malplena, kun nur unu aŭ du pasaĝeroj, similaj al forĵetitaj, ŝrumpintaj sakoj, plenaj da ŝvita seĝaĵo. En liaj pupiloj palpebrumis kaj formiĝis, detal-post-detale, la figuro de tiu knabino – malsukceso – konjekto – amo – deziro, kiu ĉitium mizeran vesperon povus transformi en festotagon, en la tagon, kiun li atendis tutatempe, de sia infanaĝo, kaj lia rigardo, akompananta la penson, descendis ankoraŭ pli suben, glitis sur la platan knabinan ventron, ĉirkaŭ kiu susuris blanka robo sur la streĉita tangaa kalsoneto, en kies ete plektita blankeca reto estis kaptita ĉokolada fiŝo inter anserhaŭtaj femuroj de la denaske longdistance kuranta ulino, kun du malgrandaj belgrajnoj sur ingveno, du solecaj malhelaj steloj – du talpoj – kial ne, talpoj. Talp! Talp! Lia manplato glitis sur tiu varma haŭto, haltis ĉe la rando de tiu densejo; ĉio fleksiĝis mole kaj plezursopire, dum la kruroj de la knabino paŝis, streĉante kaj malstreĉante la ligamentojn de perfekta ineca maŝina iratoro-flugatoro, kiun elpensis Leonardo. Li aŭdas klak-knar-krakojn de ŝiaj kalkanumoj, kies sonon malintensigis moliĝinta asfalto, havanta la koloron de putra kolombo; li aŭdis tiun klakan enu-ritmon en la Vaso-strato, kiu ŝajnis pli malplena kaj pli senespera ol iam ajn en sia historio; kaj ju pli li konsciis, ke estas neeble renkonti tian junan virinon, kiun Beogrado al li dum multaj jaroj estis sengarancie promesanta, dum li ekscite revenadis tra tiuj sencejoj, kun la koro, kiu jam batis en lia gorĝo – des pli li finfine sentis ĝin, tiun nenuligeblan kaj definitivan

malvenkon, kiun li longe evitadis, forgesadis, entuziasma pro neekzistantaj eblecoj, sed nun li estis tie, nun li sciis: tia knabino ne ekzistas, tia knabino ne ekzistis, tia knabino neniam ekzistos, tia knabino ne ekzistas por li, kaj tiam subite, vekita sur la fundo de varmega nokta lago konsistanta el nemoveble ŝvebantaj polvoj, aŭtomobilaj gasoj, benzina vaporo, insekticidoj, kiuj kovris la urbon dum kontraŭkula batalo, en la aero, simila al tepida akvo, forgesita en preskaŭrompita bronza bankuvo, en kiu multaj viroj antaŭ li jam banis sin, li ŝajne unuafoje vidis tiun lokon, en kiu li dum tre longa tempo vivis, mem ne sciante pro kio: betonajn loĝkestegojn, konstruaĵojn sen la plej eta beligaĵo, domojn, kiuj similas al virinoj, kiuj sen amoro kaj pasio lasis fali siajn manojn, kaj nun putras en antaŭtagmezaj veluraj roboj sen ia ajn ĉarmo, submetiĝintaj al sia sorto, kondamnitaj al ĝismorta vivo. Jen, tio estas stratoj, kiuj gvidas nenien, nur en vegetadejon, jen, tio estas la vivo, dronanta en enuon, en la ĉiutagan vivaĉon kaj senesperon. La somero iompostiome estingiĝis – televidiloj ekfunkciis... Polvaj tilioj en la strato Makedona odoris je benzino. Tamen, fojfoje al li ŝajnis, ke li ekvidis sian revknabinon en kinejo, sed kiam ŝi turniĝis, ĉar antaŭ tio li tutan horon ordonadis al ŝi fari tion, hipnotige koncentrita: „Turniĝu! turniĝu! turniĝu! turniĝu! turniĝu! estu ŝi!“ – tio ĉiufoje estis iu alia. De la deka ĝis la dekdua horo en matenkinajo, sameposte, same de la dua ĝis la kvara horo, sameposte, de la kvara ĝis la sesa, sameposte, de la sesa ĝis la oka, sameposte, de la oka ĝis la deka, sameposte, ankaŭ de la deka ĝis la dekdua, sameposte, sameposte – li eliradis, ensorbinta la odoron de satmaĉinta duondorma grego da spektantoj, kiujn fascinis fremda celuloida sorto, kiun blindigis movbildoj, trentanta kraketantan tapiŝon el kukurbaj semŝeloj, inter kiuj, kiel falsaj diamantoj, briletis globetoj el ĉifita staniolo. Li ja sentis ke ekzistas, ke ie devas ekzisti tia knabino, nur por li, same kiel la maljuna strangulo Mendelevo<sup>4</sup> antaŭsciis, ke devas ekzisti io peza ĝuste tiom, kiom pezas uranio, multe pli frue ol tiu detrua elemento estis trovita; same tiel ankaŭ la profesoro antaŭsentis ŝian dormeman kaj ridetantan vizaĝon, pintojn de pelvostoj, eĉ la obtuzan tembron de ŝia voĉo, same kiel lacoplana maristo antaŭsentas per skorbuto verdajn insulojn, plenajn de fruktoj kaj freŝa akvo, kvankam ili ekzistas nek sur la karto, nek sur la horizonto, simple, dank al la limo de sia soifo kaj senespero, tuj ĉe la rando de pacienco. Kaj kvankam li de tempo al tempo havis tion, kion la viroj nomas sukceso en tiu longatempa ĉasado, senfina kaj sensonga, kvankam li plurajn fojojn estis proksime al la momento, kiam li ŝin graplos, kiam li kaptegos tiun malfacile kapteblan glimantan blankan ombron, li ĉiufoje post tio vekigis apud tute aliaj knabinoj kaj virinoj. Rigardante elproksime, sub la kruela matena lumo,

4 Dmitrij Ivanoviĉ Mendelejev (1834–1907), la rusa ĥemiisto, aŭtoro de t.n. „Perioda sistemo de ĥemiaj elementoj“.

ilian haŭton, li ĉiufoje konstatis, ke ilian haŭtkoloron detruis beligiloj, li malkovradis reton da etaj krateroj, kaj vidis, ke el la atente prirazita krurhaŭto dumnokte penetris pika stoplaro, kiun li sentis, kiel trompilojn sur la tuta palpa supraĵo de sia haŭto. Moliĝinta krajonŝminko, kiu hieraŭ vespere ankoraŭ estis transformanta iliajn okuloj en sopirplenan Bambi-rigardon<sup>5</sup>, forviŝita kaj moliĝita pro kisoj kaj ŝvito, reduktis iliajn okulblankojn al ĉiutaga, modera dimensio – lin neatendite fiksrigardis etaj kaj blinkaj okuloj de arbara besteto. Kaj la revo pri malhelhaŭta knabino en blanka robo transformiĝis en krudan, nerafinitan haŭton. La ungoj – ungegaĉoj. Maldelikate krustiĝintaj kalkanoj. Vulgara formo de pieda fingro. Cikatro post operacio de cekumo. Cezara operacio. Haroj en naztruo. Plomboj. En lia kuŝejo, virinoj estis transformiĝantaj en dormantajn hejmajn bestojn, inter kiuj, nur dio scias kiam, eble ĝis la fino de nokto, kiu tra plumba paleco forvaporis tagiĝante, fornebulis ĉiu eterne ĉasata revknabino, sur fingropintoj, nudpieda, kun arĝentaj sandaloj en la mano, kaj kun robo surtirita sur la nudan korpon. La robo, nebutonumita sur la larĝa kaj maldika dorso, sur kiu elstaris skapoloj, estis pruvo, ke ŝi ne volis lin vekti - ŝi estis eskapanta senbrue, foriranta tra fenestro sur Beogradaj tegmentoj, tra la densaĵo el antenoj kaj fumtuboj, perdiĝanta super Savaaj pontoj, forlasante al li amarecon sur la velo, lasante denove tiun ĉiaman instigon ŝin serĉi, persekuti, postkuri, ĉasi, kun espero, ke ŝi finfine estos kaptita. La vera ŝi. Ĉu tiu ĉasado havos finon? Al li ŝajnis, ke la ĉasado daŭras deĉiame, iu ke ĝin komencis delonge, antaŭ lia naskiĝo, kaj je ĵuris lin daŭrigi kaj fini la ĉasadon; ĉasakiri la knabinon-unukornulinon, vivan kaj nelezitan, obeante al la severaj reguloj, laŭ kiuj li devas ŝin ĉasi sen ia ajn armilo, sen ies ajn helpo, nur per sia sopiro, kiun li ricevis, kiel la nuran heredaĵon, kiu estis mordanta lian internaĵon per sia obstina, ĉiama, nedigestebla veneno, kontraŭ kiu ekzistas nek antidoto, nek kuracilo, nek faciliĝo. Ĉiuj antaŭ li postkuris tiun knabinon, kiu senĉese ŝanĝadis kostumojn, frizaĵojn, beligilojn, stilojn kaj ornamaĵojn, kaj al ĉiuj fojfoje ŝajnis, ke ili ŝin havis: ili poste edziĝis kun ŝi, invitadis vilaĝanojn kaj urbanojn partopreni edziĝfeston por festeni la sukcesan finiĝon de tiu inĉaso; ili pafadis en aeron, ĵetadis pomojn, en kiujn estis enpremitaj dukatoj, rondodancis, tute ebriiĝadis pro feliĉo, sed poste, ofte jam dum la edziĝfesto, ili konstatis, ke tiu knabino, nekaptebla kaj neniesa, kaŝe forbloviĝis senspure, postlasante sian duulinon, kiu, cetere, havis la saman trajtojn, la saman paŝmanieron, hararon, manojn, ĉion, sed tiun trompon ĉiam malkaŝis iuj bagatelajoj. Estis malfrue por ion ajn ŝanĝi, sciigi pri la trompo. Ili tial silentis, al neniu malkovrante ke ili estas trompitaĵoj, ili naskigis infanojn

5 „Bambi“ – Simbolo por delikateco, tenero, mildeco. Origine Bambi estas la konata usona animacia filmo el la jaro 1942 (reĝisoro David Hand) pri la delikata cervina ido nomita Bambi kiu pro sia boneco fariĝis „amik(in)o“ al ĉiuj arbaraj bestoj.

kun espero, ke almenaŭ la knabinetoj similos al la malaperinta revatino (kaj la knabinetoj vere similis, dum ili estis tute malgrandaj), ili suferis kaj vegetis, ŝajnigante antaŭ la homoj, ke ili estas viroj, kiuj trovis tion, kion ili serĉis, sed ilin perfidis kaŝrigardoj, direktitaj al aliaj preterpasantaj virinoj – ili serĉis sian mirknabinson ĝis sia morto; iuj kaŝe, aliaj malkaŝe, konsentante, ke oni ilin nomu malĉastuloj, ĝuaviduloj, ventkapuloj, maniuloj... La aliaj drinkis kaj batis tiujn duulinojn el sia sonĝo, mortigadis per siaj manoj kaj piedoj tiun korpon, kiu ilin ja azenigis, postulante diri, kie estas tiu, kiun ili ĉasis, sed kiu restas neĉasita. Kie? Eble tiuj viroj estis mortantaj aŭdinte vokon de sia mirknabino (ili ja ne ridetus tiel, se ili la revatinon ne vidus je la fino?), kvietaj, feliĉaj, ĉar ili renkontis ŝin, ĉar ŝi ilin vokis... Nur dio scias tion! Sed tiu ilia deziro neniam elĉerpiĝis, neniam kvietiĝis post ilia morto – ĝi loĝiĝis en iliajn heredantojn, en iliajn posteulojn, kaj tiel, de generacio al generacio, ĝi fine atingis ankaŭ la profesoron Babiĉon, kiu dum multaj jaroj sukcese ŝajnigadis, ke lin interesas nur kariero, ke li estas prudenta kaj respondeca familiestro, sed fakte li tute atende, ke alvenu tiu knabino, kiun perdis lia malproksima praulo en la montoj super la monaĥejo Manasio, eble, aŭ dum foiro antaŭ Normandia ĉefpreĝejo je la tago de sankta Ludoviko, tie, de kie devenis la familio de lia patrino. Pro tiaj knabinoj oni mortigas, perfidas carojn kaj patrolandojn, ŝanĝas la religion de siaj prapatroj, perfidas amikojn kaj baptonojn, perdas bienojn fulmrapide, kuras for al alia mondoparto, por liberiĝi de la inkubo, por eskapi de ŝi, por sin savi, sed ĉio ĉi restas sen ia ajn sukceso, ĉar ĉiufoje, kiam al oni ŝajnas, ke ŝi estas proksime, oni senprudentiĝas: se ŝi apartenas al ilia frato – tio estas lia problemo! Oni forkaptas ŝin per forto, aŭ per ruzaĵoj, oni organizas ribelojn, sieĝas urbojn, lasante post si senhomejon, suferon, detruitajn domojn. „Ho dio, ŝi alvenu, ŝi nur ĉi nokte estu mia, poste vi faru, kion vi volas, mi nek protestos nek bedaŭros!“ Tamen, tiu knabino forestis dum multaj jaroj, kvankam la profesoro persiste sentis, ke ŝi ekzistas, kaj ke ŝi, eble, estas proksime. Kaj jen, lia pacienco finfine iĝis malvana; la knabino alvenis mem (verŝajne lacigita pro multjara batuo), kaj diris: „Mi estas Una Vojvodiĉo“. Li havis ŝin! Subite, al li ekŝajnis, ke dum momento li ekkonis la esencon de la vivo, samkiel fulmobrilo en la plej malluma nokto lumigas kaŝitajn pejzaĝojn, ĉion ĝis la plej malgranda bagatelaĵo; al li nun tre ridindaj kaj sensignifaj ŝajnis la aliaj viroj, perdintaj sin en vana klopodo atingi ion; sensenca ŝajnis la aro de iliaj ambicioj, ideoj kaj povoj – vana estas ilia potenco, eĉ se ili la potencon akiris, ĉar ili malvole kuŝiĝas apud siaj malbelaj, velkintaj edzinoj, kaj vekiĝas kun naŭzsento apud ili, anstataŭ apud Una, kiu, jen, disetendis la membrojn simile al eleganta kato, kaj diris oscedante: „Kiom longe mi dormis? Ĉu mi vere dormis du horojn? Ho, al mi vere estas tre bone kun ci, ci stultulo!“



Foje taksio, en kiu la profesoro veturis kun sia edzino al enuiga posttagmeza koktelo, enfalis aŭtoŝtopiĝon antaŭ la Savaa ponto. Ili povis veturi nek antaŭen, nek malantaŭen, ili nur sidis, malliberigitaj, fumante. Tiam li ekvidis Unan sur flava „Babeto“, kiu bravure ŝoviĝis inter aŭtomobiloj. Ŝi preterveturis sur sia malgranda motorciklo tre proksime al la taksio; libera, juna rajdantino kun ardiĝintaj vangoj kaj malplektitaj nigraj haroj, kiujn flirtigis vento. Li sentis deziron alkrii, ke li estas ĉi tie, proksime, sed restis tute paralizita, kvazaŭ en sonĝo, en kiu tra vitra ĉerko li povas vidi sian akompanantaron, amikojn, eksan amatinon, florkronojn, ĉion, sed el kiu lin neniu aŭdas, kvankam li hurlas, ke li ankoraŭ estas viva, ke la entombigo estas terura eraro. Baldaŭ la ŝtopiĝo estis malaperinta, kaj li, daŭrigante la veturon, observis per sia rigardo la stratojn je la alia flanko de la rivero, esperante denove vidi Unan.

Ŝi frenezis pri motorcikloj, pri fortaj motorcikloj „Jawa“, „Kawasaki“, „Yamaha“ kaj „Honda“ – milkubaj. Antaŭ li ŝi fanfaronis, ke knaboj el ŝia kvartalo en Novbeogrado veturas nokte sur senhomaj etvojoj ĉe Kunfluejo<sup>6</sup>, fojfoje eĉ cent sepdek kilometrojn hore. „Vi ne scias, kia sento estas tio!“ – parolis ŝi. – „Oni devas firme mankapti la talion de la kondukanto, tiam kvazaŭ ĉio malaperas, ekzistas nur tiu freneziga, ebriiga rapideco... – Splende!

Li komencis atente rigardi la aregon de knaboj, vestitaj en nigra ledaĵo, kaj iliajn knabinojn, kiuj ĉie postsekvis ilin. Li sentis sin malvigla kaj degradi-ta, ĉiufoje, kiam li vidis, kiel tiuj modernaj kavaliroj kun kaskoj, hurligante la

6 Kunfluejo de la riveroj Danubo kaj Savao.

motorciklojn, rapidegas tra la urbo, aŭ maĉas gumon ĉe stratanguloj. La braĵoj de Una estis senĉese antaŭ liaj okuloj; ili estis premantaj la talion de forta knabo, kies vizaĝo estis konstante ŝanĝiĝanta, sed poste ŝiaj fingroj ekglitis tien, suben, inter ties muskulajn krurojn; ŝiaj femuroj estis gluiĝintaj al la liaj, ŝia brusto – al lia dorso; la knabino, knabo kaj motorciklo, kungluiĝintaj en unikan tondran organismon, similis al apokalipsa dukapa centaŭro en rito, el kiu li estis tute ekskludita. Li rememoris Artur Kestler: „Supre oni ja povas sin trompi, sed malsupre, sube de la stomako, ĉio ĉiam estas klara.“

Iam, antaŭlonge, la streĉita mekanismo de lia socia vivo ankoraŭ ĉiam inercie estis tiranta lin al neeviteblaj akceptofestetoj, tagmanĝoj, premieroj kaj vespermanĝoj post ili, sed subite li nenion plu povis diri al siaj mense obezaj samaĝuloj kaj iliaj estimataj edzinoj, kiuj, kiel hejmaj Cerberoj atentege zorgis pri la prestiĝo de siaj edzoj. Al li estas neesprimeble enue kun ili, en pretendemaj interioroj, en kiuj oni konkuras, kiu el ili pli bone satigos la gastojn. Manĝegado, manĝegado, manĝegado, senĉesa manĝegado. Li demandis sin pli kaj pli ofte, kiel li povis elteni ilian kuneston dum tiom multaj jaroj, tiom multaj somerumoj kaj surherbaj piknikoj?

En unu domo oni ĉiam manĝis svisan fonduon kun fromaĝo. En alia domo la manĝiloj estis multekostaj, hereditaj de gepatroj, sed la manĝaĵo estis fuŝkuirita. La filino de malnova korespondanto el Ĉinio terorizis ilin per falsa ĉina manĝaĵaro – tie nur la bastonetoj estis veraj. Aliaj, alidome, fanfaronis pri sia leĝereco – tio estis, onidire, bohemiaj vespermanĝoj kun „tio, kio estas en la domo“ – ĉie palpebrumis etburĝa kondutmaniero. Ĉe la profesoro Vuĉiĉo oni eterne trikis la saman temon: kion kroatoj faris kontraŭ serboj, kaj male. La edzino de la docento Filipoviĉo gvidis francecan konversacion, vidigante sian konon de superrealismo – tio ja estis ŝia magistraĵo. En ies domo la domestrino ĉiam demandis, sub kiu horoskopa signo li naskiĝis. Ĉu fiŝulo? Oho, vi bonege harmonias kun Skorpiuloj! Dum akceptofestetoj, organizataj de usonaj diplomatoj, lin ĉiam perpleksis iliaj perfekte briligitaj ŝuoj, kiuj kvazaŭ neniam tuŝus la pekan teron. La konversacio turniĝis ĉirkaŭ ĝeneralaj temoj, kaj preskaŭ ĉiam estis finiĝanta kun la vortoj: „Ni nepre devas dum sekvaj tagoj interaŭdiĝi!“ Malsukcesaj politikistoj arigadis intelektulojn pro dekoraciaj kialoj: „Maria, mi petas vin, ŝanĝu la teleron de la kamarado Vuko!“

Por ke la tempo pasu pli rapide, li eskapis en leĝeran vinstuporon. Plej penige al li estis defendi sin de la suspektaj, altrudiĝemaj demandoj, kial li aspektas tiel, kial li silentas, aŭ pri kio li nun okupiĝas? Estus bone, se ili lin almenaŭ iomete lasus kvieta! La vesperoj estis transformiĝantaj en ververan turmenton, tuj kiam la gemastroj eltiris projekciilon kaj komencas vidigi filmojn, faritajn dum somerumo. Kairo. Beba sur kamelo sub piramidoj. Ŝia

larĝa, peza pugo, kiun kunpremis ŝarĝoselo pendas sur ambaŭ flankoj de la malfeliĉa besto. La edzo kun fezo sur la kapo ridas kiel imbecilo al la deksesmilimetra kamerao. Malaltaj nuboj super prerio: ĉi tio estas la vojo al Adelaido, en kiun ni alvenis el Pertho. Ne el Pertho, sed el Melburno! Ĉi tio estas indianoj en Utaha rezervejo, de kiuj ni aĉetis, jen, tiujn kolĉenojn kaj mokasenojn! Kazbo en Alĝerio. „Kiuj estas tiuj? Niaj amikoj el Berklio... Bombajo. Ĉi tie oni bruligas mortintojn sur ŝtiparo. Prezentu al vi, ĉi tiuj nigraj birdegaĉoj atendas, ke la familio foriru – por formanĝi la kadavron! Ĉu ĉi tio estas Amsterdamo? Jes, estas. Ĉu vi ne rekonas Placon Damaon? Jen, rigardu, la panjo Gina en Venecio! Ĉi tio estas vera fantastaĵo! Vera fantastaĵo! Kio estas tio? Nenio. Fakte, Ĝorĝo mismetis la filmon... Vidu kiel mi retroiras! Mikonosoj! Dum la tutaj tagoj ni estis nur en kostumoj... La plaĝo estis proksimege! Vespere ni mendadis fiŝojn, kiujn sekvatage ni tagmanĝos. Kaj la vinon, ho! Jen, Vesna dancas greke. Je Dio, Vesna! Nu, nun estas via vico, vi vizitos nin! Ne, ne! Nepre, neeviteble! Ankaŭ ni havas filmojn... Vi devas vidi, kiel mia edzo filmis taŭrbatalon en Barcelono! Do, la sekvan vendredon, interkonsentite! Tio estas videnda!

Dum la tuta tempo Una, kiel spirito de Ljano Estakado, tondrante giris sur la horizonto de la profesora menso; ŝi ŝanĝadis motorciklojn, kvartalojn kaj fotrantojn, obliĝante je milo da junaj virinoj-rabobestoj, dum li enuis, malliberigita en la velkinta rondo de kleraj babiluloj, iliaj averaĝaj ideoj, ne-talentaj manuskriptoj, ilia malĝoja mezaĝo. La silentadon ili kredis orgojlo de la profesoro. Li konstante plenigadis sian glason – jen la signo, ke li estas kaŝiĝanta ebrulo. Li, kiu ĝis antaŭnelonge flegis grandan simpation al sia ekstraordinare diligenta generacio, komencis iompostioe konscii ĝian mizercon, rimarki, ke ĝi malrapide akceptas la vivon kaj cirkonstancojn – sanigajn kompromistermojn, jarojn, jarojn... La plej mizeraj ili ŝajnis al li tiam, kiam ili komencis analizi, analizegi la nunan generacion de junuloj, komparante ilin kun la epoko de siaj elpensitaj ekzaltiĝoj. Ili kondamnis lies indiferecon, foreston de grandaj celoj kaj nepretecon por sinofero. Li aŭskultis grakajn onidirojn de siaj koleginoj, kaj ne atentante, tute, la enhavon de debatoj, gapis al iliaj koloj, rimarkante sekiĝintan haŭton de tiuj maljunaj kokinoj, sulkojn, kiujn ili penis kaŝi per ĉirkaŭkoloj, ĉion... Laŭ sia aĝo li apartenis al ili, li tion sciegis, sed (kvankam nur entruĝinto) kore li estis kun Una, sur ŝia flava motorciklo, sur kiu ili rapidegis tra senhomiĝintaj noktaj stratoj, ekzaltiĝantaj pro rapideco kaj vento en la oreloj. Kion? Vi, kolego kara, ŝajne, estas tute nekoncentrita? Ne, mi nur iom enpensiĝis. (Ho, se mi almenaŭ, kiel tiu diskeraro, havus tabulon, sur kiu estas skribite: „Mi petas ne rimarku min!“) Min tre interesas, kion vi opinias pri tiu afero? Finfine, kiu pli bone ol vi povas tion klarigi al ni? Vi ja estas en senĉesa kontakto kun ili... Pardonu,

mi ne aŭdis la lastan frazon! Pri kio temas? Mi ja diris ke mi opinias, ke la nuna generacio de gejunuloj estas tute malpolitikema. Oni simple ne povas interesigi ilin pri iu ajn ideo, malletargiigi ilin... Ĉu vere? Ĉu eblas, ke vi tion ne rimarkis? Ne, mi vere ne rimarkis.

– Ĉu vi legis ion de Castañeda?

– Mi ne scias. Eble...

– Kial vi ne scias?

– Nu, jen, problemo estas tio, ke mi ordinare legas vespere. Dume mi drinkas vinon, jen... Matene mi nenion memoras. Tial, vere, mi ne scias, ĉu mi legis, aŭ ne legis ion de li. Eble mi legis, sed eble ne legis.

Li sciigis, ke li ofendis tiun velkintan, persistan intelektulinon kaj ŝian impotentan edzon – filologon, kaj ke tiu iam sendube venĝos al li, sed li simple ne havis forton melki la temon, kvazaŭ estus en literatura salono fine de la pasinta jarcento. „Oho, jen veraj hundarĉuristaĉoj!“ – diris li al la edzino, dum ili estis malsuprenirantaj laŭ ŝtuparo. – „Veraj hundarĉuristaĉoj!“

Nur ŝi konjektis, kio lin turmentas, fojfoje li rimarkis sur si ŝian kvietan, ĉionscian rigardon, lumanta el duonlumo, dum sur improvizita ĉambra ekrano vibris orienta bazarplaco filmita per „Pajaro“. Li okulsignadis al ŝi komplike, aŭ per la lipoj blovis senŝonan kison. Tiam en li denove vekigis amo al tiu malnova, sperta kunbatalantino dum liaj la plej malfacilaj tagoj, kiuj, bedaŭrinde, ne povas helpi al li dum ĉi tiu lasta, decidiga batalo por la savo de liaj animo kaj korpo. Cetere, kial la edzino de raportisto estus ĵaluzza pri azia milito, dum kiu ŝia edzo estos sendanta raportojn? Ĉu ne estas same danĝere fordoni sin al la kaprico de moderna knabino, kia estas Una? Dum la milito, verdire, oni povas pereji, sed ĉu mezaĝa amoranto, dudek jarojn pli aĝa ol la amatino, ne povas same perdiĝi en sia eksperimento?

Vere, ŝi ne devis esti ĵaluzza! Pere de Una li estis provanta venki la amon kaj, finfine, ekscii kiu estas li, Miŝelo Babiĉo; li deziris trovi ion similan al serumo, kiu en estonteco helpos al liaj amkontuzitaj samaĝuloj liberiĝi de ĝi, kaj esti kompletaj. Una en tiu batalo, kiun ili ambaŭ neniam menciis, estis samtempe kaj malamiko kaj armilo. La profesoro, efektive, ne volis akcepti la opinion de humanistoj, ke la amo nobligas. La amo estas simila al serioza malsano, kaj se oni, bonŝance, ĝin travivas, en oni porĉiame restas cikatroj kiuj fojfoje pikdoloras; post mencio de ies nomo, dum pala antaŭvespero, kun muziko, kiun oni iam geaŭskultis, eĉ post flugrigardo al strata horloĝo, sub kiu oni renkontiĝadis...

Una loĝis en la plej malĝoja parto de Novbeogrado en loĝa kvartalo, kiun ĉirkaŭis vico de malserenaj domegaĉoj por dormado kaj rigardado de televiziaj kanaloj, domegaĉoj antaŭ kiuj kreskas nek arbo nek herbo; tamen, ĉiufoje, kiam li preterveturis ŝian paviljonon (kvartalon, kiun dum multaj

jaroj li neniam rimarkis, kvankam li tre ofte veturis tra ĝi al aerodromo), li tremis de la kapo ĝis la piedoj, sed la difektitaj fasadoj sammomente transformiĝadis en mezepokajn muregojn ĉirkaŭ imagata kortego, kiu defendas Unan kaj ŝian malgrandan mondon. Pro ŝi li komencis ami tiun urboparton, kiun antaŭe li kalumniis, nomante ĝin senanima loĝa geto. Kial li estis kontraŭ amo? Ĉar en ĝi neniam ekzistas egalrajteco. Ĉiam iu amas malpli ol la alia, kaj la malpli amata partnero bone scias, ke oni devas sange batali por la objekto de sia amo; oni devas toleri humiliĝon pro ĵaluzo kaj posedado, oni estas perturbita – kaj fine, oni estas sub alies regado, kaj nur de ies bonvolo dependas, ĉu tio estos aŭ ne estos misuzata. Miŝelo Babiĉo preferis liberecon ol dependecon, negrave kiom dolĉa ĝi estas. Dum multaj jaroj li preterpasadis amon, rifuzante aŭ akceptante allogajn proponojn, kvazaŭ ili venadus al li per si mem, dum li estis malplena kaj nevundebla, indiferenta pri amaj afliktoj, kiel homo kiu en la manoj tenas firme ĉiujn pupfadenojn en teatro, kie okazas tiu ridinda dramo. Li kredis, ke li estas tute sendanĝera, ke li transiris la kruclinion, post kiu la amo ordinare ne plu aperas. Eĉ se li estus meditinta pri tio, li verŝajne eksciis, ke tio tamen okazas, ĉar li tro amas sin mem. Li provadis prudentigi siajn amikojn, kiuj subite decidis eksedziĝi pro iu, laŭ lia opinio, tute averaĝa knabino; li miris pri ili, kredis ilin veraj amatoroj, kiam ili informis lin, ke ili denove edziĝas; li malkvereligadis ilin kaj iliajn indignantajn kaj seniluziigintajn edzinojn, restante inter siaj konatoj ekzemplo de flegma, netuŝebla viro, kiu el mallongdaŭraj amrilatoj kapablis preni ĝuste tion, kion li bezonis, neniun ofendante. Li tre bedaŭris pro la dezerta lando, kiun li nun estis forlasanta pro Una! Senĉese li fiksaŭskultis mense la vekigiĝon kaj ĝermadon de amo, same kiel kanceristo fiksaŭskultas la simptomojn de kancero en propra ventro, samtempe scivola kaj timfrapita de sciata postsekvo. Li mense vidis, fakte, veran amon, kiel rilaton inter du tute apartaj, memstaraj sortoj, du egalrajtaj vivoj de viro kaj virino, kiuj en paŭzo inter du bataloj, du luktoj kaj du solecoj, renkontiĝas kaj amas unu la alian, sed neniu el ili penas subigi sian partneron. Ripozo de militisto! Honesta kaj sentrompa ludo. Anstataŭ tio, lin nun nevideblaj fadenoj envolvis en humiligan situacion, kontraŭ kiu li povis fari nenion, kvakam li sciis ties kaŭzon, kaj povis mem fari diagnozon kaj terapion, ĉar ĝi, evidente, superis lian prudenton.

„Lo, kara mia“ – diris li al la kamaradino Mitroviĉo – „la mondo nuntempe estas tro tavoligita, tial oni ne povas ĝin ampleksi kaj klarigi per nur unu ideologio, sendepende de tio, kiom ĝi estas progresema, avangarda kaj ĉionsava... Sendepende de tio, ĉu ni tion volas aŭ ne volas, ni ja povas diri, ke ni vivas en la epoko de ideologia krizo. Kompreneble, vi facile povas trovi pretekston por iu ajn tezo, kiun vi deziras pruvi, sed tio estas absolute

sensignifa! Pli precize, tio nur signifas, ke vi malebligis al vi mem pli ĉioman kaj pli liberan komprenon dela vivo. Ĉu vi sukcesas kontempli miajn vortojn?“

Fakte, li volis diri al ŝi: vi sendube timas vivi iom ekster la ideo, eĉ se ĝi estas brokanta; kiam oni troviĝas ekster firma opini-sistemo, kiu al vi donacas almenaŭ ian sekurecon (anstataŭ falsaĵo), same kiel bone konata meblo en ĉambro, kvankam la ŝrankoj estas tiom grandaj, ke ili ombras la fenestrojn kaj pordon, kaj kvankam ne ekzistas elirejo el tiu ĉambrega kaptilo – tamen, oni havas senton, ke oni ne estas sola, ke oni kuraĝe paŝas, ĉirkaŭitaj de samideanoj, al la komuna celo...

Sed sub ĉiuj vortoj, sonoj, ideoj kaj personoj, sub la tumulto de la vivo kaj tempo, subbrulis konstanta kaj senĉesa sopiro – Una, Una, Una, Una, Una, mi bezonas vin kiel nikotino! Helpas ja nenio, nek saĝo, nek prudento, nek sperto, nek ĉiuj antaŭaj amaj aferoj de tiu kompatinda sperto, nek ĉiuj humiligoj, kiujn devas traelparti la homo kiu amas.

Merginte la kapon en ŝian hararon, li restis tiel kaŝita kaj sekura duonhoro. Li deziris rakonti al ŝi pri sia suferego, sed timis, ke ŝi lin ne komprenos, kaj eĉ se komprenos – ke tiam ŝi sentos sin pli forta ol li. Ŝi alrigardis lin, kaj flirteme diris:

– Samkiel ĉiuj prosperaj viroj en via aĝo, ankaŭ vi, kompreneble, devas havi junan litamikinon!

– Verŝajne, – diris li – vera kiĉo!



(La naŭa bendo) „... al mi ŝajnas, ke mi la tutan vivon, ĉiujn ĉi tiujn jarojn, estis... nu, ekzemple, plenumanta ian specon de oficiala tasko. Mi ne asertas, ke al mi dume ne estis okazantaj teruraj, kortuŝaj, animmuellaj, stultaj, nekredblaj kaj sensencaj aferoj, tion mi ne asertas – sed mi ĉiam kvazaŭ rigardis ĉion ĉi deflanke, kvazaŭ tio estus okazanta al iu alia. Mi sciis, ke venos tago, kiam ĉio ĉi iĝos sencohava, sed kial – tion mi ankoraŭ ne scias! Mi ĉeestis, do, mian biografion nur kiel vidanto. Mi ne asertas, ke mi dum tiu tempo ne ploris, ridis, ĝembojis kiel hundido, esperis kaj partoprenis, ne, mi ne diras, ke mi ofte ne timis, ke mi ne enamiĝadis, vagis, stumbladis, laboregis, sed kiam mi vere koliziis kun la vivo, tio tamen estis ies fremda filmo, mi ja estis nur ordinara kromscenaristo!

– Vi menciis biografion, ĉu?

– La biografioj estas ŝarĝaĉo! La ulo, kiu iĝis tro konata, tro fama, impresanta, estu certa, ke tia ulo jam eluziĝis. Oni, fakte, vole-nevole, iompostiome identifikigiĝas kun la publika imago pri si, kaj komencas kondukti kiel bronza, paŝanta monumento. Rigardu, ekzemple, gravulojn dum oficiala tagmanĝo! Rigardu, kiel ili digne maĉas, interparolas, iras en klozeton, kvazaŭ estus

farantaj ion nekredeble gravan! Ili ekkredis, ke ili estas bezonegataj. Sed bezonegata, kredis min, estas neniu!

– Kiaj ili estas fakte?

– Ili estas tiuj, kiuj penas pensi, kaj poste transdonadi siajn ideojn, paroli pri ili. Ĉiuj eŭropaj intelektuloj, onidire, devenas de kortegaj sprituloj, aŭ de pastroj – de la unuaj profesiaj inteligentuloj, kiuj provis sian vorton enpiki en dikan, indiferentan orelon de aliaj homoj. Ŝajnas, ke mi estas kombinaĵo de tia duopo – mi, freneza pastro de nova amaskumunika religio! Tio estas ridinda, sed mi tamen vivas per tio, kvankam tio estas tute nebula kaj malcerta okupo. Mia patro, ekzemple, estis kuracisto. Ni sciis, ke li nin nutras per sia sekura kaj honesta profesio, kiu ne dependis de la ŝanĝigema kaprico de politiko, sistemo aŭ aŭditorio. Dum la milito, li per la samaj aŭdilojn en la oreloj priaŭskultis bronkitojn kaj de la venkintoj, kaj de iliaj kaptitoj.

– Ĉu vi pretas rezigni?

– Rezigni, kion? Kiam mi estas malfavorato, mi fumas cigaredaĉojn anstataŭ multekostajn fumilojn; mi drinkas kuraĝakvon, anstataŭ viskion; mi veturas per tramo, anstataŭ per taksio; mi ne vojaĝas, do, mi havas multe pli da tempo por mi, por libroj, por meditado kaj amikoj.

– Kion vi opinias pri via laboro?

– Nenion specialan. Ĝi ne multe diferencas de la laboro de ŝuisto, ekzemple! Mi plektas pensajn retojn, samkiel ŝuisto faras ŝuojn. Mi klopodas, kompreneble, esti bona isto: havigi la plej bonan ledon, ofte faritan el mia propra haŭto; bonan plandumon – sciencaĵon bazon, taŭgajn ligilojn – nu, ŝulaĉojn.

– Kion signifas esti isto?

– Isto estas longdistanca kuranto kun plumbaj kruroj, gladiatoro, kiu ĉiutage iras en arenon; esti isto signifas lukti defendante nur siajn kredojn, kaj poste revenadi en sian ĉambron, en sian solecon. Tia isto, kia estas mi, similas al ŝnurdancisto, kiu devas atingi firman tegmenton, sur vibranta ideo streĉita super abismo. Publikaĵo nin akompanas per rigardo, legas kaj aŭskultas ĉion kion ni skribas aŭ diras, atendante vidi, ĉu alvenos vespero, kiam ni falos en tiu cirko. Sed oni falas pro diversaj kialoj. Kelkajn fojojn pro tio, ĉar oni tro lerte transiris ŝnuron, pro tia sukceso komencas turniĝi onia kapo; alifoje, ĉar oni rigardas suben, kaj konkludas, ke oni estas alte super la aliaj, sed plej ofte ĉar, sciante, ke multaj antaŭ vi jam falis, vi ne kredas, ke vi longe eltenos. Tamen, la publikaĵo ŝatas nek tiujn, kiuj estas aplombaj, tiujn pri kiuj oni scias, ke ili neniam falos. La isto, do, luktas kaj kontraŭ la publikaĵo, kaj kontraŭ si mem. Ĝuste tio konsistigas la belecon de tiu metio, sed en la sama tempo ankaŭ ĝian tragikon. Simpladire, tio estas konkuro, en kiu neniu ĝis nun venkis, kvankam multaj ĝin honeste malgajnis. Esti isto en socio, kiu estas plena da amatoroj, tio, finfine, signifas morti pro infarkto post la kvardeka jaro, kaj

ricevi proksimume ĉi tian nekrologon „elstara sciencisto, kolego, specialisto kaj patro...“, kun foto, se vi estas favorato, kaj sen ĝi, se vi estas malfavorato! Cetere, oni ne devas pensi pri tio...

– Kial?

– Mi jam ne memoras precize kie, sed mi opinias, ke ekzistas belega epizodo en libro, kiu enhavas respondon al via demando. Unu el aŭdacaj bruskuloj, homo agema, kiu neniam havis tempon pensi pri si kaj pri la aliaj, devas enĵeti en la kelon de palaco primitivan, nigran eksplodilon, vi ja scias, la rondaforman, kun mallonga ekbruligilo, kaj, kompreneble, forkuri, antaŭ ol ĝi eksplodos. Nu, li flamigis la ekbruligilon, enĵetis la eksplodilon tra la fenestro, kaj komencas kuri. Kaj ĝuste en tiu momento li spertis tion, kion la budaanoj nomas „graco“; subite, li enpensiĝis pri la fakto, ke liaj kruroj moviĝas mem, tute aparte de lia kapo, sen ia ajn helpo de lia volo; li, efektive, nenion al ili ordonis – la maldekstra simple etendiĝis antaŭ la dekstran, kaj la dekstra – antaŭ la maldekstran! Kaj tiam, ĝuste kiam li unuafoje en la vivo komencis pensi – li, kompreneble, mispaŝis, la eksplodilo krevis, kaj la domo disfalis sur lin. Kial? Ĉar li fine komencis pensi! Mi volas diri, ke la homo, kiu tro pensas agante – hezitas! Al tia homo tre povas okazi, ke li mispaŝas, kaj lia tuta vivoverko falegos sur lian kapon! Estas multaj intelektuloj, kiuj tre ofte faras tion...

– Kion, laŭ via opinio, signifas esti intelektulo?

– Tio signifas fini la veterinaran aŭ arbaristan fakultaton. Aŭ iun ajn alian. Sed ne nur...

– Kion pri viaj libroj?

– Aj, miaj libroj! Ili similas flosglaciojn; nur unu triono de tio, kion mi scias, troviĝas en ili. La restaĵo troviĝas sub akvo. „Titaniko“ tion malkonsideris, kaj pro tio dronis.

– Oni riproĉas vin, parolante, ke vi, ne sciante la anglan lingvon, tamen verkis libron pri Usono, sub la titolo *Markizo de Usono*.

– Oni forgesas, ke Kolumbo malkovris Amerikon, kvankam li sciis eĉ ne unu anglan vorton!

– Min interesas, kion vi opinias pri la talento? Kio estas tio?

– Mi vere ne scias, sed la talento nuntempe, verŝajne, estas la lasta umo, kiun oni ne povas manipuli – oni ĝin aŭ havas, aŭ ne havas. Ĉio alia estas malpli grava; ĉion alian oni povas aĉeti, ellerni, ricevi, elpeti, doni per dekreto, ŝteli... Ĉi tiun teorion pri la talento nuntempe estas konsiderata malaktualiĝinta kaj konservativa; tiuj, kiuj kreas oniopinion, ne ŝatas ke homoj ilin memorigu, ke ekzistas io, kion ili tute ne povas influi. Ili, efektive, povas organizi ĉion, sed ne povas krei ununuran talenteron!

– Vi ree provokas!

– Iufoje provoko estas bezonata, por ellogi el indiferenta kunparolanto ian ajn veran senton – almenaŭ koleron, pro kiu oni forgesas sian ŝelon, bezonatan por havi kontakton kun publiko, por ke elsub la oficiala masko montriĝu homo, kian oni deziras vidi – homo vera, malfalsa! La publiko tiam povas riproĉi onin, dirante, ke oni estis maldeca, ke oni kondutis malmilde rilate al onia kontraŭulo, sed mia metio permesas al mi kelkfoje esti ankaŭ tia, ĉar mi tiel sukcesas trovi almenaŭ grajnon de vero.

– Nedisputeble estas, ke vi tre influas... nu bone, ekzemple, la mondri-gardon de viaj studentoj, ĉu ne?

– Tio estus bone! Sed ne estas tiel! Tio estas malebla. Absolute malebla. Fojfoje mi estas tre afliktita, ĉar mi ne povas kripostuli, ke ili ne iru la vojon, laŭ kiu ili ekiris, ĉar mi, farante samtipan eraron, vane eluzis multe da mia al-tvalora tempo. Sed oni al neniu, ŝajnas, povas helpi per sia sperto. Tamen, mi opinias, ke via generacio estas multe pli bonŝanca ol la mia; ni estis, plejparte malgrandaj grizaj unuopuloj, kiuj penis eltiriĝi el la provinca mallumo, kaj ne havante ĝustajn informojn, ni duonrampis al iu, nur al ni konata, imagata mondo, kiu tamen, tio poste pruviĝis, ne indis tiom da penoj.

– Kia estas tiu generacio?

– Generacio de la malvarma milito. Verŝajne la lastaj individuistoj, kiuj ĉiam parolas *mi* anstataŭ *ni*. Ili malamas flagojn kaj paradojn, amasecon kaj kolektivian spiriton. Ĉiu vivas por si mem, malkiel viaj samaĝuloj, kiuj ne scipovas vivi alimaniere, kiuj vivas gente. Krom tio, ili estas timigaj pro siaj alternativaj signoj... Barboj, insignoj kaj ĉio alia!

– Kial?

– Mi principe opinias, ke la plej strangaj homoj aspektas tre konven-cie, tre standarde. Ĉar la homo, kiu estas tre stranga interne, profunde kontraŭanta la mondon, kiu lin ne akceptas kaj ne komprenas, tia homo ne sentis ian ajn bezonon ornami sian eksteraĵon, altiri ies ajn atenton. Male! Tia homo deziras kaŝi sin. Ĉu ekzistas pli stranga kreaĵo ol Kafko, ekzemple, sed li preskaŭ la tutan vivon laboris en asekura kompanio en Prago, ne dife-rencante, ekstere, de la aliaj oficistoj.

– Kio, laŭ via opinio, estas scienco?

– Scienco estas maniero, kiel mi organizas mian antaŭtagmezan vivon.

– Vi uzas prelegojn, do paroladon, gazetojn, librojn, televidilon... Kiu amaskomunikilo pleje konvenas al vi?

– La plej perfekta amaskomunikilo por mi estas tiu, al kiu sukcesas proksimiĝi nur malmultaj homoj, tute liberiĝintaj de plaĉavido, do, tiuj, kiuj plej multe progresis; prudentaj, anonimaj personoj, kiuj por si elektis silen-ton, kiuj preferas esti maleminentulo.

– Ĉu vi povus tiel vivi?

– Ankoraŭ ne. Iun tagon eble, kiam mi estos pli bona.

– Kion vi tiam faros? Kie vi vivos?

– Mi opinias, en Ĉuburo<sup>7</sup>, en unu el teretaĝaj domoj, kie vivas modestuloj. Fontokrano en la mezo, kolombejo malantaŭ la domo. Nuksujo. Sur ŝnuro sekiĝos multkoloraj tolaĵoj. En la ununuran ĉambron oni povos eniri rekte el la korto. Tie troviĝas tablo, kiun kovras plasta tablotuko, salujo, longforma pano, terpoma supo, botelo kun vino, fasko de juna cepo. Jes, ankaŭ „fiakro“ – la malnova, nigra kuirforno el lado, kun bruldifektita bakujo. Sen gazetoj, sen radioaparato, sen televidilo. Sen io ajn, krom alta lito, ŝranko sur kiu estos kofroj, kaj du seĝoj. Oni ja forgesas, kio oni estis, kaj kio oni devas esti. Havi tenejon kun ligno, kun duontuno da karbo. Estos ja bone, se vi iufoje venos tien, al Ĉuburo, en mian korton, kaj ion por mi kuiru, aŭ alportu fruktojn, kiam mi estas malsana, sed tio signifas atendi de la vivo pli, ol ĝi povas doni...

– Ĉi tio ne estas parto de la intervjuo, ĉu ne?

– Faru kion vi volas, por mi tio estas negrava.

– Ni daŭrigu: kion por vi signifas engaĝo?

– Ekzistas nur respondeco antaŭ la gefiloj! Kiam iu faris kanajlaĵon, aĉaĵon, perfidon, aŭ vidigas timemon, oni ordinare diras: „Kion fari, al li ne estas facile; li havas infanojn!“ Aŭ li mem diras: „Mi ne povis protesti, kvankam mi volis; mi tion ne subskribis, ĉar mi havas du infanojn!“ Tamen, kiam ni ne plu vivos, la infanoj nin respektos nur laŭ tio, kion ni faris; ĉu ni silentis, aŭ ni provis almenaŭ ion fari! Tion mi nomas la nura vera engaĝo. Mallongdire, kiam mi riskas, mi faras tion pro miaj nepoj!

– Kiam vi riskis?

– Kiam? Multam! Ne, tio ne estis grandaj riskoj, pri kiuj indas paroli; ekzemple, mi vidigis, ke mi ne deziras konsenti pri tio, je kio mi ne kredas. Unu fojon min alpaŝis la redaktoro antaŭ tujelsendo, li demandis min kion mi planas subteni dum la interparolo. Mi diris al li, sed li ne konsentis kun mia opinio. Post duonhoro oni petis min foriri el la studio, onidire pro teknikaj kialoj, aŭ pro io simila...

– Fakte, televidilo... Ni ne menciis ĝin, ĉu ne?

– La televidilo estas tre danĝera amaskomunikilo por tiu, kiu tro ofte okupiĝas pri ĝi. Ĝi estigis improvizitajn kutimiĝojn; al oni ŝajnas realaj falsaj muroj, falsaj pordoj, fotegoj anstataŭ reala pejzaĝo, falsaj floroj anstataŭ veraj; oni kutimiĝas vidigadi falsajn ridetojn, verŝadi falsajn ĝentilaĵojn, kaj fine oni iĝas ĝisosta falsulo, tiome intoksita de televidilaj mensogoj, ke oni eĉ ne rimarkas, ke ankaŭ oni mem iĝas enkadrigita kartonaĵo. Mi rimarkis, krom tio, ke la homoj, kiuj nur unu fojon aperis televizie, deziraĉas aperi tie denove,

7 Ĉuburo – malnova kvartalo de Beogrado.

kvazaŭ tiu lumo de publikeco kaj konateco, kiu ilin dum unu momento lumigis, infektas kaj porĉiame fortrenas ilin de la simpla kaj modesta vivo.

– Ĉu vi eltenus perdon de viaj aŭskultantoj?

– Mi ne komprenis la demandon.

– Mi volis demandi, kion vi sentus, se oni nuligus viajn prelegojn kaj ĉion alian?

– KREDU, al mi estas tutegele, ĉu mi parolas amfiteatre aŭ televizie, ĉu mi miajn ideojn aperigas en gazetoj kaj magazinoj, aŭ mi ilin elparolas telefone, aŭ flustras al ies orelo... Mi simple devas paroli al iu! Se oni min malebligis paroli fakultate, mi aperigos tion en la gazeta rubriko „Legantoj skribas“! Se ankaŭ tion oni al mi ne permesos, mi provos publikigi libron sub mia propra mono; se la libro ne aperos, mi parolos en kafejoj, en trolebusoj, mi faros replikojn dum prelegoj, kiam iu diros: „Ĉu iu volas demandi?“ Kaj fine, mi atentos homojn surstrate, kaj haltigados ilin por diri, kion mi opinias. Sed kiam mi komplete eksilentos, tio estos mia fino! Tamen, ankoraŭ ne alvenis la fina fino, ankoraŭ la seĝoj ne estas metitaj sur la tablon, mi havas ankoraŭ tempon por diri iujn, por mi gravajn aferojn. Tamen, mi tre scias, ke mi, same kiel ĉiuj antaŭ mi, respondecos pri ĉio, kion mi faris, kaj mia respondecado estos precize tioma, kioma estas la valoro de tio, kion mi faris. Tio estas neevitebla. Ne, mi ankoraŭ ne estas tute laca. Eble mi estas nur iomete dormema. Bonan nokton.

**(Krom la intervjuo, sur la bendo numero naŭ estis ankaŭ sonoj de aerodromo, fajrobrigada blovorkestro, amatoro kiu kantas kaj akompanas sin per gitaro, tiktakado de vekhorloĝo, telefona sonorado, birdaj ŝirkrioj, amorbruo, interparolo kun kelnero, kiu enportas matenmanĝon en la ĉambron, marbruoj. La daŭro de la surbendigaĵo: naŭdek minutoj.)**

Jam la trian fojon en novembro la amfiteatro, en kiu la profesoro Babiĉo faris siajn prelegojn, estis, onidire, okupita, tial oni lin sendis en la depresian „numeron sep“, kiu ne povis gastigi pli ol kvindek aŭskultantojn. Mirmaniere, denove malaperis ankaŭ la temo, pri kiu li devis paroli, el la horaro pendigita antaŭ la dekanajo. La fidela publiko de la profesoro tamen, kvazaŭ dank al kaŝa konspiro, trovis la foran lernoĉabron, kaj plenigis ankaŭ la koridoron antaŭ ĝi. Iu proponis, ke oni alportu mikrofonon kaj laŭtparolilon, por ke ankaŭ tiuj, kiuj estis ekstere, povu aŭdi Babiĉon, sed li rifuzis la helpon de tekniko.

– Oni kulpigas vin, dirante, ke vi estas senvola, letargia generacio – komencis li sian prelegon, serĉante per sia rigardo Unan, kiu ĉi tiu fojon ne troviĝis inter la studentoj – kaj tio estas relative ĝusta, se oni rigardas deekstere! Multaj homoj (eĉ tre saĝaj) pro sia aĝo ne povas rekoni alian specon de energio, diferencon de tiu, al kies kodoj ili al kutimiĝis. Neniama ĝis nun en la historio de la homaro ni havis tiom da simileco en la generacio de junaj

homoj en diversaj punktoj de nia planedo! Dank al elektra civilizado kaj ĝiaj amaskomunikiloj, kiuj kovras la kompletan terglobon per la reto de siaj simboloj, vi estas multe pli similaj al junaj francoj, japanoj, usonanoj, al siaj samaĝuloj el Italio, el Malproksima oriento aŭ el Finnlando – ol al viaj pli aĝaj fratoj kaj patroj. Vi surhavas la samajn ĝinzojn, dancas sammaniere en diskejoj, uzas la samajn psikedelaĵajn metaforojn kaj formojn, legas la samajn bildrakontojn, rigardas la samajn teleseriojn, maĉas la samajn maĉgumojn, sur viaj muroj pendas similaj afiŝoj, sur la bretoj staras samaj libroj kun diversaj tradukoj, vi fumas la samajn speciojn de herboj (kiuj fumas), la samajn cigaredojn kaj trinkas la saman kokakolaon el la samaj boteloj, veturigas la samajn tipojn de motoroj, uzas la samajn kontraŭkoncipilojn, la samajn parfumojn, kaj la samajn ĉifrojn por la sama nocioj... Vi ja parolas: „Fek!“, „Forfiku vin!“ aŭ „Super!“! Tiu, kiu ne komprenas, ke dum la lasta jardeko la mondo ŝanĝiĝis pli ol dum la lasta jarcento, estas kondamnita porĉiame resti en azilo de la ideologio de la deknaŭa jarcento! Tio, kompreneble, ne signifas, ke la mondo nuntempe estas pli bona aŭ pli malbona ol la hieraŭa! Tio signifas nur, ke ĝi estas alia. Iu povas disloĝigi la urbojn, nuligi la monon kiel pagilojn, fermi la universitatojn, forpeli la tutan loĝantaron sur rizajn kampojn, aŭ en mezepokon; iu alia povas malpermesi la bildrakontojn de Walt Disney, povas arestadi aŭskultantojn de ĵazo kaj roko, anatemi la abstraktan pentrarton, malebligi aŭskultadon de eksterlandaj radio- kaj telestacioj, malpermesi importon de fremdaj gazetoj kaj ĵurnaloj – sed tio estas nur portempa solvo: iun matenon, Donaldo Dako tamen ŝoviĝos tra tiu blokado; iu iel enkontrabandos la unuan globkrajonon aŭ gramofonan diskon, kiu troviĝas sur indekso... Por malebligi la kontrabandon, ie, kie knaboj sopiris ĝinzojn, estis konstruita fabriko de ĝinzoj, kaj tujtuje „Levisaj“ krurumoj plenigis novan standardan stilon de la vivo, kontraŭ kiu estis neeble lukti, ĉar kaj Donaldo Dako, kaj globkrajonoj, kaj kokakolao, kaj ĝinzoj enhavas ekstrakton de mitologio de la tutmonda vilaĝo, en kiu vivas ni, kiujn ĉirkaŭas la elektra civilizado...

Ĉe la elirejo el „numero sepo“ la profesoron alpaŝis junulo kun flavruĝa barbo, kaj prezentiĝis kiel helpa libristo de „Penso“, el la strato Princo Mihaĵlo. Li malkaŝis al Babiĉo, ke lia ĉefo ordonis al li forigi la librojn de la profesoro „Amaso“ kaj „Diktaturo de blatoj“ el la montrofenestro, kaj forĵeti ilin en deponejon. Li volis sciigi la profesoron pri tio, kaj peti lin ne malkaŝi de kiu li ricevis tiun informon, ĉar li estos maldungita, sed la laboron li bezonas por vivteni sin dum la studado, ĉar liaj gepatroj estas malriĉaj. La profesoro dankis al li, kaj promenis de Kalemegdano ĝis Slavio. En ĉiuj montrofenestroj videblis „Diktaturo de blatoj“, kelkloke eĉ „Amaso“. Ili ne estis nur en la montrofenestro de „Penso“. Li eniris kaj ekserĉis la estron, kiu ekĝojis vidante lin.

– Mi volis peti vin – amputis lin Babiĉo – informi ankaŭ la aliajn libro-vendejojn, ke ili formetu miajn librojn, ĉar tiuj libroj estas tre danĝeraj. Ne estas honeste, ke nur vi tranaĝu, ankaŭ la aliaj ja, same kiel vi, pruvu ke ili estas atentemaj.

– Pri kio vi parolas? – la estro de „Penso“ paliĝis, sed la profesoro jam pensodrone foliumis novan folozofian revuon, ne atentante lin plu.

La sekvan tagon li rimarkis, ke la libroj estis remetitaj en la montrufenestron. Tamen tavolo de danĝero restis en la fundo de lia ventro.

Beogrado iĝis tro malvasta kaj danĝera por Una kaj la profesoro. Nenio tiom lacigas litamikojn kiel duobla vivo. Kaj vere, ĉiam ekzistis ebleco, ke iu el la konatoj ilin renkontos kaj senvualigos ilian zorge kaŝatan amrilaton. Verdire, sur la monto super du riveroj kaj ebenejo, ŝirmata nek de ĉielo, nek de ventoj, Beogrado ofte ŝajnas klostrofobia al tiuj, kiuj devas kaŝiĝi de fremdaj rigardoj kaj scivolemo. „Ĉu mi povus elteni, se mi estus konspirulo dum milito?“ – demandis la profesoro Unan – „Mi ja penplene sukcesas kaŝi eĉ nian amrilaton!“ „Jes, sed la konspiruloj dum milito ne ĉarmigis plenplenaj aŭlojn, ne aperadis televide!“ – respondadis ŝi. – „ili estis nefamaj...“

Unuafoje li sopiris senfamecon. La nefamulo estas nevidebla kaj nevundebla.

Ilin jam iomete tedis la renkontiĝoj en ilia zen-ĉambro. En ĝi, verdire, ili sin sentis eksterdanĝere kaj komforte, sed post certa tempo la tagoj kaj noktoj intermiksiĝis kaj fariĝis ĉiam la sama tago, kaj ĉiam la sama nokto. Kiam ili estis en tiea kuŝejo, ili ne plu povis distingi pasintmonatan vendredon de lundo aprila. Ilia amo postulis novajn kadrojn; ilin ĝenis ankaŭ ripetado de la ĉiam sama rito: glaso da blanka vino, senvestiĝo, banado, orgasmo, sonĝo, denova orgasmo, banado, nova glaso da vino, interparolo, vestiĝo, elŝteliĝo el la ĉambro sub atentaj rigardoj de scivolemaj najbaroj el la turdomo en Stelaro, kiuj, evidente, estis ĝiskoĵone enuitaj; taksio, hasta kiso antaŭ disiĝo... Ili deziris vidigi al la homoj sian amon; ili sopiris kiel ĉiuj aliaj libere eniri restoracion, en kiu ili ne devos ĉiam serĉi la plej malproksiman enangulan tablon. Ili deziris promeni sur Danuba kajo en dimanĉa tagmezo, kiam sur ĝi estis plej multaj promenantoj. La profesoro pli kaj pli ofte forgesis la bezonatan singardemon, kaj poste, dum pluraj tagoj, li koleris kontraŭ si pro sia senpripensemo.

Pro tio li decidis kunveturigi Unan. Ili veturis aparte, kiel komplotantoj: li per aviadilo, Una per vagonaro, kaj renkontiĝadis en hoteloj en urboj, kie ilin neniu konis. Li ridis pri la frapfrazo de sia malnova amiko, fotografisto – konata kiel konspira amoranto, kiu kokradon de sia enuiga edzino nomis „hejma rezista movado“. „Mi tiom singardema estas, kiam mi tion faras“ – diris li al la profesoro – „ke mi renkontiĝas nur kun nekonataj personinoj, en

la horo kiun ni anticipe ne interkosentis, en nekonata loko, al kiu la nekonata personino por renkontiĝi kun mi alvenas sur tegmentoj, kaj mi tra kanalizacio! Tio estas la sekreto de mia longatempa sukcesa kokrado!“

Tiuj vojaĝoj de la profesoro kaj Una daŭris unu-du, iufoje eĉ tri tagojn, kaj tiuj tagoj ŝajnis al ili tutaj malgrandaj vivoj, travivitaj de la komenco ĝis la fino; mallongaj geedzeco, kiam dum kelkaj tagoj kun ili okazas tio, kio al la aliaj homoj okazas dum dudek kvin jaroj de gea vivo. Ili ĉiufoje travivis, fakte, ĉion; la unuan geedzan nokton en nekonata hotela ĉambro, amon ĝis absoluta satiĝo kaj milda stuporo, la unuan kverelon pro bagatelaĵo, lacon, alkutimiĝon, seniluziĝon, adiaŭon... Dum ĉi tia vojaĝo, la profesoro dorlotis ankaŭ sekretan esperon; ĉar li ankoraŭ ne povis liberiĝi de la amo al sia juna amikino, li esperis, ke ilia komuna vivo (sendepende de tio, kiom mallonga ĝi estos) tamen malakrigos la klingon de tiu, por li danĝera, sento; ke kelkaj tagoj, pasigataj gee de mateno ĝis mateno, almenaŭ senigos Unan de ŝia enigmeo, kiun al ŝi, kiel specialan allogon, donis la malpermesita rilato. Pro tio li penis atente ŝin observi, kapti ŝiajn erarojn, malkovrante unu post la alia ŝiajn mankojn, kaj tiel liberiĝi de la dependeco, kiu lin konkeris. Li konatiĝis kun ŝiaj kutimoj, rigardis ŝin matenmanĝanta, vekiĝanta, dormanta, vidiĝanta tro dorlotitecon kaj enuon; iĝanta kverelema kaj kolerema, paŭtanta, baniĝanta aŭ ĝojanta pro promenado; li vidis ŝin eĉ sidanta sur neceseja pelvo kaj rigardanta lin kun rideto, kvazaŭ bebo. Sed lin pleje ĝenis ŝia tro longa restado en banĉambro. Li kredis, ke al ŝi la juneco donacas belecon tuj kiam ŝi malfermas la okulojn post dormo, sed ne, Una elspezadis la lastan kvanton da energio por doni al sia aspekto per beligiloj kaj kombilo iun, nur al ŝi konatan idealecon. Tra la ĉambro ĉiudirekte ruliĝis pecetoj de vato, boteletoj kun lako por ungoj, boteloj de acetono; li stumbladis sur ŝnuro de harsekigilo – el tiu kompleta ĥaoso Una eliradis perfekte kaj siamaniere ŝminkita, simila al katedralo, kiu ĵus forskuis desur si skafaldaron. Li rimarkis, same, ke ŝi kun si ĉiam trenas grandegan necesujon – veran kosmetikan manan salonon! Ne estis same esti kun ŝi dum kelkaj, ĉiam malfacile ŝtelitaj horoj, kaŝiĝi kaj nutri ilian rilaton per tiu sekreta ludo; tute alia afero estis travivi ĝis la fino tiujn malgrandajn tritagajn gevivajn, kiam ilin minacis nenia danĝero, sed kiam enuo kaj satiĝo embuskis el vazo kun floroj sur tablo, apud kiu ili silentis, ne sciante kion plu diri unu al la alia. Post tiuj vojaĝoj li revenadis hejmen kun la sento de faciliĝo, kisinte distre Unan dum disiĝo („Mi telefonos al vi dum sekvaj tagoj!“), certa ke, finfine, li porĉiame liberiĝis de ŝia dominado, sed jam la trian aŭ kvaran tagon ilia lasta hotela ĉambro iĝis al li simila al perdita paradizo, kaj li planis novan fuĝon, esperante, ke li ĝin bezonas nur kiel definitivan liberiĝon de Una – de la obsedo. Kaj ĉio komenciĝadis re kaj re.



En sia kvardek kvara vivojaro, la profesoro Babiĉo jam sciis ke ne estas tiel juna kiel sin ofte sentis. Sed neniam li tion sentis en tiel evidenta maniero kiel tiun nokton kiam, elkondukinte Unan en la restoracion de la hotelo „Esplanado“ en Zagrebo, li subite rememoris Sanjan. El la ĉambro li rezervis diskretan tablon. Ĉe la enirejo de la duonluma restoracio, en kiu tra aŭstro-hungara nebuleto, kiun riĉigis interkontinenta higiena perfekteco, fajreris glasoj kaj arĝentaj ujoj por malvarmigo de blanka vino, ilin renkontis la ĉefo de la halo, kaj venigis ilin al manĝmetita tablo por geoj en la hala profundo, sub palmo. („Zagrebo“, diris li al Una, „estas komforta malnova fotelo kun vidaĵo al Eŭropo!“) Li ĝuis siajn molajn nigrajn mokasenojn, kiuj estis neaŭdeble dro-nantaj en dikan tapiŝon, kaj la mallongan daŭran foreston de kostumo, kiun li portempe forlasis, vestinte jaketon kaj grizan pantalonon el flanelo, anstataŭ sia ĉiutaga ĝinzo; li ĝuis la memfidon, per kiu li akceptadis enviajn rigardojn de siaj mezaĝaj samaĝuloj, kiuj kun admiro rigardmezuris Unan dum ŝi per siaj paŝoj de glitistino transformadis la ŝiman „Esplanadon“ en modkampon. Li ĝuis, elektante manĝaĵojn, antaŭĝojante pro denova renkontiĝo de sia velo kun la leĝere-akra „Laŝka rislingo“. Fakte li havis preskaŭ ĉiujn kialojn por absoluta feliĉo; Una, flatata kaj videble ekscitita pro lia invito akompani lin en Zagrebon, kie li estis faronta du prelegojn en Studenta kultura centro ICF, kaj sur la tribuno „Forumo“, konsentis sian intence eluzitan veston anstataŭi per, laŭokaza, pli diskreta vestaĵo de juna damo (simpla viola silkrobo kaj malhela jako, el pluŝo). Perfekte pretigitaj rostitaj helikoj kaj bovida tranĉaĵo en citrona suko, malbrua muziko, kiu per sia dentopaste glueca kaj senemocia

sono rilaksas la streĉitajn sensorganoj, interkonsento noktomeze dum longa tempo nenifari en bankuvo kun ŝaŭmo, ĉio ĉi tio, sed tamen ankaŭ malklara antaŭtristo, difektis ĉi tiun detalege aranĝitan tempopasadon kun sendube obscena fino. Dum Una brilis pro la donacita al ŝi atento, li, dronante pli kaj pli profunde en la eabriigan esencon de rislingo, fosis tavolojn de sesdekaj jaroj, ĝis kiam elsub la tempotorfo komencis ĝermi konturoj de amora fortikaĵo, kiun Sanja kaj li antaŭlonge estis konstruantaj kaj sukcesis starigi, sed poste – ankaŭ detruis; kun ĉiuj atestantoj, kiuj partoprenis tiun Pompejan amoran konstruadon, kiu nun ŝtoniĝinta, surŝutita de magmo, kun movoj haltigitaj tiel, kiel ilin trafis la morto; ĉe tablo aŭ en kuŝejo; unu el ili eĉ kun levita mano, per kiu li provis defendi sin de la nevidebla tempo. Sanja sonĝas. Sanja sonĝas.

Nun li pensis pri ŝi: ŝi vivis kun sia fratino, ie en la supra parto de la kvartalo Voĵdovaco, en kuirejo kun „knabina ĉambreto“ dank al malgrandega pensio de sia patro, kiu malaperis, estis mortigita, fuĝis aŭ estis kaptita, vivis aŭ mortis, nur Dio sciis, kio okazis al li (Sanja ne sciis). Do, kiam unu fratino eliradis por rendevui kun iu junulo, la alia devis resti en la hejmo tiun vesperon, ĉar ili havis nur unu vestindan surtuton, kaj nur unu vestindan duŝuon. Malgrandaj Antigonoj. Ĉiu ilia eldomiĝo do estis, iamaniere, sortodecida investo en la estontecon. Kion ŝi povis esperi de li, en kies kapo absolute ne ĝermis ideo edziĝi, peni elŝiri ŝin el tiu mizera kuirejo, forkonduki ŝin en lokon, al kiu ŝi fakte denaske apartenis; ĉirkaŭi ŝin per respektinda spaco, multekostaj parfumoj, peltvestoj, eskvizita manĝaĵo, atento, protekto, interesaj homoj? Ne, ili neniam gedormis! Tion li ne povus forgesi, se tio vere okazus. Ne. Tio ne okazis. Ili suferis dum horoj, tuŝante la korpojn unu de la alia, sed Sanja ne volis – ŝia virgeco devis esti la plej granda kontribuo por la loterio, kies ĉefa premio devis savi ŝin de la humida kuirejo; ŝi, vere, ne povis donaci ĝin al li simple tiel, kvankam ŝi deziris kaj baraktis kiel freneza ĉiufoje, kiam ŝi proksimiĝis al la danĝera limo, kiam ĉio nigriĝis antaŭ ŝiaj okuloj. Nun ĉio ĉi ŝajnis sufiĉe ridinda (kiu ja plezuris havante virgan knabinon?), sed en tiu tempo la virgeco ankoraŭ estis alte taksata. Kiel rapide ŝanĝiĝas la mondo! Sed tiam aperis tiu diplomato, kiu ĉion, pri kio Sanja revis dum longaj vintraj noktoj, kovrita de vintra surtuto kaj polvoplana tapiŝo (la revoj de malriĉulinoj), per ununura gesto ĵetis sur amason, mezde la kuireja tablo, kiun en tiu momento lumigis ampolo sen lampŝirmilo: potenco, influo, vojaĝoj, sendanĝereco, Mercedeso, vivo en eksterlando, kaj kiam li estis en la lando – vilao en Neimaro, kaj Sanja la lastan fojon provis ekscii, kion pri tio opinias li, Miŝelo Babiĉo, sed li al ŝi lasis plenan liberecon: mi opinias, ke tio estas akceptenda, diris li, tia ebleco ne aperas ĉiutage. Sed li estas terure maljuna... Kiom da jaroj li havas?

– Tridek ok...

– Abomene! – diris li. – Se mi ĝisvivos la tridekan, mi mem mortigos min!

– Ĉu vi vere opinias, ke tio estas akceptinda?

– Mi ne estas proprietulo.

– Ĉu vi vere opinias tion?

– Jes. Ĉu mi opinias tion? Mi ne scias. Faru kiel vi volas.

Tri fojojn ŝi lin demandis ĉu edziniĝi, kaj tri fojojn li faris absolute ne-nion por haltigi ŝin. Kaj tiel la diplomato surflugis en ilian mizerejon, simila al ŝtata anĝelo kun sep buleoj.

– Edziniĝu – diris Miŝelo – kaj ni kornuligos ĉi tiun maljunan diplomaton!

Kaj ŝi edziniĝis. Sed ili la diplomaton ne kornuligis. Nek tiam, nek poste. Nek iam ajn pli poste. *Jamais*. Jen la nura definitiva kaj nebonigebla vorto!

– Kion? – demandis Una, kiu amuziĝis eligante per dudento helikojn el konkoj.

– Mi ŝatas la vorton: *Jamais!* – diris li.

– *Jamais?*

– Tio signifas neniam, franclingve.

– Bone.

Li suferis kiel mizera bruto. Li ĉiam ekdormadis buliĝinta, kiel homo kun dolorantaj intestoj; per ambaŭ manoj li tenis sian ventron, ĝemis pro doloro, ĉar Sanja estis forkondukita, ĉar ŝi ridas dancante ie kun sia diplomato, ĉar ŝi malvestiĝas, ĉar vekiĝas en roza litaĵo, ĉar, eble, ŝi kelkfoje pensas pri li, geumante kaj rigardante per siaj dismalfermitaj okuloj en plafonon, se ŝi ankoraŭ, iam ajn, rememoras lin. La abdomeno. Kial ĉiam doloras tie? Kial ne doloras la koro aŭ io simila? Unu fojon, multe da tempo post ĉio ĉi, kiam Sanja jam iĝis nur perdita sonĝo, kiam li pensis, ke li firme tenas sian vivon en siaj manoj (neniam diru neniam), li demandis neŭropsikiatron Draŝkoviĉon, kial la amo doloras ĝuste tie, en la abdomeno? Li ne plu memoras kion tiu precize respondis, sed scias, ke la psikiatro tiun lokon nomis la regiono *splanchnicus*, kie disbranĉiĝas kaj interkruciĝas nervaj vojoj, kiuj spasme igas la surrenan glandon eksudi adrenalidon, kaj per streso defendas la minacatan organismon. Iel-tiel. Li deziris scii. Malamis li tiun diplomaton, kiu aĝis tridek ok jarojn, kaj estis kompare kun li, kiu tiam aĝis dudek jarojn – vera maljunulo. Li konstruis kompletan strategion de malamo kontraŭ la samaĝuloj de sia konkuranto, kontraŭ tiu tuta mondo, kiu povas pagi ĉion, kion deziras, kiu povas ricevi ĉion, kvankam estas verkitaj tiom multaj fabeloj en kiuj geoj, finfine, ĉiam trovas unu la alian, kaj filmoj, filmoj kun feliĉaj finaĵoj, kie edziĝontino fuĝis en la lasta momento de oltaro, ne povante inter siaj palaj lipoj elbalbuti la vorton – „jes“. Vento frenezas en la vualo de la june-dzino dum ŝi kuras transstraten inter aŭtomobiloj por ĵeti sin en la brakumon

de tiu, kiun ŝi efektive amas, de tiu, al kiu ŝi vere apartenas. Mi malamas tiujn maljunulojn, aĝajn tridek ok jarojn. Mi malamas ilin, mi malamas ilin...

Fojfoje Sanja venigadis sian maljunan edzon en ilian eksan kafejon „Malgranda Parizo“. Multegajn fojojn ili sidis, trinkis teon, tenante la manojn unu de la alia, ĉiam ne sciante, ĉu ili havos sufiĉe da mono por pagi ankaŭ kornbulkojn kun karvia surŝutaĵo! Miŝelo ĉiun vesperon, laŭkutime, sidis kun siaj kamaradoj, kiuj sciis nek pri Sanja, nek pri ilia dramo, dum ŝi je dutabla distanco vespermanĝis en silento, sen ununura elparolita vorto kun sia grizethara diplomato, kiu eĉ ne konjektis, kion al ŝi signifas la proksimeco de Miŝelo, kaj kiu, verŝajne, miris kial ŝi petas, ke li venigu ŝin ĝuste en tiel mizeran lokon, kia estas „Malgranda Parizo“, kaj kial ŝi enuas en la hoteloj „Metropoliteno“ kaj „Maĵestiko“! Miŝelo, kompreneble, ŝajnegis, ke ŝin li ne rimarkas, ridante pli brue ol la aliaj, ne salutante ŝin, kiam li ŝin ekvidis, kaj fintante, ke al li estas tutegale, kaj tion li faris, supozeble, sufiĉe sukcese, ĉar fine ŝi ĉesis alvenadi. Post tio li neniam plu vidis ŝin. Li ankaŭ nun memoras, ke liaj amikoj demandis lin: „Ŝajnas, ke tiu pupino vin fikse rigardas, ĉu ne?“ – post kio li ĉiufoje respondis, ke tio al ili nur ŝajnas, sed li sentis ŝiajn malhelajn okulojn sur sia nuko, sur siaj ŝultroj, sur sia mano, kiu tremis dum li estis proksimiganta tason kun teo al siaj lipoj. Li eĉ ne songis, ke en tiuj momentoj Sanja lin kreadis el sia malĝojo, vaneco kaj amo; ke li ĉiam restos tia, kian ŝi igis dum tiuj vesperoj en „Malgranda Parizo“, kaj ke venos la tago, kiam li pro punindaĵo estos punita, ke li, Miŝelo Babiĉo, devos pagi pro la sufero, kiun li kaŭzis.

Nu, nun li aĝas kvardek kvar jarojn, kun li sidas alia Sanja, kiu ĉi-vespere nomiĝas Una, dum alia knabo, kiu ĝuste ĉi tiam estas en armeo, kaj nenion povas fari, malamas lin, hipoteze, el la profundo de sia animo, kiel mezaĝan aĉegulon, kiu povas permesi al si venigi malsian knabineon en multekostan lokon, kia estas „Esplanado“. Jes, ĝuste tiel estas. Krom tio, ĉi tiu loko estas multe pli ŝika ol tiu kafejo, la iama kafejo, kaj li estas multe pli fia ol tiu diplomato de Sanja (kiu nun, kune kun ŝi, probable, ŝimas en Kinŝaso aŭ Lagoso kiel la tria sekretario de ambasadejo), ĉar al ĉi tiu Una, ĉe-sidanta, li eĉ geedziĝon ne povas proponi, nenion al ŝi li povas proponi, krom iomete da provizora plezuro en la komforto de ŝtelitaj horoj. Absolute nenion! Nun li estas tiu diplomato. Nun li devas pagi por tio, kion li iam faris. Nun ili kuŝas en bankuvo, paralizitaj pro varmo, kun la gamboj interplektitaj, kun la nukoj malsekaj. La profesoro pensas pri tio, ke devas esti terura tiu sento, kiam oni estas virino, kiam oni ĉiuj insidas, ĉikanas, palpetas per malsataj fingroj, kiam oni sentas viran barbon sur sia vizaĝo, fiksaŭskultas malkontinuan spiradon de ekscitita masklo, elportas intimecon... Imagu iun ajn potencan, gravan viron sur virino – li ne plu al vi ŝajnos monumentosimila; lia loza

blanka postaĵo luliĝas supren-suben, supren-suben, supren-suben, konfuzita rigardo, krioj, ĝemado, ho, dio!

Una, ŝajne, estis dum tro longa tempo en misaj manoj. La profesoro sciis kiel konduki kun knabinoj. Nenion specialan li faris. Li nur helpis al Una forgesi malbonajn spertojn, atendante trovi lin. Al li ŝajnis, ke li modeste asistas ŝian amludon. Ŝi sin, simple, eltiriĝis el siaj malnovaj traŭmatoj, senvestiĝis, komencis dorloti sinmem, tiel, kiel ŝi deĉiame deziris, sed tion al tre malmultaj plaĉavidaj aŭ prudaj viroj kuraĝis konfesi. Li nur tuŝetis ŝin, milde, milde... „Vi ja havas virinan manon!“ ŝi lin laŭdis. Ŝajnis kvazaŭ Una estus barko, kaj li barkokonstruisto, ke li lasas ŝin etere elgliti el la doko, en kiu estis konstruita, farinte nenion specialan, nur tratranĉinte ŝnuron. Una englitis la amon, sentinte post nur dio scias kiom da tempo, ke iu al ŝi redonas kaj donacas ŝian propran korpon.

„Ĉi tio iĝis danĝera!“ mense diris la profesoro, komencante organizi elirejojn se okazos ama incendio.

Ili sentis postamoran lacon. La profesoro sciis, ke al li ne restis multe da tempo. Li forkonsumis sian tagon kun Una. Ankaŭ nokton li forkonsumis. Kiom da noktoj al li ankoraŭ restis? Li komencis paniki. Tiam li fordonis sin al toleremo. Baldaŭ, li estos vere tre, tre maljuna kaj fordoninta sin al sia sorto. Al li ne plaĉis esti konstante nur ŝtelanto de amo. Kion li volas ankoraŭ? Ĉion li volas. Ŝian estontecon, ekzemple. Tamen, tio estas malebla! Li tion sciis, sed tamen deziris. Li rigardis la langvoran Unan, denove inertan en la reto de sia beleco, etenditan sur la kuŝejo, kun unu mano metita sub la kapon kaj la alia tenanta bruligitan cigaredon, distre observanta la leviĝadon de la fumo al la tegmento. Kun kiom multaj viroj vi gekuŝos post mi, ho knabineto? Kun kiom da ili vi ankoraŭ seksumos, geumos, intergratos, intermordos, al kiom da koloj vi ankoraŭ anhelos, kaj parolos: „Enen, enen, nun, enen!“ Kun kiom da ili vi ankoraŭ gebanos en ŝaŭmo, geduŝos, kiom da ili vin ankoraŭ sapumos, lekos, kiom da ili kisados tiujn viajn lokojn, al kiom da ili vi ankoraŭ malkaŝos viajn sentemajn punktojn, la sekretan pozicion de via ĝugrajno, la topografion de karno, kun kiom da ili vi poste gefumos, kiajn cigaredojn, kaj kion vi gedrinkos (kiuj vinoj estos laŭmodaj tiusezone?), ĝis la momento kiam ankaŭ vin, vin etulino mia, foje forportos diablo, ĝis la momento kiam ankaŭ vi komencos esti perdantino; ĉar ankoraŭ neniu evitis sian sorton, ĝi estas neevitebla, tion vi devas absolute scii! Kie mi estos tiam – mi estos nur malklara, nebula loko en la sennombra kolono de litamikoj, kiuj plagis vian belan korpon, nur kromstacio, en kiu vi ŝanĝas la ĉevalojn kaj ĉaron dumvia longa veturo en niĥilon. Mi estos, sekve, nenio, aŭ ankoraŭ malpli ol nenio.

Li estis ĵaluza pri alvenanta tempo, ĵaluza pri sia ĵaluzo, sed poste li rezignis ĉion, permesante, ke Una portu lin kiel torento. Sed tutan tiun tempon,

ili kvazaŭ rigardus unu la alian el grandega distanco, eĉ kiam iliaj ventroj estis gluiĝantaj haŭt-al-haŭte, lip-al-lipe, dent-al-dente, spir-al-spire, kaj tiam ili kun la rapideco de lumo, kun la rapideco de pereco, malproksimiĝadis unu de la alia, kaj tiam inter ili estis nevidebla muro, luma bariero, simila al la nuda, elingigita glavo en kuŝejo inter knabo kaj knabino el la fama popola rakonto, kaj tie oni nenion povis fari, neniu povis ion ajn bonigi; ili sciis, ke ilia amrilato estas neeltena, ili ambaŭ ja konis tiun maljunan fiulon – la vivon, ili ja scipovis antaŭvidi ĉion, kion ĝi faros, ĉion kion ĝi uzos, kiel ĝi friponos, humiligos, pereigos, venenigos, malstreĉos ĉiun nodon – li tion sciis dank al sia sperto, kaj Una dank al sia speciala talento, kiu faris ŝin maljuna kiel Balkanio, kvankam ŝi aĝis nur dudek kvar jarojn. Ŝajnis ke ŝi, belulino, sufiĉa por si mem, havas pli da talento vivi nur por ĉi tiu nuno; cetere, antaŭ ŝi ja estis tre multe da tempo! La profesoro, kaŝe inklinanta al malfeliĉo kiel stilo, ofte malbonigis ĉiun belan momenton en sia vivo, simple travivante ĝin, gardante anticipe feliĉajn vidaĵojn por sia maljunaĝo, por malbonajn tagojn, kiuj sendube aperos, pro kio li eĉ dum unu momento ne povis penetri tra estontaj jaroj, kiuj ilin estis disigontaj, ĝojante anticipe pro la sufero, kiun iun tagon, eble baldaŭ, li devos elteni, kiam Una lin forlasos.

Baldaŭ li iĝis ĵaluza pri ŝia provoka, dorlotema voĉo: „Haloooooooooo?“ – ĉiufoje kiam ŝi levis la telefonan aŭskultilon. Kies voĉon ŝi atendis aŭdi? Por kiu vibris tiu voĉo, kiu sin proponas al ĉiu nekonata telefonalko? Eble al iu bela junulo? Ŝi ja ne povis scii, ke ĝuste li telefonas! Pri kiu ŝi pensis proksimiĝante al la telefono? Nun, kiam li povis havi ŝin ĉiufoje, kiam li tion ekdeziris, li kvazaŭ estus en infero, irante kvazaŭebrie sur stratoj, implikiĝante en sian propran belan kaj teruran sekreton, kiun li al neniu povis konfidi, kiu lin estis ekscitanta pro la kaŝita feliĉo, samtempe timigante lin pro ĝia eksplodpovo, ĝi ja povis ajnamomente dissplitigi lian ŝajne kvietan kaj aranĝitan vivon.

Observante kaŝe Unan, kiu sidis ĉe la tablo en „Levo“ en Labako, kien ili eskapis semajnfine, li konstatis, ke ŝia beleco, ŝajne, estas sufiĉa por si mem – temis pri ia eksterordinara, absolute speciala talento. Una, nome, estis kompleta; ia speco de milda dormemo ĉirkaŭvolvis ŝin simile al nevidebla pelerino, kvazaŭ ŝi, komforte lokiĝinta, senĉese sidus meze de magneta kampo de sia altirforto, ne interesiĝante pri io ajn, kio troviĝas ekster tiu mistera korono. Multegajn fojojn li aŭdis, ke la belulinoj preskaŭ ĉiam estas malfeliĉaj; eble poste, kiam ilin forlasas ilia talento konservi sian belecon, sed dum ili la belecon posedas – nenion alian ili bezonis! Kontemplante samtempe ankaŭ sin mem, li konstatis, ke li estas neperfekta, ke li ĉiam bezonas aliajn homojn, virinojn, ideojn, vortojn, bataletojn, objektojn, aŭskultantojn, moviĝojn, ian ajn okazadon... Dum momento li estis kompleta nur tiam, vere nur tiam,

kiam li kuniĝas kun fremda beleco aŭ atento. Eble ĝuste pro tio li la tutan vivon kaŝe ĉasis belulinojn, embuskante ilin ĉiuloke, persvadante ilin esti iomete liaj, aŭ almenaŭ nur iomete proksimaj al li. Sen io ajn okulfrapa, en sia kolorperdita surtuto el maldelikata tolo, larĝa helblua pantalono kaj blanka alkola ĵerzo, kun aktoj en kiu kaŝiĝis tuta aro da altvaloraĵoj, aperigitaj per magia truko inter ordinaraj bagatelaĵoj: pudrujoj, fajrigiloj, ŝminkiloj, pape-raj poŝtukoj, alpendaĵoj kaj aliaj inece-katecaj objektoj (ĉirkaŭ ĉiuj tiuj aĵetoj flugpendis ŝiaj magiaĵoj), Una estis memmova formacio, kapabla vivi kaj ne diserigi, sen helpo de fremduloj, ajnaloke kaj ajnatempe. Sendepende de tio, kiel ŝi sidis, ŝia pozo ĉiam vidigis noblan kvieton kaj memsufiĉon; ĉiufoje kiam ŝi ekmoviĝis, ĉiuj apudantoj, reagante al ŝia movo, ekmoviĝis ne demandante kien; kiam ŝi apogis sin sur la kadrumon de iu domaĉo, ĝi ekhavis eksterordinaran signifon; putreta boato sur la rivero Savao, sur kies pobon ŝi ekpaŝis, sammomente iĝis eksterordinara kadro por ŝia manekena krurpozo, sed ĉio ĉi estis okazanta sen ia ajn peno, sufiĉis nur ŝia esto, ekzisto kaj nenio plu! Ofte li koleregispro tiu ŝia kvieto (li opiniis, ke ŝi ĝin tute ne meritis, ke ŝi ne rajtas havi ĝin), li provis ankaŭ mem akiri ĝin iel, serĉante en si forton por fokusiĝi, kvietiĝi kaj koncentriĝi al ia zen-pozicio, timante pli kaj pli ofte, ke apud Una li iĝas vasalo, kies nura tasko estas admiri ŝin. Sed ĉio estis vana, tial li koleris, ĉar ŝi, verŝajne, tute ne konsciis pri sia granda naturdoto, kiu al ŝi, en liaj okuloj, donacas tiom multajn malhandikapojn. Li ankaŭ sciis, ke li iompostiome perdas memstarecon, komencas sinki en deprimon, li sentis sin punita kaj neglektata ĉiun minuton, kiam li ne estis kun ŝi, li estis kolerega, sentante, ke li dependis nur de Una, de ŝia afableco al li, kaj ke ŝi ankaŭ povas lin igi stultulo, same kiel multegajn aliajn virojn antaŭ li – verŝajne.

La tutan ruzecon, kiun li ĝis tiam posedis, li uzis por esti kun Una, por ŝin konkerti, ligi ŝin firme al si, eldevigi promesojn kaj kredigojn pri amo (ho, kiel kompatinde finiĝis lia enorma sperto!), kvankam ŝi ĉiam kun li sidis malsovaĝe, tenante distrasente la manon en lia mano, tre proksime, sed samtempe restante tre fora kaj netuŝebla! Una. La nura. La sola. Li penis forŝiriĝi de tiu amo, kiel laca dronanto penas forŝiriĝi el flu-sablo, senespe-re kroĉiĝante per siaj vundoplenaj fingroj al la pintoj de tigoj de kelkaj siaj antaŭaj sukcesoj, al la sablo kaj ŝiriĝantaj radikoj, al folio kiu falas, al aero – sed li tamen sentis sin senrevene dronanta, lia tuta vivo en tiuj momentoj aperis antaŭ liaj okuloj impete, kiel filmo pri absolute fremda homo kiun li neniom povas helpi.

Li plurfoje decidis puni ŝin, ne kontakti ŝin tutajn tri tagojn, sed tiu tri-tago por li iĝis ĉiamo, tial ĉiufoje jam la unuan vesperon li komencis mal-trankvile rondiri en ĉambroj, levadi la aŭskultilon, diski ŝian numeron, sed aŭdinte la duondorman sonon de ŝia voĉo: „Haloooooooo?“ – li ĉiufoje

hontosente mallevis la aŭskultilon, dum glacia ŝvito aspergis lian frunton. Tiam li retelefonis.

– Ĉu vi ĵus telefonis? – demandis ŝi, sciegante, ke tion faris li.

– Ne! – mensogis li. – Mi ĵus eniris la domon... Kiel vi fartas?

Al li ŝajnis, ke Una amas lin, sed la belulinoj ja ne povas ami iun ajn krom sin! Pensante pri tio, li ne pensis pri la virina memplaĉo, kvankam Una multegajn horojn pasigis antaŭ spegulo, observante sin, kvazaŭ sin vidante unuafoje en la vivo; ne, la demandon, eble, oni devus fari alimaniere: ĉu povas perfekta skulptaĵo ami sian neperfektan, provizoran posedanton, ne enamiĝinte eĉ en la majstron kiu ĝin muldis? Tamen, estus erare pensi, ke Una estas malvarma, male, ŝi estas nur animforesta: jen trafa vorto, *animforesta* – kontempleganta sin mem, fordonanta sin al sia dolĉa paralizigo, el kiu ŝi fojfoje katece etendis sian brakon aŭ kruron, kapskue retropuŝante bukilon, senkonscie glatumis siajn mamojn kaj cicojn. Ne, ŝi ne estis letargia; ofte ŝi fuĝis el tiu sia memsufiĉo en ludon, en agon, en ridon, en piroteknikan saltadon kaj etajn frenezaĵojn, sed ankoraŭ pli ofte en depresion. Tamen, ŝi kvazaŭ sentus sin en sia vivo pli komforte ol iu ajn alia en la mondo, ŝi ĉiam estis en harmonio kun la spaco, en kiu ŝi troviĝas; ĉiu alia apud ŝi sensukcese penus nestiĝi kiel ŝi; estis senteble, ke Una kaj spaco, ŝia interna spaco, estas en ia sekreta harmonia komploto, kiun la aliaj homoj nur malbonigas per sia ĉeesto.

Finfine Una, ŝiriĝinte el sia ensorĉiteco, rimarkis, ke la profesoro atente okulmezuras ŝin. Ŝi ekridetis honteme, kiel knabineto, kiun oni vidis tuŝanta sian pipiĉeton. Ekkonsciinte, ke li ĉion *komprenis*, ŝi rekompencis lin por tiu lia eksterordinara peno per mallonga frazo: „Oho, kun vi mi fartas iel tieeeel boneeee...“ – kiu, signifante absolute nenion, al la profesoro dum certa tempo signifis ĉion.



(El la raporto de Una) „... en Zagrebo li renkontiĝis kun Sherry Goodman, Usona sociologo, kiu havis serion da prelegoj en Usona kultura centro. P. ne parolis kontraŭ nia lando. Male, li pledis ankaŭ por iaj aferoj, pri kiuj li antaŭe parolis al mi, ke ili lin nervozigas. Sherry Goodman lin plurfoje demandis pri lia pozicio en Universitato, kaj en la publika vivo, ofertante malrekte ian ajn helpon, kion P. senhezite rifuzis. Al la demando, kial al la seminario pri komunikado en moderna socio, kiu en septembro okazis en Harvarda universitato (Carpenter centro pri vida komunikado), estis sendita ne li, sed H. Alibegoviĉo (kiu tute ne estas sociologo), kvankam P. estis persone invitita de la profesoro Maxwell Stone, P. respondis, ke li ne povis alveni pro sia laboro, kaj ke neniu respondecas pri tiu anstataŭo. Ni loĝis en la hotelo „Esplanado“. P. pagis la elspezojn. La sekvan semajnon ni forveturis en Labakon. (Hotelo „Levo“). P. tie renkontiĝis kun grupo da intelektuloj en Pen-klubo. Ili planas komenci eldonadon de nova revuo pri sociologiaj esploroj, kaj petis lin iĝi redakciano. P. deklaris, ke li estas absoluta individuisto, ke li batalas siamaniere, kiel tutsola gerilano, ke al li ia ajn grupaniĝo, sendepende de tio, kiom li individue respektas ĉiun grupanon, estas tute neakceptebla. Li promesis eksteran kunlaboron. Laŭ mia memoro, P. diris, ke ĉiu grupo, negrave kiom avangarda ĝi estas, tamen enhavas hierarĥion, kion li absolute ne toleras. Li ja ne aliĝis al la oficiala hierarĥio, kion li facile povis, do ne ekzistas ia ajn kialo, ke li aliĝu al la opozicia, eĉ se temas pri intelektula opozicio. Mi ne scias, kion vi ankoraŭ esperas, ke mi rimarku en la konduto de P! Ĉi tio estas ĉimomente pli-malpli ĉio. U.“



Foje la profesoro en malgranda apudmara universitato havis prelegon pri universalisma metafiziko de amaskumunikiloj. Tien li kunveturigis Unan, sopirante pasigi kelkajn kvietajn noktojn en la urbo, kie ilin neniu konis. Alesto de maro refreŝigos ilian amon. Ilia gastiganto, la korpulenta doktoro Draŝkoviĉo, kiu interalie estis pasia kolektanto de antikvaĵoj, proponis al ili viziti la monaĥejon de la Dipatrino Marborda en montoj, kie li estis vizitonta psike malsanegan pacienton, kiu denove furioziĝis. Tre multaj frenezaj uloj vivas en ĉi tiu regiono. Tiu loko estas izolita de la alia mondo, pro kio ĉi tie plej ofte okazas geedziĝoj inter parencoj. Verŝajne tiuj malfeliĉuloj tamen ne ŝajnus tiom nenormalaj, se ili, hazarde, aperus sur parizaj stratoj, kie tiaj uloj estas ĉiutagaĵo, kie la homoj estas toleremaj, kutimiĝintaj al diversaj mensaj ekstravagancoj. Rememoru, ekzemple, Francis Picabia aŭ Tristan Tzara, iun ajn surrealiston aŭ dadaiston; rememoru pri Dalí aŭ Duchamp; multe malpli seriozajn umojn, ĉi tie, en nia duonsovaĝa regiono oni deklaras nesaniĝeblaj, kvankam en Saint Germain oni eĉ ne turniĝus por alrigardi tian konduton. Sed en ĉi tiuj malriĉaj vilaĝoj, kie oni atendas, ke ĉiu viro laboregu de mateno ĝis mallumiĝo, edziĝu kaj naskigu idojn, por ke la gento pluekzistu sur ĉi tiu

malabunda kaj malfekunda tero – ĉiu buŝo kiu manĝas, sed ne perlaboras, estas granda ŝarĝo por la familio.

Ili glitis sur la glata asfalto de Adria ĉefŝoseo, dum dekstraflanke rebri-ladis maro sub la oblikvaj sunradioj de Sankt-Martena somero. Ĉu eblas esti freneza en ĉi tiel benoplana regiono kun klare apartiĝantaj lumoj kaj ombroj, kie ĉio ŝajnas racia, lavita kaj pura?

– Tamen ne ekzistas mensostato pli depresia ol ĉi tiu, kiu vivas sur la marbordo – klarigis la doktoro Draŝkoviĉo, stirante kampvojan „Landrove-ron“. – Ĉu vi scias, ekzemple, ke en la leĝaro de multaj marbordaj urboj, jam de la mezepoko, la tagoj kiam blovas vento, kiu estas kromnomata „aŭstraló“, aŭ, en kelkaj regionoj ankaŭ „sudulo“, se okazis murdo estas konsiderataj kiel faciliga cirkonstanco? Jen, ankaŭ ĉi tiu ulo, pro kiu mi veturas supren, se li hazarde estus verkisto, kredus sian malsanon ne puno, sed beno. Li, nome, ĉiun duan tagon ŝanĝas sian aĝon! Kiel? Se li hodiaŭ havas, ekzemple, dudek sep jarojn, li memoras sian filinon, kiu naskiĝis kiam li havis dudek ses jarojn, sed li eĉ aŭdi ne volas pri sia filo, kiun li naskigis en sia tridek kvina jaro. En la tagoj, kiam li havas dekok jarojn, li dum la tuta tago briligas siajn botojn, kaj beligas sin, ĉar li estas renkontiĝonta kun Erjika antaŭ la soldatejo en Graz, kie en la 1916-a jaro li soldatservis. Iufoje li sinkas ankoraŭ pli profun-den tra la tempo; tiam oni lin devas alivesti, ĉar li pisas en sian kalsonon, kaj ploretas kiel novnaskito. Estas interese, ke li neniam havas sian veran aĝon! Verŝajne paneis lia tempomekanismo, kiun ni ne komprenas! Mi supozas, ke li mortos en la sama momento, kiam li atingos sian, okdekjaran aĝon, kaj elmerĝos el la tempo, en kiu li tiel belege perdiĝis. Kiom aĝa li estas nun? Nun li havas dudek du jarojn, kaj li enarbariĝis. Li komencis sian propran militon kontraŭ la vilaĝo...

Post proksimume dudek kilometroj de veturo sur asfaltita vojo, ili sen ia ajn antaŭaverto deflankiĝis en montojn, tra malalta, dorna arbustaro, inter kiu ŝoviĝis apenaŭ videbla kaj kaŝita ŝtona vojo, larĝa ne pli ol bova ĉaro. Tiu karstovojo konstante gvidis alten, kaj ili fine aperis sur herba altebenaĵo, kiun surŝutis jenjenaj blankŝtonaj egaĵoj, kiujn, kvazaŭ lude, enfosis nenifara loka giganto. Al ili ŝajnis, ke kelkaj ŝtonoj moviĝas; sed ne, tio estis nur ŝafoj, kun longa kaj malpura felo, kiuj treniĝis sur la ruĝa tero sur kiu, lokloke, kreskis herbo. Alte, ĉe la horizonto staris paŝtistoj, apogiĝintaj sur longaj nodplenajn bastonojn, kun surŝultraj manteloj. La doktoro Draŝkoviĉo, kies dika kaj kvadratumita ĉemizo estis ŝvitsaturita, traŝovadis lerte la sanservan aŭtomobilon laŭ nur al li konataj ŝparvojoj; ŝajnis, ke ĉiuj iliaj dentoplombaĵoj elfalos pro veturskuiĝado kaj saltetado, kiam ili traveturadis valojn, tratranĉatajn de multaj sekiĝintaj riveretoj, ĉirkaŭveturis karpentan arbaron, supreniĝante pli kaj pli al ŝajne neatingebla celo, alta montmurego,

malantaŭ kiu troviĝis la fino de la mondo, kiun la profesoro kaj Una konis. Ili haltis nur unu fojon, apud forlasita akvomuelilo, por ke Una akvumu flo-rojn. Post du kaj duono da veturhoroj, kiam la profesoro kaj knabino jam tute perdis esperon, ke ili iam ajn atingos la promesitan monaĥejon, antaŭ iliaj okuloj subite aperis kaŝita valo, en kies meza mezo troviĝis aro da longaj, malgraciaj konstruaĵoj, kun la preĝejo de Dipatrino en la centro, kiu, kvazaŭ tute senpeza, rekte el la ĉielo surflugis la manplaton de sia fondinto, la ĉefepiskopo Danilo. Ili hirtiĝis, ekscitfrapitaj, ne nur pro la beleco de ĝiaj harmoniaj kupoloj, sed ankaŭ pro subita malvarmo; ĉi tiu regiono, kvankam ne tiom malproksima, sendube havis alian klimaton, ĝi estis plena da longaj, malsekaj ombroj kaj freŝa aero. Ilin renkontis bojado de monaĥejaj hundoj, kaj klukado de malkvietiĝintaj kokinoj. Trarigardinte la internon de la preĝejo (ĝin nur por ili malŝlosis la sonorilisto Mutao, malsuprenveninta desur iu el duondetrinitaj freskoj el la frua 14-a jarcento – Kristo ja benas ĝibulon), ili flamigis mallarĝajn flavajn kandelojn por la vivantoj kaj forpasintoj, poste certan tempon staris, fiksaŭskultante forfluintajn jarcentojn, sentante, pli profunde ol iam ajn antaŭe, siajn pekojn; malseriozecon, ĝuamon, ajnamanieran havigon de plezuro – la tutan kaŝatan ŝarĝon kiun, ŝajne, en ili rimarkas ĉiuj, tuj kiam vidas ilin, sendepende de tio, kiom ili tiun ŝarĝon kaŝas kaj sekretigas.

La monaĥejestro Dimitrio, maljunulo kun maldensa, blanka barbo en eluzita nigra vesto, kiun surgutis vakso, kies kubutoj kaj genuoj brilis pro trolonga portado, akceptis ilin en la gastoĉambro de Tranoktejo. La doktoro Draškoviĉo transdonis al li skatolojn kun kuraciloj kontraŭ lia malsano. Tio estis longa ejo, kies anguloj estis malaperantaj en duonobskuro, kun kelkaj majestaj senmovaj servoŝrankoj altgermanstilaj, kaj sofoj, tabletoj diversepokaj; muroj, kiujn kovris ikonoj de Bokela skolo, sed ankaŭ malmultekostaj, ŝtongravuritaj portretoj de sanktuloj, apud fotografaĵoj de ekleziaj altranguloj, kiuj iam vizitis la monaĥejon. Sur bretoj glimis rebrilantaj objektoj; fendohavaj ceramikaĵoj sur kiuj anglaj ĉasistoj postkuris blujajn vulpojn, malheliĝintaj kandelinoj el bronzo kaj vitro, arĝentaj pletoj kaj kalikoj, kaj eĉ unu grandega Venecilanda purpura glaso el Murano, kiun donacis nekonata pilgrimulo, konservinte ĝian fragilecon en interkrutejoj kaj ravinoj tra kiuj li vojaĝis; la planko estis frotita kaj flava kiel vakso, sur ĝi kuŝis diversegaj kovriloj – hejmkudritaj linajoj kaj malgrandaj Persaj tapiŝoj. Laŭlonge de la masiva mangŝoĉambra tablo, kiu longis de unu ĝis la alia fino de la ĉambro, estis vicigitaj petrollampoj (la monaĥejo estis senelektra), oni sidis sur malmolaj seĝoj, kiujn tegis ledoj, kun alta apogilo, kiu ne permesis senstreĉiĝi. Kape de la tablo sidis la monaĥejestro Dimitrio, kies sanktule blanka barbo, kaj glorkrono el maldikiĝintaj silkaj haroj, helis kvazaŭ sur preĝeja bildo; ĉe li sidis

la doktoro Draškoviĉo, je la alia flanko de la tablo sidis Una (rok-kantistino erarveninta en la monaĥejan historion el la fino de la pasinta jarcento); surtabliganto estis la sonorilisto Mutao, ĉirkaŭkuranta la tablon per sia lama piedo. Li verŝis por ili orecan, dufoje distilitan, prunbrandon en miniaturajn kristalajn glasetojn, kiujn el servicoŝranko oni prenas nur kiam alvenis speciale gravaj gastoj. Maljuna servistino alportis laktokremon kaj kaprofromaĝon en lignaj ovalujoj. Pano malmola, anakoreta, bakita el sekalo, sekbruis sub la dentoj. Iuj gastoj manĝetis atendante, ke la tagmanĝo estu preta: ses kokidoj en lada bakujo, sur kiun oni amasigis ardaĵojn el fajrujo en kuirejo kun tera planko. „Jen, nur tion ni havas hejme; gastojn ni ne atendis!“ Una pardonpete diris, ke ŝi volas vizitila monaĥejan ĝardenon, kaj eliris el la manĝejo por fari fotojn per „Sony“, lasante la virojn interparoli pri vetero. Mutao akompanis ŝin je kelkpaŝa distanco; ŝi sentis lian suspekteman straban rigardon sur siaj ŝultroj kaj postaĵo. Enirinte obskuran deponejon kiu fetoris je kapra sekviano, faruno, mucido kaj malnova ĉevala ekipaĵo, ŝi enrigardis puton meze de atrio, registris eĥojn, eĥojn – ĉi tie oni povis konstrui splend-hotelon, en kiu kelneroj devus esti kostumitaj kiel monaĥoj, sed poste, timigita pro silento kaj mallumaj kavoj, kiuj gvidas ien, profunden en la kelon, ŝi revenis en la gastoĉambron, kie ŝi renkontis ankoraŭ unu viron. Tio estis juna monaĥo, Paŭlo, kiu antaŭnelonge revenis post studado en Zagorsko, proksime de Moskvo. Li aĝis ne pli ol dudek kvar jarojn, konkludis Una, atendante ke iu lin prezentu al ŝi; sed neniu el la viroj leviĝis de la tablo, ili ŝin simple tute ne rimarkas, dronintaj en sian interparolon. Sidiĝinte, ŝi povis pli bone observi lin, ĉar ŝi estus ĝuste transe de li. La palan, longforman vizaĝon de la junulo, kun ardaĵ migdalaj okuloj, kadris, kiel la vizaĝon de Kristo, maldensa nigra barbo. Liaj longaj kaj spindelformaj fingroj distre turnadas glaseton kun brando. Li sidis rekte, preskaŭ rigide, sed sen ia ajn peno (jen ŝtoniĝinta Hamleto), kvazaŭ tio estus lia la plej natura sidpozo, tute nekonŝianta sian korpon. Nur la lakto-roza vangokarno vidigas lian junecon. „Li ankoraŭ estas infano, tiu povrulo, kiu vivas ĉi tie!“ – mense diris Una, rigardante kaŝe sub la okulharoj sian samaĝulon. „Ĉu mi provu?“ Ŝi premis startbutonon sur la kasedilo:

– Arto! Ho, arto! Min jam tedis la interparoloj pri arto! – diris la profesoro. – Kvazaŭ ne ekzistas aliaj aferoj krom arto! Kiu, ĝenerale, planas artumi en nia tempo? La ikonopentristoj en tiu tempo eĉ ne opiniis, ke ili devas subskribiĝi sub siaj faraĵoj; tute senigitaj de plaĉavido, ili simple plenumis sian farendaĵon, tio por ili estis ĉio! Ĉar en tiu epoko, la freskoj estis primitiva formo de televido; oni povas eĉ diri – bildrakontoj! – kvankam tio sonas blasfeme. Jes, bildrakontoj. Simpla vico da bildoj, sur kiuj sekvas diversaj scenoj el la vivo de sanktuloj. Tiel evidentmaniere ili devis montri al piuloj ĉion, kio kun la homoj okazos en infero, se ili estos pekantoj, kaj kun kio ili konatiĝos

en paradizo, se ili estos bonaj kristanoj. Se ni atentege observas tiujn bildojn, ni povas vidi, ke la scenoj en kvadratoj (kun tieaj surskriboj kaj signoj, kompreneble), sekvas unu la alian laŭ la tipa dramaturgio de bildrakonto! Jen, Dipatrino naskas Kriston; sur la dua bildo oni lin baptas, en la tria kvadrato li predikas; infanaĝo kaj junaĝo; kaj poste sekvas strio kun la juĝproceso, dornkrono, vipado, krucportado, krucumo kaj apoteozo. Se ni aldonas ankaŭ aliajn scenejajn formojn: Ĥorusan kantadon (sono), lumon (lumo kaj sono), incenson (odora dimensio), sakralan arkitekturon kaj skulptaĵojn (formo), jen unu el puraj praformoj de la nuna amaskumunikila sintezo!

„Mi volontege enŝoviĝus sub lian sutanon. Li sendube sub ĝi havas nenion. Mi buliĝus sub tiu moviĝanta tendo. Mi ĉiurkaŭprenus lin per miaj kruroj, por ke li portu min. Li sendube havas belajn, fortajn krurojn. Mi volus bani lin, tiun barbohavan bebon. Sapumi lian tutan korpon. Nudaj, mi kaj li, nudaj, kuri sur kampo. Nudaj – rajdi ĉevalojn. Mi volus lin malvirtigi. Lernigi al li ĉiujn umojn, kiujn mi scias. Ke li ekzistu nur por mi. Nu, knabo, alrigardu min! Deigu viajn belulajn okulojn desur la tablo! Tie estas nenio krom paneroj, per kiuj vi ludas. Alrigardu min! Mi lekos por vi miajn lipojn. Mi montros al vi mian langon. Alrigardu, alrigardu!“

La doktoro Draŝkoviĉo kontraŭis; se tio estas vero, diris li, nu, ĝusta tio estas eble nur duone, kial do la skemo de ĉi tiu preĝejo, same kiel de multaj aliaj diservejoj, havas la formon de kruco, kvankam tiun krucon neniu vidas desur la tero, ĝi ja videblas nur de la alto de fluganta birdo? (Kion faras ĉi tiu malgranda malĉastulineto? Ŝajnas, ke ŝi volas delogi la junan monaĥon, ĉu tio eblas? Nu, ŝi piĉumos lin, ĉi tie, sub la tablo!)

La doktoro, fakte, foje havis eblecon flugi per armea helikoptero super la preĝejo de la Dipatrino Marborda; la hlikoptero estis transportanta malsanegulon, kaj nur tiam li komprenis la kvintesencon de ĉi tiu diservejo. Ĉirkaŭita de netrapaseblaj montoj, arbejoj kaj interkrutejoj, la preĝejo estis ĉiamasigno, signalo al la ĉielo, ke la kruco kaj religio ĉi tie estas konservataj malgraŭ ĉio. Kvazaŭ iu desur la tero per arhitekturo sendis al la anĝeloj mesaĝon, ke sube vivas animoj – perditaj sed baptitaj.

– Neniam oni povos kompreni la belecon kaj profundan religiismon de ĉi tiu loko, krom se oni flugas super ĝi per helikoptero, ni ja estas senflugilaj! – asertis la doktoro Draŝkoviĉo. – Ĉar, pro kio la nekonata konstruisto investis tiom da klopodo por krei belecon de la tegmenta konstruaĵo, se oni ne vidas ĝin desur la tero?

Kaj dum la senlaca doktoro kaj monaĥo Paŭlo igis novan disputon pri la religio kaj dogmo, la profesoro sentis, ke Una rigardas la junulon. Denove aperis tiu malnova sento, ke li estas tro maljuna, jen, Una apartenas ne al li, sed al ĉi tiu juna asketo. Volontege li ŝanĝus sian neŭrozan histrionan vivon,

en kiu oni senĉese ion defendas kaj atakas, por havi la kvietan kaj persistan piecon de ĉi tiu knabo, kies korpo estas liberigita de superflua karno, graso, senagemo, voluptaj deziroj. Ĉu ne estus pli nature ke, anstataŭ li, kun Una estu tiu monaĥo; ke ili interamu – tiuj du majstroverkoj de la naturo kaj juneco; sveltaj, teneraj kaj fortaj, ke ŝi ne treniĝu kun la profesoro sur ĉi tiu malfeliĉa tero, eterne fuĝante, kun konscienciproĉo sur la ŝultro, simila al ekzotika birdo? Jen loko, kien, eble, indus retiriĝi kaj pasigi la restaĵon de sia vivo en kontakto kun veraj ...oj, kiujn li jam delonge forgesis: ĉielo, ruĝa tero, akvo, ŝtono, ŝafo, paŝtisto, montoj kiujn surkreskis flava printempa spartio... Lin kaptis iaspeca senbrido. – Nu, provu frenezigi lin! – flustris li al Una, kliniĝinte por kapti pecon de fromaĝo. – Nu, ni vidu tion, ĉu vi povos?

– Mi kvazaŭ vidas ilin – parolis fascinsente la doktoro Draŝkoviĉo – alvenantaj elfore, portante sian ilaron; spatelojn, vertikalilojn, pigmentojn por farboj, faskojn da pergamenoj...En skatolo estas iliaj penikoj: la penikoj el haroj de sciuraj vosto estas utiligataj nur por pentrado de okulaj pupiloj; de porkaj haroj – por drapiraĵoj; de kastoraj – por linioj; larĝaj, akraj brosoj estas por la fono, la rondaj – por konturoj... Ili veturas el la malproksima Tesaloniko aŭ Konstantinopolo; eble eĉ desur grekaj insuloj; ili vojaĝas multajn monatojn perpiede kaj surĉevale. Iuj el ili mortos dum tiu peniga vojaĝo, aliaj estos prirabitaj, mortigitaj; triaj, eble, enamiĝos, kaj restos travivi la restintan vivon ĉe iu karavaneja vojkruciĝo, sed iuj el ili, tamen, atingos kaj elektos la plej kaŝitan Balkanan valon inter montoj, kiun ĉirkaŭas la plej densa arbaro – valon en kiun malfacile penetros armeoj kaj rabistaj hordoj. La unuan nokton ili tradormos subĉiele, apud fajroj. Dum pluraj semajnoj ili serĉos la plej konvenan lokon por starigi sian signon kontraŭ Granda Forgeso; ili mezuros valon, esploros la kvaliton de ŝtonoj en proksimaj interkrutejoj (tie ili poste faros ŝtonminejon), ili vigligos kalkon, senarbigos vojon, sur kiu estos transportataj prilaboritaj ŝtonoj kaj plumbo por fenestroj kaj kupoloj, sed poste, kiam la muroj estos konstruitaj, kiam ilin kovros la unuaj tavoloj de mortero, ili komencos starigadi skafaldojn – kaj pripentros ilin; unu jaron, du jarojn, dek jarojn se estos bezonate, ĝis kiam ĉio estos prilaborita, kaj estos bildigita ilia vizio de religio, arogante starigita meze de tiu netrairebla sovaĝejo, turnita al la ĉielo. Jes, al la ĉielo! „Sendu al mi bluan pulvoron kaj orajn folietojn“ – skribis unu el ili al Konstantinopolo – „ĉar mi, post du jaroj, finfine atingis la ĉielon...“

Una fiksrigardis la monaĥon, penante per hipnota koncentriĝo enigi obscenajn pensojn en lian bele konturitan kapon, kies ondiĝanta hararo estis falanta sur lian sutanon. Ĉiufoje kiam li ŝin alrigardis, lin renkontis lago de kaŝiĝinta dezirego, kaj malsekaj lipoj, kiujn ŝi lekis per sia lango. Nekaŝitaj promesoj. Evidente tiu rigardo lin konfuzis, kaj li paliĝas. Liaj fingroj

tremetis (li ne plu estis tiel modera kaj sinjoreca, kiel komence de la trolonga tagmanĝo, kiu ankoraŭ adis, kvankam jam delonge finiĝis la tago, kaj mallumo sinkis super la valon), sed io lin igis ankoraŭ unu fojon alrigardi ŝin kaj konvinkiĝi ke, eble, li eraris, ke ĉio ĉi estas nur produkto de ia konfuzo en lia varmega sango. „Ho, mi vere ŝanĝus mian vivon por la vivo de ĉi tiu vigla urba homo, se tio estus ebla, de la homo, kiu libere venigis kun si ankaŭ sian litamikinon (ili evidente ne estas geedzoj), ho, mi vere farus tiun ŝanĝon ĉi-vespere! Mi preĝos cent Patroniajn, por esti savita de satano!“

„Ho, mi vere ŝanĝus mian vivon por la vivo de ĉi tiu junulo“, mense parolis la profesoro, „por lia asketa vivo en ĉelo kun blankaj muroj, kie mi, finfine, povus kviete ordigi miajn disŝutitajn tagojn, kaj denove ilin kunglui per silento kaj soleco; por levigadi kun la suno, legi, prifosi post ĉio mian ĝardenon kiel Candide, trinki freŝan fontakvon, nutri min per plantoj sen pesticidoj... Mi envias lian humilecon kaj modestecon. Ĉar li estas for de la elektrona prempoto, de ambicio, envio, tromanĝado, fornikado, kiu subkompreniĝas post desertoj kaj digestivaĵo, ekster la ĉiama senseca kurado kaj malcerteco...“

„Ho, kiel mi envias lin“, mense parolis la monaĥo, „pro ĉi tiu knabino-diablino, kiu min tentas malfeliĉige, kiu vizitas min nokte en la kuŝejo, volante, ke mi havu ŝin!“

„Ho, kiel bone estus esti kun ili ambaŭ!“ – mense parolis Una, ŝanĝante la trian kasedon. – „Unu, kiu estas rafinita, la alia, kiu estas sovaĝa; kun ili mi estus kompleta, sed ankoraŭ pli kompleta mi estus, se kun ni estus, eble, ankaŭ iu virino! Tio estus splenda!“

La monaĥejestro Dimitrio ne partoprenas la interparolon ĉe la tablo. Kiam oni lin pri io demandas, li pardonpetis, dirante, ke lia aŭdsenso estas tre difektita. Tempaltempe, li faris ordonojn al la maljunulo kaj Mutao, kiuj surtabligadis manĝaĵojn. Kokajon li manĝis kampule, per la fingroj, kaj viŝis sin per kub-ornamita tuko. La juna monaĥo noble manumis la ponardon kaj forkon, kvazaŭ ne sentante manĝemon. Li maĉis etajn glutaĵojn, kun la lipoj kunigitaj. Kvankam, evidente, li malestimis la simplan monaĥejestron, li ne povis kaŝi, ke por li estas honoro esti invitita al la solena manĝotablo kun ĉi tiuj konataj urbaj gastoj. Vortoj, nur vortoj, vortoj... Ĉi tiuj homoj, kiuj tre lerte ripetas kaj muelas doktajn vortojn, neniam ekscios la esencon de Dio. Vantaj ili estas, al ili ŝajne gravas nur, ke ili superruzu unu la alian.

Una sentis dormemon. Ŝin ebrigiis la monta aero, kaj roza monaĥeja vino en eksepokaj ĝlasoj. La interparolo estis malrapide svenanta. La homoj ĉe la tablo estis pli kaj pli ofte dronantaj en oazon de silento. La monaĥejstro dormis sur la seĝo, kun la kapo retroklinita sur la apogilon, tial ĉiuj parolis duonflustre, por ne vekti lin. Tempaltempe, li rekonsciiĝis, alrigardas siajn gastojn, kaj denove dronis en tiun maljunulan duondormon, leĝera kiel aero.

La profesoro parolis, pli kaj pli naŭzante siajn vortojn: kial ĉion, ajnakoste, sistemigi? Liaj teorioj, pri kiuj ĝis la hieraŭa tago li ankoraŭ fieris, subite perdis ajnan valoron antaŭ la vizaĝoj de ĉi tiuj honestaj pastroj, perdiĝintaj en unu el la lastaj bastionoj de ortodoksismo, sur kies muroj suben gutis vakso, humideco kaj tempo.

La korpo de Una glitas suben sur la seĝo; ŝi nun preskaŭ kuŝis, ofertante la pintojn de siaj mamoj sub la travidebla, reta pulovero al la rigardo de la juna monaĥo. „Tiu damna, larĝa tablo! Mankas nur iometo, mi ja povus tuŝi lin per la botoj, se li ne estus tiel malproksime. Min tre interesas kiel li reagas!“

Nun pri la reveno ili eĉ pensi ne povis; dum ili sidis kaj parolis, malleviĝis netravidebla nebulo, kiu tempaltempe subite envolvas ĉi tiun regionon. Ili devos tranokti. Dank al Dio, en Tranoktejo troviĝas dudeko da ĉambroj. Servistino pretigos por ili kuŝejojn. Ĉi tie, bedaŭrinde, oni frue kuŝiĝis, diras la monaĥejestro Dimitrio, kiu vekiĝis; oni kuŝiĝas, nome, en eknokto, kaj leviĝas kune kun virkokoĵoj.

La ĉambro estis malvarma, littukoj krudaj kaj odorantaj je iaj herboj. Ili senvestiĝis kaj intertuŝis, fiksaŭskultante interparolon de dommastroj kaj iliajn paŝojn sur platokovrita koridoro. La mano de la profesoro estis sur la nuda ventro de Una, liaj fingroj sur la rando de ŝia densejo. Ili amoris. Okulferme Una mense vidis la monaĥon anstataŭ la profesoron. – Ag!, fort!, fortegu! – ŝi plorĝemis kaj hojllis. – Nun trankvilu. Ĉes! Ne, ĉesu! – La profesoro mense vidis Unan mense vidanta la monaĥon anstataŭ li, kaj venĝis al ŝi. Mi estas tamen isto, ho vi infano! Mi vin muelos, sciuj tion! Ĉu vi ĝuas? Ho, jes, jes. Jes, jes, jes, jes!

La monaĥo aŭdas dampitajn kriojn, dum li en sia kuŝejo, nur dio scias kiun fojon, foliumis luksan eldonon de *Boriso Godunovo*, donacon de la seminariestro por „bonega sukceso kaj adekvata konduto en la 1978/79a lernoĵaro. Zagorsko.“

*Ankoraŭ nur ĉi tiu lasta rakonto*

*kaj la analo estos finita mia.*

*Mi plenumis la devon, kiun Dio delegis al mi...*

– Nun ĉi tiel! Turniĝu... Tiel. Ĉu vi plezuras?

*Ne elektis min Eternulo vane*

*Li lernigis al mi lertan skribadon*

*Por ke mi estu atestanto de multaj jaroj,*

*Kaj ekleziulo iam agema*

*Trovos ĉi tiun sennoman verkon...*

– Ĉu vi opinias, ke la banejo estas dekstre? Kie? Tuj malantaŭ tiu pordo, ĉu ne?

– Kovretu vin per io!

– Kial? Ĉiuj dormas...

*... kaj oleolampon, kiel mi, flamigos  
 kaj desur la libroj forskuos jarcentan pulvoron,  
 Transskribados la saman vorton,  
 Por ke la ortodoksaj rememoru nepoj  
 Sorton praan de la gento rusa...*

– Aj, malvarme estas! Kovru nin...

– Mallaŭtu, ĉio aŭdeblas!

La monaĥo Paŭlo jam genuis en angulo sub kruco, kaj preĝas al Sinjoro, por ke tiu liberigu lin de la tentoj. La doktoro Draŝkoviĉo ronkis. Aŭdiĝas strigoj kaj hundoj. Kaj nokta aviadilo, kiu tondrante superflugis la monton.

La profesoro sentis nerezisteblan bezonon trapiki Unan, kaŭzi al ŝi fizikan doloron, najli ŝin sur nevideblan krucon, kaj ŝi, atendante ĝin, jam disetendis la brakojn kaj krurojn.

– Ho, Dio – plorĝemis ŝi. – Neniam estis pli bone! Neniam! – Sed la profesoro estas sufiĉe aĝa por scii ĉion pri la forgeso, kiu lin ie en estontco, en futuro, atendas inside. Li sciis ĉion pri tiu forgeso, kiu sen peno forviŝas la noktojn kaj matenojn kaj la frazojn „Ho, Dio neniam estis pli bele!“ Ĉiam estos pli bele kaj pli bone, nur ni ne estos pli belaj kaj pli bonaj. Ĉiam.

Matene la nebulo forleviĝas, kaj ili adiaŭis la gastigantojn, kiuj ilin elakompanas ĝis „Landrovero“ en la monakeja korto. Una estis flamruĝa post dormo kaj amoro. La monaĥo Paŭlo havas grandajn bluringojn, la monaĥejestro estis, same kiel ĉiam, distriĝema kaj nekoncentrita.

– Ĉu mi devas kisi lian manon? – demandas Una la doktoron.

– Viavole...

Una klinis la kapon, kaj proksimiĝis al la mano de la monaĥejestro.

– Dio vin benu, ho filino!

Post tio ŝi prenis la manon de la juna monaĥo (oni devus priflegi liajn ungojn kaj ungohaŭton), kaj proksimigis ĝin al sia buŝo, kvankam li hezitas etendi ĝin. Ŝi ĝin kaŝe lekis.

– Estu benitaj! – diras la monaĥejestro. – Kaj bonan vojaĝon...

En aviadilo, Una aŭskultis la kasedon. Ŝi surbendigis partojn de la interparolo, eĥojn, kikerikadon de virkokoĵoj, bojadon, ululon de strigoj, bruon de etrivero, paŝojn sur ŝtonaj platoj, tirsonojn de la monaĥeja pordego. Ŝi kliniĝas sur sia sidloko, esperante vidi la perdiĝintan monaĥejon en la valo, sed sube estas nur maro. Maro.



Aliflanke, Una al la profesoro malkaŝis tute novan Beogradon, pri kies ekzisto li nenion sciis. Foje, nokte, ŝi irigis lin, simple, en la diskotekon „Nautiluso“, kiu troviĝis profunde sub la tero. Ili estis subenirantaj laŭ spirala, malseka ŝtuparo, sub atentaj rigardoj de karateistoj-elĵetistoj, kiuj konis Unan; al la profesoro estis malfacile elteni la premon de kunpremitaj korpoj, kaj pereigan sonon en la kela mucido. Ili atendis, ke la diskisto finfine elektu muzikon por gedancado, sed tiam la profesoro, mergiĝinta en la orelon kaj hararon de Una, malkovris, dancante, ke li estas la plej aĝa en ĉi tiu subtera klubo. Li ne estis dancemulo, sed ĉiufoje kiam li tamen decidis (aŭ estis persvadita) danci, li tion faris nur por ke li, per sia fizika proksimeco ekscitu sian parulinon, kaj tiamaniere sensufere transiru la barieron de ĝentileco. Unan li jam ne devis delogi, tial li enuis sur la dancpodio, kie li sentis sin mallerta amato.

– La medicinisto rekomendas al mi nur unu dancon jare... – diris li, forglitante al verŝotablo. – Kaj fari tion okaze de Novjaro, en noktomezo!

En tiu momento la diskisto aŭdigis „Man Gave Names to All the Animals“ de Bob Dylan, kaj vidigis tute novan Unan, kiun la profesoro ĝis tiam ne konis. Ŝi sola ĵetiĝis en la epicentron de la eferveska dancistaro, kiu bolis en la mallumo, kaj, submetiĝante kun la okuloj fermitaj al tiu kirliĝo, ŝi ofertis sin al ĉiuj samtempe. La profesoro, kompreneble, restis tutatempe kun glaso da vino, soleca inter kokakolaĵoj kaj bieroj (cetere, tiu blanka vino estis la nura rekonebla objekto en la naŭa cirklo de tiu akustika disk-infero), kaj kaŝobservis ŝian korpon elmerĝanta kaj denove malaperanta en malstromo

de la rok-apokalipso. Tempaltempe, en la brilo de luma ŝprucaĵo, kiu senlekte vidigis dancantojn, kvazaŭ en ia inkubo, li vidis la koksojn de Una, ŝian rigardokaptan lumbon kun du malgrandaj konkavaĵoj en la malvasta, alkorpa pantalono el rozkolora veluro, kiel vera jesulino proponanta sin al ĉea juna egulo, verŝajne manpilkisto aŭ ĵudisto; liaj ŝovelilaj manoj estis sur ŝia postaĵo, liaj manplatoj sur ŝiaj femuroj; kaj iom poste – en tute alia parto de la freneziĝinta kelo, li malkovras svingatajn hartufojn de Una, kiu sub la lumo de *light show* ekhavis la kolorojn de ĉielarko, tuj poste, ŝian palvizaĝon gluiĝintan al ies ŝultro en akompano de la melodio de Donovan „The Divine Daze of Deathless Delight“ – ŝiaj streĉiĝintaj femuroj tuŝis la gambojn de iu belulo, probable manekeno; ŝia ventro (lia lango ja konis ĉiun vilon sur ĝi) nun estis ofendeprosima al la korpo de tiu alta knabo, vang-ĉe-vange; kiel eblas ne ekdeziri lin? –Kaj ĝuste kiam li rezignis sian ĵaluzon, kaj mendis la trian glason de vino, nova knabo aperis el la elasta pasto de dancantoj, kaj el la kanto de Eddy Grant „Living On the Frontline“, kun Una en la sino: unu, du, tri, kvar – ŝi unue flugis super lia maldekstra kokso, du – dekstren; tri – ŝiaj kruroj disiĝis fluge, Una surpikiĝis sur lin, ĉirkaŭprenas lin, kaj firme premis per la femuroj lian talion, dum ŝia hararo, disŝutita sur la planko vipiĝas trance, sed la sekvan momenton ŝi traflugis inter la disigitaj gamboj de la junulo, altirata de liaj fortaj brakoj; denove starigita sur la piedojn, ŝi plue sekvis la ritmon, malseka pro ŝvito, kun la harbukloj kungluitaj, humida, tute sindona kaj dankema, ĉar fine aperis ulo, kiu montris al ŝi, kiel oni tion devas fari, sen rideto, sen ĉarmo, sen ununura vorto ĉe la fino, ĉar la ritmo, kiun ili gesentis, kongruis, bruegante sub ilia haŭto. Ŝajnas, ke Una vivas nur kiam dancas. La profesoro, sekvante per unu okulo ŝiajn ekshibiciojn (ŝi ja amaĵos kun la tuta diskotekanaro!), devis samtempe jesadi per la kapo, konfirmante indignon de iu kalveta rigardulo-tedulo, kiu per sia nazvoĉo plendis pri la nuntempa muziko kaj ĝia brueco: – Ĉi tie oni tute ne povas interparoli. Mi ŝiros mian gorĝon! Vere mi ne scias, kio al ili plaĉas en... – sed Una ĝuste tiam preterflugis randon de la lumigita cirklo kun iu danĝeraspekta ulo, kiu miscele uzis malrapidan komponaĵon de Rolling Stone por teni ŝin glue premita al si: lia mano karesas la vertebraron de Una, sur kiu subenfluis ŝvittorentoj. La profesoro sciis: sub la nereale leĝera bluzo el araneeca, nigra materialo, ŝi surhavas nenion; nun al ŝi jam sendube estis negrave, ĉu ŝi estas malseka pro ŝvito aŭ pro spermo, ho Una! – li tremegis febre, resentis ĵaluzon, teruran ĵaluzon sen ia ajn ebleco trovi konsolon: degradita, ĵetita en foran angulon, en ombron de verŝotablo, nebezonata, li entrudiĝinto en ĉi tiu sekreta rondo de junaj kaj belaj, danĝeraj kaj neniom naivaj uloj; varme-go bruligis lian vizaĝon, malplezuro lin kaptas, naŭzon li sentas pro timo ke li enfalis kaptilon, ho Eternulo, se vi ekzistas, ordonu al la diskisto ĉesigi ĉi

tiun turmentadon, ĉi tiun malrapidan muzikon, anstataŭigu ĝin per rapida, saltiga muziko, en akompano de kiu oni ne povas danci tiel ĉee, tiel ofende ĉee – ŝanĝu la diskon! Sed tiam la profesoro transiris la limon de sufero, kaj trankvile komprenis, ke li porĉiame perdis Unan, ke ĉio estas finita, ke li nenion povas fari, estis ja bele dum tio daŭris, li nun jam estis konvinkanta sin, ke ŝi, fakte, apartenas al ĉi tiu loko, kaj ke li estis tre bonŝanca, ĉar ŝi certan tempon estis lia, nun venis la fino al lia latino, kaj ia stranga sento de faciliĝo liberigis lian korpon, frunton, manojn, krurojn, ventron, la tutan lion; trankvile li pagis ĉion por si kaj por Una, eĉ la bieron por tiu tedulo, kaj libera, denove iama, denove malnova, libera virkato, li trapasis la ombrojn de jam delonge mortintaj junuloj kaj knabinoj, kiuj ensorĉite staris laŭlonge de muroj de la malhela kelo, kaj per animforestaj okuloj rigardegas la dancantojn; li mansvingis bonkore al pordogardistoj, kaj enpaŝis la freŝan nokton sur akvumita trotuaro, enspirinte profunde la benigan aeron, senfuman kaj senpolvan. Ĉiuj forfurzu... Una nun estas malproksima pasinteco, kvankam li lasis ŝin antaŭ nur kvin minutoj. Ŝi restis tie, en tiu nereala „Nautiluso“, ie en tiu loko, al kiu ŝi, fakte, apartenas. Li haltigis taksion, meditante dum momento, ĉu veturi hejmen, aŭ reveni en la zen-ĉambron. Li ja sentis bezonon kelkan tempon esti sola, por resumi la vesperon. Interparolon kun la edzino li ne povus elteni. De morgaŭ ili interparolos ĝis la fino de la vivo! Ĉi tiun nokton li dormos sola. Li veturigis sin al Stelaro, ventumis la ĉambron, kaj kun glaso da blanka vino en la mano, rigardis la briletantan urbon, sube, sub si. Tiam li komencis subridaĉi pri si mem, rememorinte malgrandan, mallonge tonditan fiulineton, kiu, preterirante lin en nepriskribebla trameca kunpuŝiĝo de la diskotekanaro, diris, tuŝetinte lin per siaj malgrandaj, pintaj mamoj sub svetero kun la cifero 33: „Oĉjo, mi petas vin, lasu min preteriri!“ Li foriĝis flanken, kiom povis, sed ŝi lin tiam alrigardis mire: „Kion vi faras ĉi tiel malfrue, eksterdome?“ Li diris al ŝi: „Simple preteriru, ho infano, mi venis por kontroli la ventolsistemon!“ Finfine libera! Denove kun siaj samaĝuloj. Neniu povos lin riproĉi! Jam morgaŭ li komencos ordigi manuskriptojn de sia nova libro. Jam estis la lasta momento por reveni al serioza laboro. La umado devas esti finita! En lia vivo estos ankoraŭ multaj belaj aferoj: prelegoj, libroj, amikoj, blanka vino, vojaĝoj, vivado, la vivo mem... Desur la tablo lin spektis la forgesitaj sunokulvitroj de Una. Li prenis ilin atente per du fingroj, kvazaŭ levante danĝeran objekton, kiu povas tujuje eksplodi, kaj metis ilin sur breton. Mirinde, li ne sentis sin malplena. Nur iomete laca pro ĉio. Pri nenio li bedaŭris. Li estis kompleta kaj, post multe da tempo, denove malfragmenta. Ŝi geadu kun ĉiuj, kiujn ŝi deziras, mense diris li, la mateno por ĉiuj estos la sama! Fia kaj sensenca. La sama sento de kulpo, la samaj ĉifitaj littukoj, cindroplenaĵoj, amaro sur la velo, cigaredstumpo dronanta en duone

malplenigita glaso, polvoplenaj ŝuoj meze de tapiŝo, disĵetitaj vestoj, grizeco, tra kiu geamoroj revenas hejmen en vesperaj vestoj, kiuj tre diferencas de la afliktitaj homoj, kiuj iras al sia laborloko... La mateno ĉion forviŝos. Tro multe ni ludis la profesoron Higgins kaj Eliza Doolittle! Fi, Pigmaliono!

Li aranĝis la kuŝejon, verŝis malvarman lakton en glason, senvestiĝis kaj bruligis la lastan cigaredon tiunokte. Profunde entirinte fumon, li en la sama momento aŭdis gratadon ĉe la pordo – la kutima signo de Una, ke la vagabonda katino revenis hejmen. Tute nuda li malfermis la pordon.

– Ho, ne estis tre sprite lasi min tie! – diris ŝi, kolerege deĵetante la ŝuojn desur la piedoj. – Inter tiu aro da aĉuloj kaj kruduloj! Mi apenaŭ sukcesis trovi taksion...

– Mi estis dormema... – mensogis li. – Mi ne volis interrompi vian distriĝon.

– Vi estas vera bonŝanculo! – diris ŝi, demetante la orelingojn. – Multegaj uloj ĉi-nokte min deziris, sed min havos nur vi! Vi estas vera bonŝanculo!

– Ĉu? – diris li malvarme kaj sovaĝe mergiĝas en ŝian bonodoran haŭton, revenigita el sia naiva fuĝo.

Dum ŝi egalritme spiris sur lia ŝultro, li sciis: estos tio longa, elĉerpiga batalo pri la vivo kaj morto por liberiĝi de ĉi tiu knabino, kiun hazardo donacis al li.



(La dekdua bendo) „... mi eĉ ne scias, pro kio mi ĉion ĉi parolas al vi; tio jam ne estas intervjuo, eĉ ne por iu dika, enuiga revuo; ĉi tio estas iaspeca konfeso, testamento, nur dio scias, kio estas tio! Eble tuta ĉi tiu afero estas la plej proksima al la ekspliko de Umberto Eco, kiu diras ion tian, ke simila speco de intervjuo multe diferencas de tio, kio estas verkita por gazeto, ĉar al tiuj personoj estas ebligite diri ĉion, kion deziras. Tiel oni ne devas penegi verkante eseon, aŭ honti, publikigante aŭtobiografion, kiun neniu petis. Eble mi devis skribi same kiel la aliaj, sed mi de ĉiam sentis bremsan antaŭ la definitiveco de presitaj vortoj; tio, verŝajne, havas rilaton al mia plaĉavido – mi deziris, same kiel ĉiam, esti la plej bona – la mezeco min ofendas, sed, tamen, ian spuron oni devas postlasi. Eble vi estas tiu spuro! Eble iun tagon, kiam vi estos grandaĝa, vi komencos kontempli ĉi tion; vi aŭdigos viajn bendojn kaj umos ilin. En tiu tempo, supozeble, via bela „Sony“ estos eksmoda, nostalgia mekanismo, samkiel nuntempe eksmoda estas karbogladilo...

... mi meditas pri la somero 1955 aŭ 1956, nun la jaron mi ne memoras precize; mi petveturis al marbordo, kaj alvenis ĝis Sankta Stefano, kiu tiutempe estis insulo. Ĝin al la tero ligis nur mallarĝa strandzono, malaperanta sub fluso. La urbanoj estis elloĝigitaj, ĝi estis ĝuste tiusomere transformita en aron da hotelaj apartamentoj. Hotelinsulo! Hotelurbo! Tiel oni ĝin nomis. Mi sencelumis en tiu loko, kaj vidis longan kolonon de grizvestitaj homoj, kiuj, kvazaŭ perdiĝintaj, kontrastis kun tiu feliĉa regiono. Oni transportadis brikojn kaj tabulojn trans la vadejo. Mi proksimiĝis al ili, kaj komprenis, ke

tio estas punlaboruloj. Estis inter ili ankaŭ belegaj uloj. Ili rigardis antaŭ sin, malridaj kaj silentemaj. Milicistoj kun maŝinpafiloj kuŝis sub olivujoj. Sur la teraso de ĵus finkonstruita apartamento, sub oleandro, sidis arkitekto kun sia kunularo. Virinoj estis en bankostumoj. Ili ridis kaj manĝis fruktojn. Punlaboruloj supreniris sur kruta, ŝtona strateto sub tiu teraso, kaj kaŝe rigardis ilin. Probable ili longe estis sen-inaj, sed la virinoj ilin tute ne atentis. Kvazaŭ ili ne estus viroj. Kvazaŭ ili tute ne ekzistus! Multajn jarojn poste mi hazarde sidis apud tiu arĥitekto dum oficiala vespermanĝo. Gaja, simpatia maljunuleto, ankoraŭ elanplena. Mi memorigis lin pri tiu somero, kaj priskribis la vidaĵon sur la teraso, ĉar mi ĝin memorfiksas. „Oho, tio estis splendaj knaboj!“ – ekridis li bonkore. – „Ni ofte ĵetadis al ili cigaredojn! Tio estis bona malnova tempo!“ Mi ne povis al li klarigi la malplezurigan senton, kiun mi porĉiame forportis de Sankta Stefano, li ja verŝajne tute ne komprenus, eĉ se mi dirus al li ion ajn. Mi nur konsentis, ke tiu somero vere estis longa kaj arda, kaj ke la klimato, same kiel ĉio, cetere, multe ŝanĝiĝis de tiam (1955).

... Dum vintra libertempo 1947 mi veturis al miaj parencoj en vilaĝon ĉe la hungara landlimo. Mia unua memstara vojaĝo! La vagonaro atingis Suboticon, je la kvara horo nokte, kaj la regiona trajno al Somboro estis forveturonta je la sesa matene, pro kio oni al mi diris, ke mi devas atendi en la stacidoma restoracio. La kofron mi tenis inter la genuoj, por ke ĝin neniu forŝtelu. Mi estis sinjorido, kaj mi mendis teon. Alvenintoj trinkis brandon; kelkaj „bunevaninoj“, kies kapojn kovris nigraj lanaj ŝaloj, trinkis nenion. Ili tenis korbojn, el kiuj elstaris blankaj anasaj koloj. Soldatoj trinkis rumon. Kelnero malvolonte alportis al mi teon en kavigita alumina taso. Mi memoras neĝon, kiu degelis sur plateto de ceramikaĵo; mi memoras larmigan fumon el „Fornoreĝino“, kiu neniel sukcesis ardiĝi. Tiu teo fakte estis apenaŭ dolĉigita malhela akvaĉo. Ho, tiu tempo de senhaveco kaj mizero! Oni nun diras, ke tio estis tempo de grandaj ekzaltiĝoj! Tiam sur la kajon, kiun draŝis Panona neĝventego, alvenis drezino. Mi unuafoje vidis tiun strangan veturilon (mi ja havis nur naŭ jarojn), longan nigran „ZIS“ sur feraj radoj, el kiu eliris grasaj duondioj en pezaj ĝiskalkanaj soldatsurtutoj, kun peltaj kolumoj kaj feltoĉapeloj, surŝovitaj ĝis la brovoj. Prujnumitaj, ili eniris la restoracion. Ĉiuj restoracianoj senvortiĝis pro timo kaj admiro. La venintoj okupis du tablojn proksime de la mia. La sama kelnero servile ŝanĝis la tablotukon, kaj alportis al ili sur pleto teon en tasetoj el fajenco, tekruĉon, arĝentajn kulere-tojn, ĉion... Tiam mi unuafoje vidis citronojn: disduigitajn, freŝajn citronojn 1947. „Ĉu vi scias la landon, kie citronujoj disvolvas florojn?“ Kubsukero. Kekso. Ili sorbtrinkis teon, tute ne rimarkante mian aluminian tason. Tio estis rusaj fervojistoj al kiuj estis komisiita inspektado. Mi sentis min degradita kaj humiligita, kaj eĉ ne tuŝis mian teon, kiu estis malvarmiĝanta. Mi

estis bone edukita urba infano, kiu sciis la diferencon inter la alumina taso kaj teservico el antaŭmilita fajenco. Neniam mi tion rakontis al iu ajn. Mi ne certis, ke oni min komprenos. Eble oni nur dirus: „Kion do?“ Vere, kion do? Sed tutan mian rilaton al la aŭtoritatoj difinis, eble, ĝuste tiu antaŭlonga, Subotica trinkado de teo...

... mi neniam skribis pri Diplomacia magazeno en la eksa Oficira domo, kie estis vendataj nehavigeblaj ruĝaj ŝuoj kun dika kaj flava kaŭĉuka plandumo. Mi ne skribis ankaŭ pri la admirindaj maljunuloj, kiuj el la publika vivo retiriĝis solecon, kvankam mi ilin devis almenaŭ mencii. Mi ne skribis pri la malriĉeco kiun mi estis fiere kaŝanta, portante banton, dum aliaj estis ricevantaj stipendiojn kaj senpagajn somerumojn. Mi ne skribis pri gravaj homoj, kun kiuj mi konatiĝis nur kiam ili iĝis eksaŭtoritatoj, pri iliaj indigniĝoj, kaj pri tio, kiel ili forgesis, kion ili fifaris kontraŭ aliaj homoj, kiam ili estis suprujoj. Pri mallongdaŭra memorpovo mi ne skribis. Mi ne skribis pri io, kio ne estis brila, ĉarma, nekomplika kaj plenplena da spritaj ŝanĝoj, kie mi povis montri mian informitecon, kaj drivi inter nomoj kaj citaĵoj kiel orfiŝo en akvario. Mi ne skribis pri naŭzo...

... mi pensis: ke ĉio ĉi min ja ne koncernas! Tiel mi trompatis generacion post generacio, ĉar mi evitadis paroli la veron; mi ĉirkaŭiris la veron de ĉiuj flankoj, supozante, ke mia distanciĝo sentiĝos, ĉar mi neniam miksiĝas en ion ajn, ke ĝi sentiĝas inter miaj vortovicoj, en la intonacio de du miaj vortoj, en paŭzo inter du miaj frazoj, en konjekto; mi pensis: mi skribos tion, kiam alvenos por tio ĝusta tempo, sed ĉiuj tempoj estas la samaj; oni tiajn aferojn skribis tuj, aŭ neniam. Mi timis, ke mi perdos rajton havi almenaŭ iom komfortan vivon, kiu min tiris pli kaj pli profunden, en mezumecon. Mi pravigadis min antaŭ mi mem, ke la plej granda kvanto da okazaĵoj, kies vidanto mi estas, ne kontraŭas mian taskon. Tiuj, kiuj prave, de mi atendis pli multon, kredis miajn pravigojn preteksto. Jen ĉio. Jen kie mi estas. Mi, posedanto de senfruktaj ideoj. Inter la scienco kaj vivo, mi ĉiufoje elektis la vivon. Por skribado mi havos tempon, tiam, kiam mi ne estos kapabla por io ajn alia. Fikfek!

... tiam vi havis sep jarojn!

... tiam vi ankoraŭ eĉ ne estis naskiĝinta!

... tiam vi havis naŭ jarojn!

... imagu, tiam vi havis du jarojn, kaj oni viŝadis vian bazamenton!

... tiam vi havis dek ses.

... nekredeble, tiam vi havis kvin jarojn, kaj mi jam estis...

... aj, vi ja tiam havis nur sep jarojn!

... ĉu tio estas ebla?... tiam vi havis dek tri jarojn!

... atendu, tiam vi havis kvin jarojn; vi ja ne povas tion memori!

... mi ne aŭdacis. Ŝajnas, ke mi tamen estas timemulo, ĉu? Ĉiuj ja estas tiaj! Vi tion ne scias, sed estas terure, kiam la telefono subite ne plu sonoras. Kiam oni de tempo al tempo levas la aŭskultilon, por konvinkiĝi ĉu ĝi funkcias – kaj aŭdas nur la signalon. Kiam oni malfermas la leterskatolon, sed ĝi jam multajn semajnojn estas malplena. Kiam oni iras en bankon, sed la konto estas malplena. Kiam oni subite ne plu ricevas invitilojn por premieroj, por malfermoj de ekspozicioj, por diskutforumoj, por festivaloj, festrenkontiĝoj... Kiam oni estas trofiera, kiam oni neniam estas la unua kiu telefonas al iu ajn. Kiam oni silentas. Kiam oni malrapide dronas en forgesujon. Kiam oni portempe estas ekskludita. Viva enterigita.

– Ĉu ni malfermu ankaŭ la duan botelon? Ekzistas belega etrakonto: „Min mirigas, ke oni vinon vendas! Ĉar mi ne komprenas, kion pli bonan ol vinon oni povas aĉeti per la ricevita monon?“

– Ni surbendigu la sonon de elboteligata ŝtopilo, ĉu?

(pluuuuuuuuupf!)

– ... kaj nun, la bruon de la vino!

(glugl-glugl-glugl)

– ... la tintadon de glaso!

(tint-tint)

– Ĉu vi volas iomete da sodo?

(ŝuuuuuuuuuŝ!)

– Ĉu ni aŭdu, kion ni surbendigas? Ĉu vi volas?

– ... mi eĉ ne scias, pro kio mi ĉion ĉi tion parolas al vi; tio jam ne estas intervjuo...“



Subite, la profesoro ĉie ĉirkaŭ si komencis rimarkadi multajn junajn virojn. Ĉiu el ili povis forpreni lian Unan, kaj porĉiame puŝi lin en la tombejon de mezaĝaj kaj forlasitaj malfeliĉuloj, kiuj serĉas konsolon en sia ĉif-aspekto kaj sort-akcepto, kun kiu ili konsentas vivaj putri, surkubutiĝinte sur malfirman tablon en urboranda stardrinkejo, en kiu pri ili rezignis kaj la amo, kaj la virinoj, kaj Dio, kaj la homoj. Dum li prelegis en la amfiteatro, por li tiu juna mondo estis nur viva digo, kiu ne tre agrable odoris – amaso, al kiu li parolis kvazaŭ al centkapa korpo, sed nun...: eble ĉi tiu? Aŭ tiu? Jen ili iras, ne konsciante la valoron de sia aĝo, svelstaturaj, streĉmuskulaj – junaj viroj kun plataj, ŝtone malmolaj kaj elastaj ventroj (irante, li pripalpis sian talion, kaj konstatis, ke ĝi estas malstreĉa, kvazaŭ ĉirkaŭ la ventro li portus malgrandajn saketojn kun sablo), kun harmoniaj profiloj, vilaj mentonoj kaj malsekaj lipoj – knaboj, kiuj kapablas kuri, salti kaj transsalti, interbatiĝi, tute nepensante ke ankaŭ ili povas esti lezitaĵ... Sendube estas agrable vekigi apud tiaj fortaj, bonodoraj korpoj, pasigi la fingrojn tra milda filikaro de la sunbruna brusto, senti per la femuroj ankoraŭ neforuzitan freŝecon de la dudekaj...

- Kiomjara vi estis, kiam vi senvirgiĝis?
- Deksepjara...
- Ĉu tio doloris?
- Iom. Sed estis splende!
- Kun kiu?
- Kun Deĵano. Li estis mia unua amato.

- Pri kio li okupiĝis?
- Li estis basisto de „Sovaĝaj katoj“.
- Kiom longe vi geis?
- Proksimume unu jaron.
- Kio okazis poste?
- Poste ni disiĝis, tute kaj absolute.
- Ĉu vi suferis?
- Mi preskaŭ freneziĝis.
- Ĉu vi iafoje renkontis lin?
- Nur unu fojon.
- Antaŭ kiom?
- Antaŭ kvar jaroj.
- Kaj kiel estis?
- La renkontiĝo finiĝis en lia lito, sed tio ne plu estis kiel iam. Ni ne povis seksumi.
- Kial?
- Mi ne scias. Sed tio ne plu estis kiel iam. Simple, ni ne povis!
- Kial?
- Mi tion ne povas scii! Oho, mi ridmortos! Ni kuŝis tiel, kaj li min subite ekpetis, ke mi iomete piedtretu lian dorson...
- Ĉu piedtretu?
- Nu, jes! Li ja iomete ankiŝiĝis. Mi ja surgrimpis lian dorson (li kuŝis suventre) kaj komencis lin treti, treti, treti, treti, treti... Kaj ju pli mi lin tretis, des pli al mi ŝajnis, ke mi sur lia dorso foriras ien malproksimen, pli kaj pli for de tiu povra Dejano kaj liaj umajoj... Li restis ie sube, profunde sub mi. Kaj tiel mi tute malaperis el lia vivo!
- Ĉu li estis bela?
- Imagu, sur la korpo li havis eĉ ne unu hareton! Li estis absolute glata. Tio min ekstempe ege seksardigadis, sed tiam tio al mi ekŝajnis iel aĉa...
- La profesoro ektimis, ke pro sia amo al Una, kaj pro ĵaluzo, li iĝos angil-simila! Ne! Li nur pristudadis la estontajn kontraŭulojn, fosadis tranĉeon, kombinis taktikon, pretiĝante esti forlasita kiam alvenos la tempo por tio, por ke ĉio ĉi lin ne tro lezu, ne tro doloru. Li forkonsumis sian freŝecon, spiron, malfermitecon, scivolemon, ĉion. Kio restis al li anstataŭ tio? Nur deziro teneri. Tamen, tio ankoraŭ ne estis forkonsumita, ŝajnis ke ties fonto estas pli forta ol iam ajn antaŭe, kaj ke ĉiuj ĉi gravaj, nekompenseblaj aferoj, la tuta energio kaj elano estas forbrulitaj, ke sur tiu malnova fajro, sur ĝia malvarmiĝinta ardaĵo, dank al ia mistera proceso, kristaliĝis la esenco de sopiro.
- Ĉiu el tiuj altstaturaj beluloj, kiujn li enviis pro iliaj sanaj dentoj, juna hararo, kiun ne povis distaŭzi eĉ la plej freneza Beograda vento, povis kuri

pli rapide ol li, grimpi ŝnuron, elteni pli da fizikaj penoj, kaj fine: ĉiu el ili povis lin draŝi kaj malkapabligi, kaj eĉ, se okazos iu estonta milito, esti lia estro, komandanto, kapitano, leŭtenanto... Li komprenis subite, ke li estas trialigano, kaj ke, laŭaĝe, li postvivis sian patron, kiu mortis en sia tridek naŭa jaro. Sed iu maljuna, kaŝiĝinta, spitula diablo flustris al li en la ore-lon, ke li devas batali plue, ne rezigni la konkuron, kvankam ĉio ŝajnas anticipe perdita, ke li devas fronti tiujn feliĉajn knabojn, kiuj maturiĝis sur korbopilkejoj kaj plaĝoj, nutriĝantaj per oranĝoj kaj televido, kaj ŝteli iliajn inojn, kiuj devus pliu apartenas al ili ol al li, frenezigi iliajn inojn, kaj forlasi ilin kiam ili lin tedos, kiel vera, sperta viro-ĉiesulo, transformiĝinte tute en atentostreĉan ĉasiston-vulpon, kiu devas propramane forkapti inon, kvankam ĉirkaŭ si li havas aregon da avantaĝuloj. Sed ili ne havas pli da bonŝanco! Jes, da bonŝanco. Bonŝancon li, ŝajne, ankoraŭ havis, sed li ne deziris dependi nur de ĝia malkonstanta inklino. Same kiel ĉiuj spertaj ĉasistoj, li deziris fini ĉiujn bezonatajn pretigojn, antaŭ ol meriti sian Unan, se li iam ajn ŝin meritos!



Ili interkonsentis tiun sabaton pasigi kune, sed la telefono apud la kapo de Una sonoris panike preskaŭ dudek minutojn, antaŭ ol ŝi finfine trovis sufiĉe da forto por levi la manon (ĉu tio, antaŭ la okuloj, estas mia mano?) kaj preni la aŭskultilon. La profesoro, kiu devis multe taktiki kaj mensogi por iel ebligi tiun, dum longa tempo atendatan, liberan tagon, sentis preskaŭ koleron. Post ĉio, kion li faris, ŝi simple dormis! Li atendis, ke ŝi jam estos vestita kaj preta elkuri post lia alvoko, sed li devis puŝiĝi tra tiu ŝia dormo, por almenaŭ atingi ŝian malklarigitan pensmanieron. Li aŭdis la bruon de ŝia spirado, ĝemado kaj, fine, raŭkan, tute nekoncentritan voĉon, kiu kvazaŭ estus penetranta el iu alia sona stelaro:

– Oj, lasu al mi iomete da tempo, por ke mi min ordigu...

– Ĉu vi fartas malbone? – li kriis en telefonejo, dum ĉirkaŭ li, skuante asfaltan, tondris ŝarĝaŭtoj kaj ŝutkamionoj. – Kio do okazas?

– Ne, ĉio estas en ordo... sed mi ne povas eldormiĝi. Aaaaj, mia kapo!

– Kion vi faris ĉi-nokte?

– Nnnnnnenion...Mi nur iomete ŝargis min.

Ŝi venis al la renkontiĝo post tri horoj kaj tridek minutoj, kiam la ekspektata distriĝo jam senkonsole fiaskis, pala, kun grandiĝintaj pupiloj, kiuj

estis senvivaj pro io, kion ŝi vidis sur la alia flanko de la ĉiutageco, de ie elfore, kie li ne plu povis ŝin sekvi, kaj kie al ŝi lia protekto nenion plu signifis. Li estis ĵaluza pri haŝiŝo kaj mariĥuano (ŝi ĝin familiare nomis Meria Ĝejno), pri tuta tiu rondo de multharaj senvaloraj filozofoj, kiuj lin memorigis pri la frukristanoj pro iliaj impertinentaj fuĝoj de la realeco, kiun li devis ĉiutage konfronti kaj spiti. Ili estis rifuzantaj inkludiĝi en io ajn, kaj plue batali; li estis ĵaluza eĉ pri reklamafiŝoj de junaj mortintoj en tiu imaginara ĉambro, en kiu li mense vidis Unan, buliĝintan sur malpura lankovrilo, nudpiedan, kun implikita hararo: Jimmy Hendrix, Janice Joplin, Bryan Jones, Jim Morrison kaj nur dio scias kiu ankoraŭ; li estis ĵaluza pri la tuta mondo, al kiu li ne havis aliron, kaj en kiun li povis eniri nur en la memoro de Una, kvankam ŝi lin ĝuste tie estis perdanta. Finfine, kiam li jam pensis, ke li estas preskaŭ liberiĝinta de tiu premsonĝo, kaj preskaŭ bridinta la mensan Unan – la dolĉan, danĝeran kutimon, kiu lin dum multaj monatoj ruinigadis – li sentis pli forte ol iam ajn antaŭe la efikon de la sindromo „Una“.

– Ho, ĉi-nokte ni tre ŝargis nin! – diris ŝi, glutante plenmanon da aspirintabletoj.

– Nu, bone, kion vi sentas fumante... tiujn ...ojn?

– Mi ne scipovas klarigi al vi. Tio estas... mi kvazaŭ flugpendas, kaj ĉio ĉirkaŭe estas iel oblikva. Ia dolĉa kapturniĝo.

Ho Dio, estis tre bone malstreĉi sin, tute sin fordoni, cedi al la sento de bela disfalo, kiam en ĉiu nebula globo, kiu alvenas el nenie, alruliĝante el nenio, jenjene aperas fragmento de antaŭvivo. Bedaŭrinde oni fine falas en neniujon!

– Nnnnne, seksumo ne okazis, se vi pri tio pensas! – ŝi mensogis por ne ofendi lin. Li ja tion ne komprenus! Verdire, ne okazis seksumo en tiu formo, en kiu ili ĝin praktikis – ne okazis vetseksumo, kiam la viro devas registri konkretan kvanton da punktoj, vidigi sian forton, eltenemon kaj memkontrolon, ne kulmini antaŭ ol tion faros lia parulino, sendepende de tio, kiom ŝi prokrastas la orgasmon; en tiu klasika duelo, Una sentis sin sporta rekvizito: boksosako por trejnado, led ĉevalo aŭ matraco; trejnpartnero por nekontentigita plaĉavido, kiu bezonas sinpruvon ĉiutage, tuj kiam ilia geritualo iĝis firmigita plendetale. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi nun tute hazarde sidas kun iu, mirinde postvivinta homo el la deknaŭa jarcento, al kiu ŝi neniel povis klarigi pri kia umaĵo temas, ĉar, kvankam ili parolas la saman lingvon, ĉiuj ĝiaj signifoj iel implikiĝis kaj perturbiĝis. Li preskaŭ iritis ŝin per tiu sia konstanta ĉioninkluziva amorveka trudpenso, kiu estis tro unudimensia. Kion li scias pri tio?

Kuniĝintaj ĉi-nokte per kortuŝa frateco kaj fumo haŝa, ŝi kaj ŝiaj amikoj, veturis kune en nihilujon:

„Kion vi vidas? Mi vidas iun procesion... Ĉu vi rekonas iun? Oho, jes, jes! Sed mi ne povas paroli. Tro rapide ili preterpasas. Tro rapide!“

Mi vidas min en tiu ĉambro en Dedino; tie min lasis la paĉjo, foririnte por labori du jarojn en Sirio; mi aĝas dek jarojn, kaj nudas en tiu ĉambro; vidu, mi tute ne havas mamojn, nur verukojn; mi atendas, ke eniru Nikolao, la filo de la mastrino, ke li min vidu tia; mi permesos al li vidi min nur iomete, post kio mi ekkrietos kaj fuĝos; ĉu mi lin jam delogis? Mi vidas, kiel oni nin banas en kuvo; ili opinias, ke ni estas tro malgrandaj por ion senti; nin ili volvas per bantukoj, kaj tranĉas niajn ungojn. Estas varme, malseke, odoras bebosapo. Ili legas al ni ĉapitrojn el la libro *Heida*, mi ploras, ĉar la libro estas terure malĝojiga.

„Venu... Malrapide. Tiel. Jes, tiel! Sidiĝu! Disigu iom la genuojn. Tiel. Estas bone. Kion vi ankoraŭ vidas?“

Nun vi estas blonda knabo Nikolao, kaj vi penetras en min malrapide, kiel oleŝmirita piŝto de lokomotivo, ho, tio bonas kaj kvietigas, min envolvas trankvilo, finfine, mi ne plu sentas ian ajn spasmon, ho, bone estas, tiel, tiel, donu fumon! Trip. Irip. Irip. Trip. Irip. Irip. Irip. Trip. Irip. Trip. Trip. Nun vi estas la televizia knabo, kun kiu mi sidis antaŭ la Urba kafejo en Dubrovniko. „Kie vi baniĝas? Nenie. Mi ĵus alveturis. Ĉu vi volas, ke ni kune iru al la Ekscelsiora plaĝo? Ne! Tie estas enue. Nur famuloj estas tie! Eble al Lokrumo<sup>8</sup>, ĉu vi volas? Tion mi lasos por mia unua nudisma banado en ĉi tiu sezono. Nu iru kune! Mi neniam estis nudisto. Ĉu estas vero, ke sur la nudismaj plaĝoj ne ekzistas erotiko? Ne ekzistas – vere. Oni tie tute ne sentas, ke oni estas sen vesto. Ĉu vi volas lernigi al mi, kiel esti iomete nudisto? Jes, mi volas. Kiam? Se vi volas, tuj!“ Nun ni veturas en malgranda motorboato apud rokaro, sur kiu sin sunbanas nudaj geviroj, ĝuste kiel sur ilustraĵoj el la purgatorio de Danto. Li min jam tuŝas, kaj malrapide senvestigas. Tiel, jes, ĝuste tiel. Ni geumas en varmeta maro. Tiel. Donu fumon! Tiel. Trip. Trip. Nun mi estas nuda en soldata banĉambro, dum ili ĉiuj tie, ĝishaŭte tonditaj, fortaj kaj tuberaj, alpaŝas min malrapide, dum mi retroiras sur glitaj latoj, ho, ne, ne, ne! Oooj! Jes! Jes! Trip. Nun vi estas tiu nigrhaŭtulo, kiu hurlis orgasmante; nun vi estas unukornulo, sur kies kornon mi estas surpikita, kaj nun padusligna kanono el la Unua serba ribelo<sup>9</sup>; flagmasto, fabrika fumtubo; nun vi estas tiu franco en Moskvo, hotelo „Rusujo“, ĉambro numero 1234. Nun vi estas triopo, nun vi estas Aleno Delono, kun kiu mi mense geumis, kiam mi estis malgranda; nun vi estas ĉiuj, kiuj lavangas unu super la alia, kaj venas, venadas el neniujo, dum mi mortas je trodolĉa karesado, tuŝado,

8 La insulo nemalproksime de Dubrovniko.

9 Serba ribelo kontraŭ la turka regado en 1804.

en silento... Kiom longe tio adas! Tiu kuna flugpendado tra malrapidiĝo, kiel kiam paraŝutistoj, antaŭ malfermiĝo de siaj silkaj fungoj, kaptas la manojn unu de la alia, kaj komencas fali al verdaj pejzaĝoj en maro; tio estas flugo super siaj kaj fremdaj vivoj, super dezertaj regionoj, tra kiuj, mole kaj sen ia ajn sono, oni nur sinkas, sinkadas... Estas bone, ke vi troviĝas proksime, ke vi estas tiel proksime, ĉar mi timas; nun aperos multharaj malbeleguloj – gnomoj, araneoj kaj flugantaj oktopodoj; estas bone, ke vi estas glata kaj malmola, ke mi vin tiel bone sentas en mi, al mi ŝajnas ĝis la gorgo, sed malrapide ĉio forbloviĝas; via nesto denove ekhavas murojn, kiuj leviĝas desur la tero, kaj kuniĝas ĉirkaŭ ni kiel kartonaj skatoloj; ĉu ni faru ankoraŭ unu cigaredon?

Vi prenas „Drinon“<sup>10</sup> per viaj trememaj fingroj, kaj elŝutas tabakon, farante ĝian areton. Vi varmigas per kandelo peceton de haŝiŝo, kaj erigas ĝin. Post tio la malplenan papercilindron vi denove plenigas per tabako, enŝutante tempaltempe tiujn malhelkolorajn, frenezajn erojn, kiuj nin flugigos malproksimen, malproksimegen. Vi trovas rondforman bastoneton, ŝtopas per ĝi nian multvaloran vojaĝbileton, bruligas la pinton de la cigaredo, kaj ensuĉas profunde, profundege fumon. Vi estas nek bela, nek forta, nek eleganta, nek alloga, nek sukcesa, ĉar vin ĉio ĉi ne interesas, sed post la unua fumo via vizaĝo transformiĝas, okuloj viaj disiĝas kaj grandiĝas, mi gluiĝas al vi – tenas vin firme, ĉar la ĉambro malrapide turniĝas ĉirkaŭ mi; la skatolo malfermiĝas, la muroj denove enfalas molajn nubojn, nia flugo rekomenciĝas. Kiu vi estas? Kiuj estas ĉiuj vi ĉi-nokte?

– Kiu li estas?

– Oho, iu... Vi ne konas lin.

– Pri kio li okupiĝas?

Pri kio li okupiĝas? Denove tiuj stultaj demandoj! Kial li devas pri io okupiĝi? Kial li devas esti menciita en la libro „*Kiu estas kiu en Jugoslavio*“? Esti grava ulo! Al li ja estas sufiĉe, ke li ekzistas, lin nur tio interesas.

– Li ion kvazaŭverkas. Mi ja nenion scias. Li pretiĝas, ŝajne, verki ion teruran, li rakontis al mi pri tio, vespere al li ĉio ŝajnas klara, verŝajne, absolute ĉio, ĉiu detalo; li decidis ekverki jam la sekvan matenon, sed matene ĉio forbloviĝas.

– Kiel li havigas la herbon?<sup>11</sup>

– Nu, li mem kreskigas ĝin! Unue en bankuvo, kiam la kreskaĵoj estas junaj, poste li forportas ilin ien, en Panĉevon, en iun ĝardenon, kiun tute kovris trudherboj, tie ili kreskas tre alte, kiel kanabo; li diras, ke ili kreskas eĉ kvin

10 „Drino“ – marko de cigaredoj.

11 Herbo – ĵargone: marihuano.

metrojn. Li ilin kontrolas unu fojon semajne. Certan tempon, antaŭ ol estis kaptita, li ilin kreskigis en plantopotoj, sur sia teraso. Splende!

– Nu, kiel do li sin vivtenas?

– Mi tion ne scias! Ŝajne li vendas iujn terpecojn, kaj neenloĝeblajn ĉambrarojn... Iujn aĵojn. Liaj antaŭuloj iam estis tre riĉaj.

– Bone, sed kion li faros, kiam li ĉion disvendos?

– Li revas forveturi en Kolombion aŭ Sudanon, li ja tion diris al mi, kaj tie kreskigi herbon. Nur pri tio li povas okupiĝi. En tiuj landoj tio ne estas krimokupo. Jes ja, li vere estas tute freneza! Vi ja devas vidi lin!

– Kiel li aspektas?

– Kiel li aspektas? Tiel. Malflegate. Li min admirigas, ĉar li iasence estas kompleta, lin interesas nenio, krom liaj kreskaĵoj. Ĉu vi scias kiel li sin vestas? Nu, jen: kiam estas malvarme, li surmetas la unuan trovitan veston, en kiu al li estos varme. Kiam estas varme, li demetas ĝin. Konklude, mi ne estas certa, ĉu li hieraŭ vespere estis en vintra surtuto! La vestoj sur li simple ne rimarkeblas. Mi neniam renkontis iun ajn, al kiu tiom malgrava estas propra aspekto...

La profesoro provis klarigi al ŝi la danĝeron, en kiu ŝi troviĝas. Tion li al ŝi ne parolas, diris li, kiel malkontenta filistro, kiu tute kaj absolute nenion scias pri la narkotaĵoj – tion ŝi devas tuj kompreni! Antaŭ kvin jaroj li verkis studaĵon „*Ŝanĝiĝita realeco*“, tiam li provis ĉiujn speciojn de halucinaj narkotaĵoj, ne je ratoj aŭ kunikloj, sed je si, same kiel Aldous Huxley provis meskalinon, por skribi, kio okazas en onia kapo dum ĝia efiko; sed multe pli frue tion faris Charles Baudelaire kaj multaj aliaj.

– Ne fantaziu, ke vi estas la unua, al kiu tio okazis, ne pensu, ke vi faris ion tre aŭdacan kaj eksterordinaran, ion, kio konfuzas la averaĝajn ulojn; mi haŝiŝumis en New Orleans, en drinkejoj de Bourbon Street, mi snufis krakaĵon en Novjorkaj ĝazkluboj, mi pasigadis noktojn en sekretaj fumejoj en Bangkoko kaj Hongkongo; kredis min, mi scias ĉion pri tio! Rigardu ĉi tiujn aĵojn sur la tablo! Boteloj, pano, glaso, salujo, gazeto... Ili estas realaĵo. Rigardu lumon kaj ombron! Pripalpu ĉion per la fingroj! Tamen, vi absolute ne konscias, kiel facile estas droni en tute malsaman, apartigitan realecon, kiu same ekzistas en ĉi tiu momento. Tiuj mondoj troviĝas unu tuj apud la alia; se iu vin hazarde frapos sur la kapon, vi sammomente eniros unu el ili; se via temperaturo estos pli ol kvardek gradoj – vi havos ĝin, enpulgumigu haŝiŝfumon, kaj vi tuj aperos tie! Tiuj mondoj penetras unu la alian, ili interplektiĝas, ili ja vere ekzistas. Jes, ambaŭ tiuj mondoj estas veraj; kaj neniu inter ili estas pli bona, aŭ pli malbona ol la alia. Sed ili estas malsamaj. Ili estas tiaj, kiaj vi ilin sentas. – Nu, kio tiukaze estas problema? – demandis Una. – Problema estas la elekto – la fakto, ke oni devas elekti unu el ili

– diris li trankvile. – Kial? Vi demandas kial! Pro tio, ĉar estas maleble vivi samtempe en tiuj ambaŭ mondoj. Via knabo estas okeja – evidente li jam delonge solvis ĉiujn dilemojn, firme decidinte ne eliri el sia haŝ-rifuĝejo. Kial li entute eliris, je diablo, se li tie fartis bone? Laŭ mia sento, ĉio ĉi estas, se li vere estas poeto, nura pleonasmo! Ĉu haŝ? Nu, la veraj poetoj naskiĝas kun tio en la kapo! Sed vi... Vi ja havas problemon. Eliru aŭ restu porĉiame tie! Kial? Ĉar vi estas malforta. Mi timas, ke vi fuĝis tien, por eviti la respondecon kaj konfrontiĝon kun si mem. – Mi estas malforta, ĉu vi tion diris? – Jes. Mi ja konas vin. Tie vi fartas bone, sed matene vi devos forlasi la fumdefendon, kaj tiu alia realeco, kiu vin atendas ekstere, perdos por vi ajnan valoron. Tio ja estas terura. Vivi nur tiam, kiam oni estas en alikonscio, en la fumo. Se povus ekzisti vivo, kian mense vidas via amiko, tio estus la plej ideala vivotipo. Edeno. Vivo en sonĝo. Tamen ĉi tiun mondon, en kiu ni troviĝas, regas malebriaj, sanaj kaj energiaj homoj. Por ili vi estas nur ordinara rubaĵo sen volo, kaj vi kaj via Huckleberry Finn. Por ili vi estas amorfaj estaĵoj, kreskaĵoj, nenio! Kun vi ili povos fari ĉion, kion ili prezentos al si en sia menso. Vi faros ĉion, por almenaŭ unu fojon ankoraŭ vivi en fumo. Ĉu vi scias la miton pri Tezeo? – Mi ne tute memoras ĝin. – Nu, Tezeo eniris labirinton por mortigi monstron, nomatan Minotaŭro. Ĉiuj antaŭe perdiĝis en tiu labirinto, kaj Minotaŭro ilin, senkuraĝiĝintajn kaj lacajn, venkis senpene. Sed Tezeo en la mano tenis fadenan bulon, kies alia finaĵo estis en la manoj de Ariadna, kiu lin amis. Li mortigis Minotaŭron, kaj per tiu fadeno trovis la elirejon el la labirinto. Ĉu vi scias kial? Ĉar li havis ion, kio lin atendis ekstere. Iun, kiu lin amis. Iun finaĵon de la fadeno. Iun ideon. Ankaŭ grvan kialon. Sed kion vi havas? Nenion. Vi neniam eliros! Kредu min, ĉiujn gravajn aferojn sciis jam la antikvaj grekoj, multe antaŭ ni!

Una lin trankvile rigardis per siaj migdalokuloj. Kial li tion parolas al ŝi? Parolas, parolas, parolas, parolas... Ĉar ankaŭ li mem estas profunde en kaĉo. Li eniris Unan sen fadeno, kaj havis nenian ŝancon eliri el ŝi viva. Neniu lin atendas ĉe la elirejo. Una mem estis, fakte, tiu grandvalora fadeno; sed anstataŭ liberigi lin de la labirinto, ŝi lin enbuligis. Eksilentinte, li manpremis sian kapon.

Ŝin kaj ŝian povran kunhaŝanton li kompatis. Kion ni faris por tiuj infanoj? Kion ni faris por ili? Ni, damnaj, eksjunaj egoistoj, okupiĝantaj nur pri ni, pri niaj propraj sukcesoj! Ĉiuj lokoj jam delonge estas okupitaj! La sekva lotumado estos post kvindek jaroj. Ni fopelis ilin en mariĥuanejojn, kiuj malfermis la pordon de haŝiŝejoj, kaj tiuj – de kokainejo, kaj tiu dormiga blanka pulvoro – de acidejo, sed nuntempe jam temas pri heroinejo! Heroino regas inter la beogradanaro, kiu ankoraŭ maĉas burekon kun fromaĝo, kaj ŝargas sin per brando! Kiel rapide ni iĝas malbona variaĵo de la mondo! En

pruntĉambroj, manenmane kun samaĝuloj, sidas dekkvinjaraj knabinetoj, kaj ridetante veturas, veturas, veturas malproksimen, tien de kie neniu ĝis nun revenis, ĉar oni fartas admirinde en la regno de la dolĉa fumo. Dum tiu tempo, ni batalas unuj kontraŭ la aliaj por akiri influon, reputacion, konceptojn, povon, aŭtoritatecon, por la ideoj el la deknaŭa jarcento! Kion ni faris por la infanoj?

– Kiam vi komencis fumi? – demandis li Unan.

– En la dekkvina... – respondis ŝi trankvile, kvazaŭ dirante al li, kiam ŝi komencis uzi rulŝuojn.

– Kie?

– En Londono, en Croydon.

Surrey. Thornton Heath. Vicoj de tute samaj familiaj konstruaĵoj el ruĝaj brikoj, kun ŝtuparoj kaj balustradoj. Ŝi loĝis en la domo de la familio Baret, kien ŝin venigis ŝia patro en nigra, ofica „Bentley“ de la Ambassadejo, kaj petis sinjorinon Baret, en la angla lingvo kun rimarkebla serba akcento, ke ŝi, se tio estos bezonata, estu severa al Una. Vizitadis Una la someran kolecion en Croydon, konsiderante sian novan ĉirkaŭumon unu el multnombraj punoj, al kiuj ŝi dum multaj jaroj estis submetata, trankvile kaj kviete, enŝoviĝinte en sian konkon de Danuba bordo. Ŝi sopiris sian avnjon kaj ties korton sur Dorĉolo<sup>12</sup>. Samrezigne ŝi sidis dum multaj vesperoj sur la ŝtuparo antaŭ la domo de la familio Baret, ĉirkaŭita de britaj, francaj, hispanaj kaj arabaj geknaboj – malgrandaj forpeltitoj el sia familia paradizo, kiujn oni ĉi tien, sur la Insulo, sendis ellerni la ĉefan mondlingvon, kaj ĝis la morto esti dankoplenaj al la gepatroj, sen kiuj ili vivis la plej sentemajn jarojn de sia pubereco, anstataŭinte ilin per senriproĉa, perfekta insula prononco de la angla lingvo. La gepatroj ilin forgesis en ĉi tiu modesta mezklasa regiono, kie oni matenmanĝas refrititan panon kun sengusta butero, kaj vespermanĝas verdan salaton kun gustomankaj kolbasetoj. Ĉu vi volas unu fumon?! Ŝi ne povis rifuzi, ĉar se rifuzus, oni nomus ŝin provincianino. Atendis ŝi, ke okazu miraklo, kaj tiu streĉa atendo malhelpis ŝin senti ion ajn, krom timo. Ŝi levis la ŝultrojn, kaj mensogis, ke tio estas nenio, ke en Beogrado oni fumas eĉ pli bonajn ... ojn. Tiamaniere do ŝi iĝis ano de malmultenombra, elita rondo de malgrandaj haŝamuloj, kiujn la aliaj infanoj rigardis kun envio kaj admiro. Ili fumis, tie, sur ŝtuparo, en proksima parko, sur forlasitaj tenisejoj, en keloj, en Vimpi kaj en klozetoj de la kolegio. Ili fumis, kaj iĝis plenkreskuloj. Ŝi ne iĝis dependulino, kvankam ŝi ĉiam impete ĵetiĝis en tiun plezurejon; ŝi povis ĉesi haŝiŝumadon iam ajn, sed ĉiufoje ŝi renkontis iun nekonaton el fumgrupo, kiun ŝi rekonis en la sama momento laŭ nur al ŝi konataj, nevideblaj

12 Malnova urbokvartalo de Beogrado.

signoj: laŭ peko, kaŝita en ties okulangulo, laŭ nekoncentriteco, mildeco kaj tremanta, apenaŭ rimarkebla spuro de timo ke li estos kaptita, pro kio al ŝi ŝajnis, ke ŝi renkontas la plej proksimajn parencojn, plenumantaj la malnovan riton de soliĝo kaj flugpendo. Facile ŝi trovis tian rondon, similan al tiu en Croydon, ankaŭ pasigante someron en Bejruto, kien ŝia patro estis postene translokita. Ŝi kunportis en Beogradon ducent gramojn da haŝiŝo en kuko, por vidigi sian gravecon. Ŝia urbo post la vojaĝo ŝajnis al ŝi virga kaj pruda. Ŝi volis ĝin perpleksi per materiaj pruvoj, alportitaj el la malproksima mondo, sed polica luphundo en la Surĉina aerodromo malamike graŭlis kontraŭ ŝia hipisako – kaj la plano estis fiaskinta.



La profesoredzino, Vida Babiĉo, alvokis Unan kafumi en la hotelo „Jugoslavio“. Una, akceptinta tiun inviton, ne demandante pro kio ŝi estas alvokita, alvenis perpiede el Novbeogrado, per ŝparvojoj tra kampoj, kun ĝuo sentante kiel la kalkanumoj de mallongaj vakeraĵoj eniĝas en pasintjaran herbon. Ili sidis apud granda vitro, rigardanta la arĝentecan supraĵon de Danubo. Una ĝentile malakceptis bongustegan kukon „cervodorso kun batokremo“, kiun al ŝi proponis Vida Babiĉo, kaj mendis por si nur kokakolaon, kvankam ŝi deziras glason da blanka vino. Ŝi timis, ke ĉi tie oni ne surtabligas vinon je glasoj. Du trenŝipoj, kiuj malrapide kaj pene luktis kontraŭ ŝanelo, salutis per bova tirableko rusan pasaĝeran ŝipon „Norda stelo“. Al indiferenta rigardanto (kvankam rilate al ĉi tiuj du, tiel diversaj virinoj, oni certe ne povis esti indiferenta rigardanto), Una kaj Vida similas al amikinoj, aŭ pli precize – al parencinoj, fuĝintaj de ĉiutagaj devoj, por iom babileti kaj iel pasigi la tempon ĝis vespera amuziĝo. Ili ambaŭ siamaniere, konforme al sia klaso, reprezentis perfektigitajn stilojn. La pli aĝa posedis puran, senartifikan vizaĝon, kiun kadris helharara glorkrono, kies oreca koloro perfekte harmoniis kun ŝia malhelblua variaĵo de matrosa kostumo. Ĉiu objekto sur ŝi, kaj antaŭ ŝi, sur

la tablo: arĝenta fajrigilo „Duponto“, longaj cigaredoj „Eva“, aktoj el malhela, ĉifita led, kaj gantoj el la sama materialo, nereale maldikaj sunokulvitroj, vidigis rafinitan guston, dum la vesto sur la knabino apud ŝi, hurlante, ruinigis tiun rafinecon, apartenante al tute alia stilo, kiu intence ĝuas la fuŝemon de pufpantalono, kvadrumita ĉemizo kaj ĉeno kun rompita koro Else Peretti; kolorperditan kaj kvazaŭmaĉitan strukturon de tola mantelo kun refaldita kolumo, kiu pendis sur maldikaj ŝultroj de ĝia posedantino – ĝis la danĝere pintaj ruĝaj botoj. Iu malpli konanta la kapricemon de modaj tendencoj, povus konkludi, ke la rezervema blondulino estas pli multekoste vestita ol la juna nigrabarulino, ne sciante kiom kostas ties zorgoplene flegata leĝereco. Kvankam iliaj rigardoj estis direktitaj al la novembra rivero, la du virinoj tamen sukcesis kaŝe pritaksi unu la alian, per la tipa ina oblikva fulmrigardo, kiu dum ununura ekbrilo rimarkas centojn da detaloj, kiujn la vira okulo ne povas atingi: de la kvalito de lako sur la ungoj, ĝis la unuaj spuroj de perdita batalo kontraŭ jaroj en la sulkoj de la kolo... Evidente, sub la ŝajna senhezito de la pli aĝa damo subbrulis kaŝita ekscito, dum la pli juna kviete maĉis gumon, sen ia ajn alia esprimo, krom koncentriĝo al gepromenantoj kun infanoj kaj hundoj. Kiam ili estis priservitaj, kiam Una portempe gluis la maĉgumon sur la kruron de tablo, Vida ekparolis konkrete; unue ŝi pardonpetis la gastinon pro ĉi tiu melodrama renkontiĝo, kaj diris, ke por ŝi tio estas „la unua ĉi-speca interparolo en la vivo“, konfesante, ke en tia situacio ŝi ne tre bone orientiĝas. Una trankvile rigardis ŝin per siaj malsekaj bizancaj okuloj, kiuj kvazaŭ descendus desur fresko el la monaĥejo Studenico. „Ho Dio, kiel mi kiĉas!“ ekĝemis la edzino de la profesoro, ankoraŭ fingrumante la fajrigilon, ne sciante, kion fari kun la manoj, krom neŭroze fumi. Ŝi ne havis kuraĝon daŭrigi la interparolon: „Ŝajnas, ke ni estas en la stadio, kiam por ni malpli gravas propra vivo, ol la timo ke ni banaliĝos!“ Finfine ŝi diris, ke ŝi jam delonge scias pri la amafero inter Una kaj ŝia edzo. Una ne neis. Ŝi simple (klak!) forŝaltiĝis kaj koncentrite rigardis siajn du malgrandajn portretojn en la okulvitroj de Vida. Ne, ŝi neniam malnoble spionus ilin, sed kiam oni vivas kun iu tutajn dudek jarojn, oni ne devas esti tre elstara psikoanalizisto, por diveni, kio kun la edzo okazas. Cetere, Vida jam delonge atendis, ke io simila okazu. Tio ne estas lia unua amaventuro. Estas nature, ke la amo post dudek jaroj da geedza vivo ne estas tia, kia ĝi estis je la komenco, kaj estus nereale atendi ke tiel estu; kvankam neniu el ni, tamen, ĉesis ĝis la fino kredi je fabelo, je tio, ke ilia kunvivo estas escepto – restas, fakte, iaspeca amikeco inter la geedzoj, kiuj spertis malbonajn kaj bonajn jarojn – sindonemo, komplico, komuna anima vivo: la amo estas amo; ankaŭ vi tion komprenos foje, diris Vida, sed la vivo estas vivo! Fortrinkinte sian kokakolaon, Una rekomencis maĉi la gumon per apenaŭ videblaj movoj de siaj palaj lipoj. Ŝi daŭre silentis.

Vida tiam diris, ke ŝi nenion havas persone kontraŭ Una, kaj kontraŭ periodaj amaferoj de la edzo – finfine, ŝi al li revenĝis sammaniere – sed ŝi devas atentigi Unan, ke Miŝelo, kontraŭ kiu oni jam delonge kaŝe komplotas, nun estas en ekstraordinare danĝera situacio, ne nur pro sia interaĝo – kiam la viro malfacile adiaŭas sian junaĝon, ĉar li antaŭsentas, ke la restinta parto de la vivo ne estos pli bona ol tiu, kiu jam pasis, sed ankaŭ pro tute praktikaj kialoj. Nome, oni deziras lin senkatedrigi, forigi lin el la Fakultato! Ĉiuj ĉi tiuj umoj estis dum multaj jaroj kolektiĝantaj kaj amasiĝantaj, nun ili povas abrupte kovri lin lavange, dum li, kiel ordinara bubo, sekrete geumas, anstataŭ esti koncentrita kaj singardema. Miŝelo elmetas sin, iĝas celobjekto, donacante al siaj kontraŭuloj pli kaj pli da motivoj, ke ili lin sukcese distretu. – Kian mi havas rilaton al tio? – demandis Una. – Ili misuzos vin, por alkroĉi al li, krom ĉio alia, ankaŭ misuzon de sia publika posteno: delogadon de studentinoj! – respondis la profesoredzino. – Tio ja povas esti la decidiga guto en la jam plenplena glaso, kiun Miŝelo devos eltrinki, antaŭ ol li forlasos sian laboron, kaj porĉiame adiaŭos sian universitatan karieron, por kiu li estis pretiĝanta dum sia tuta vivo. Mi ne scias, ĉu mi havas rajton zorgigi vin pri tio – diris ŝi – sed mi supozas, ke vi lin amas, kaj ke al vi ne estas tutegale, kio kun li okazos, ĉu ne? Via amafero min interesas ne tre, same kiel min ne interesas sentimentala historio el iu ama gazetaldonaĵo, sed min interesas la manovroj, kiujn oni kontraŭ li organizas. Unue okazos nuligo de liaj jam afiŝitaj prelegoj, neuzo de liaj skriptoj; librejoj jam, unu post la alia, forigas liajn librojn el siaj montrofenestroj; disciplina komisiono lin kulpigas, ke li sabotas la laboron de komitatoj por aprobo de doktoraj disertaĵoj; li ja tiun laboron evitas, ĉar oni al li ĉiun dimanĉon donas po du milojn da paĝoj, enhavantaj ordinarajn stultaĵojn, kiujn li devas tralegi, kaj skribi sian opinion pri ili... Se li nur tion estus faranta, li ne havus tempon eĉ por dormi, des malpli por okupiĝi pri sia scienca laboro! Tre perfida plano, ĉu ne? La dekanon pasintmonate postulis, ke la kongreson de sociologoj en Londono ne partoprenu Miŝelo, kiu estas invitita, sed la vicdekanon, kiu jam dum multaj jaroj tute ne okupiĝas pri scienco. Ili sukcesis malebligi al li paroli dum publikaj tribunoj, kiujn li antaŭe ofte partoprenis, mensogante, ke liaj teorioj ne estas konvenaj en ĉi tiu politika momento. Antaŭ televida diskutforumo lin en reĝisorejo alpaŝis la organizanto, kaj informis, ke lia apero estas prokrastita pro teknikaj kialoj, kvankam ĉiuj aliaj ĉeestantoj restis sur siaj lokoj. Oni eĉ sukcesis, ke lia lasta libro „Amaso“ ne estu prezentita en iu ajn gazeto, en iu ajn faka revuo! Atentu, li oficiale ne estas malpermesita; neniue ajn subskribis ian ajn liston de malpermesitoj, sur kiu estas lia nomo, ĉar neniue havas sufiĉe da kuraĝo, farante ion tian, transpreni respondecon antaŭ venonta tempo. Ili jam lertiĝis! Simpladire, ili pere de altrudita oniopinio organizis,

ke cirkulu onidiroj pri Miŝelo, ke li iĝis malfavorato, kaj nun ĉiuj hezitas kontraŭstari tiun opinion, laŭ la popoldiro: „Kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas!“ Jen tipa radikalula truko! – Kial ili tion faras kontraŭ li? – demandis Una. – Kial? Tio estas klasikaĵo; juna vi ja estas, tial vi tion ne scias, kaj ne devas scii! Kial vi volas scii tion? Miŝelo ja estas homo, kiu ĉiam kaj ĉiusence estis bonŝanca, li estis Ido de bonŝanco. La homoj ja malfacile pardonas fremdan sukceson, se la sukceson ne subtenas malhonesta mono. Ili ĉiuj bone scias, kiom da abomenaĵoj ili devis fari, por iĝi tio, kio ili nun estas. Miŝelon ili pri nenio povas kulpigi, kvankam ili klopodegis deklari lin framasono, poste angilo, agente de CIA, plagiatisto, eĉ hebreo! Miŝelo, kompreneble, spite kaj puntilie malrezistis. En akompano de aprobo de studenta publiko en la amfiteatro, li nemalofte spritas kaj ŝercaĉas pri siaj Fakultataj kolegoj, kaj pri iliaj ideoj – kio poste havas voston. Jes, ankoraŭ io, li ja estas ŝatanto de Eŭropo kaj Eŭropa ideo, kvankam tio en ĉi tiu ĉirkaŭumo neniam estis bone akceptata. La vicdekano, kiu finis postdiplomon studadon en la universitato Lomonosovo en Moskvo, persiste altrudas sian kaŝan tutslavan ideologion. Aliflanke, eksaj stipendiatoj de Fulbright (aparta grupo en Fakultato) zorgas pri propraj interesoj, defendante siajn anojn. Ĉiuj ili, kompreneble ĉiu siamaniere, aĉetas animojn por eventuala nova dismetado de kartoj. Eŭropo jam delonge ne havas monon por partopreni tian hazardludon. Miŝelo estas nek kun tiuj, nek kun la aliaj – li estas tute sola, neprotektata, sed tia sendependeco ĉe ni estas multkosta. Ĉiuj grupoj lin riproĉas, ĉar li „stariĝas super nia realeco“, kaj tiu netoleremo vastiĝas pli kaj pli; ĝi atingas eĉ tiun tempon, kiam li, estante knabo el delikata urba familio, portis papiliformajn kravatojn, kaj somerumis en Francio, el kiu alvenis lia avnjo. Ekzistas ja socia komplekso, kiu ne estas ignorinda, kaj pro kiu li deĉiame sidas profunde en kaĉo. Krom ĉio ĉi, via vicdekano kaj Miŝelo... sed tio estas temporaba rakonto! Iam ili estis la plej bonaj amikoj, kvazaŭfratoj! Nesolvitaj interrilatoj... vi ja komprenas, ĉu ne? Mi petas vin, ne enkaĉigu Miŝelon! – Kiu lin enkaĉigas? – kontraŭstaris Una. – Mi scias! Mi scias, ke vi povas havi kaj pli junajn, kaj pli belajn, vi ja rajtas havi ilin, ĉar ankaŭ vi ja estas juna kaj bela; mi scias, ke li vin enpuŝis en ĉion ĉi tion, sed mi supozas, ke vi ne sciis pri la fono de ĉio ĉi, tial mi venis por klarigi tion al vi. Iun tagon vi estos dankoplena al mi, pro ĉio, kion mi hodiaŭ faris. Mi ne faras tion pro mi, sed pro Miŝelo! – Ili sidis tutan horon antaŭ la hotelo „Jugoslavio“, kies kafejeto estis dronanta en ombron, dum la kontraŭa bordo de Danubo ankoraŭ brilis en la lumo de subiranta suno. Una, plejparte, silentis, demandante sin, kial ŝi, entute, partoprenas ĉi tiun dramon, dum la profesoredzino estis metode detalanta ĉiujn danĝerojn kaj neeblojn de ilia amrilato. – Nun vi havas dudek kvar jarojn – diris ŝi – sed la tempo rapidas; post dek ses jaroj vi havos kvardek!

Miŝelo ankoraŭ ĉiam havos dudek kvar! Li, fakte, estas nur granda infano. Vira bebo. Kvankam, unuavide, li aspektas kiel vera estro kiam li prelegas, li fakte dum la tuta vivo estis estrita. Vida dum multaj jaroj por li tradukas artikolojn el revuoj, pretigas dokumentojn por liaj tezoj, respondas al leteroj, tajpas publikigotajn tekstojn, provlegas ilin, faras poste korekturojn, organizis lian vivon, forigante desur lia vojo ĉion, kio povus malgrandigi lian krekapablon. Tio ja ne estas facila, ŝi vere al neniu deziras tian vivon, kiun ŝi tamen memvole akceptis. Nun estas malfrue ŝanĝi tion. Kunlaborantino, sekretariino, tradukistino, korektistino, provlegistino, tajpistino, krom ĉio ĉi ŝi okupiĝis ankaŭ pri ĉiuj financaj aferoj, kiuj ne estas tre favoraj, kaj krome, ŝi estas ankaŭ ĉambristino, kuiristino, fojfoje flegistino kaj hejma psihoterapeŭtino, patrino, zorgistino kaj nur dio scias kio ankoraŭ. (Ŝi ne menciis la rolon de konkubino, rimarkis Una.) Sen ŝi, li estos perdiĝinta, des pli, ĉar lin baldaŭ atingos ankaŭ malsanoj. Ĉu Una konsentos rezigni siajn distriĝojn, je kiuj ŝi havas rajton, ĉu ŝi estos kun li ankaŭ kiam li iĝos malsukcesulo, nu, li jam iĝas tia? Una kompatis ĉi tiun belan, plenaĝan helokulan virinon, kies vizaĝo estis kvazaŭ tuj ekploranta. Ŝin konfuzis ties kortuŝa sincereco, patostimo kaj moderecsento, per kiu ŝi penis superi la banalan situacion, en kiun ŝi dronis, ne pro sia kulpo. La vizaĝo de Una ĉion ĉi tamen neniom vidigis; malgraŭ tio, tra la hardigita masko de nova generacio, al kiu ŝi apartenis, tra la kiraso de indiferenteco, simila al malproksima eĥo de kortikla civilizacio, ŝin estis penetranta sufero, amo, eble eĉ kompatio... Ŝi tre deziris abrupte brakumi kaj kisi tiun virinon, sub la lango senti ties langon, ensuĉi tiun rozkoloran kavon, el kiu penetras la profunda kaj melodia ina voĉo! Antaŭ du tagoj ŝi preskaŭ paraliziĝis sur la vojkruciĝo apud Ĉefpoŝto: ŝi atendis, ke ekbrilu la verda lumilo, kiam ŝi en griza „Peugeot“ ekvidis sian patrinon – verŝajne samaĝulinon de la profesoredzino. La patrinon ŝi ne vidis sep jarojn. Ilia interrigardado kvazaŭ daŭris senfine, la patrino de Una rigardis tra la vitro, kaj Una rigardis, starante en grupo da homoj, atendantaj transiri la straton, kaj en tiuj rigardoj, kiuj renkontiĝis sur la venta vojkruciĝo, estis kaj malamo, kaj allogo, kaj vano, kaj malĝojo. Neniam ŝi povis pardoni al sia patrino, ke tiu ŝin forlasis sola kaj izola tie, sur Dorĉolo, ĉe la avnjo, foririnte kun alia viro, al kiu, Una tion poste aŭdis, la patrino naskis novajn infanojn. Multajn monatojn ŝi serĉis kaj finfine trovis la patrinon (tiam Una havis dektri jarojn), kiu loĝis en Instruista kolonio; ŝi eksonoris je ties pordo, trompita de la romanoj de Dickens, en kiuj perditaj Copperfieldoj ĵetiĝadis en la sinon de ekzaltitaj onkloj; sed la unua frazo de la patrino, kiu atente alrigardis ŝin, estis: „Kial vi tiel aspektas? Kial vi iĝis ĉi tia?“ ĉar Unu estis vestita laŭ la frua hipistilo. Ŝi forturniĝis kaj hurlante malsupren kuris laŭ ŝtuparo, esperante tamen, per ero de sia konscio, ke la patrino ŝin haltigos,

aŭ ekiros post ŝi. La patrino tamen faris eĉ ne unu moveton. Ĉu, eble, ĉi tiu virino akceptus kison, aŭ farus skandalon? Una sentis, ke ili du, kiujn kunigis la amo de Miŝelo, iĝas iaspecaj fratinoj (neniam estas malfrue por trovi parencon), fratinoj laŭ ŝvito aŭ spermo, negrave; estus ja tre nature, ke ili interbrakumu kaj satploru kune, kaj, lekante larmojn, daŭrigu tion, daŭrigu – ŝi flaris Yves Saint Laurent sur la matura karno de Vida, la guston de la karna korpo, kies brakmuskolojn, sendube, surŝutis svarmo de brunaj lentugetoj; cicoj grandaj, mamoj iomete malstreĉaj, pezaj: ho, se ankaŭ Vida tion volus! Una promenigis la manon sur la internan flankon de siaj femuroj kaj sur la monton de Venuso: ŝi ekscitiĝis. Ŝin ardigis ĉi tiu flegata, pura virino, kiu povus esti ŝia patrino, ŝi ekdeziris, ke ŝia amo estu reciproka, ke ili almenaŭ iomete estu kune... Kia stultaĵo – geedzeco! Kie do estas problemoj? Ĉu ili ambaŭ ne povas esti liaj? Ni ja povas tiel vivi tre bele! Ŝi elakompanis Vidan ĝis la parkumejo antaŭ la hotelo, luktante kontraŭ la deziro ĉirkaŭpreni ties talion, kisi ties buŝon. Vida malfermis la pordon de malgranda „Renault“: – Ĉu mi veturigu vin? – Ne, dankon! – Una malakceptis la proponon ĝentile, kaj revenis hejmen inter novkonstruaĵoj, tra kampoj, sur kiuj jam lokloke promenis vesperaj maniuloj el Novbeogrado „...min ne ravis Usonaj kosmonaŭtoj sur Luno. Jan Palach ja per multe malpli da karburajo atingis stelojn!“ (El raporto de Una.)



La renkontiĝoj en la zen-ĉambro iĝis por Una kaj por la profesoro necesgaj, same kiel en ilia lernaĝo estis necesega foresto dum la lastaj lernejoj instruoj. Iliaj ĉiam pli oftaj renkontiĝoj similis al seancoj de psiĥoanalitikistoj kaj pacientoj, kiuj malpaciencege atendas informi la kuraciston pri sia iama traŭmato aŭ lastnokta sonĝo. (Hej, mi sonĝis vin ĉi-nokte! Kiel? Vi kvazaŭ estis kun mi sur lito... Nu, ĉu mi plezurigis vin?) Sed ne estis diveneble, kiu estas malsanulo, kaj kiu estas psikiatro. Iliaj roloj ĉiun tagon alternis; Una oftfoje maltrankvile turniĝadis sur la larĝa lito, kiun, en ilia privata lingvo, ili nomis *fikodromo*, serĉante la plej komfortan pozicion, kiel kato, kiu pretiĝas ronroni. La vangon ŝi kuŝigis sur la ŝultron de la profesoro. Por ŝi tio estis momento de dorlotado, kiun ŝi ŝatis multe pli ol la ŝvitajn geluktojn. Ŝi adoris la manieron, kiel li gratis ŝian dorson, kaj kiel li rakontis. Tiam ŝi denove iĝis malgranda brunhaŭta knabineto, ŝirmata kaj protektata. Nenio malbona povis al ŝi okazi. Karesante ŝin, li sentis sub la fingroj la delikatan, malkontinuan linion de ŝia elasta vertebraro. Apenaŭ tuŝante ŝin per la ungoj, li glitigis la manon pli kaj pli suben, ĝis la koksaj konkavaĵoj (olimpan saltejon el haŭto), kvazaŭ karesante ian viviĝintan figuron de Brâncuși (birdon aŭ fiŝon), sed

anstataŭ malvarma bronzo aŭ polurita granito, ĉi tiu skulptaĵo estis varma, kaj ie en ĝia profundo pulsas palpita, juna vivo, faranta ĝin kate glata kaj ekscita.

Kiel ja ĉi tiu forŝtelita tempo diferencis de la malrida periodo, kiam al li ŝajnis, ke ekzistas eĉ ne unu feliĉa punkto en lia vidatingo! Pernicioze enuaj tagoj kaj semajnoj alternis en la ritmo de semestroj, kunsidoj, ŝtataj festoj, vintrumadoj kaj somerumadoj. Espero ne ekzistis. Li ofte paŝis laŭkutime unu-du horojn laŭ stratoj, ĉasocele, sciante, ke li nenion ĉasakiros, samkiel hokfiŝanto iras kun sia ilaro sur la bordon de larmige poluita rivero, kiu ankoraŭ, verdire, fluas, kaj nur pro tio similas riveron, kvankam en ĝi jam delonge ne ekzistas ia ajn vivaĵo. Ĵetinte fiŝhokon, la fiŝanto rigardegas en akvon, ĉar ne povas akcepti, ke ĉio estas porĉiame perdita. Same la profesoro rigardis la vivon, kiu estas plena da indiferentaj vizaĝoj – tiun amason da absurda, neniom noblita karno, kiu nutriĝas, trinkas, manĝegas, kantas kaj reproduktiĝas: ĉu mi iĝas unu el ili? Li jam parkere sciis la enhavon de ĉiuj montrofenestroj sur la strato de Kalemegdano ĝis Slavio; multkoloraj kovriloj de libroj flavis kaj volviĝis antaŭ liaj okuloj – la legado lin naŭzis, li volis, anstataŭ legi, iomete vivi. Kiam li misis?

Iun tagon li hazarde komencis interparoli kun flavruĝhara knabineto, sur la teraso de la kafejo „Suno“. Li provis konduti kun ŝi delikate, sed tio montriĝis mallerta kaj aminduma. Ŝi diris, ke lia ĉarmigprovo estas simple idiota!

– Ĉu vi ne komprenas – diris ŝi, proksimiginte siajn elstarantajn dentojn al lia vizaĝo – ke mi amaras kun tiu, kiun mi deziras! Ĉu vi eble opinias, ke vi povas min sendi en arbaron per tiuj viaj antaŭdiluvaj blagoj?

– Nu, ĉu vi volas amori kun mi? – li provis spriti.

– Ne, mi ne volas!

– Kial?

– Mi ne povas tion fari, kiam mi sentas nenion.

Tiun posttagmezon je la sesa horo, li preskaŭ povis difini la precizan formulon de malvenko: tio estas acidet-amara gusto de metalo, miksitita kun leĝera kapturigo kaj genutremado. Li estis la lasta restinta ĉasisto en la ĉasejo, en kiu oni ne plu devis ĉasi, ĉar la ĉasaĵo jam estis malsovaĝigita. Neniu plu, ŝajne, ĉasis. Antaŭ Filozofia fakultato en la strato Princo Mihajlo, knabinoj senĝene alpaŝadis siajn samaĝulojn, kaj proponadis al ili gekaresadon tiun vesperon. Amo sen superruzado, sen taktikaj agoj, kaptiloj kaj embuskoj... Benata la epoko de feliĉaj bovidoj, kiuj finfine, havas tion, kion volas! La muzeo de eksaj Don Juanoj povis nun akcepti kaj lian ĉarmon kaj amajn versojn kaj ĉiujn akcesorajn trukojn, kiujn lia generacio pasie flegis. Post longa dormo li vekiĝis en la mondo de gejunuloj, kies agojn kaj lingvon li ne plu komprenis. Ĉio okazis rapidege. Li estis fremdulo. Pere de Una li povis iomete enrigardi tiun plenplenegan infanvartejon, kaj miri pri ĉio, kio

tie okazas. „Ĉu ja estas eble, ke nia vivstilo malaperis?“ – mense ripetadis li. – „Ni ja ankoraŭ estas relative junaj kaj fortoplennaj! Kio do okazis? Kiu nin, antaŭtempe, ĵetis sur forĵetaĵojn? Ĉu la principo de umado ne estis sama de Casanova ĝis nun? Ĉu ĉi tiu knabino nun ne ĝuas? Ĉu ŝi ne dronas en orgasmon? Ĉu ŝia vizaĝo ne spasmas, same kiel spasmis la vizaĝoj de iamaj knabinetoj, kiuj nun aĝas kvardek jarojn?“

Ili silentis elĉerpitaj, ĝis kiam Una alrigardis sian malgrandan horloĝon, formetitan apud litkapo, kaj diris, ke ŝi devas foriri. Li neniam demandis kien. Tio estis silenta interkonsento, kiun ili ambaŭ respektis. Cetere, al li estis tutegale. Li deziregis fotelon kaj libron. Li sciis, ke li ne povos legi, sed simple pensos pri Una, kaj la libro en lia sino estas nur malgranda alibio por tiu vekstata sonĝo.

– Mi ŝatas rigardi vin vestiĝanta! – diris li.

Ŝi estis surmetanta vestojn sen ajna ekscita movo, kiel lernantino, kiu sin haste vestas post gimnastika instruhoro. Simpladire, ŝi estis ensaltanta kalsonŝtrumpojn, enĵetanta la bruston en ĉemizon, surtiranta kalsoneton, surŝovanta ĵerzon super la kapo, ne priatentante la frizon, al kiu tio, ŝajne, estis tute negrave. Tute same ŝi estis ankaŭ senvestiĝanta.

– La viroj aspektas stultaĉe dum ili tion faras! – diris li. – Je ĉiu fojo al mi estas iomete malagrabla resti nur en ŝtrumpoj... Kaj se mi la ŝtrumpojn unue demetas, tio al mi ŝajnas ankoraŭ pli stulta!

– Kial vi pri tio, entute, pensas?

– Ĉar la viroj estas, plejparte, malbelaj.

– Ho, nu!

– Nu, jes! Diference de virinoj, la viroj estas tendenoj, multharaj, kun ridindaj, maldikaj kruroj...

Ili malleviĝis per lifto sur la teretaĝon, kaj trovis ŝlositan enirejan pordon. La profesoro provis malfermi ĝin per unu el siaj multnombraj ŝlosiloj, sen ia ajn sukceso. Ili staris senhelpe, atendante, ke alvenu iu malfruanta loĝanto de la turdomo. Tamen, malbonŝance, en tiu domo, ŝajne, vivis nurnure televidaj maniuloj kaj frudormantoj – neniu aperis tutan duonhoron. Ili estis kaptitaj en ridindan kaptilon! La pordo, interalie, estis vitra, konsistanta el kvar same dikaj vitroj.

– Rompu ĝin! – diris Una.

– Per kio?

– Nu, per piedo! Batu ĝin per piedo!

Li hezitis dum momento. Kion fari se ĝuste tiam alvenos iu el la loĝantoj? Oni povus irigi ilin en policejon, demandadi kiun ili vizitis, kaj kiel ili restis ŝlositaj en la konstruaĵo. Ilia kaŝejo estus porĉiame malkovrita. Kion fari se morgaŭ oni tralegos en vesperaj gazetoj novaĵon, ke la regula universitata

profesoro Miŝelo Babiĉo rompĉis la vitran pordon de turdomo en Stelaro? Una lin rigardis primoke. Aŭ al li tio nur ŝajnis, pro ombro, falanta sur ŝiajn vangostojn? Li tuj forgesis la riskon, kaj senpripense piedbatis la vitron, kies tinto eksonis en la nokta silento simile al eksplodo de bombo. La vizaĝo de Una vidigis ĝojegon. Per ŝu-bato li trarompĉis la vitran kaĝon, en kiu li loĝis dum multaj jaroj. Ili ŝoviĝis tra ĝiaj frakaspecoj, kaj forkuris tra rubejo, dum sur la turdomo estis malfermiĝantaj fenestroj, sur kiuj estis aperantaj homoj en piĝamoj. Aŭdiĝis krioj: „Hontindaĵo! Stratulaĉoj! Voku policanojn!“ Haltiginte noktan taksion ili firme interplektis la manojn, komforte sidante sur la malantaŭa sidejo, kiel du fuĝantoj el pun-eduka malliberejo.

Nur hejme li sentis doloregon en piedartiko. Demetinte la ŝuon, li konstatis, ke ĝi estas sangoplena.

„... kiam li eksciis, ke lia edzino interparolis kun mi, postulante, ke mi lin forlasu, komenciĝis longa interparolo inter ili, post kio P. portempe translokiĝis en Stelaron. Sian edzinon li tute ne riproĉas, tion li diris al mi, sed li preferas klarajn rilatojn. Ili interkonsentis, ke por ambaŭ estos multe pli bone, ke li certan tempon estu sola, por decidi kion fari. Verŝajne lia edzino estas tre saĝa; ŝi lasis lin iomete konsolidiĝi, kredante, ke P. baldaŭ revenos, obeema kaj malpostulema. Ŝi scias, ke ŝi fine atingos tiun venkon. Poste tio ŝi povos lin pro lia fuĝo regi kaj ĉantaĝi dum la tuta vivo. Tamen, kio okazos al mi? P. en zen-ĉambbron alportis nur skribmaŝinon, la plej gravajn personajn dokumentojn, kelkaj necesegajn librojn, kaj iom da vestoj. La ŝanĝo de la situacio lin pli ol iom konfuzis. Ŝajnas, ke li ne estas lerta en solvado de praktikaj problemoj. Li ricevis atakon de kolerego, kompreninte, ke li forgesis sapon por razado, kaj ke li ne havas viŝtukojn. Ĉar ni havis nenian kovrilon, mi aĉetis littukojn, kusentegojn kaj du lankovrilojn en la grandmagazeno „Beogrado“. Kaskvitancon mi almetas. Vi komprenos, ke mia studenta poŝmono, kiun al mi donas mia patro, ne sufiĉas por kovri ĉi tiujn elspezojn, sed mi devis iel rekompenci P., kiu ĉiufoje pagas ĉion, kvankam mi pro tio fartas tre malagrabla. Mi supozas, ke vi disponas monon por ĉi tiaj aferoj. Mi havis okazon kaŝe konatiĝi kun lia financa stato – tion vi ja taskis al mi. En ŝparlibro, kiun uzi rajtas ankaŭ lia edzino, li havas 23.000 dinarojn. Li havis 60.000, sed lastatempe liaj deponaĵoj estis ofte prenataj. P. havas ankaŭ ĉekojn de „Chemical bank“ en New York. Mi trarigardis raportojn, kiujn al li sendas la banko: ĉi tiam sur la konto li havas ducent okdek dolarojn kaj kvindek centojn. Tio estas, pli-malpli, ĉio, kion mi eksciis. Mi atendas pluajn instrukciojn. U.“



Nun ili ne plu devis kaŝiĝi. Una venadis en zen-ĉambbron, kaj restadis tie du-tri tagojn. Ofte ŝi nur tranoktis, kaj matene iris rekte en la prelegejon. La profesoro tiam ellitiĝadis antaŭ ŝi, en apuda privata bakejo aĉetadis kornbulkojn, flanojn kaj jogurton. Ŝi ŝatis matenmanĝi en la kuŝejo, disŝutante panerojn ĉiudirekten. Tiam al profesoro ŝajnis, ke li jam estis edziĝinta kun Una. La gedzeco komenciĝas tiun tagon kiam la knabino unuafoje alportas sian dentobroson. Evidentiĝis, ke la mastrumado ne estas ŝia ĉefa talento. Kelkfoje ŝi, vere, komencis impete baki krespojn, sed ŝia subita entuziasmo estingiĝis tuj post tagmanĝo aŭ vespermanĝo; post ŝia kuirarta eŭforio restis nelavitaj teleroj, bruldifektitaj kaseroloj kaj patoj, ŝtopita lavujo, kompleta ĥaoso en la malgranda, improvizita etkuirejo. Li neniam povis daŭrigi sian verkadon ĝis kiam li mem malĥaosigis ĉion, kion Una lasis post siaj gastronomiaj ekspedicioj. Por ke li okupiĝu pri sia manuskripto, ĉirkaŭ li, sendepende de tio, kie li troviĝis, devis regi perfekta ordo. Lin ofte en lia malnova domo ĝenis eĉ bildo pendanta oblikve sur muro! Tamen, estis ĝuige vespermanĝi kun Una ĉe kandeloj, kaj aŭskulti ŝin frenezumanta, rakontanta siajn travivaĵojn, aŭ imitanta telestelulinojn. Plej multe ŝi ŝatis imiti afektemajn rokdancantinojn el diskejoj. Ŝi estis naturdotita aktorino kaj dancistino; la profesoro opiniis,

ke ŝi miselektis sian profesion. El Una ekfluis vortotorento: ŝajnas, ke Miŝelo estis la unua homo en ŝia vivo, al kiu ŝi povis fidi, tute kaj absolute, sen timo, ke li tion iam ajn misuzos. Sed ŝi jam tute ne povis elteni silenton. Io devis senĉese esti okazanta. Siaflanke, la profesoro sopiris oazon de paco. Dum la lastaj monatoj li vivis ĥaosege; nun li sentis konscienciproĉon, ĉar li ne sufiĉe laboris. Sensukcese li estis provanta arigi siajn disĵetitajn pensojn, kaj koncentriĝi al sia laboro. Ofte li mergiĝis en iun libron, sentante ke Una lin rigardas kun la kapo misturnita: ŝi estas faranta manstaron, kun la hararo disŝutita sur la tapiŝo. Multfoje ŝi subite saltis sur liajn ŝultrojn kaj rolis plenplenan stadionon: „Kaj nun vi vidos amasgimnastikon „Juneco“, kiun oni simbole plenumas kun stangoj kaj ŝnuroj!“ Ne, ne, jen, nun mi vere estos kvieta! Kvazaŭ mi tute ne ekzistus! Tute kaj absolute!

Una lin kaŝe flankrigardis. Li ofte ŝanĝadis okulvitrojn por legado. Neatendite ŝi klare komprenis, ke li, fakte, estas maljuna homo! „Kion mi faras en ĉi tiu stranga ĉambro, kun ĉi tiu fremda, grizethara viro, kiu povus esti mia patro? Kiel mi okazis ĉi tie? Kia estas nia interrilato?“ Kvazaŭ vidante lin unuafoje en sia vivo, ŝi ekkonsciis, ke li havas sulkojn, vejnozajn manon, okulvitrojn, malrektajn ŝultrojn. Ŝi tiam ektimis lian seriozecon, kaj freneze ekdeziris kunumi kun siaj samaĝuloj. Ŝi alarmiĝis. Promenetante de unu al la alia flanko de la zen-ĉambro, ŝi verŝadis drinkaĵojn en glason, gapis tra fenestro sur straton, sentante sin kiel sovaĝa kato en bestejo de dokta maniulo.

– Mi kvin tagojn ne vidis Benjon! – diris ŝi riproĉe.

– Kial vi ne vizitas ŝin? – demandis la profesoro, ne levante sian rigardon desur la manuskripto.

Ŝi paŭtis kaj komencis danci, en akompano de diskmuziko, kiu lin ĝenis:

– Mi estas tempomanka! Ho, mi sentas dancurĝon! Mi volas danci ĝis elĉerpiĝo!

– Iru ĉi-vespere en diskotekon!

– Neniuokaze! Fakte, mi volas ludi korbopilkon! Mi volas veturi sur motorciklo! Mi ne scias, kion mi volas fari... sed mi volas fari ion... Rigardu ĉi tiun finton! Finto, maldekstren – finto, dekstren!

La profesoro tiam retiriĝis en sian singardan mezaĝan kirason, mallevin-te ĉiujn periskopojn kaj antenojn. Labori ne plu eblis.

– Aŭdu – diris li tiam – mi vin ĉi tie ne trudtenas! Mi nenion postulas de vi. Kiam ni renkontiĝas, tiam ni amaras, kaj tio estas ĉio! Vi pri nenio kulpas, nenial vi nun devas suferi. Nenion vi devas fari. Nun simple iru kaj estingu vian dancurĝon! Gedormu kun iu bubo! Gedormu kun kelke da ili! Haŝiŝumu. Ludu korbopilkon laŭvole, kaj revenu kiam vi ekdeziros reveni. Ĉu okej?

– Okej. – ŝi imitis lin – Okej. Okej. Okej! Mi tre malamas la ulojn, kiuj senĉese miksas serbajn kaj anglajn vortojn!

– Mi estas tro maljuna por ŝanĝiĝi! – diris la profesoro. – Nun, for! Ĉu okej? Li revenis al sia manuskripto. Ŝi komencis plori:

– Kial vi tiel kondutas al mi? Kial ni estas kvazaŭ en ringo? Vi kaj mi konstante estas kvazaŭ en ia ringo! Mi sentas tion! Mi sentas tion, tiun travi-deblan kurtenon inter ni. Alvenos la tago, kiam vi ekkompotos la malgrandan Unan, kies la plej belajn jarojn vi detruis. Vi ja komprenos tion!

– Vi deziras ludi korbopilkon, ĉu ne? Aŭ vi volas piĉumi? Tio ja estus en ordo! Kial vi pensas, ke mi kaj vi estas kvazaŭ en ringo? Ĉiu povas fari tion, kio estas ĝuiga!

Jarbariero estis denove inter ili. Li komencis pli kaj pli rimarki ĝin. Naskitaj 1953, 1954, 1960, 1961... La neantaŭvideblaj samaĝuloj kaj samaĝulinoj de Una, infanoj el alia sentogalaksio... Kian rilaton li havas kun ili?

– Hieraŭ vespere mi denove haŝumis! – fanfaronis ŝi iun matenon. – Ho, kiel ni enviinde haŝumis!

– Kiu do!

– Boĉjo kaj mi! Ni buliĝis sur lito, kaj haŝumis la tutan nokton!

– Bone... – diris la profesoro, pluordigante noticojn por sia prelego pri video-kasedoj, kiujn li nomis „scenoj en konservujo“!

– Ni estas nur geamikoj, ĉu vi komprenas? – Una estis praviganta sin, kvankam li tion de ŝi ne postulis. – Iam li estis enamiĝinta je mi, sed tiu sento jam delonge fornebulis. Jen ekzemplo! Li kaptis mian bazamenton, kaj mi diris al li: „Nu, lo, Boĉjo, kio okazas kun vi? Mi ne volas tion fari kun vi!“ Li ne scias pri vi, sed supozas, ke mi iun sekrete amas. Ĉiuj en la urbo opinias, ke mi estas frigida ulino, kaj ke... o min tute ne interesas, ĉar ili ne scias pri vi... Neniu scias kun kiu mi geumas! Jen frenezaĵo.

– Splende... – diris la profesoro nekoncentrite.

Sep tagojn li ne telefonis al ŝi.

– Mi scias, ke vi pro tiu Boĉjo aktorlas seninteresiĝon pri mi! Je ĉiu fojo kiam mi al vi diras ion pri iu mia viramiko, vi aktorlas seninteresiĝon – venĝocele. Fakte vi estas terure ĵaluzaĉa!

– Mi, ĵaluza, ĉu? – kontraŭstaris li. – Fabelaĵo! Sensenca ideo venis en vian kapon!

– Ĵaluza vi estas, sed en la sama tempo sufiĉe inteligenta por tion ne konfesi! – ŝi persistis pri sia akuzo.

– Nu, ek, ni difinu la ĵaluzon! Kio estas, fakte, la ĵaluzo?

– Nu, provu, kaj vi konvinkiĝos, ke vi ĵaluzas!

– Jen, oni povas diri ĉi tiel: la ĵaluzo estas timsento, ke la amata persono renkontos splendmasklon, kun kiu al ŝi estos multe pli bone; aŭ splendfemalon, kiu al la viro havigos pli da plezuro.

– Mi legis tion ie... Denove vi iun priŝtelis, ĉu?

– Eble! Oni jam ne scias, kies ideojn oni prenas, kaj kiu oniajn ideojn akceptas... Vi mem diris, ke ni du plej plezurige geumas en la tuta mondo! Ĉu vi ja ne diris tion, ho Una?

– Kun vi al mi estas, vere, plej bele.

– Kial do mi ĵaluzu pri iu alia?

– Tion ankaŭ mi demandas min mem!

– Ne, ne, mi vere ne estas posedama! – diris li, kvankam estis ĵaluza kiel tigro, kaj Una tion sciis, kaj li sciis, ke Una tion scias.

– Kial do vi aktoras seninteresiĝon? Vi denove trovis iun intelektulinon, kun kiu vi diskutos pri Fromm, ĉu?

– Mi, ĉu mi aktoras seninteresiĝon? Jen fabelaĵo!

– Kial do vi ne telefonis?

– Mi estis en ĥaosego... – respondis li.

– Vi denove aktoros seninteresiĝon! – diris Una. – Kial vi ĉiam rolas seninteresiĝon, kiam mi ion parolas? Neniam plu mi diros ion ajn...

Ŝiaj malkontentoj estis tute nemotivitaj. Tio estis ia speciala stato de spirita kaj korpa senpacienco, io, kies nek radikon, nek spuron, nek kialon, nek klarigon ŝi sciis. Jen, ia nekontentigita spirito plenigis ŝin de la piedfingraj pintoj ĝis la lasta hareto de ŝia malhela hararo. Li ne permesis al ŝi kvietiĝi, tremigante ŝin, ekscitante ŝin per malklaraj aludoj pri eblaj distriĝoj, aventuroj kaj vidaĵoj, devigante ŝin saltadi, translokiĝadi de unu al alia loko, fari subitajn movojn, senbride danci en akompano de muziko el malgranda transistoro, funkciigi kun maksimuma laŭto gramofonon, ĝis kiam najbaroj komencis frapadi la murojn, plankojn kaj plafonon, kure konkuri la lifton, kuri ŝtuparsuben, kaj spiregante, preskaŭ eliginte la tutan animon, alveni antaŭ li al la teretaĝo. La profesoro tiel havis eblecon denove elproksime observi alfluantajn torentojn en ŝia angiaro, rekoni la pulsadon de la dudekjara aĝo sub la juna haŭto de tiu infano-virino-bestino.

Ĉiuj iliaj konfliktoj tamen estis finiĝantaj en kuŝejo, kie ili amoris. Li estis bridanta Unan, samekiel sperta ĉevaldresisto lacigas per rondkurado eĉ la plej furiozan ĉevalinon. Jam dum ŝi estis senvestiganta sian flavan sarongon, en kiu ŝi similis budaanon, Una antaŭsentis, ke li tion estas faranta por ŝin kvietiĝi; ŝi ofte provis eviti aŭ prokrasti tiun humiligan riton – al ŝi tute ne plaĉis la rolo de sovaĝa poneo, post kio, tion ŝi bone sciis, alvenos laco, sonĝo kaj mildaĵoj, do, malsukcesa vespero, nerealigita distriĝo. Ŝin plezurigis lia korpo, sed ŝi samtempe malamis la metodecon, kun kiu li estis malsovaĝiganta ŝin, ne permesante al si perdi sinregon eĉ unu momenton; eĉ kiam li estis klimaksanta, liaj okuloj senĉese ŝin atente esploris.

Interese, ŝi neniam lin venigis hejmen, kvankam li ege deziris vidi la ĉambiron, en kiu ŝi vivas! Ŝi pravigadis sin, asertante, ke ŝiaj gepatroj konstante

estas hejme: ŝi ja ne sciis kiel prezenti lin al ili! Kion ŝi diru, kiu li estas? Eble ŝi hontis pri sia loĝejo, kiu pro sia malĝoja etburĝa stilo verŝajne kontrastis kun ŝia nov-onda aspekto: pretendemaj mebloj, kiĉpentraĵoj, averaĝa aspekto de homoj, kiuj en ĝi vivas,odoro de nova loĝloko; ĉio, de kio ŝi dum la tuta vivo fuĝis eksteren, straten, en fremdajn domojn, en veran vivon; tien, kie perdiĝis eĉ la spuro de ŝia deveno kaj hejma vivmaniero. Ekster la konteksto de tiu loĝeja konko, kaj de tiu ĉambro, ŝi povis esti tio, kio ŝi deziris esti! Fatala juna virino aŭ taŭzita studentino kiu kraĉas sur la konvenciojn. Ripozlito, kiun tegis falsa tigra felo, malkonfirmis ŝian tutan eston, tuj kiam oni ĝin vidis; la patro en pijamo antaŭ eterne funkcia televidilo; lia edzino en sporta trejn-vesto, najbaroj, gastoj kiuj ilin vizitas... Tamen, tio ne signifas, ke absolute ĉiuj amikoj de Una ne eniradis ŝian ĉambron; ŝi ne havis similan bremsosenton antaŭ siaj geamikoj, kiuj tre ofte eĉ dormis en tiu gastama domo. Simpladire, la profesoro por Una estis ulo el tute alia mondo. Ŝi timis lian cinikismon, splendan mildecon, aŭ nur silenton antaŭ la gobelinoj de Olga, kaj Afrikaj memoraĵoj de la patro. Unu fojon ŝi geumis en sia ĉambro kun Huckleberry Finn; jen la sento de faciliĝo! Al li estis tute negrave, kie li troviĝas, kaj kio lin ĉirkaŭas. La objektoj, aĵoj, dom-interno, gestoj, vortoj, odoroj kaj sonoj, por Hakfino estis nur ekirstacio al ali-konscio, kiu iun ajn spacon per la fumo estis transformanta en lian internan spacon, sen materialaj limoj kaj signoj. Kvan-kam ŝin li neniam pro tio riproĉis, la profesoron estis ofendanta la fakto, ke li ne konatiĝis kun la aspekto de la loĝadejo de Una. Lin turmentis tiu enigmo, nekonata kadro, sen kiu li ne povis plene kompletigi la bildon de Una, ĉar al li mankis randaj kuboj. Ĉio ĉi tio lin memorigis pri la komika situacio, kiam kaŝpolicistoj turniĝas dorse al kameraoj kaj fotoaparatoj, dum fotado de la homo kiun ili ĉirkaŭas protektocele. Una, ŝajne, kaŝis parton de sia vivo, diference de li, kiu al ŝi malkovris ĉion, kion li posedis, restiginte nenion por si mem. Ĉu pro tio ŝi grandigis sian enigmecon, per kiu ŝi lin sorĉumis? Aŭ ŝi, simple, hontis pri sia rilato kun homo, dudek jarojn pli aĝa ol ŝi?

Kiam li enpaŝis plenplenan amfiteatron, lin bonvenigis aplaŭdado. Iu, evidente, decidis, ke tamen estas pli bone, ke la prelegoj de Miŝelo estu farataj en la amfiteatro ol en la „numero sep“, pro eblaj tohuvabohuoj en koridoroj. Studentoj, proksimume tri centoj da ili, staris kaj entuziasme aplaŭde salutis lian lastan bataleton kontraŭ la federacia sekretario pri komunikado, publikigita la antaŭan tagon en la rubriko „Leteroj de legantoj“ en grava semajna revuo.

*„Kiel la lastan argumenton en ĉi tiu laciga polemiko, kies kaj kialo kaj celo jam delonge perdiĝis“ – la profesoro Babiĉo estis finanta sian leteron – „la estimata Sekretario uzas siajn dek publikigitajn librojn pri komunikadoj, kontraŭ miaj du-tri kompatindaj kajeretoj kun negravaj*

eseoj. Jen bonega ebleco iom pli detale pridiskuti liajn verkojn, kaj klari-  
gi ilian ekeston. Ĉiuj dek libroj, kiujn mi, interalie, atente tralegis (iĝinte  
tiamaniere malofta leganta ekzemplero por Riplio!), ĉar mi dubas, ke  
tion faris eĉ ilia aŭtoro, konsistas el (se oni atente ilin tralegas) paroloj,  
intervjuoj, stenografaĵoj de diskutoj ĉe rondaj tabloj, referaĵoj, tostoj  
dum bonvenigoj kaj elakompanoj de gravaj gastoj, solenaj longparoloj  
dum malfermadoj kaj fermadoj, kaj ĉefparoloj dum ŝtataj festotagoj.  
Tio ja ne estus tre terura, se al ĉiuj ne estus klare, ke la estimata Sek-  
retario, pro lia grava funkcio, estas tre okupata homo, kaj ke liajn  
parolojn, okaze de ĉiuj ĉi tiuj eventoj, skribis tuta malgranda stabo de  
anonimaj oficistoj, inter kiuj troviĝas eĉ du diplomitaj stilistoj, kiujn  
gvidas Kabinetestro. Iun tagon, kiam ariĝis konsiderinda kiomo de ĉi  
tiuj geniaj pensoj pri komunikado, iu el tiuj oficistoj, probable, propo-  
nis al la kamarado Sekretario publikigi tiun tutan salaton en la formo  
de libro. Ne gravas, oni penis lin konvinki, ke tion ne verkis vi mem;  
la verkado estas, samkiel ni scias, malplej grava – viaj estas la bazaj  
ideoj kaj ĝeneralaj tendencoj, viaj estas la tezoj; ĉio alia estas – nenio,  
malmultvorte, nura rutino! Baldaŭ aperis la unua libro el la serio  
de senindividuecaj titoloj. Dum ĝia promocio parolis Kabinetestro. Li  
estas, same, aŭtoro de multenombraj, solenlaŭde tonigitaj prezentaĵoj  
sur tutaj paĝoj de la plej konataj gazetoj kaj revuoj, li estas proponanto  
de Jara Plejlibro, kaj samtempe membro de decidistoj, kiuj aljuĝas tiun  
gravan afirmilon. La libro estis, vere, disvendita en rekordaj tempo  
kaj eldonkvanto; sed, kiu ĝin aĉetis? Oficistoj de Sekretariejo pri ko-  
munikado donacadis ĝin eĉ al siaj infanoj por naskiĝtagoj, kaj eĉ ne  
unu oficejo, estrata de ĉi tiu grava organo ne restis sen kompleto de  
ĉi tiuj fundamentaj verkoj, necesegaj por profunda kompreno de la  
moderna komunikteorio en nia socialisma socio... – kiel trafe, en la  
antaŭparolo, emfazis la kabinetestro. La kamarado Sekretario dank  
al la kvina libro eĉ doktoriĝis. Ekzistas nur unu bagatelaĵo: la dena-  
ska burokrata maldiligentulo eĉ ne klopodis el la tekstoj, troviĝantaj  
en ĉi tiuj dek volumoj, forviŝi interkrampajn vortojn, inter kiuj estas  
ankaŭ (aplaŭdado), (sincera ridado), (entuziasma ĝojkriado), kaj eĉ  
jena perlo (... post finaj vortoj, kaj tratanĉo de bendo, la kamarado  
Sekretario ĉeestis solenan manĝeton en la restoracio por laboristoj en  
la novkonstruita masonaĵo). Subskribo: la profesoro Miŝelo Babiĉo.  
Numero de identigilo 186236, Beogrado.“

En la tuta urbo oni ĉie rerakontadis la anegdoton: traleginte la leteron  
de la profesoro, la redaktoro de semajna gazeto, ĉirkaŭita de kunlaborantoj,

ekpaŭtis kaj diris, ion, similan al „... nu, ne ĉio estas tia kiel vi asertas!“ La profesoro tiam prenis la tutan monon, kiun li tiumomente havis en la poŝoj, kelkajn centmilojn da dinaroj, metis la monon sur la tablon de la redaktoro, kaj diris, ke ĉion prenu tiu, kiu povas citi almenaŭ unu frazon el iu ajn el la deklibro de la Sekretario. Ekregis plensilento. Neniu memoris ion ajn! La profesoro tiam proponis, ke la tutan monon prenu la redaktoro aŭ ĵurnalisto, kiu sukcesos citi senerare almenaŭ unu titolon de tiu deklibro! La redaktoro kaj la ĵurnalistoj rigardis unu la alian, sed eĉ ne unu inter ili memoris almenaŭ unu titolon. Trankvile kolektinte sian monon, la profesoro eliris el la redaktejo. Venontsemajne la gazeto publikigis lian leteron komplete.

Li eniris la amfiteatron per hastaj, iomete oblikvaj paŝoj, kiel boksisto enkuranta ringon. La aplaŭdadon li ĉesigis per nerva mansvingo. Komenciĝis silento, tia, ke kelkan tempon klare aŭdiĝis la tiktakado de murhorloĝo. La studentoj sidiĝis sur siajn lokojn; tiuj, kiuj ne sukcesis ĝustatempe okupi liberajn benkon, restis starantaj. La profesoro promenetis kelkajn minutojn antaŭ ili, poste subite haltis kaj, levante la rigardon al la aŭskultantoj, sciigis per voĉo, obtuza pro tabakumo, ke antaŭ ol paroli pri la temo de la hodiaŭa prelego, li diros unu-du vortojn pri la aplaŭdado...

„Kiel stranga estas tio“, mense diris Una, rigardante lin el la dua vico; „nur mi, inter ĉiuj ĉeestantoj, konas ĉi tiun homon deproksime – ĉiun poron sur lia haŭto, ĉiun cikatron, gingivon, dentojn...“ Malgraŭ tio, nun li ŝajnis al ŝi iel stranga, subite maskita je profesoro, kiu en tiu momento apartenas al ĉiuj, ne nur al ŝi. Ŝi sentis ondon de ĵaluzo. Ĝis tiam ŝi eĉ ne rimarkis kiom multe ŝi lin bezonas.

– Antaŭ ol, do, ni parolos pri la telefono – pri tiu ilo de la moderna teroro en la proporcioj de intensa kaj absolute tutplaneda rito, permesu al mi menciivan aplaŭdadon, fakte la aplaŭdadon kiel principon, kiel unu el la praaj homaj komunikmanieroj. Neniu scias precize kies manoj unuafoje aplaŭdis en la monda historio, kaj al kiu tiuj manoj aplaŭdis. Verŝajne tio estis multharaj manplatoj de iu entuziasma neandertalano – al gvidanto de grego, kiu sukcesis per bastonego dispisti iun rampulon. Sed jam de la komenca komenco de nia civilizacio, la kiomo de amasa aprobo sendube estis mezurata laŭ la daŭro kaj intenseco de aplaŭdado...

Ŝin inundis subita tajdo de amo al tiu maljuniĝinta knabo en kvadrumita ĉemizo, kiun tre bone konis ŝia korpo: ofte ŝi surtiris tiun ĉemizon, elirante sur balkonon, aŭ por enkuri la kuirejon, kaj ion manĝi post seksumado. Li estis ŝia sekreta amiko, tiu ĉiama fuĝanto, senhelpa bubo kaŝiĝanta sub la masko de matura, prosperanta viro. Litamiko – kiel tiu vorto stulte kaj eksmode sonas! Litamiko kaj kromedzino! Ĉu iu ajn ankoraŭ uzas ĉi tiujn esprimojn pri tiuj, kiuj sekrete amas unu la alian? Li lernigis ŝin trinki blankan vinon,

kompreni la gestolingvon, elekti la plej bonan tablon en restoracio, sper-  
ti sinsekvajn orgasmojn, kuiri spagetojn, interparoli kun taksiistoj, ne esti  
malfeliĉa kiam vespere ne povas eliri ien ajn el la domo, ne rigardi televidi-  
lon – li vekis en ŝi ŝian endormiĝintan kvintesencon, kiun ŝi ne konsciis, sed  
malgraŭ sia tuta amo, kiun ŝi sentis al li, ŝi tamen estis helpanta liajn mala-  
mikojn fari al li malbonon, kaj ŝi lin senĉese ĉantaĝis per sia nura avantaĝo  
je kiu ŝi disponis – je aĝdiferenco. „Kiam foje li restos sen sia publiko, kiun li  
bezonas pli ol manĝaĵojn, pli ol sin kaj min, pli ol ion ajn, kvankam li senĉese  
asertas, ke li malestimas tiun specon de sukceso, kiam li restos sen sia ĉiutaga  
porcio de aplaŭdoj kaj admirado, kiam lin de tiu tago apartigos nur unu  
paŝo – li estos perdita homo! Ĉu vi ankaŭ tiam restos kun li? Mi faras al vi  
komplezon, retenante lin por mi, nun, kiam li ĉiusence malprosperas. Ĉu vi,  
vere, ne volas la kukon 'cervodorso' kun batokremo?“

– ... konata estas ankaŭ la aplaŭdo en la epoko de Ĉefgeneralo! Ĉifoje  
post mencio de lia nobla nomo, ĉiuj ekstaris kaj komencis aplaŭdi. Tiu, kiu  
komencis aplaŭdi, povis esperi plezurigan avancon, sed, aperis malgranda  
teoria problemo: kiam kaj kiel ĉesi aplaŭdi? Kiu la unua estos tiom kuraĝa  
aŭ senatenta, negrave, kiu la unua mallevos la manojn korposuben kaj tiel,  
interpunkcie, markos la kvanton de kolektiva ekzaltiĝo? Problemo, kiu eĉ  
ĝis hodiaŭ ne estas solvita! Tiu malfeliĉulo, nome, estis eksponita al la plej  
severa puno kaj forpelo, ĉar, pli multe ol en la aliaj lokoj, en totalismaj socioj  
la aplaŭdo estas unu el la plej potencaj politikaj armiloj en la batalo kontraŭ  
logiko. Ĉu vi povas imagi tiun scenon?“ Miloj da homoj staras kaj aplaŭdas,  
sed neniu kuraĝas esti la unua ĉesanto! Eble en ĉi tiu momento ie, en ia izola  
gubernio, kiun ankoraŭ ne atingis la novaĵo, ke la senmorta Ĉefgeneralo  
mortis en la 1953a jaro, en ia malproksima deputita halo, staras duonvivaj  
ostaroj, kaj aplaŭdas al la gvidanto, observante suspekteme unu la alian...

Ŝi rigardis nun liajn kurŝuojn, ĝinzon, jakon ĵetitan sur seĝon; cigaredu-  
jon „Dravo“ (ĝi lin memorigis pri la franca „Gauloise“), armean fajrilon, ma-  
nuskriptojn disĵetitajn sur katedron kaj du okulvitrojn; lian grizetan hararon,  
tra kiu ŝi, nur dio scias kiom da fojoj, puŝis siajn fingrojn; sed ŝin pleje incitis  
la fakto, ke li tute kontrastas kun tiu tipo de viroj, pri kiu ŝi deĉiame revis, ke  
li kontrastas kun la malhelhaŭta, krispa egulo-tenisisto, je kapo pli alta ol ŝi,  
kun du vicoj da simetriaĵoj, blankaj dentoj kaj firma makzelo. Krom tio, ŝi sen-  
tis konscienciproĉon pro ĉio, kion ŝi faras kontraŭ li. Ĉu konscienciproĉon?  
Ĉu tio ankoraŭ ekzistas, aŭ ni ankaŭ ĝin delonge ĵetis sur la rubejon de falsa  
filistra moralo? Ŝin oni jam en la unua klaso de gimnazio instruis denunci  
la kamaradon, kiu al ŝi sufloris dum lernohoro de historio, klariginte, ke  
estas falsa, filistra moralo, kiam ŝi lin kaŝas, kaj socialisma moralo, kiam  
ŝi diras lian nomon, por ke la kamarado faru memkritikon, kaj boniĝu! Ŝi

mense diris: tre malfremda, sed tre malproksima! Tuj poste ŝi mense diris: kvankam parte ĝusta, tiu frazo jam delonge estas banaligita. Ĝi sonas pli ol iom senhava. Kion do? Cetere, li kulpas same kiom kulpas ŝi. Kial li akceptis ĉi tiun ludon? Ĉar li estas am-avida. Ŝajne lin lezis la antaŭkrizaĝa paniko; li ja antaŭ kelkaj tagoj konfesis, ke por li seksumado estas la nura vere valora vivumo? „La seksumado estas“, diris li tiam, „por mi la nura vera komunikado!“ Sendube li sentas, ke al li restis ne tre multe da tempo por amoro, tial li deziras uzi ĉi tiun lastan eblecon tute kaj absolute! Kion ajn mi farus, mi ne kulpus. Li, tamen, estas gajnanto. Li ja havas dudekkvarjaraĝan litamikinon, dum liaj samaĝuloj gedormas (aŭ ne gedormas) kun mezaĝulinoj. Krom ĉio ĉi, li ne estas senemocia fikulo. Li fikas per la cerbo. Por geumi – li devas unue ion senti. Mi povus havi iun ajn el ĉiuj ĉi knaboj en la amfiteatro, kaj ili estus feliĉaj se mi konsentus geumi kun ili, sed kion mi farus kun ili? Kion fari inter du gedormoj? Kio min do ligis al ĉi tiu homo, kiu nun parolas al la gestudentoj, kvazaŭ parolante la lastan fojon en sia vivo; same kiel li kisas, same kiel li drinkas?

– Kiu estas aplaŭdrezista? Tiu dieca bruo nin plenigas per la sento, ke ni realiĝis, ke ni harmonias kun la tutaĵo, kun la socio, en kiu ni vivas... Ĝi vekas en ni memplaĉon; dank al ĝi, ni facile ekkredas, ke ni estas mirindaj, eksterordinaraj, neanstataŭeblaj... Nu, televizio oni povas rigardi elsendojn por kantistoj-komencantoj, kiuj nomiĝas „Riverencu kaj komencu!“ aŭ „Ilia unua aplaŭdo“. Kial? Ĉar profesiulojn oni devas kutimigi ekde infanaĝo al la danĝera tentkapablo de aplaŭdoj, por ke ili poste ne perdu spiritĉeeston, ne postulu, ke oni al ili aplaŭdu, eĉ se trude! Mi trapasis, siamaniere, tiun lernejon, pro tio mi havas por vi peton: neniam plu aplaŭdu al mi! Ne, tio ne estas falsa modesteco, tio estas nur timo, sento de danĝero... Nu, ni daŭrigu pri la telefono! Kiel estas konate, la telefono unuafoje...

„Ni iĝis tutaĵo. Lia odoro absorbiĝis en mian haŭton. Mi komencas uzi liajn vortojn, ŝatsintagmojn, frazstrukturojn. Mi iĝis lia mediumo. Li povas min sentrude venigi antaŭ, jen, ĝuste ĉi tiun publikon, meti mian nukon sur la apogilon de unu, kaj la kalkanojn – sur la apogilo de alia seĝo, kaj transsegi min, aŭ fari ion similan. Mi perdis ĉion, kion mi ŝatis antaŭ la konatiĝo kun li. Li iĝis ridindaj miajn noktajn veturojn sur motorciklo kun buboj; pri la libroj, kiujn mi legis – li diris, ke ili estas forĵetindaĵo; pri miaj la plej bonaj amikinoj – ke ili etas malgrandaj ĉiesulinetoj; pri rulŝuoj sur kiuj mi veturis ĉe Kunfluejo, ke tio estas ekshibicia infaneco, pri mia 'Babeto' – ke mi flosas sur ĝi por vidigi mian puĝeton, kaj sub la pipiĉeto senti ion malmolan; pri la kvartalo, en kiu mi vivas – ke ĝi estas malserena, same kiel ĝiaj loĝantoj; pri la haŝo kaj mariĥuano, ke mi ilin uzas, ĉar mi ne havas evoluintan internan vivon, pro kio mi serĉas ajnan anstataŭaĵon; pri la diskotekoj – ke tio estas

lokoj, en kiuj kolektiĝas junaj filistroj, kiuj ne havis kuraĝon iĝi profesiaj istoj, pro kio ili aerumas sian koron per siaj mizeraj, amatoraj koreografioj; pri miaj vestoj, ke la nura celo de la saĝa homo nuntempe estas trapasi kiel eble pli nerimarkita la straton, sed mi – mi penas iel ajn altiri atenton; pri seksumado, ke mi tion faras meĥanike, ĉar mi vidis, ke ĉiuj tion faras; pri mia vivo, ke ĝi havas absolute nenian celon, ĉar mi ne estas pasie ligita al ia ajn laboro... Foje mi legis pri vilaĝanoj, kiuj ĉirkaŭ kokino faras en polvo cirkulon, kiun la kokino ne povas transiri. Kaj la kokino ĝin, vere, neniam transiras, kvankam ĉirkaŭ la kokino estas tuta korto! Nu, Miŝelo desegnis ĉirkaŭ mi tian cirkulon, kaj plej malbone estas, ke mi jam ne scias kiel reveni en mian iaman kompanion. Mi elkuris el lia cirklo, luktis kaj baraktis, sed poste mi revenis propravole. Kial? Li kaptis min per flataj paroloj. Ĉu tio estas amo?“

– ... la nunajn loĝantojn de la tutmonda vilaĝo infektis paranoja timo, ke iliaj telefonoj estas kaŝaŭskultataj. Kvankam la kaŝaŭskultado de ĉiuj, kiuj opinias ke ili estas kaŝaŭskultataj, estus trokara por iu ajn reĝimo; ne nur pro la kvanto de elektronaj instalaĵoj, sed ankaŭ pro la analizistoj, kiuj devus aŭskulti tiun amasegon da bendoj; kvankam multaj opinias, ke la polico de totalismaj reĝimoj mem vastigas onidirojn, ke ili kaŝaŭskultas grandan kvanton da civitanoj, por anticipe malhelpi la komunikadon inter la homoj, kaj semi suspekton – multe pli grava estas io alia; trovi en la nuna tempo, kiam ĉiuj estas trookupitaj pri laboro kaj pri si mem, iun, kiu vin vere aŭskultos kaj rigardos en la okulojn, dum vi konfesdonas! Estus bone, se ekzistus iu, kiu nin aŭskultis!

En la profesora ĉambro, post la prelego, li eksciis, ke dum tiu tago alvenis letero de la sekretario pri komunikado, kiu nenuligeble postulas, ke li ne plu estu prezidanto de Fakultata Konsilantaro, dum la profesoro Miŝelo Babiĉo estas preleganto. Lin ĉirkaŭis glacia silento.

Sur via nuda ventro cindrujo similas al ĵus estingiĝinta kratero, kiu ankoraŭ fumas.

Mi ne povas vin dorloti, por ne renversi ĝin.

Tial mi ĝin prenas atente, kaj metas sur la kuŝejon inter ni.

Tamen, tio ne estas bona loko – nun ni estas disigitaj.

Se mi ĝin metos sur vian flankon, mi timas, ke ardaĵo falados sur vin.

Se vi metos ĝin sur mian flankon, vi cindron ŝutos sur min.

Kie ni metu tiun damnitan cindrujon, kiam ni kuŝas kune?

Kaj dum ni rigardas la plafonon sekvante fumon, mi promesas Nobelpremion al tiu, kiu elpensos flugpendantan cindrujon por geamorantoj.

Ĝi devus flugpendi en aero precize super niaj brustoj, tiel ke, en la tempo kiam ni fumas, ni povas kuŝi brakumitaj – fum-ĉe-fume.

Una dispremis cigaredstumpon, kaj sidiĝis lotuspozicie:

- Mi ne plu venados al vi... – diris ŝi trankvile.
- Kio okazis? – demandis la profesoro.
- Ĉio ĉi estas tute sensenca... – respondis ŝi.

Li ja sciis, ke tio foje okazos, sed ne sciis kiam kaj kiel. Nu, nun li sciis ankaŭ tion. Li sciis, same, ke estus absolute sensence konsili al ŝi ŝanĝi la decidon, ŝin peti, petegi, jelpi. Li penis haltigi trepid-atakon, klopodante, ke lia vizaĝo restu kviete ridetanta, kiel la vizaĝo de diskvaronigata gladiatoro. Tamen, evidente li ne estis sufiĉe pretiĝinta. Cetere, ĉu la homo povas iam ajn sufiĉe pretiĝi por io simila? Li atendis rutinan seksumadon – sed endramiĝis. Jen, tio estis tiu neantaŭvidebla Una, la knabino, kiun li deziris jam de sia gimnaziago! Danku nun ĝentile la oĉjon Vivon, ĉar ĝi provizore prunedonis ŝin al vi (kvankam tro malfrue por ion ajn serioze entrepreni), ĉar vi estis pli bonŝanca ol multaj aliaj homoj, kiuj post la kvardeka jaro neniam renkontis kaj amaĵis kun amatino el sia infanaĝo. Li sentis sin kiel somnambulo, regata de fremda volo. Ĉu mi freneziĝas? Kio okazas kun mi? Koncentriĝu, ho homo! Ne permesu, ke ŝi eksciu, kiom ŝi vin lezis!

Jam kelkajn fojojn en la lasta tempo li rimarkis ian ŝanĝon de Una, similan al morno, malaperantan dum ili amoras, sed ĝermantan dum paŭzoj inter du orgasmoj. Ŝi leviĝadis el la kuŝejo, neŭroze elŝaltadis kasedon, kiun ŝi iam ege ŝatis, finkciigadis radioricevilon, faris ion ajn, negrave kion.

- Ĉi tio sonas iel tro makabre! – parolis ŝi. – Mi volas ion viglan!

La kasedo estis ŝia propraĵo, ŝi portis ĝin ofte kun si al iliaj kaŝkunvenoj. Santa Esmeralda: „Nothing Else Matters“<sup>13</sup> – sensencaj, dolore petegaj voĉoj, rampis tra venena vesperkrepusko, en la akompano de gitaroj. Strange, tiu kanto tre similis al Una!

- Neniu vin iam ajn tiel precize priskribos kiel Sankta Esmeralda!
- Ĉu vi vere opinias, ke mi similas?
- Ĉi tiu melodio eĉ havas ankaŭ viajn vangokavetojn!

Tiu longa, tirtona latinamerika temo markis, simile al gvidmotivo, ilian fole melankolian amon. Nun ĝi al ŝi ŝajnis enuiga. Ŝi komencis aŭskulti reklamojn kaj listojn de furorkantoj de Studio „B“.

- Kio okazas kun vi?

Ĉu ekzistas pli stulta demando en la mondo?

– Mmmmi ne scias! Mi konstante iommmm spasmas... – ŝi balbutis ĉiufoje kiam estis iom ekscitita; tioĉiam estis tre ĉarma, krom hodiaŭ. – Ŝajne mi... mmmii iĝis supre malplena! Mmmmmi ja nenion scias! Ĉio min nervozigas. Hieraŭ mi ploris la tutan posttagmezon. Mi ne scias. Mmmmi nenion sukcesas...

13 Nenio plu gravas.

Ho Eternulo, se vi ekzistas, ne permesu, ke mi transformiĝu en la frenezetan profesoron Unraton, kiu rampas post kafeja kantistino, „Blua anĝelo“! Kiel sendube jelpis perdinte siajn knabinetojn, tiuj maljunaj malsaĝiĝintaj frenezuloj; la dentomanka Goethe, la kalva kaj malica Voltaire, kiun hontige venkis bovistinoj, la barbohava Leono Nikolajeviĉo, la epilepsia Dostojevsko, la egoistema Pablo Casals, la mirinda Nabokovo, kiu provis savi sin, skribante pri ĉio ĉi; tiu tuta granda arego de freneziĝintaj maljunuloj, al kiuj la saĝo neniom helpis, kaj ili kiel almuzuloj petis iom da karesoj de ĉiesulino, ĉambristino, subreto, stenografistino, puberulino... Mi tamen ne estas tiom maljuna, ke mi perdu la vivon, se mi jam perdis Unan! Mi montros al vi, ho malgranda bestio, duoninfano, duonvirino, ke mi povas rezisti al vi, ĝuste tie, kie vi dominas. Elektu armilon!

– Mi sentas min, kkkkiel, kkiel kokkkino en tiu cirkkklo... – diris ŝi. Ŝiaj granda kaj malhelaj okuloj rigardis lin kun senparola riproĉo.

– Kiel vi eksciis pr tiu cirklo?

– Nnnnnu, mmmi legis!

– Braaaaave! – diris li al Una. – Tio estas saĝa ideo. Tiu ideo, ke vi eliru el la cirklo. Mi ĝojas, ke vi mem trovis tiun solvon. Mi ja sciis, ke tio devas okazi pli aŭ malpli frue. Al mi ŝajnas, ke mi antaŭsciis ankaŭ tiun frazon „Mi ne plu venados al vi...“. Estas io kortuŝa en ĝi. Ĝi plaĉas al mi. Al la homoj ordinare okazas ĝuste tio, kion oni pleje timas. Ĉar, tio ekzistas nenie, krom en iliaj kapoj. Kaj eliras el ilia kapo, formiĝas, defias la sorton, alvenas. Tio ja estas bona. Alikaze la tuta mondo transformiĝus en rutinon. Nu, kio ja estas la rutino? Iaspeca morto.

Li promenas nuda en la ĉambro, kun glaso da blanka vino en la mano, kvazaŭ farante prelegon pri tio, kion la telegrafo ŝanĝis la komunikadon inter la homoj. Li sukcesis dum momento konvinki sin, ke Una lin ne jukas. Li sciis, ke ŝi al li ne kredos, se li mem ne ekkredos.

Ŝin, aliflanke, estis humiliganta tiu lia diskrete supereca pacienco, kiun li uzis en sia monologo, kvazaŭ parolante al iu debila infano.

– Vi estas, vere, superba knabino! Supeeeerba! Mi neniam renkontis iun ajn similan! Mi opinias, ke vi estas grandvalora. Enbatu tion al vi en vian belan, saĝan kapon: *grandvalora!* Kial mi tion parolas al vi? Por ke vi sciu, kia vi estas! Sed ankaŭ ĉar mi, certasence, respondecas pri vi. Pli precize, mi enkondukis vin en mian, kiel vi tion diras – rondon. Nu bone: ni forviŝos tion, nun vi devas reveni en vian mondon! Sed tiu mondo estas danĝera. Se mi, ekzemple, decidus eldomigi iun katidon, kun kiu mi certan tempon vivis, mi forportus ĝin al iu, kiu amas katidojn, ĉu vi komprenas min? Ien, kie ekzistas ĝardeno, aŭ almenaŭ, korto. Mi ne elportus ĝin sur la straton „Karaĝorĝo“, mi ne lasus ĝin sur veturejo. Aj, kio okazas! Kial vi ploras?

Ĉio ja estas en ordo. Mi mense subtenos vin... Sed nun, ni findrinku nian blankan Pinoton!

Ili fordrinkis, same kiel ordinare, du botelojn da blanka vino, geumis ankoraŭ unu fojon kun la gusto de baldaŭa disiĝo, post kio Una sin duŝis, vestiĝis, prenis sian kasedilon, dentobroson, banmantelon kaj la kasedon Santa Esmeralda, malvolvis novan maĉgumon, kaj metis ĝin en la buŝon. Ŝi kisis lian vangon.

– Aŭdiĝu! – diris li.

– Mi volas... – diris ŝi. – Mmmmi nnnne sssscias kkkkial, sed vi mmmmin ĉiam mmmmalgajigas. Damnaĵo!

La profesoro sencindrigis cindrujon, ventumis zen-ĉambbron, kuŝiĝis kaj dronis mole kaj sensone en sonĝon kaj memorkoŝmaron.



Ŝi ne plu telefonis. Li ne plu deĵoris ĉe telefono. Li ne plu streĉis la horloĝon. Paniko infektis lin. Li ne povis koncentri sian atenton al legado, al laboro. La prelegojn li pli kaj pli abomenis, ili similis al eterna ĉerpado de akvo per kribriilo. Li penis ne pensi pri sia malgranda amikino, sed tamen la tutan tempon traserĉadis per sia rigardo la buntan amason da gejunulaj kapoj en la amfiteatro, atendente, ke aperu ankaŭ la ŝia. Ŝi malaperis kiel ŝtono en maron.

Plejmulte li kunumis kun flava, kiun al li foje donacis Una. Tiu balono kvazaŭ estus vivaĵo; sendepende kiel la homo ĝin batas, ĝi ĉiam revenas al la homo. De tempo al tempo ĝi malŝvelis, tiam la profesoro ĝin denove plumblovis, timante tamen, ke ĝi krevos. Ĉiun tagon li trovis iun forgesitan aĵeton de Una, el kiu lin ridete spektis ŝiaj kapreolinecaj okuloj. Kiam li foje estis senpolviganta matracon, li trovis tri harpinglojn, fenditan kombilon kun arĝentaj steloj, kvaronon de ĉokolado kun kokosfarĉo, kaj duone forfumitan skatolon „Marlboro“. En la banĉambro li malkovris violkoloran lipruĝigilon, kaj vaton. Fetiĉisto! Ĉu tio estas ĉio, kio restas post amo? Kaj kio, fakte, estas postamo?

Ĉu telefona numero, kiu malrapide paliĝas en lia memoro?

Ĉu glasoj kun gravuritaj monogramoj, ŝtelitaj en la hotelo „Esplanado“?

Post la amo restas kutimo blankan vinon verŝi en tiujn du glasojn, tiel, ke la linioj estu je sama alteco.

Post la amo restas la tablo en la kafejo „Ĉe signo ?“, kaj surprizita rigardo de la maljuna kelnero, kiam tiu nin vidis kune kun aliaj homoj.

Post la amo restas la frazo: „Vi belege aspektas, neniom vi ŝanĝiĝis...“ Kaj: „Aŭdiĝu fojfoje, vi ankoraŭ havas mian telefonnumeron.“

Ankaŭ kelkaj numeroj de hotelĉambroj, en kiuj ni gedormis, restas post la amo.

Post la amo restas mallumaj stratoj, tra kiuj ni estis revenantaj post amorado.

Post la amo restas melodioj el radioaparato, kiuj eksmodiĝas.

Restas sekretaj signoj, amĉifroj: „Se vi min amas, komencu la morgaŭan prelegon kun tri vortoj, kiuj havos la komencajn literojn de mia nomo...“ Li eniris la amfiteatron, kaj diris: „Unikas nia avangardo...“ Ŝi blovis al li kison.

Post la amo restas via flanko de la kuŝejo, kaj timo, ke iu abrupte aperos. Klak! – mallevita aŭskultilo, kiam aŭdiĝas fremda voĉo. Mil kaj unu malveraĵoj.

Post la amo restas la frazo, kiu hantas en la ĉambro: „Mi iros la unua en banĉambron!“ – kaj la demando: „Ĉu ni ne iros kune?“

Ĉifoje, ne.

Post la amo restis kunkulpuloj: gardistoj de sekretoj, kiuj ne plu estas iaj ajn sekretoj.

Post la amo restas leĝera ĝeno, kiam preterire mi enspiras „Cabochard“ sur iu nekonata brunhaŭta knabino.

Plenplenaj cindrujoj kaj vaka koro. Kutimo bruligi du cigaredojn samtempe, kvankam neniu troviĝas apude. Fotoj faritaj en aŭtomato; taksiistoj, kiuj nin neniam ŝatis („Dankon, ĉar vi ne fumis!“ – sed ni fumis), kaj floristinoj, kiuj nin ŝatis.

Post la amo restis lezita plaĉavido.

La metala gusto de malsukcesulo sur la labioj.

Post la amo restas aliaj homoj kaj aliaj virinoj.

Post la amo restas nenio.

Fikfek!

La vesperoj iĝis infero. Fikfek! Li ne povis traelporti ilin. Fikfek! Li traŝoviĝis iel tra la fikfeka tago, kiel tra kudriltruo, sed la nokto lin insidaĉe atendis kaj rikanis al li tra la faŭko de siaj dentomankaj horoj. Fikfek! Fikfek! Fikfek! Diofeka furzo! Bonŝance, li ne oficiale disiĝis de Vida. Ili konservis korektajn rilatojn, malgraŭ ĉio; li eĉ plurajn fojojn dormis en sia eksa domo. Laŭ opinio de la amikoj kaj konatoj, same kiel de la alia Beograda intelektula feĉo, ili ankoraŭ estis ideala geo. Ĉu ideala geo? Fikfek! Li konservis la ŝlosilojn de la loĝejo kaj de la pordego. Malŝlosinte la enirpordon, li eniris

la vivoĉambron, kie li vidis neniun. En la kuirejo, vidalvide sidis Vida kaj la docento Raŝiĉo, kiu estis en ĉemizo. Ili estis farantaj buŝtukojn el papero kaj aspektis tre intimaj. Fikfek. „Ĉi tio estas, ŝajne, sezono, kiam min forlasis ĉiuj virinoj, kiujn mi amis,“ diris li mense, sed laŭte elparolis:

– Leso revenas hejmen...

– Restu vespermanĝi – invitis lin Vida. – Venos ankoraŭ kelkaj homoj.

Raŝiĉo pretigis gadon siamaniere...

– Kie estas la etulo?

– Ĉe la avnjo.

Li restis kaj aktoritis familieŝtrono. Sekvis serio da vespermanĝoj, kiuj lin ekstraordinare ĝuigis. Li komencis invitadi amikojn por kunumado, ĝuste kiel viva mortinto, kiu mem invitas parencojn al maldormado, por malpliigi mortotimon. Dum li laboris por siaj gastoj, al li estis malpli malfacile; li forportadis malplenajn botelojn de vino, forigadis ŝtopilojn de alportitaj boteloj, verŝadis, viŝadis per tuko tablon kiam vino elverŝiĝis; pretigadis manĝaĵojn, lavis vazojn, estis sindona kaj afabla dommastro, esperante tiel pasigi la tempon, kiu ĉion kuracas – kaj ĉesos pensi pri Una. Skribi kaj legi li ne povis, sed manlaboro, surtabligado, ekzemple, donacas al li ŝajnon, ke li vivas kaj moviĝas, ke li tamen ion faras.

Ĉu vi volas, eble, kafon? Superba ideo! Ĉu ĉiuj? Kiom, do, da kafoj? Ĉu dekkvar? Bonege! Mi foruzos duonhoron ĝis kiam akvo ekbolos. Lavado de tasetoj – okminuto. Ĉu vi volas, eble, ankoraŭ unu kafon?

Foriro por alporti skotviskion el botelŝranko, degeligo de glacio en la vujo, pretigo de glasoj, verŝado de sodakvo: dekminuto! Foriro por alporti botelon da „Grand Marnier“, pretigado de glasoj, verŝado: kvarminuto. Ve, Una! Fikfek! Forigado de glasoj! Una, Una, Una, Una, Una, Una, Una, Una, sesminuto. Malplenigado de cindrujoj: triminuto. Ĉiufoje, kiam la gastoj disiris, proksimume je noktomezo, Vida foriris en sian ĉambron por dormi, kaj la elreviĝinta Raŝiĉo foriris hejmen; la profesoro tiam ligis antaŭtukon kaj lavis monton de kaseroloj, patoj, formuoj, potoj, teleroj kaj glasoj. Li purigis per polvosuĉilo la manĝejon, balais la kuirejon, ĵetis restaĵojn en balaaĵsakon, kiun li portis sur la straton kiam iris al Stelaro, en la zen-ĉambron. Al li ŝajnis ke, ordigante sian eksloĝejon, li enportas certan ordon ankaŭ en la ĥaoson, en kiu li vivis sen Una. Li estis revenanta, perpiede, por dormi du-tri horojn, antaŭ ol matene iri prelegi, kontenta ĉar la nokton li iel foruzis. Piedirante, li lernis vivi sen Una. Paŝi, fakte kiel resaniĝanto, sed tamen, paŝi. Manĝi. Drinki sola. Spiri, dormi, ridi – tio por li estis plej malfacila.

Kiel forgesi Unan inter milo da lecionoj?

Li interparolis kun homoj, kiuj tiun sperton jam havis. Ili diris al li, ke li sukcesos, se li tion vere deziras. Tamen, li ne certis, ke li tion deziras. Plej

grave estas, diris ili, ke li neniam plu vidu tiun juninon. Se li ŝin renkontos, ĉio komenciĝos refoje. Sed li estis mislernanto! En ĉi tiun klason li sendube iros denove. Kial ŝi ankoraŭ ĝenis lin? Kiam ĉi tiu koŝmaro definitive finiĝos?

Post tri semajnoj lin kaptis terura depresio. Li mem receiptis al si kuracilon: dediĉi sin kiel eble pli al aliaj homoj, tute forgesi pri si. Li iradis hejmen regule, promenigadis sian filon. Lin estis kvietiganta la ĉeesto de la filo. Al la filo li aĉetadis donacojn, por iel kvietigi sian konsciencon, kaj kompensi la fakton, ke ili ne plu vivas kune. Tial al la filo li aĉetis ankaŭ glitilojn, kaj kondukis lin en la sketejon Taŝmajdano.

Surtirinte baŝlikon de sia vjetnama bluzo sur la kapon, li sidis sur tribunon, tuj apud la barilo de glitejo, rigardante kiel la karusela glitantaro turniĝas kaj kurbiĝas en cirkla ordo. Fojfoje iu ŝanĝis sian glitdirekton, apartiĝis el la ronda moviĝo, faris pirueton, sed jam sekvamomente denove adaptiĝis al la komuna fluo de la viva turbo. Li sentis froston pro proksimo de la glacio, soleco kaj transtomba muziko en la resonado de la glacia stadiono, pro la punkto, kiu simile al griza tolmarkezo surtiriĝis super Taŝmajdanon.

Subite (li ne kredis al propraj okuloj), li ekvidis Unan, feliĉan, nereale glitantan tuj antaŭ lia vizaĝo, tute kaj absolute ne rimarkante lin. Ŝian manon en leda ganto tenis ia admirinda, blonda junulo kun bukloj, falantaj sur lian frunton, pro kio al la profesoro ŝajnis, ke li vidas geprincojn el infanaj bildolibroj. Neĝa reĝino! En sia malpurverda bluzo li sentis sin malĝojujo, sur kiun iu, por lin tute humiligi, surŝovis ankaŭ pentokapuĉon. Jes, ĝuste tiel. Glaciiginta, li abrupte sentis sin malliberiĝinto de la jam delonge forvaporinta kaj forgesita sentimentala eduko, kiu kun senespera peno, kiel nostalgia vampiro, premis siajn terajn lipojn sur la varman, junan kolon de tute alia epoko. Sed, kvankam Una estis absolute lia, li neniam povis tiel memfide kaj leĝere ŝin gvidi post si, kiel tiu bela knabo, tute fordoninta sin al la melodio, nebulo kaj glacio. Ŝi preterglitis proksime al li kvin fojojn, eĉ ne unu fojon vidinte lin, ĉar li estis en la ombro de reflektiloj, lumigantaj la glitantojn; poste ĉio ien fornebulis, malantaŭ ŝi kaj ŝia akompananto restis nur dolora diagramo de la profesora ĵaluzo en la formo de kvar elegantaj blankaj linioj, paralele entranĉitaj en glacieron, sed ankaŭ ilin baldaŭ kovris reto de kristalaj piruetoj.

Ho Dio, endormigu min! La mateno aperu rapide. Igu, ke mi vekigu senviva. La vivo tro longe adas, la merdejo eternas...

Una decidis totale reordigi sian vivon. Kiel mi povis konsenti? Ĉio ĉi estas tute misa. Neniu rajtas devigi min fari ion tian. Kaj neniu plu, absolute neniu, regos min! Se tio estos bezonata, mi kulpigos ilin eĉ en Supera tribunalo! Je Dio! Aŭ mi ĉion rakontu al la patro? Li ja scios, kion li devas fari. Tion mi ja jam delonge devis fari. Oooooj, li mortigos min kiam li tion aŭdos. Nu, negrave!

Ŝi anoncis sian viziton al la vicdekano, kiu ŝin akceptis starante apud fenestro. Li ne proponis al ŝi sidiĝi. Ĉi-foje ŝi ricevis nek kafon, nek sukron.

– Mi ja diris al vi, ke vi ne venu ĉi tien!

Ĉi tio estas la lasta fojo, diris ŝi. Koncerne ŝin, Unan, la afero kun la profesoro Babiĉo estas finita. Ili trovu iun alian, kiu pretos plenumadi tiajn taskojn. Se li plue devigados ŝin spioni la profesoron, ŝi ĉion rakontos al sia paĉjo, kiu ankoraŭ havas konsiderindajn kontaktojn kun diversaj homoj – li ja scipovos protekti ŝin. La vicdekano silentis, kaj tiam demandis ŝin, ĉu ŝi eble, enamiĝis?

– Eĉ se mi estus enamiĝinta, tio vin ne koncernas! – diris Una spite. – Tio estas mia privata afero!

– Al mi ne plaĉas la vorto „devigadi“! – diris li. – Ni tuj klarigu tion: neniu vin devigis fari ion ajn. Ĉu en ordo?

– Mi volis diri... – balbutis Una. – Ttiu homo, kiu sidis ĉi tie...

– Kiu homo? Pri kio vi parolas?!

– Ttiu, la nigra...

– Neniu homo estis ĉi tie! – diris la vicdekano. – Ni interparolis kvarokule, kaj mi petis vin fari malgrandan komplezon.

Li ekis promeni en la kabineto kun la manoj sur la dorso:

– Ĉio ĉi estus tute nebezonata, se vi, la nuna junularo, havus almenaŭ iom da iniciatemo, kaj pensus pri la estonteco! Iomete pli de konscio. Tiam la iniciato ne devus veni desupre, sed desube, el la bazo!

– Kiu estas supre, kaj kiu estas sube? – demandis malice Una, preta kontraŭstari ĝis la fino. Sed la vicdekano ne atentis ŝian interdiron:

– Kion ja faras via studenta organizaĵo? Ĝi organizas dancvesperojn kaj ŝipajn ekskursojn al Ĝerdapo kanjono! Festojn por ekstudentoj! Ĉu iu ajn aktivulo iam ajn aŭdigis laŭte sian propran opinion? Ĉu iu ajn kontraŭis ties detruajn ideojn? Kiu! Ĉar, tio ne plu estas prelegoj, tio, kion li faras; tio estas amuz-programoj! Li transformiĝis en amuziston, kiu rakontas anekdotojn! Kio okazas kun liaj promesitaj teoriaĵoj? Tie ja mankas ia ajn sistemeco! Mankas ankaŭ liaj lernolibroj!

– Li estas, antaŭ ĉio, parola ulo! – diris Una trankvile. – Li ne ŝatas verki librojn, ĉar li timas definitivajn konkludojn, li ja estas elasta! Li diras, ke, eble, nur je la fino de onia vivo indas aperigi unu libron, tiam, kiam oni ne plu havas tempon por ion ajn ŝanĝi, kaj la vivo ĝin ne povas malkonfirmi.

– Tion vi parolu al iu alia! – laŭtigis sian voĉon la vicdekano. – Unu afero estas amuzi la amfiteatrojn per paradoksoj, kaj tute alia okupiĝi pri scienco, respekti la instruprogramon! La scienco ne estas anekdoto – ĝin oni ne devas ĉiapreze adapti al la ĉeestantaro, kaj senkritike adoptadi ideojn pri la komunikadoj, kiuj por ni estas fremdaj, kiuj konfuzas la historiajn kondiĉojn, kaj ne respektas la klasajn determiniĵojn!

- La televidiloj ĉie estas samaj – nur la programoj malsamas!
- Mi vidas, ke li ankaŭ vin sukcesis infekti per siaj ideoj.
- Vi min sendis al li!

- Ne temas pri tio! – kvietigis la atmosferon la vicdekano, sidiĝante ĉe sian tablon. – La demando estas multe pli serioza: kion vi kunportos el la Fakultato, kiam vi foriros? Memoron pri la ĉarma Babiĉo, kaj centon da ĥaosaj metaideoj, ĉu? Kiel vi adaptiĝos al nia vivo, al nia socio? Ĉu uzante liajn pseŭdospritaĵojn, kiuj estas ordinaraĉaj parafradoj de „makluanecaj“ blagoj. Kiu ja estas lia idealo? Marshall McLuhan! La filo de baptistaj gepatroj, katolika konvertito, kanada studento de la angla literaturo, eksstudento de tekniko, homo, kiu fine de sia vivo, por altaj honorarioj, amuzadis en ekskluzivaj kluboj teksasajn miliardulojn kaj pasiigintajn sufragetojn? Mi diros al vi jenon: ĉiu povas meti sin super nian realecon, kaj en ĝi trovi milionon da mankoj. Ni, cetere, neniam kaŝis niajn mankojn! Ni mem konscias ilin, ĉar ni vivas en neperfekta socio, en ĝia transira tempo. Plej facile estas faradi rimarkojn. Kritiki! Sed nek li, nek liaj amikoj havas ian ajn solvon! Ili ne vidas elirejon! Ili estas intelektaj apaĉoj! Kion ili faras? Dum la tuta vivo ili malice ridetas kaj parolas: „Ni sciis tion delonge!“ Kion, damne, ili sciis? Batali nur por si mem, gardi nur proprajn pugnojn! Dum mi estis organizanta laborbrigadojn, konstruiganta digojn kaj faranta fervojliniojn, per kiuj tiuj blatuloj poste veturos en dormvagonoj – dum mi laboregis kaj dormis sub tendoj, tiuj sinjoroj sukcesis doktoriĝi! Ĉar, ne forgesu: ni ne ĉiuj startis de la sama pozicio! Kiam mi unuafoje surpaŝis asfaltan, s-joro Babiĉo jam elokventis en la franca lingvo, sciis por kio oni uzas ĉiun forkospecon! Unuafoje mi ekvidis eksterlandon, kiam mi havis tridek jarojn! Hej, tridek! Kaj dum ni batalis por ricevi ĉi tiun konstruaĵon, por ekipi ĝin per ĉiuj bezonataj mebloj kaj lerniloj, por ebligi hejtadon, intermanĝon por studentoj, monon, kreditojn, studentejoj, por presigi lernolibrojn, kion li estis faranta? Li vagaĉis tra kongresejoj, de New York, ĝis Bangkok; akirante influhavajn konatulojn, li enŝovadis sin en listojn de internaciaj diskutforumoj, dum kiuj li superece kaj sprite menciadis nian eksperimenton. Li ja estus neniom interesa al iu ajn, se ni en la kvardek unua jaro ne dirus „ne!“, se ni en la kvardek oka jaro ne dirus „ne!“ – se ni ne estus senĉese en la mondfokuso, se ni ne estus verŝintaj nian sangon, por ke s-joro Babiĉo el ĉio ĉi tio povu konstrui siajn falsistemojn!

La vicdekano ekscitiĝis; lia sindeteno krevis antaŭ la torento de malnovaj konfliktoj:

- Kion ili volas? – nun li preskaŭ kriis. – Ili volas regi! Sed kion ili farus, se ili ekregus? Ĉu vi scias kion? Tio estus la plej malbona ebla regantaro en la mondo! Jes, regado de universitataj profesoroj! Tion mi povas senhezite diri, ĉar ankaŭ mi estas instruisto en fakultato. Ĉar, se ankoraŭ ekzistas absolutistoj,

tio estas la profesoroj, kredu al miaj vortoj! Ili estas absolutaj sciestroj! „Ho profesoro, vi donis al mi la noton 'ses', kvankam mi meritis la noton 'dek'!“ Vi meritis la noton „dek“, ĉu? Ĉu vi aŭdis lin? Ĉu li meritas la noton „dek“? Ni kontrolu, ĉu vi meritas la noton „dek“, ĉu bone? Jen demando. Kion? Ĉu vi ne scias? Vi eĉ la noton „ses“ ne meritas! Jen, al vi la noto „kvin“, kaj vi bonvolu veni al la septembra ekzameno! Jes, iliaj decidoj ne estas korekteblaj. Ili ne alkutimiĝis al ia ajn kritiko. Ili estas la plej saĝaj, kaj ĉiuj aliaj estas trionkleraj stultuloj! Ĉiuj! Kaj ĉu nu do devas al ili cedi la regadon? Neniam. Neniom!

– Sed vi, onidire, estis la plej bonaj amikoj?

– Jes ni estis, sed ĉu vi scias, pro kio? Ĉar tiu franca sinjoreto dum la tuta vivo bezonis iun, kiu lin admiras, kiu akompanos lin kiel ombro! Iun, kiu lin senĉese aprobas! Ĉiuj malhandikapoj por li estus senvaloraj sen apuda fascinita kampuleto! Tamen, ĉio ĉi tio neniom rilatas ĉi tiun agon! Mi simple ne volas permesi, ke ĉi tiu fakultato transformiĝu en diskuttribunon, en ian anrahiliberalan debatklubon, nur dio scias en kion! Ĉar ni scias, kion tio sekvigos – novan sesdek okan jaron!

– Nu, mi nun foriros! – diris Unu. – Al mi estis tre agrable iom interbabili kun vi...

– Kiam mi ricevos novan raporton?

– Neniam. Neniajn raportojn mi plu faros!

La vicdekano estis traserĉanta dokumentojn:

– Ĉu vi vere tion firme decidis? – diris li, ne rigardante ŝin rekte en la okulojn.

– Jes, firme.

– Bone, estu kiel vi volas! – diris li. – Mi nur bedaŭras, ke ni devos montri al Babiĉo tiujn viajn antaŭajn raportojn...

– Ili estas tajpitaj kaj nesubskribitaj! – ekridetis Unu, fiera, ĉar ŝi estis sufiĉe saĝa, kaj nenion skribis permane.

– Vi pravas! Sed en ili estas sufiĉe da detaloj, kiujn nur vi povis ekscii. Vi lin perdos ĉiuokaze, kiam li ekscios, ke vi lin tutatempe denunciadis...

Ŝi denove estis pata. Nek tien, nek ĉi tien. Ĉi tiu vivo vere estas diable aĉega. Ili staris kaj rigardis unu la alian rekte en la okulojn.

– Mi havas pli bonan proponon... – diris la vicdekano, lasinte Unan certan tempon suferi. – Mi promesas al vi, ke mi estos justa rilate al vi. Kiam li estos forlasinta Fakultaton, via tasko estos finita. Definitive forgesita! Neniu iam ajn ekscios, ke vi estis helpanta min. Li certe ne ekscios. Al mi estas egale ĉu vi tiam restos porĉiame kune, ĉu vi geedziĝos, kaj kion vi poste faros... Mi bezonas nur pruvojn pri lia malutila aktiveco ĉi tie, nenion plu! Privataj aferoj inter vi kaj li min ne interesas.

– Kiajn pruvojn? Li nenion tiasencan faras...

– Ne vi devas fari tiajn konkludojn! Tio, kio al vi ŝajnas negrava, por mi povas esti tre utila. Nu, estu saĝa! – li ĉirkaŭiris la tablon, kaj aprobe fraptuŝetis ŝian ŝultron. – Eltenu ankoraŭ iome! Kiam li estos foririnta de ĉi tie, li estos nur via.

– Kion pri la studentoj? Ĉu vi pensas, ke liaj studentoj permesos, ke li simple foriru?

– Studentoj, ĉu? Ili forgesos lin post du semajnoj! Cetere, ili alvenas kaj foriras. Sed ni restas ĉi tie!

Una forturniĝis sur la kalkano, kaj ekiris al la pordo.

– Hej! – alvokis ŝin la vicdekano. – Vi sendube opinias, ke mi estas terure malbona homo, ĉu?

– Mi jes opinias tion!

– Vi eraras. Mi ne estas pli malbona ol la aliaj... – diris li. Kaj la raportojn skribu pli konkrete! Lastatempe viaj raportoj estas iomete sencomankaj...

Pluvo estis glaciiganta sur la trotuaro.

Post kelkaj dormomankaj noktoj, pasigitaj en koŝmaro, la profesoro dum la tuta tago ne ellitiĝis en la zen-ĉambro, en kiun kvazaŭ estus falinta bombo. Je la kvina horo posttagmeze lin el duondormo vekis malbrua gratado sur la pordo. Li ne leviĝis, sed la karakteriza gratado ripetiĝis. Revenis la vaganta kato kaj, pli bela ol iam ajn, staris antaŭ li, tenante ĝojradie en la sino du botelojn de „Blanka Pinoto“ kaj malsekan sakon, el kiu estis elfalantaj ĉokoladoj, ternuksoj, migdaloj, aveloj, sekvinberoj, figoj kaj nova, neelpakita dentobroso.

– Do, vi min tamen iomete amas? – balbutis la profesoro starante nudpieda en la antaŭĉambro.

– Mi adoras vin, ho ventkapulo! – respondis Una, kaj deĵetis ŝuojn desur la piedoj.

– Turniĝu, dolĉulino!

Apogante sin sur la genuojn kaj kubutojn, Una al li ĉarme proponis sian brunhaŭtan korpon, samkiel oni proponas cidonion aŭ piron, kaj li per ununura movo, senhezite, eniĝis profunde en ŝin, subtenante atente ŝiajn femurojn per siaj manplatoj.

– Atendu... – la profesoro haltigis la knabinon, kiu estis karesanta lin. – Mi volas vidi!

Tio estis unu el la frenezaj noktoj, kiam ĉio estas ebla. Post la vespermanĝo en ĵurnalista-klubo, postkiam ili vizitis ankoraŭ kelkajn kafejojn kaj restoraciojn, kiuj unu post la alia estis surtabligantaj la seĝojn, la mastroj invitis ilin kundrinki en fotografista laborejo, en subtegmento de konstruaĵo ĉe la fino de „Bulvardo de Revolucio“. Desur la muroj de vasta, preskaŭ malplena ateliero, estis malvolviĝantaj finosenaj rulvolvaĵoj de kolorigita papero. Ĉar en la ejo ne estis mebloj, ĉiuj kuŝiĝis sur molan blankan teksaĵplankon, sub arbaron el stativoj kaj

reflektiloj. La fotografisto, cetere, tiutage finis serion da portretoj de Miŝelo por foto-monografio *Personoj*; sur ili la profesoro havis aspekton de mistika profeto, kies vizaĝon tute umis la zorgo pri la homaro. Ili drinkis vinon kaj aŭskultis bendojn de la grupo „Chic“. Post certa tempo, la knabinoj helpis unu al la alia demeti la botojn, kaj ili komencis danci nudpiedaj. En unu momento, la ekzaltita Una ekkisis Milan – rufharan foto-modelon kun abunda brusto, kaj kun knabaj koksoj. Ili ambaŭ konfuziĝis pro tiu subita intimeco, kiu ilin trafis nepretajn. Tamen, la sekvanta kiso ne plu havis la prudecon de la unua: liberiĝintaj, ili per la lipoj ensorbadis unu la alian... „Ĉu tio estas ŝia vera personeco?“ – demandis sin la profesoro, rigardante tute nekonatan, ardiĝintan Unan, kiu glutis Milan per siaj buŝo, dentoj kaj okuloj – „Kaj eble ĉiuj niaj malkonsentoj aperis, fakte, ĉar mi ne ĝis la fino malkovris la kaŝitajn pasejojn al ŝia bridata fantazio?“ Li rememoris la esplorojn de Kinzio<sup>14</sup> pri la procento de lesbaj impulsoj en ĉiu virino; kial rezisti, se ili jam ekzistas? En ĉi tiu momento, dum la fingroj de Una karesis la kolon de la knabino, vekiĝas ĝis tiam nekonata parto de ŝia personeco, dum longa tempo subpremata, la neestingita deziro akapari inajn karesojn, kiujn ŝi perdis kiam ŝi ilin plej multe bezonis. Venkas tio, kio estas nekonata!

Brakumante unu la alian ĉirkaŭ la talioj, la knabinoj foriris en banĉambron por duŝi sin. Rigardante iliajn luliĝantajn postaĵojn, Miŝelo mense diris, ke ĉi tiun komponaĵon oni vere povus nomi „Naskiĝo de lesbo“! La fotografisto, kompreneble, pensis pri Davido Hamiltono. La samaĝulo de la profesoro, evidente jam delonge akceptinta perversemon de siaj modeloj, kiuj dum multaj jaroj defilis tra ĉi tiu ateliero, decidis ebriiĝi, kaj tiamaniere celebri la finon de sia laboro. – Nun ni konjakumos! – diris li al la profesoro. – La konjako ja troviĝas en la kuirejo. Sed kredu min, mi eĉ ne unu movon povas fari... – Serĉante botelon sur bretoj, Miŝelo fiksaŭskultis la bruon de akvo, kaj ridon, kiuj aŭdiĝis el la duonfermita banĉambro. – Kial ni bezonas virojn? – Una estis konvinkanta sian novan amikinson. – Ho, ni ilin jesbezonas! – ridis tiu. Ili aperis elsub akvo, similaj al bedueninoj, viglaj kaj volvitaj de la kapoj ĝis la kalkanoj en blankajn littukojn. Una tute malstreĉiĝis. Post kiam la fotografisto liberigis sian litamikinson de la blankaĵo, kvazaŭ vidigante maloftan kaj grandvaloran donacon, mem perpleksega pro ĝia enhavo, Una kisis ŝian mamon. – Imagu – diris ŝi – vi estas la unua virino, post mia patrino, kies mameton mi kisas! – Ankaŭ ŝi elglitis el sia littuko, kaj sidiĝis flirteme, prenante la pozon de lotusa floro. La fotografisto malaperis en la banĉambro, kaj post ia tempo eliris kun viŝtuko ligita ĉirkaŭ la talio. – Kion vi atendas? – demandis Mila la profesoron. Vere, li sentis sin

14 Alfred Kinsey (1894–1956) – fama usona seksologo kiufaristeorian revolucionen la kampo de homajseksrilatoj. Post liamorto, liajnideojnpluedisvolvis la geedzoj William Masters (1915–2001) kaj Virginia Johnson (1925–2013).

pli ol iom ridinda, komplete vestita inter ili. Ili helpis al li senvestiĝi, tuŝante lin per la fingroj atente kaj singarde – tio ja estis ia variaĵo de kontakt-terapio, dum kiu oni per la unuaj, hontemaj tuŝoj degeligas la malnovajn bremsojn, kiuj onin separigis de la aliaj homaj estaĵoj. La du viroj brakumis la taliojn de siajn litamikinoj, tenis ilin same kiel per mallongaj rimenoj oni tenas duonsovaĝajn, grandvalorajn bestojn, antaŭ ol tiuj forŝiriĝos kaj ĵetiĝos unu kontraŭ la alia. Kaj vere, tuj kiam ili estis lasitaj, la knabinoj pasie kaptis unu la alian. La nigra hararo de Una tapiŝis la ventron de la alia knabino.

– Kiu el ni du nun viras? – ŝi levis la okulojn kun malklarigita rigardo.  
– Mi aŭ ŝi?

Vi, ho fiulino! Ĝuste tion vi deĉiame deziris, sed ne aŭdacis konfesi al si mem! Adiaŭ, Una! Adiaŭ, etulino kara!

Mila, al kiu, ŝajne, tedis la senfrukta karesado sen la klasika dura rezulto, eltiriĝis angile el la brakumo de Una, kaj ĉirkaŭprenis per surpriza forto la korpon de la profesoro per siaj kruroj. En la malkontinua psikedela iluminado, kiun funkciigis la fotografisto, kaj „Chic“ sonoj, la korpobulo komencis implikiĝi kaj malvolviĝi en rozebrune, hara-glata kirliĝo, kiu odoris je ĵus elfumita mariĥuano. Muskoloj kaj rondaĵoj, ŝvito, gingivoj kaj mallongaj flankmordoj, volupte ombrumitaj kaŝataj lokoj, simbolo grandigintaj pro subita apudeco – ĉio ĉi tio miksiĝis, unuiĝis, drivis, lekis, snufis, mordis kaj karesis, implikiĝante en sin mem, kaj en la aliajn; en longa, trolonga brakumo de la du geoj, kiuj, sen ia ajn aparta pretiĝo kaj interkonsento, denove sinkis en intimecon en la freneza, vibra lumo, kaŝanta kaj malkaŝanta fulmobrile ŝanĝitajn regionojn de obscenaj revoj.

Kvankam li multajn fojojn aŭskultis pri similaj seancoj (kompreneble, ne kredante plene je ilia aŭtentikeco), kvankam li dudekon da fojoj rigardis porno-filmojn, kiuj lin ĉiam iom naŭzis, la profesoro ĉi tion spertis unuafoje en sia vivo. Li estis absolute paralizita pro la novaj dimensioj de la gajega Una, kiu sin en ĉi tiu situacio, ŝajne, sentis perfekte, elpensante senĉese novajn pozojn kaj kombinaĵojn („Nun vi ĉi tiel, kaj vi venu tien!“), sed ankaŭ pro la simpleco de la libero en la komplete nudigita amo, kiu tute kaj absolute kopiis liajn la plej kaŝitajn revojn. Ho Dio, kiel ĉio ĉi estas perfekte simpla! Pura, blanka spaco, en kiu amoras kvar korpoj! Kiom multe ni fantazias pri tio, sed kiel malfacile ni decidus fari ion similan. Verdire, por tion efektiviĝi, devis renkontiĝi kvar personoj, kiujn interligas fido; tio devas esti personoj, kiuj eĉ en unu momenton, negrave kion ili faras, ne transiras la limon de vulgareco. Kaj eĉ se oni ne retiriĝas, oni tamen respektas moralecon, oni esperas, ke je la fino oni ne malkovros sovaĝulon en si kaj en la aliaj.

Li akceptadis nekoncentrite kisojn kaj tuŝojn de Mila, kaŝobservante tutatempe Unan kaj la fotografiston, kiuj, ŝajne, bone amuziĝis; kvankam,

juĝante laŭ ekbrilo de malrektaj rigardoj de Una, ŝin multe pli interesis amorado kun la parulino de la profesoro.

– Turniĝu, dolĉulino!

Jen, finfine, la vidaĵo, kiu lin definitive liberigos de ĵaluzo! Ĉu tio estas ĉio? Tiu regula, ritma moviĝo de la korpo antaŭen-malantaŭen, tiu spasmospirado; fremdaj manojn sur la koksoj de la knabino kiun li adoras, kaj ŝia sklava, humiliĝa pozicio sur la genuoj kaj kubutoj; ĉu tio estas absolute ĉio? Ĉu ne ekzistas io, pro kio oni freneziĝas fantaziante? Nun tio estas, jen, tie, duonmetron de li, kaj finfine li ne devas turmenti la lacigitan fantazon, elpensante novajn amorpozon, okulesprimojn, malkontinuaĵn, spiregantajn frazojn („Atentu, ne enen; hodiaŭ estas mia danĝertago!“) – tio, simple, ŝajnas ĝuste tiel, kiel aspektas; ĝuste tiel, kaj en tio estas nenio hida, nenio nenatura. Jes, ĝuste tiel!

Una mankaptis Miŝelon: ŝi alrigardis lin el nebula distanco, kvazaŭ apenaŭ rekonante lin malantaŭ la kurteno de io nedireble agrabla kaj doloriga en la sama tempo, kaj poste ĝin komplice premis, dum ŝia lumbo ankoraŭ moviĝis en la sama regula, kirla ritmo, dum la muskula viro penetradis pli kaj pli profunde en ŝin per sia varmega borilo.

Meze de tiu pruda malĉastado, la profesoro sentis, ke li liberiĝas de posedamo. Milan li ekposedis malvolonte, nur por plenumi la farendaĵon, kaj tiel konfirmi sian partoprenon en la komuna ludo. Komplete elĉerpitaj, ili falegis samtempe, ĉiuj kvar, post longedaŭra orgasmo.

Halt! Una haltigis „Sony“.

Ili vestiĝis, malplenigis ankoraŭ po unu glason da drinkaĵo, konsentinte ke, kvankam la tuta okazaĵo estis vere mirinda, ne indas insisti pri ĝia ripeto, por ke la tuta okazintaĵo ne transformiĝu en iaspecan perversan kutimiĝon, kiu malakrigos ilian deziron praktiki naturan amon. Okazis tio, kio okazis, estis bele, ĉar okazis sen iaj ajn pretigoj, tute spontanee kaj pure!

Ili taksiiis:

– „Vi ja estas, fakte, vera filistro! – diris Una, observante la streĉitan, pensodronan vizaĝon de la profesoro. – Vi revis pri ĉi tio same kiel ni ĉiuj, sed nun, kiam tio vere okazis, vi sentas konscienriproĉon; vi ektimis, ĉu ne?“

– Ĉu al vi ne estas klare, – replikis li – ke oni ĉi tion aŭ postvivas, aŭ tio malfeliĝigas onin por la tuta vivo?

– Nu, kion do vi decidis?

– Postvivi!


Ili neniam plu menciis tiun frenezan nokton. Nur unu fojon, dezirante reaŭskulti iun alian bendon, ili hazarde aŭdis la frazon: „Turniĝu, dolĉulino!“ kaj amoris, ekscititaj kiel neniam antaŭe. La profesoro estis fotografisto, kaj Una estis Mila.



„... Leon K. Tobey – 838.6789 674. Madison Ave. New York. 100022.  
Eduard Nilsen (031) 684487 Antwerpen. Belgie.  
Ibrahim Waziri 651.224 Victoria Is-Lagos  
C. U.N.Y. Graduate Center, 33 West 42nd Street. N.Y. **790.4635**.  
Prof. Haig. 10Bruxelles, Rue des Dominicains 02.677.38.97.  
Prof. Denitch, Perth, 335.6769.  
Mauricio Parella, Via Parmigianino 14. Milano. 469988. Lary Benson.  
Foreign Press Center (212) 826.4722.  
Prof. Ruth Fischer, Marktgasse 13.8001, Zurich. 061.32 82 84  
R.B. Hammer. Riebetli Siebeneich, CH.6064 Kerns/ow.66 25 05  
Studio International Group, Massachusetts USA. **617.354.0407**.  
Carlo Sher. 28 Soi 61. Sukhumvit Road, Bangkok. 391.9090/1.  
Boris. Republica de Venezuela. Comision de Resursos Naturales  
657.578. Caracas.  
D. Kosovich M.D.F.A.A. p. 3Mercer St. Apt.31 D. New York 10003  
982.4304.780.3491.

Mrs. M.Baragagno. 245 East 63 Street. 37.31.592.  
Tatjana Duggelin. Boutik „Vivaldi“ 734.2739.  
Lozich Zo-Zo 45. Rue D'Alesia. Paris. 588.8851  
Shery Goodman. 36. Rue Du Bac. Paris. 7.261.2855. Beba. 345. East  
65 Street. 379.9842. Cecil.  
Francine Bergman. 476.8942.  
Prof. Spaack. Cambridge. Massachusetts 02138.59. Church Street.  
354.0407 (USA)  
F. Terrence Frankenhalter, Washington. 897.6398.  
Prof. Lee. Bronx. 3606672 aũ 3.  
Lucy Foonegen. United Nations Building. Room 480.754.6152.  
Elizabeth K. 215 Kings Road, London. 8W3.567.9011.  
Thomas Gibbson, Fine Art. 9. A. Bond Street. London. W 1  
Y.499.9876  
Olaf Petersen. Majorsgatan 9. Sweden. Goteborg. 345.2019...“  
(El la raporto de Una)

„Pardonu, amato mia!Una.“



Li estis kvazaŭ perdita du tagojn sen sia malnova, eluzita telefona notkajero, sed poste, kiam li jam rezignis serĉi ĝin, li trovis la kajeron sub kuireja tablo. Verŝajne ĝi tien hazarde falis el lia poŝo.

Jam venis la lasta momento, ke mi tiujn numerojn reskribu en novan kajereton. Ĉi tiu jam komplete eluziĝis. Folioj deiĝis de la kovrilo, telefonoj kaj nomoj iĝis nelegeblaj; ili troviĝis unu superla alia, skribaĉitaj kaj senordaj... Du tagojn mi estis for de la mondo. Jam dum longa tempo al mi neniu telefonis, sed min tamen kvietigas la sento, ke mi povas telefoni al aliaj. Sen ĉi tiu notkajero mi perdus kontakton kun miaj amikoj. Mi eĉ ne unu numeron scias parkere. Okazas, ke mi nur penplene sukcesas rememori eĉ mian propran numeron. Pri la adresoj eĉ paroli ne indas!

Ĉu nur pro maldiligenteco, superstiĉo aŭ sentimentaleco mi ne disiĝis de tiu malgranda telefona biblio, kvankam en tirkestoj mi havas ne malpli ol dek kvin multe pli belajn notkajerojn, binditajn en maroka ledo, kun orgravuraĵo, kiujn de antaŭ multaj jaroj oni donacas al mi por miaj naskiĝtagoj. Tamen, eĉ ne unu el ili estas kiel ĉi tiu malnova notkajero, kiu hejmiĝis en mia poŝo, kaj sur mia manplato. Se mi transskribos la numerojn en novan notkajeron,

mi devos porĉiame rezigni kelkajn karajn nomojn kaj adresojn, kvankam mi jam dum longa tempo tiujn numerojn ne uzis, aŭ neniu respondis kiam mi turnis la telefondiskon.

167-986 kuŝas en la Centra tombejo, profunde, profundaĉe sub la tero. Li ankoraŭ vivas nur en mia notkajero. Li vivos ĝis kiam mi lin ĉiutage vidos sub la litero M., kiam mi foliumas ĉi tiujn paĝojn. Lia edzino reedziniĝis. Nekrologoj forgesitaj en malnovaj aroj da gazetoj. Kiu ja hodiaŭ parolas en lian aŭskultilon? Ĉu almenaŭ ŝi memoras lian spiron? Al kiu ja nun apartenas tiu numero, kiun nekonataj damoj diskis en noktomezo, por aŭdigi al li iun muzikdiskon, anstatŭ diri „bonan nokton“? Se mi ĝin ne transskribos, li porĉiame ĉesos ekzisti.

338-987. Naturdotita, bela, sprita kaj eleganta. Kiam lin ĉio naŭzis, li transloĝiĝis en Venezuelon, Maracaibo. Li sukcese komercas per nafto. Kiam ĉiuj endormiĝas, li aŭskultas mallaŭte muzikdiskojn kun Dragaĉevaj trumpetistoj, kaj drinkas sola en sia tagĉambro, apud baseno, en kiu naĝas du malgrandaj aligatoroj. Liaj infanoj ne parolas serbe.

389-555. Mi traveturis tiun urbon, kiu iam por mi multon signifis. Tie mi sentis nerezisteblan bezonon aŭdi ŝian voĉon, je la kvara posttagmeze mi diskis ĉi tiun numeron. La telefono sonoris du fojojn. Post tio mi aŭdis: „Jeeeeees! Jeeeeees! Mi aŭskultas!“ Mi, konsternita, mallevis la aŭskultilon. Post tiom da jaroj, ŝia voĉo ankoraŭ sonis imprese.

453-280, 654-459, 654-458, interna numero 176. En la tempo kiam ni kunumis, mi telefonis el publikaj telefonejoj, sed nun li havas tri telefonojn kaj sekretarion, kaj malgraŭ tio lin neniu povas kontakti, sendepende de tio, kiom longe oni sonoras. Bedaŭrinde! Oni devas atendi, ke li perdu la postenon. Tiam li, probable, denove havos tempon por siaj malnovaj amikoj.

697-2453, Parizo. De kiam ŝi spertis malfeliĉan amon, ŝi ne plu somerumas en Dubrovniko. Ŝi veturas en Maŭricion, sur Sejŝelojn, sur Kanariojn, portante ĉien kun si la iaman ofendon, kiel nevideblan etikedon sur sia kofro.

621-756, mi ĝin diskis tiun someron, kiam Beogrado estis larmige malplena kaj dezerta. Mi volis nur, ke ni sidiĝu en iu ĝardeno, sub tilio, kaj englutu po unu glasegon da biero, kiel ni faris iam. „Ŝi edziniĝis!“ – diris ŝia patrino ofendite. Kion do? Ŝi ne plu loĝas ĉi tie, kiu telefonas? Malnova amiko...

Neniu, ŝajne, nun loĝas ĉi tie!

737-1578, Manhattan. Angulo de la Sepdek dua strato kaj Tria avenuo. Monty Silver, kromnomata Lucky, enmanigas ĉiun nokton ledan ujon kun saksofono, kaj vizitas lokojn, kie oni muzikas ĝazon. Tiu aferhomo delonge ĉesis okupiĝi pri muziko, sed io lin devigas vizitadi kafejojn en Green Village. En multaj lokoj oni lin ne plu konas; la muzikistoj estas buboj, ili nun muzikas en tute alia maniero, kiu al li ŝajnas fremda. Sed kelkloke li ankoraŭ renkontas

maljunajn pianistojn, kiuj muzikis kun Billy Holliday, Roy Eldridge kaj Max Kaminski; tiujn kiujn ili memoras el iliaj gloraj tagoj. Ili invitas lin aliĝi al ili, kaj post ĉiu lia solkanto ili ĝojkrias entuziasme: „Yes, man! Yes, man!“ Ili komencas kun „On the Sunny Side of the Street“, kaj finas kun „Stormy Monday“. Ili drinkas bieron, kaj piedbatas ladskatolojn revenante hejmen.

569-105 Amoro posttagmeze.

(408) 292-1361, San Francisco. Li retiriĝis en malnovan konstruaĵon sur Giradelli skvaro kaj, kiel maljuna lupo, forlasita de sia grego, atendas morton. Mi vin volonte vidus, diris li lastafoje, kiam mi al li telefonis, sed estos pli bone, ke vi ne venu! Ĉi tio ne plu estas mi!

018-987. Mi ne povas diri al vi telefone! Kial? Mian telefonnumeron oni subaŭskultas...

02-51-1376. Bruxelles. Restaurant Slave „La Vieille Serbie“. La posedantino aperis en la profundo dela halo en longa nigra robo, kun cigaredo en ingo el arĝento: „Nu, kio okazas en Beogrado?“ En la kvindekaj jaroj oni ŝin nomis „nigra damo de la serba poezio“. En la komenco ŝi laboris kiel kudristino, sed poste malfermis krakmanĝejon, prosperis kaj malfermis ekskluzivan restoracion en gastronomia urboparto. Ŝi demandadis pri la poetoj, kun kiuj ŝi iam trinkis en „Preŝernova kleti“. Kion li faras? Li mortigis sin. Monumenton li havas. Ĉu eblas? Kion pri tiu malgranda Montenegrano? La infanoj legas liajn verkojn en legolibroj. Kion faras tiu alia? Tiu porkido. Li ĉiam estis porkido – tio min ne mirigas!

„Jes, ĉi tio estas 326-884. Mi petas elparoli mesaĝon, daŭranta ne pli ol tridek sekundojn. Komencu paroli kiam finiĝos la tria sonsignalo. Dankon!“ Tiiiiii! Tiiiiii! Taaaaa... Tamen, mi ne sentas bezonon diri ian ajn mesaĝon; mi nur deziris iomete interparoli. Nur. Mi ja nenion scipovas diri dum tridek sekundoj. Cetere, kiel mi interparolu kun aŭtomato?

538-1558. Domenico. La ano de la gildo de la Antverpenaj juvelistoj. En la internaj poŝoj de sia jako li portas kartonojn kun diamantoj valorantaj kiel fabela riĉaĵo. Li trinkas malmultekostan mozelvinon el altaj verdaj glasoj kaj ludas blovharmonikon nomatan „pikolo“. Lia patro mortis kiel ministro.

22-109. Li sin okupis pri poezio kaj filozofio, sed devis interrompi la studadon, kaj reveni en sian eturbon, por esti kun la patrino. Vespere ili kune sidis en la korto, kiun kovris blankaj rulŝtonoj, kaj aŭskultis radiodissendon. Li tempaltempe parolis pri iu, kiu ĝuste tiumomente estis parolanta: „Ankaŭ lin mi konis...“

326-884. „Bedaŭrinde, la numero ne respondas! Ĉu mi retelefonu?“ Dankon, nebezonate...

343-536. Una. La amĉifro.

Jam estas la lasta momento, ke mi reskribu ĉi tiujn numerojn en novan notkajeron!



Post promocio de la libro *Ontologio de agresemo*, kiun verkis malnova amiko de Miŝelo, la sociologo d-ro Vardo, Miŝelo iris saluti la festanton. Vardo donacis al Una sian la plej novan verkon kun pordediĉa surskribo:

– Via filino vere tre kreskis! – diris la profesoro. – Ho Dio, kiel rapide pasas jaroj! Mi konas ŝin dekiam ŝi estis, jen, ĉi tioma! Sed nun vi sendube estas eĉ pli alta ol via panjo! Kion vi studas?!

– Amaskomunikilojn... – respondis Una, penplene bridante ridon.

– Ho, do, jen: vi iras laŭ la vojo de via paĉjo... – la doktoro Vardo aprobe fraptuŝetis ŝin. – Nu, salutu la samdomanojn, kaj dankon ĉar vi alvenis!

„... P. diris pri V., ke V. estas sociologo, fama en la tuta Eŭropo, sed ankaŭ kromdiris, ke V. estas terure naiva, kiam temas pri liaj propraj aferoj. Kvankam la promocion ĉeestis multaj gravaj homoj, P. asertis ke ili ĉiuj alvenis pro senpaga ekzemplero, kaj senpaga drinkaĵo, ke neniu el ili skribos ununuran frazon pri tiu libro. Ili ĝin simple prisilentos, tio ja estas malnova mekaniismo, ĉar per atakoj oni nur grandigus ĝian publikecon. V. do ne iĝos viktimo, kvankam al li tio pleje plaĉus, pro eblaj tradukoj en Okcidento. Orienton ne interesas tiaj aferoj. Ĉio finiĝis kun ordinara koktelo, dum kiu la disidentoj

pruvis, ke ili ankoraŭ vivas, al tiuj, kiuj alvenis por vidi ilin propraokule. La libro post unu-du semajnoj estos tute forgesita, kaj kiam post kvindek jaroj iu ĝin trovos – ĝi estos jam eksinteresa! Batis, rebatis, neni profitis. Eĉ se ĉiuj montrofenestroj estus plenaj da libroj de V., ankaŭ tiam ilin neni aĉetus, ĉar la ordinaraj homoj legas nur stultaĵojn, se ili, la anoj de unu el la plej malkleraj popoloj en Eŭropo, ion ajn legas. Aliaj sociologoj tralegos la verkon de V. por trovi lian malkonsekvencon kaj erarojn, do la tuta afero denove restos en tiu malmultehoma familio. „Fojfoje mi vere demandas min por kiu mi skribas, por kiu mi parolas? Kiu tion, do, bezonas?“ (El raporto de Una)



Tio okazis sur la rivero Savao, sur ankrumita barĝo, en la unua semajno de aprilo, kiam oni festas la komencon de velsezono. Ĉirkaŭ la barĝo svarmis ŝipoj kun mallevitaj veloj. La profesoro kaj Una, kiun sur Savaon alvokis kelkaj ŝiaj buboj, pasigis agrablan kaj kvietan tagon, rigardante super vinglasoj la printempan riveron. De ie aperis ankaŭ du ciganoj – muzikantoj, en longa, nigra longboato. La pli aĝa, kiu nomiĝis Karuzo, kantis antaŭmilitan ŝlagron obtuzbaritone, akompanante sin per gitaro. Ĉiuj aliĝis: iuj, ĉar la kanto al ili vere plaĉis, sed plimulto – por ridindigi lian patoson:

*„Ni – infanoj de grandurbo,  
En mansardo paradizis,  
Sed okazis vivperturbo,  
Nian ĝuon paralizis...  
La mansardo – etloĝejo;  
Sur la strato – mallumejo!  
Murhorloĝo ade krakas,  
Sur la muro ĝi tiktakas!  
Tra fenestro luno brilas,*

*Kion volas la noktulo?  
Sur mansardo ni azilas,  
Ni geĝuas sur insulo...*

La profesoro sciegis: neniel li povis permesi al si, ke Una lin ankoraŭ unu fojon forlasu. Li ne estis certa, ke li eltenos, se li ankoraŭ unu fojon estos eksponita al tia sufero. Timigis lin la koŝmara vivo sen Una, li kiel malsanulo, ĵus trasuferinta teruran malsanon, timis, ke tio revenos, kaj lin enlitigos. La sufero lin humiligis. Nun ja ne temis pri edzeco, kariero, aŭ socia reputacio – investita estis lia tuta vivo, la profesoro ja nun timis perdi ĝin. Li devis, do, anticipi malebligi denovan falon en tiun lumomankan profundujon. Li mem receptis al si terapion: nepre trovi inon, kiu elpremos Unan el lia koro. Dum la tuta tempo, kiam li estis kun Una, li tute ne atentis iun ajn alian knabinon, kaj tio, probable, estis lia la plej granda eraro. Li ekkredis, ke Una estas, vere, *ununura*. La ebriuloj ja, jam la unuan matenon post diboĉado, ĉesigas la postebrion per alia ebriigaĵo! Oni elbatas kojnon per kojno! Li ekis panike sondi stratojn, placojn, kunvenejojn, amfiteatron en kiu li prelegis, trolebusojn kaj kafejetojn, esperante renkonti knabinon, kiu al li helpos forgesi Unan. Kaj jen, al li ekŝajnis, finfine, ke li ŝin trovis sur Savaa barĝo: ŝi sidis transe de li, kaj tempaltempe alrigardis lin kun rideto en kiu, diference de la rideto de Una, videblis konstanta boneco. Ŝi havis helbrunan, preskaŭ oran hararon, kaj ĉarman, tolereman esprimon sur la vizaĝo. Lian alrigardon ŝi elportis kun milda enuo kaj komprenemo. Strange, ŝi multe similis lian edzinon, Vidan, el la tempo kiam ili ĵus konatiĝis. Eleganta supereco, kontrolata mildeco. Lin nervozigis la posedema esprim-movo de ŝia akompananto, remisto, kiu nekoncentrite tenis sian manon sur la ŝultro de tiu knabino, ĉirkaŭbarante ŝin kiel terpecon, sur kiu li intencas esti domon, infanojn, fruktoĝardenon, sian estontecon... Al la profesoro, rigardanta tra la arbaro el vinaj boteloj, ŝajnis, ke ĝuste ŝi estas tiu knabino, kiu povas venki Unan per sia kvieto, sed ankaŭ per la plej grava armilo de Una – aĝo, ĉar, evidente, ŝi estis eĉ pli juna ol Una.

Bedaŭrinde ŝi ne estis sola! Sed kaŝita senespero de laciĝinta naĝanto, kiun senhelpe portis la vortico de Una, donis al li nespertitan ĝis tiam arogantecon. Li etendis la kruron, kaj per tenisŝuo tuŝis la piedon de la knabino. Sian piedon ŝi ne flankenigis. Ŝi lin alrigardis, en ŝia rigardo videblis kaj scivolemo kaj flirtemo kaj singardemo. Venkis, ŝajne, scivolemo. En la momento, kiam ĉiuj kantas kun Karuzo, la knabino eltiris arĝentan „cross“ – krajonon kaj skribis sur cigaredon ses numerojn de sia telefono. Nelonge pripensinte, ŝi skribis ankaŭ sian nomon: Svetlana. Post tio ŝi remetis la cigaredon en la skatolon „Kentono“. Iom pli poste, la profesoro demandis ŝin, ĉu li povas ricevis de ŝi cigaredon? „Memkompreneble!“ – diris ŝi, dononte al li la skatolon. Li

elprenis la cigaredon, kun la telefona numero. Ĝin li bruligis kaj elfumis. La numero 601-424 fordrivis en la fumo super la printempa akvo.

Ĉiufoje, kiam li post tio diskis tiujn ses numerojn, la nebulo super Savao malaperis.

Una rimarkis, ke io okazas inter la profesoro kaj la knabino transe de li. Ŝi jam plene kutimiĝis al la blinda adoro de Miŝelo, kaj eĉ ekpenso, ke ŝi restos sen li, plenigis ŝin je kolerego. Li ja antaŭ kelkaj tagoj diris al ŝi, ke lia amo estas je la fino!

– Mi estas, eble, la unua, kiu ĉesas vin ami – diris li. – Estos ankoraŭ multe da viaj amatoj, supozeble, sed de jaro al jaro ili forfalados unu post la alia; ili estos pli kaj pli malmultaj... Eĉ ne unu virino en la historio de la homaro estis adorata ĝis la fino! Krom tiuj, kompreneble, kiuj mortis ĝustatempe, junaĝaj...

Neatendite ŝi komprenis, ke ŝi eĉ imagi ne povas, ke ŝi ne plu havos ian ajn rajton pri li. Nun, kiam ŝi lin estis perdanta, ŝi komprenis, ke ĉi tiu amafero ne estis nur simpla ludo. Damnaĵo! Li infektis ŝin je la posedemo de sia putra generacio. Ĉu amo? Bone ŝi vivis ankaŭ sen ĝi, ĝis kiam ŝi ne konatiĝis kun ĉi tiu konfuza intelektulo, al kiu ne sufiĉis nur tempaltempa seksumado; li ja deziris ĉion – ĉiujn kurbojn de ŝia cerbo! Ĝis nun ŝi gajnadis la matĉojn kun la rezulto kvin-nulo sur sia tereno, sed ĉu ŝi estos gajnanta ankaŭ kiam oni ludas sur lia tereno? Una unuafoje en sia vivo sentis, ke ŝi estas perdantino. Tio estis komplete nova sento, kiun ŝi neniam antaŭe spertis, pro kio ŝi ektimis.

Ŝi devos denove traaŭskulti tiun kasedon kun la diagnozo de la doktoro Draŝkoviĉo, kvankam ŝi ĝin jam sciis parkere. Ŝi ĝin ricevis dum veturo, kiam ili estis revenantaj el la monaĥejo „Dipatrino Marborda”.

– Ĉu ofte vi pensas pri memmortigo?

– Kiel vi divenis tion?

– Laŭ miaj konkludoj, via kazo estas tre specifa – diris la doktoro Draŝkoviĉo – ĉe vi la separkomplekso ne kreis timo pri apartiĝo de la patrino, sed de la patro! Konsiderinde stranga...

Ĉio komenciĝis, kiam la profesoro kaj medicinisto komencis analizi siajn monaĥejajn gastigantojn.

– Sed kion vi povas diri pri mi? Nu, diru ion ankaŭ pri mi!

– Ni prefere ne parolu pri tio! – provis haltigi ŝin la profesoro, sed Una persistis. Ŝi ekscitiĝis, kvazaŭ starante antaŭ aŭguristo, kiu aŭguras la estontecon per observo de manplato.

– Kial ne? – diris Draŝkoviĉo. – Tamen, ĉu vi povas elteni ankaŭ malagrablajn sciojn?

– Mi povos, povos! Diru ja!

– Do, jen, unue, vi apartenas al la tipo de anksiaj memplaĉulinoj...

– Kion signifas la vorto – anksia?

– Korprema memplaĉulo! – Draškoviĉo precizigis sian esprimon. – Vi suferas oftajn korpremojn kaj troan amon al via propra korpo! Via emocia vivo estas senakorda. Viaj sentoj ne estas daŭraj. Vi havas konstantan timon, ke via korpo vin perfidos. Pro tio vi ĝin senĉese torturas. Ĉu vi eble suferas kapdolorojn?

– Jes, ofte...

– Jen! Vi malfidas vian sanon! Ofte vi senkiale sentas trolacon. Ĉu vi ofte sentas bezonon plilongigi dormodaŭron?

– Kion pri la amo?

– La partnero kiun vi elektas, devas plenumi du paradoksajn kondiĉojn! La unua: li devas plaĉi pli al la aliaj, ol al vi! La dua: li anstataŭas vian forestantan patron, kaj tiamaniere malgrandigas vian anksiecon. Kompreneble, ekzistas ankaŭ aliaj kialoj...

– Parolu!

– Du belegaj alternativoj! Narkotaĵoj aŭ memmortigo...

– Pro kio? – demandis ŝi terurfrapita.

– Por ke la memplaĉo estu plue subtenata, kaj tiamaniere malgrandiĝu la korpremo! Mi ŝercas! – ekridis li. – Mi nur iomete aktorisis diveniston. Ĉu mi timigis vin?

Sed ŝi sciis, ke li ne ŝercis. Ŝi ja sciis, ke ĉio ĉi ne estas ŝerco. Ŝi ja sciis, ke ne indus prifosi tiun aferon, sed ŝi ne eltenis, ŝi devis fari ankoraŭ unu paŝon, ankoraŭ iomete, ankoraŭ nur iomete, ĝis kiam la krustiĝinta sangaĵo sur la genuo komplete forfalos, kaj sub ĝi komencos flui sango. Diable aĉega estas la psikiatrio! Ĝi ja estas malscienco!

Ŝi alpaŝis la profesoron, kaj ĉirkaŭprenis lin dedorse. Sed la knabino sur kies ŝultro la remanto tenis sian manon, kaj la profesoro, kiun Una brakumis, ne ĉesis fiksrigard– i unu en la alian. Ili estis kvazaŭ ensorĉitaj.

– Ŝi plaĉas al vi, ĉu? – flustris Una al li en la orelon.

Li nekoncentrite kapjesis.

– Amato mia! – ŝi mordis lian orellobon. – Faru tion kontraŭ mi, kaj vi vidos, kio okazos kun vi!

– Kio?

Post nur dio scias kiom da tempo, finfine li ekvidis lumon ĉe la elirejo el la tunelo tra kiu dum multaj monatoj li senespere rampis.

– Vi ja vidos kio!

Li sentis grandegan faciliĝon. Nekonata vokto donis finfine signon al lumigistoj turni iomete reflektilojn ankaŭ direkte al la homo, kiu vivis en la eterna ombro de Una. Maĉante gumon, tion unue faris la knabo el „Nautiluso“,

direktinte ĉiujn bateriojn de lumaranĝo al la profesoro, kiu larmige suferis ĉe verŝotablo (Una dronis en mallumon), kaj poste la lummajstroj de Taŝmajdano forlasis la glitantojn, kaj konstatis, ke li sidas kuntiriĝinta sur malplenaj tribunoj.

Lumigata per centoj da pistol-reflektiloj, li leviĝis, deĵetis la vestojn kaj, denove naskita, prenis Unan, sen ia ajn ekscito, kiel perfekte lubrikita seksmaŝino. Homo-instrumento. Homo-armilo. Homo-laborilo.

Okazis miraklo: anstataŭ kreski, kiel antaŭe, Una malkreskis, kaj transformiĝis en ordinaran, iomete timigitan knabineton!

... rigardante sub la kruela matena lumo elproksime ŝian haŭton, li konstatis, ke ŝian haŭtkoloron detruis beligiloj; li malkovris reton de etaj krateroj, kaj el la atente razitaj gamboj dumnokte elkreskis pikaj stoploj, kiujn li sentis kiel trompon sur la tuta palpema supraĵo de sia haŭto. Moliĝinta krajonŝminko, kiu hieraŭ vespere ankoraŭ estis transformanta ŝiajn okuloj en sopirplenan Bambi-rigardon, forviŝita kaj moligita per kisoj kaj ŝvito, reduktis la okulblankojn al la ĉiutaga, modera dimensio – lin neatendite fiksrigardis etaj kaj blinkaj okuloj de arbara besteto... tiel la revo pri la malhelhaŭta knabino en blanka robo karniĝis kiel sovaĝa, kruda karno... nur dio scias kiam, eble ĝuste fine de la nokto, kiu tra plumba palo vanuis en tagon, fuĝis tiu eterne ĉasata knabino-revo, piedpinte, nudpieda, kun arĝentaj sandaloj en la mano, kaj robo surtirita sur la nudan korpon... kaŝe ŝi forbloviĝis senspure, postlasinte sian duulinon, kiu, interalie, havis la samajn trajtojn, la saman paŝmanieron, hararon, manojn, ĉion, sed ĉiam iu bagatelaĵo vidigis la trompon...

Unan pro tio li ne amis malpli; simple, li amis ŝin pli kalme, senspasmе, sensufere, sendanĝere, sen ekstazo kaj sen nekontentigitaj deziroj.

– Nenikaze provu venigi ŝin ĉi tien, en la zen-ĉambron! – minacis Una.  
– Nenikaze provu gedormi kun ŝi sur mia litajo! Vi mem komprenos kial! Vi ja vidos, ho, eksjuna malĉastulo!

– Sensenca penso venis al vi en la kapon!

– Kun neni vi ĉi tie seksumos, nur kun mi! – hojlis ŝi, kvazaŭ mokincite.  
– Kun neni! Via Ferdinando ne prancos! Vi ne povos! Via Ferdinando ne prancos! Vi ja komprenos, ke vi ne povos, kaj ke via Ferdinando ne prancos!

Kvankam Una estis kaŝanta sian ĵaluzon per umado, ŝi sentis, ke ŝi lin perdas; same kiel kiam ludilon, kiu ŝin tedis, iu pliruzo infano prenis, ripariris, kunmetis ĝiajn partojn, purigis kaj poste fanfaronis sur strato pri tiu sia lertaĵo. Finfine, ekefikis ankaŭ la tempo, kiun ili pasigis kune: ŝi kutimiĝis al la profesoro kaj al lia vivostilo. Plurajn fojojn ŝi provis geumi kun junuloj kiuj ŝin ampersekutis, sed ĉiufoje ŝi rimarkis, ke ili ŝin direktas al nemultekostaj manĝaĵoj en menuo, ke ili avaras, ke estas kontentegaj pri sia profesio kaj loko en sia vivo – eĉ nevole ŝi serĉis iliajn erarojn: ili neniam leviĝis desur la seĝo,

kiam ŝi ekiris ŝminki sin, ne helpis ŝin surmeti surtuton, ne flamigis ŝian cigaredon; la eksmodan aĉetadon de floroj (kiujn ŝi, tamen, ŝatis!) ŝi eĉ esperi ne povis! Same, post vespermanĝo, ili subite komencis laŭdi la rapidecon kaj forton de sia aŭtomobilo, aĉetita partopage, aŭ koŝmare paliĝis, kiam al ili ŝajnis, ke alvenas ilia oficiala koramikino, kiun ili iomete kokris kun Una. Unu el ili, interalie reala belulo, montriĝis vera timemulo, ĉar li ne aŭdacis forlasi almenaŭ dum duonhoro sian kancelarian laboron, kaj renkontiĝi kun ŝi en kafejeto. Veraj mizeruloj ili estis! Ili gekuŝis nur vendrede kaj sabate vespere; la dimanĉa vespero ja estis destinita por ordigado kaj dormado antaŭ la labora lundo. La profesoro kapablis riski pro ŝi, kaj tio ŝin, nedisputeble, flatis, ĉar li ne estis ajnulo. Li multon povis perdi pro Una, sed li tamen ĉion ĉi ĵetis antaŭ ŝin, kvankam ŝi de li nenion petis, nenion postulis. La mono, kiun li perlaboris, staris konstante sur fridujo, kaj ili ambaŭ prenadis tiom, kiom bezonis. Kiam ili restis sen mono, li pro tio ne panikis: nur leĝere kelkan tempon li ŝanĝis la stilon de sia vivo, kaj tio estis ĉio. Tamen, al ŝi pleje mankis la senpripensa adoro de Miŝelo. Ĉiufoje kiam ŝi demoraliziĝis, ŝi uzis liajn okulojn, plenplenajn da adoro, kiel spegulon, kiu beligas, kiel pesilon, kiu ĉiam montras malpli grandan pezon! Neniam ŝi cerbumis, ĉu ŝi lin vere amas, sed pro la penso, ke ŝi lin perdos, en ŝi eksonis ia, ĝis tiam nekonata vako, kiel tiu malnova monaĥeja puto. Simpladire, ŝi ne povus elteni, se lin alproprigus alia knabino, precipe ne tiu, kies konduto rilate al ŝi, al Una, tutatempe estis ofenda kaj supereca, preskaŭ ignorante ŝian ekziston. La knabino posedis du ecojn, kiujn Una absolute ne toleris: ŝi estis blondulino, kaj estis supereca en aerodroma, *duty free shop* maniero! Ĉu eblas, ke la profesoro nun tiun knabinon kondukos al la lokoj, al kiuj li kondukis Unan, ke li profanos iliajn sekretajn sanktejojn, ke li al tiu knabino parolos la samajn folajn vortojn, malkovrados iliajn sekretajn signifojn, kaj fine, ke ĉiuj, kiuj ilin konis kiel iomete strangan, sed romantikan geon, nun vidados Miŝelon kun tute alia knabino, kaj verŝajne supozos, ke la profesoro forlasis Unan, kaj ne Una lin, kion ĉiuj atendis! La nesaga ina taktiko, kiun ŝi delonge forgesis, nun estis vekiĝanta. La spegulo de la profesoro fendetiĝis. Tion ŝi sentis ĉi-nokte. En lia spegulo ŝi ne plu estis bela. De Miŝelo ŝi ellernis multon, sed ne ellernis esti malgajnanta.

Je la dekunua horo nokte ilin vekis persista sonorado de telefono. Telefonis Mino Demajo el Londono, kien Mino ĝuste tiumomente surteriĝis el Cejlono, post duonjara meditado.

– Mi alvenos morgaŭ... – diris li al la profesoro.

La sorĉumo de Una ŝajne tamen efikis: li neniun plu venigos en la zenĉambbron. Nek ŝin, nek iun ajn alian.

Matene ili estis forlasantaj sian eksan aman neston. Ili agis diligente proksimume du kaj duonon da horoj, ĝis kiam ĉiuj aĵoj estis sur sia iama loko. Ili

ekrigardis kun malĝojo la larĝan flavan „fikejon“: multegajn fojojn ili geumis sur ĝi! Multegaj kisoj, kartoĉoj, oranĝoj, larmoj, transsaltoj, ternuksoj; multegaj elfumitaj cigaredoj kaj fortrinkitaj boteloj da vino! Multe da senespera amo!

Li enpakis siajn aĵojn en du kofrojn. Unu kofron li portempe restigis en la stacidoma kofrejo.

Una kunportis kelkajn bagatelaĵojn: du glasojn el „Esplanado“, kandelon, litaĵojn, ŝtelitajn cindruojn kaj beligilojn. Aerbalonon ili flugigis desur balkono. La ŝlosilojn de zen-ĉambro ili metis en leterskatolon.

- Kien mi veturigu vin? – demandis li ŝin, kiam ili eniris taksion.
- Hejmen... – diris ŝi deprimite. – Kien vi iros?
- Mi ne scias... – diris li.



Li telefonis je la deka horo kaj dekkvin minutoj. Dezirante esti sprita, li rolis aŭtomaton, kiu elparolas la ĝustan tempon kiam oni diskas la numeron 95.

– Dek horoj, dekkvin minutoj, tridek sekundoj. Dek horoj, dekkvin minutoj, tridek du sekundoj. (Li ne povis halti.) Dek horoj, dek ses minutoj, deknaŭ sekundoj. (Li sentis, terurfrapita, ke la elparolita tempo vere pasas.) Dek horoj, dek ses minutoj, dudek du sekundoj... Dek horoj, dek sep minutoj, naŭ sekundoj. Dek horoj, dek sep minutoj, dekdu sekundoj.

– Se vi volas aŭdi Svetlanan, ŝi ne estas hejme! – respondis profunda ina voĉo. Evidente, ŝia patrino. – Svetlana skipas en Zagrebo...

– Pardonu – mensogis li – ĉi tio estas centralo! Ni provas novajn liniojn. Malatentu, se la telefono denove sonoros certan tempon. Dek horoj, dekok minutoj, ok sekundoj...

La patrino de Svetlana mallevis la aŭskultilon.

Tio ne estis malbona komenco: nun li almenaŭ sciis, ke Svetlana estas stevardino.

Li diskis la telefonnumeron de Jugoslavia aerotransporto, kaj demandis kie ŝipanaro pasloĝas kiam ĝi skipas en Zagrebo. En la hotelo „Esplanado“.

Dankon. Vi estas tre afabla. Krimulo revenas al la krimejo. Li decidis gajni Svetlanan sur neŭtra tereno, en Zagrebo. Ho Dio, mi ankoraŭ estas freneza! Mi ankoraŭ kapablas pro junino flugi eĉ en alian urbon! Pro tio mi kelkafoje estas pli bonŝanca ol la aliaj. Kiu ne riskas, ne gajnas. Li aĉetis aviadilbileton, kaj post tagmezo forflugis en Zagrebon.

Antaŭ tio li renkontis Unan en la koridoro de Fakultato:

– Ĉu mi povas veturi kun vi? – demandis ŝi.

– Ĉifoje, ne! Mi havos eĉ ne unu minuton da libera tempo.

Tiel li komencis persekuti Svetlanan tra la ĉielo.

Li ŝin embuskis en flughavena ĉambrego, kaj atendis du kaj duonon da horoj por ke ŝi aperu. Al li plaĉis sidi en profunda leda fotelo, kaj atendi. En Beogrado li eĉ sen tio ne sciis kie loĝi. La juna docento Raŝiĉo okupis, ŝajne, definitive lian laborĉambron. „Gado je Raŝiĉa maniero!“ Tiel tio komenciĝas. Kial ne? Ankaŭ Jean Paul Sartre la tutan vivon loĝis en hotelo.

Ŝi ĝojis ekvidinte lin.

– Kion vi faras en Zagrebo?

– Mi serĉas vin...

– Ĉu vere? Tre agrable!

Finfine li povis enspiri aeron plenpulme. La vortico de Una ne plu tiris lin funden.

Li rezervis tablon en restoracio, same kiel la pasintan fojon, kaj je la sama horo ekiris vespermanĝi kun Svetlana. Ĉi tiun fojon tio ne estis moda irejo, ĉar ĉi tie ne estis paŝanta Una; en sia eleganta, malhela uniformo de stevardino, Svetlana per siaj elastaj paŝoj sammomente transformis la pedigreean „Esplanadon“ en oblikvan vojeton inter sidlokoj de „Boeing 707“.

„Ni petas vin resti ligitaj ĝis la kompleta ĉeso de la laboro de la motoroj. Por via informiĝo, la ekstera temperaturo en Zagrebo estas ok gradoj. Dankon!“

Li remendis la samajn manĝaĵojn (unue helikojn sur braĝo, kaj poste bovidviandan tranĉaĵon en citrona saŭco), kaj la saman vinon („Laŝka rislingo“), sed ĉi-foje li ne plu pensis pri Sanja, kiu porĉiame restis kovrita de tempolavango, sed pri Una – kvankam sen postsopiro kaj amaro. Kun Svetlana li sentis sin trankvile kaj komforte.

Ili dormis en lia kutima ĉambro numero 111. Li sporte eltenis tiun elprovon, kvankam la spegulo observis lin riproĉe. Svetlana estis ĉarma; apud ŝi kaj en ŝi la tempo estis pasanta kviete, simile al la rivero, sur kiu li ŝin ekkonis. Ŝi flugis alte super etaj abomenaĵoj, kiuj lin atendis. Simpla, ĉarma, pura. La tero por ŝi estis, vere, nur verda planedo, kiun ŝi ĉiutage ĉirkaŭflugas. Ne estas vero, ke la homoj ĉiam kunportas ankaŭ siajn problemojn, ĉien, kien oni iras! Tion, sinkonsole, elpensis tiuj kiuj malofte eliras el siaj ĉambroj. Plaĝo en Patajo, sur la bordo de Sudĉina maro, efikis post du horoj pli ol dujara terapio

ĉe psikiatro; lia bagaĝo penplene restis forgesita sur tute alia kontinento, de kiu lin apartigis maroj, oceanoj kaj tempodiferenco. Al la profesoro ŝajnas, ke li lasis ankaŭ sin mem tie, en la neŭroza Eŭropo, elrampinte el sia malnova haŭto, kiel serpento el sia pasintjara suraĵo.

Una estas Eŭropo. Levantenujo. Balkanio. Ŝi lin altiris, kiel la radikoj, el kiuj ni ĝermis, kiel la tero, al kiu ni ĉiam revenas, kiel gusto de rosumita ĝardena tomato, viando, lakto kaj akvo, kiel akreco de kapsiko, kiel obtuza tempoabundo sur polvoplana varmega placo, pro kiu ni ja forlasis aliajn, feliĉajn landojn, ŝia haŭto havas la odoron de praavinoj, ŝiaj okuloj vidas ankaŭ la kontraŭan flankon de la monaĥeja muro, sur kiu ili estas pentritaj, ŝiaj dentoj estas malregulaj, sed ili scipovas mordi, ŝi scipovas kvereli kiel la plej ordinara strata klaĉulino, sed ankaŭ plori kiel monaĥino pri la vundoj de Kristo, ŝia haŭto ankoraŭ ĉiam venkas farmacion, ŝia ŝvito ebriigas, la haretoj pikas, ŝiaj ungoj gratas, ŝia rido resonas, ŝia malĝojo tuj rimarkeblas. Apud ŝi, la profesoro forgesis la mondon, kiu de la infanaĝo estis lia idealo. Al li estis bone en tiu loko, kie ŝi troviĝas: virino-pruno, knabino-plugejo, foskavo, tranĉeo enfosita en argilo, freŝa aero super la Dorĉola akvumita ŝtonpavimo. Li, kiu Eŭropon ŝatis tiom, ke li metamorfoziĝis en ĝian nepagatan spiritan konsulon, pere de Una malkovris la esencon de la ĉirkaŭaĵo, sub kies ĉielo li paŝis kiel blindulo, kun la okuloj fermitaj, aŭ ankoraŭ pli malbone: kun la rigardo konstante fiksanta postlimon! Li forgesis, ke ekzistas tiu alia mondo. Parizo por li nun estis nur bildkarto; Londono –granda ĉiovendejo sur Oxford Street. Li estis ĉi tie, en Beogrado, kaj tio al li ŝajnis sufiĉa. Lia granda vojaĝo, komenciĝinta dum naskiĝo, definitive finiĝis en la haltejo, kiu nomiĝas Una. Ankaŭ kiam ili disiĝos, li amos Beogradon ĝis la fino de sia vivo, ĉar en ĝi siajn rulŝuojn uzis lia bela, stulteta knabineto.

Svetlana reprezentas liberigitan novan mondon. Singapuro. Hongkongo. Dako. Dubajurbo. Bangkoko. Bombajo. Toronto. Quebec. Montrealo. New York. Sidney. Ho Eternulo, ŝi havis nur dudek tri jarojn, sed jam konis la tutan planedon, ŝi – koncentrita, kvieta kaj neniom surprizita, simila al fluganta knabineto kun alumeto (kaj „Kento“) de moderna Hans Christian Andersen – el flugkontrolejo. Dum deteriĝo kaj surteriĝo, ŝi sidis apud la savelirejo, sciante, ke ŝi ne perdos la vivon se oni ekpanikos. Bela, blonda istino! Ŝi prenis lin sub protekton, kiel propran pasaĝeron, kiu abrupte ektimis la flugadon, sed al neniuj tiam aŭdacis konfesi.

Ŝi duŝis sin, per kelkaj energiaj movoj kombissian pezan oran hararon, kaj malrapide proksimiĝis, duobligita en spegulo, nudpieda kaj ankoraŭ malseka post banado. Se la korpo estus amaskomunikilo, kaj se ĉiu amaskomunikilo sendus mesaĝon, tiam la korpo de Svetlana en tiu momento elsendus signalojn de definitiva eskapo el la koŝmaro, nomata Una.

– Vi ne devas timi! – diris ŝi. – Dekdu horojn post la flugo mi estas sterila...

– Pro kio?

– Pro la premo kaj radiado.

Lia ora knabino, surfluginta rekte el la ĉielo sur la kuŝejon en la ĉambro 111!

Tiun nokton, inter du brakumoj, li leviĝis, kaj sur leterojn kun surskribo de la hotelo haste skribaĉis aron da tezoj por sia defendo, kiujn li subite rememoris. Nekredeble, apud Svetlana li eĉ labori povis!

– Restu ankoraŭ unu tagon – proponis ŝi – poste mi revenigos vin hejmen. Vi ja havos specialan traktadon!

Je la dua horo post la noktomezo, ĝuste kiam li sin duŝis, eksonoris telefono:

– Miŝeeeeeeelo! Oni petas vin! – Svetlana alvokis lin.

Li prenis la aŭskultilon kaj fiksaŭskultis silenton de interurbaj linioj, post kio iu mallevis la aŭskultilon.


– Mi diris al vi, ke vi ne respondu!

– Ĉu tio estas tiu via nigrahara knabino?

– Eble.

– Ĉu ŝi ĵaluzas?

– Ŝajne...



La Kolektiĝo de la sciencaj kaj instruaj istoj de la Fakultato estis okazigita du tagojn post tio, en vendredo, je la dekunua horo kaj tridek minutoj. Miŝelo jam dum longa tempo atendis tiun fin-akton: li havis gladiatoran humoron irante el la aerodromo al la kunveno. Kvardek minutojn li observis Svetlanan disportanta kafojn, sukojn kaj teojn, ridante mense pro amindumado de flugantaj amatoroj, kies celo estis ŝi.

– Se hazarde dum malaltiĝo de aerpremo en la kajuto malaperos aero, el la aperturoj super viaj sidlokoj elfalos maskoj kun oksigeno. Ni petas vin se tio okazos estingi la cigaredojn, se vi fumas, kaj premi la maskon sur vian vizaĝon...

Ŝi plenumadis pantomimon, kiu nur por li estis ridinda, dum ŝiaj okuloj petole briletis. Li sentis sin majesta, kiel en siaj la plej bonaj tagoj. Li estis, finfine, libera! Li havis Unan, sed ne plu dependis de ŝia kapricemo. Svetlana malkovris al li la atraktivecon de aliaj knabinoj. Li decidis ne fari eĉ la plej malgrandan cedon dum la kunveno. Finfine li faros lecionon al siaj kolegoj, kaj montros al ili kion signifas transiri la lastan linion, post kiu ne plu ekzistas timo. Do, ĉu gravas se li malgajnos? Al li ja restos Una – tiu donaco de Dio;

tiu rifuĝejo, en kiun li estas enkurinta, kvazaŭ en fremdan ambasadejon, tra kies fenestroj li nun rigardas senpovajn enlandajn gardistojn de ordo, kiuj staras sur razeno, sen rajto eniri. Li troviĝis sub protekto de la definitive verkita amo de Una. Ŝi komprenis, ke ŝi devas batali por li. Tion ŝi pruvis per sia ĵaluzo. Li ne humiliĝis, sed tamen havas ŝin. Ĉu porĉiame? Kial ne? Ekzistas feliĉaj geedzoj, malgraŭ eĉ pli granda aĝdiferenco. En la nuna tempo la aĝlimo nekredeble forŝoviĝis je utilo de mezaĝuloj. La aĝo inter la kvardeka kaj kvindek kvina jaroj nun estas konsiderata ora periodo de viroj. Kosmonaŭtoj ja estas miam samaĝuloj! Mi ĉesos drinki kaj fumi. Eble mi tenisos! Tio plibonigos mian korpostaton. Fikfek! La homon konservas tio, kion li havas en sia kapo. Oni estas juna kaj freneza ĝis kiam oni konsentas kompromisi, ĝis kiam oni ne timas la vivon. Cetere, min ne jukas kio okazos post dek jaroj! Du monatoj kun Una – jen feliĉa ĉiama. Razeno antaŭ malalta, longa unuklina domo: Una kuras kiel nebridebla ĉevalidino. Plaĝo: Una rampnaĝas. Mi legas en la ombro de sunombrelo, kaj tempaltempe mansvingas al ŝi. Solena akceptofesteto: mi eniras kun Una tra lumigita enirejo dum fotolumiloj fulmas: la profesoro Miŝelo Babiĉo kun sia juna edzino. Ĉu kiĉo? Eble. Sed ankaŭ feliĉo! „*Dio estas mortinta! Friedrich Nietzsche.*“ Sur iu muro estis skribitaj vortoj „*Nietzsche estas mortinta!Dio.*“ Mi semas bazilion, sed ĝermas Fridriho! Mi telefonos al ŝi, tuj kiam ĉi tiu fuŝaĵo finiĝos. Ne, mi ne venĝis al ŝi! Mi diros, ke mi ne deziris lezi ŝin. Mi nur deziris kontroli, kiomgrade ni du estas unu tutaĵo, malgraŭ ĉio, kio nin dividas. Nia amafero, kiom ajn tio banale sonas, tamen estas unika oni povas elteni, fuĝante unu de la alia! Ni gustumis aliajn virinojn, aliajn virojn, por definitive kaj firme kompreni, ke ni devas esti kune, sendepende de ĉio kio okazos. Nu, ni nun finu tiun militon, ho Una! Ĉu bone? Kaj nun, kara profesoro, bonvolu enringiĝi! Vin atendas matĉo, kiun vi, espereble, elpontos. Diference de la longa, elĉerpiga tranĉea milito kontraŭ Una, ĉi tio estos preskaŭ infana ludo. En la amo, nome, ne ekzistas ia ajn logiko. La amo estas tute neracionala. Ĉi tie mi uzos prudenton (kiu min ankoraŭ perfekte servas), feran logikon, citatojn, sciencan aparataron; mi citos antaŭajn kazojn, mi eluzos la erarojn de tiuj, kiuj blinde atakis, mi vidigos ŝanĝokapablon, humuron, sperton de longe persekutata intelekta vulpo... Ĉar en ĉi tiu kazo ekzistas nenio neracionala, krom la patologia malamo de mia eksa amiko, sed tio tamen estas nur triaklasa motivo. Ne ekzistas, fakte, ia ajn konflikto inter la politiko kaj intelektuloj, krom la regulo, malnova kiel la mondo, ke la intelektuloj respondecas pri siaj presaĵoj antaŭ la tempo, kiu alvenas, respondecas ilia ja ne ĉesas, kiam ili pensiuliĝas, dum la politikistoj rajtas ŝanĝadi siajn opiniojn kaj kancelariojn, sekvante aktualajn postulojn de ĉiu konkreta tago. Ekzistas nur envio de fiaskintaj intelektuloj kontraŭ tiuj, kiuj ion atingis en sia vivo. Bedaŭrinde, ili estas nur perantoj inter la aŭtoritatoj

kaj la spirita sfero; ili vastigas falsajn informojn, ili interpretas, miskonigante honestajn intencojn. Ĉar kial la agemuloj, same kiel la politikistoj, devas koni la nuancojn inter la juna kaj maljuna Heidegger? Ili ja, kompreneble, havas pli urĝajn farendaĵojn! Ili devas organizi la vivon, trafikon, malsanulejojn, akvon, lakton, elektron, ili devas gardi la limojn, doganon, aviadilojn kiuj surteriĝas kaj enaeriĝas, kaj energion, ili devas utiligi ĉiujn eblecojn de la naturo... Tiuj duonedukitaj perantoj igas konfuzon, sed mi ne konsentas, ke ili estas pli grandaj patriotoj ol mi. Ĉi tiu lando estas samtempe kaj ilia kaj mia, tute same. Mi unue, do, forigos tiun komencan miskredon, ĉar konflikto ne ekzistas! Ĝi malekzistas! Simple malekzistas. Kie ĝi estas? Ĝi disŝaŭmiĝis! Ekzistas nur vicdekanoj, kiuj, anstataŭ okupiĝi pri la scienco, vagas de unu al alia kunsido! Anstataŭ legi kaj progresi, ili per ruĝa krajono substrekas gravajn lokojn en multobligitaj materialoj. Anstataŭ alporti novajn ideojn, ili gardas la Fakultaton de ia ajn freŝa penso, kvazaŭ tio estus kaŝmetita dinamito. Kion mi faros? Unue mi reduktos la koleregon kontraŭ la unuopulo. Mi tion senvualigos, komprenigos la envion pro propra malsukceso, pruvos la trompon, klarigos la kaŝitajn motivojn. Je la fino, mi montros la solvon. Ne estas malbona tiu koncepto, ĉu ne! Ĝi plaĉos kaj al tiuj supre, kaj al tiuj sube. Tio estos efekta intelekta kristianio. Una ridegos, kiam mi al ŝi rakontos, kiel mi lavis iliajn malviglajn, ŝimiĝintajn cerbojn.

Ĉar, finfine, mi tion ne faras pro mi, sed nur pro ŝi. La virinoj ŝatas venkantojn, kaj tiun praan impulson ne sukcesis forviŝi ankaŭ nia libera, suspektema epoko. La venkanto forkondukas la plej bonan inon.

Profesoroj fumis en la koridoro antaŭ la kunsida halo. Iuj lin salutis, aliajn unue li salutis, triaj intence forturnis siajn kapojn. – Gardu vin, karulo! – flustris al li preterpase la ĉiama asistanto Protiĉo. Du docentoj kaŝe premis lian manon, nur la profesoro Birovlevo lin brakumis kaj tri fojojn tropompe kisis antaŭ ĉiuj.

Li alrigardis iliajn vizaĝojn; la tere flavan haŭtkoloron de tiuj ĉambruloj, lipojn, kiujn bruligis nikotino, ventregojn subtenatajn de rimenoj, okulojn kun bluringoj – konsekvencojn de sidado ĉe longaj verdaj tabloj, en malfreŝa aero plena da fumo, kun mineralakvo kaj sennombraj kafoj. Konsekvencojn de vivoj sensencaj, vanaj. Multaj el ili devis, nur dio scias kiom da fojoj, en sia vivo rezigni idealojn, amikojn, la plej intimajn kredojn (iliaj infarktoj estas sekvaĵoj de iompostioma krevado de ambivalencaj personoj!) sed ne nur tion; ofte ili devis plenkore aplaŭdi al sia malpura konscienco!

La pedelo Milovano informis la profesoron Babiĉon, ke la materialo por la kunsido atendas lin en la kabineto de la vicdekano. Kaj jen, post multe da tempo li enpaŝis tiun kavon, mirante, ke absolute nenio en ĝi ŝanĝiĝis dum ĉiuj ĉi jaroj.

La vicdekano penoplene levis sian peziĝintan korpon desur la stila seĝo sur leonaj piedoj. Jam preskaŭ tutajn dudek jarojn Miŝelo kun li ne parolis, krom en raraj cirkonstancoj, kiam tio estis necese ĝa pro laboro. La du homoj atente rigardmezuris la reciprokan gradon de ruiniĝo sur iliaj vizaĝoj kaj korpoj. Unu el ili kvazaŭ estus definitive cedinta; la alia ankoraŭ sensukcese penis savi la bonan opinion pri si. Kien forbloviĝis la iamaj belaj knaboj?

– Ni volis al vi, same kiel al la aliaj, sendi per poŝto la materialon, sed ni ne sciis vian novan adreson...

La profesoro silente foliumis la rivevitajn foliojn. El la tagordo de la Kolektiĝo de sciencaj kaj instruaj istoj, same kiel ĉiam, oni ne povis konjekti ion ajn. Netoleremo, okazonta konflikto, malamo, danĝero, ĉio ĉi estis lerte kaŝita sub la vortoj, kiuj delonge perdis sian signifon, kaj povis signifi ion ajn. Propono pri ŝanĝoj de la Statuto... Reepektado, avancigoj, publikigo de konkurso por akcepto de novaj kandidatoj. Min, verŝajne, ili lasis por la fino, kiel deserton, diris li mense.

– Estas ankoraŭ io... – diris la vicdekano.

Li antaŭsentis, ke estas ankoraŭ io. „Estas ankoraŭ io...“ – diris tiu ankaŭ tiun tagon, antaŭ ol informi Miŝelon, ke li edziĝos kun lia fianĉino. Estas ankoraŭ io – ŝi diras, ke vi mem ne scias, kion fari kun si. Estas ankoraŭ io: viaj tekstoj, diras ŝi, pri kiuj vi tiom fieras, kaj pri kiuj vi al ŝi diris ke ili vin neniam perfidos, sendepende de tio, kion vi perdos en la vivo, estas ordinara kompilaĵo el fremdlandaj revuoj, kiujn vi sukcese uzas, ĉar vi konas la francan lingvon. Iom da informoj, iom da plaĉiĝo al la legantoj, iom da ruzajoj. Ĉu ŝi tiel diris? Tiel. Estas ankoraŭ io: ŝi diras, ke vi kredas ke vi estas povega fikulo, sed fakte ĉiuj en la urbo scias, ke vi estas absoluta malindulo! Oni kaŝridas pri vi. Estas ankoraŭ io: ŝi diras, ke vi ĉiam ludas; ludas kun la homoj, kun knabinoj, kun amikoj, opiniante, ke vi estas pli saĝa ol la aliaj, pro kio vi tute ne komprenas, ke vi venkis vin mem! Estas ankoraŭ io: vi opinias, ke vin ĉirkaŭas amikoj, sed vin, fakte, neniu amas. Ŝi diras, ke vi estas sola. Sola. Sen ununura sincera amiko. Estas ankoraŭ io: ŝi diras, ke vi ŝin umis, nur por fanfaroni, ke vi havas plaĉan litamikinon. Estas ankoraŭ io: ĉiuj viaj aventuroj kun aliaj knabinoj, diras ŝi, estas nur katastrofa provo iĝi digna en viaj propraj okuloj... Estas ankoraŭ io...

Manpremite sian ventron, li enkuris la necesejon en „Du cervoj“, sed vomis en proprajn manojn, antaŭ ol atingis pelvon. Al li ŝajnis, ke li elvomos la tutan internaĵon. Ŝi celis lin per ĉiaj armiloj. Eĉ ne unu sanktaĵon ŝi indulgis. Ĉu estas eble, ke mi ŝin amis dum ĉi tiu tuta tempo? Ĉu tio estas la sama persono, kiu por mi estis la plej kara en la tuta mondo? Aŭ en ŝin abrupte enloĝiĝis malgrandaj blankaj monstroj el alia, demona planedo; ili disrampis tra ŝiaj cerbaj meandroj, kaj nun regis ŝiajn pensojn, vortojn kaj movojn. Ŝi ankoraŭ konservis siajn belajn korpon kaj kapon, sed tio ne povas esti ŝi!

Ĉar, se tio estus ŝi, ŝi indulgus almenaŭ ilian komunan vivon; tiujn jarojn oni tamen ne povas ĵeti en klozetan pelvon kune kun malpura akvo! Ĉu nenio plu ekzistas? Ĉu, vere, mi tiel aspektas en la okuloj de la aliaj? Li deziris ekhurli: „Perfido! Perfido! Perfido! Perfido!“ – sed lian voĉon stringis malvarmeta likvo kun pecetoj de nedigestita salato, kiu torentis el li kiel venena akvofalo. Li restis certan tempon tiel, genuante sur la malseka betono super la senklapa pelvo, post kio li lavis sin per malvarma akvo, kaj revenis en la restoracion por novaj „estas-ankoraŭ-io“-batoj. Sed ĉio multe ŝanĝiĝis dum la lastaj dudek jaroj. Se nenio alia, nun li ja havas Unan, kiu evidente povus esti filino de tiu iama „estas-ankoraŭ-io“-knabino. Li tamen venkis ilin ĉiujn!

– Estas ankoraŭ io... – diris la vicdekano. – Mi ne volas danci kiel kato ĉirkaŭ poto–nu, mi tion devas diri! Oni volas, ke vi hodiaŭ subskribu postulon por interkonsenta ekŝiĝo.

Ili rigardis unu la alian rekte en la okulojn, starante je kontraŭaj flankoj de la larĝa kabineta tablo.

– Ke mi demisiu, ĉu?

– Ne. Nur subskribu la postulon por interkonsenta ekŝiĝo... Tio ja estas io tute alia!

– Laŭ via opinio! Laŭ la mia, tio estas sama!

– Vi eraras. Se temas pri interkonsenta ekŝiĝo, la Fakultato devas al vi trovi novan laborlokon kun sama salajro...

– Kaj mi promesas al la Fakultato jam ĉi-vespere kunvoki preskonferencon por eksterlandaj ĵurnalistoj – post kiu multaj pentos!

Li ekiris al la pordo, sed en la momento, kiam li metis la fingrojn sur ĝian manilon, lian dorson frapis la demando de Una:

– Kio ankoraŭ mankas?

– Mi opinias, ke la intervjuanto devus pasigi multan tempon kun la intervjuato. Tio, kompreneble, inkludas ankaŭ gedormon...

– Kion?

– Nu, amoradon; seksumon, tiel via generacio tion nomas, kompreneble, se temas pri personoj, kiuj apartenas al diversaj seksoj!

– Kion vi havas kontraŭ pederastoj kaj lesbaninoj?

– Absolute nenion. Pardonu, jen, el mi dum momento ekparolis primitiva konservativulo...

**Halto.**

La sono de bendrevolvo nunfrapis Miŝelon rekte en la vizaĝon. Malgranda nigra „Sony“ kuŝis apud stulta, pompa, marmora inkujo.

**Starto.**

– Ĉu vi estas konfuzita?

– Nu, sincerdire – pli ol iom.

**(Denove sonoj. Silento.)**

- Kie estas banĉambro?
- Tie.
- Ĉu tie estas varma akvo?
- Mi dubas pri tio.

**(Silento.)**

- Bela vi estas tiel!
- Ĉu vere?
- Venu!

**Halto.**

La vicdekano per sia dika fingro penis piki la butonon por bendorevolvo, sed ne sukcesis. Ŝviteroj fluis suben sur liaj longajvangoharoj.

**Starto.**

- Mi ne memoras. Verŝajne doloris. Vi havas vere negrajn brustmolojn!
- Kion signifas negraj brustmoloj?
- Ili estas ĝuste kiel la viaj: iomete pirformaj, kaj oblikvaj...
- Venu, ni faru la totalan intervjuon!

En la kabineton duondorme endravis la velura voĉo de Leonard Cohen. „Chelsea Hotelo“. Tamen ankaŭ tio estas iaspeca progreso: post dudek jaroj li sukcesis almenaŭ ne vomii!

- „- Ho, jes, jes, jes...
- Tiel! Ĉu mi estas peza sur via mano?
- Nu, nu!
- Ĉu vi plezuras?
- Oho, jes, jes! Brile estas, brile...
- Diru, diru!
- Ho, jes, ho, jes...
- Nun, atentu nun!
- Oho, jes! Jes. Jes. Jes. Nun!“

**Halto.**

- Vi ne devas plu...  
- Sidiĝu! - proponis al li la vicdekano, kiu sentis senzorgiĝon, ĉar li ne plu devis turmenti sin uzante la nekonatan aparaton. - Ĉu vi volas ion drinki?

La profesoro kapjesis.

- Ĉu vi volas glason da „Chivas“?

La profesoro kapjesis.

- Sed mi ne havas la merditan glacieron! - diris la vicdekano, umante glasojn.  
- Kvankam mi multegajn fojojn petis ilin aĉeti por mi malgrandan fridujon!

Li fordrinkis glason da viskio, rigardante al „Sony“. La maljuna Ĉehovo pravis: la pistolo, kiu pendas sur la muro en la unua akto, devas pafi en la lasta!

– Gravas, ke vi tion nun ne sentu tro tragedia! – diris la vicdekano, verŝante por li novan glason. – Ili ĉiuj estas samaj, tiuj malgrandaj ĉiesulinetoj... Kion fari? Ankaŭ ili ne estas kulpaj! Ŝin ni estigis, tiun Unan, ĉu vi komprenas, de ni ŝi lernis; de mi kaj de vi kaj de tiuj cimcerbuloj tie ekstere, kiuj orgasmos pro feliĉo, se mi estos devigita aŭdigi ĉi tion al ili!

Li malfermis tirkeston, kaj komencis el ĝi ĵetadi sur la tablon malgrandajn nigrajn kasedojn. La kasedo – „zen-ĉambro“. La kasedo – „Monaĥejo de Dipatrino Marborda“. La kasedo – „Esplanado“. La kasedo – „Turniĝu, dolĉulino!“ La kasedo – „Kion mi neniam diris, kvankam mi devis diri?“ La kasedo – „Testamento“. La kasedo – „Aviadilo super grekaj montoj“. La kasedo – „Flustrado sur kuseno“. Eĉ la kasedo – „Santa Esmeralda: Nothing Else Matters“... Ĉu estas ankoraŭ io?

– Mi volas al vi ion diri... – diris la vicdekano – vi kaj mi povis konsenti pri nenio, sed ne ekzistas homo, kiu nin devigus fari ĉi tion unu kontraŭ la alia!

Li alrigardis kun naŭzo la amason da bendoj sur sia tablo:

– Mi scias, ke al vi estas malagrabla iri tien... – li montris per la kapo al la pordo. – Vi devas kompreni min: mi devas ĉi tion fari en la plej bona maniero! Sed eĉ dormante ne pensu, ke min tio plezurigas! Vi estas, denove, en multe pli bona pozicio; vi absolute nenion devas fari! Kaj mi vere envias tion. Sekve, jen: subskribu, jen ĉi tie, ke vi nerevokeble postulas interkonsentan eksigon. Mi tion tralegos anstataŭ vi. Vi ne devas, tute ne devas, iri tien!

La profesoro etendis la glason, kaj la vicdekano porverŝis viskion.

Post tio li metis sian subskribon. Post tio li trairis la babilantan amason da profesoroj en la koridoro. Post tio li eliris el la konstruaĵo de Fakultato. Post tio li diris al la akceptisto en la hotelo „Splendid“ sian nomon. Post tio li prenis la ŝlosilon. Post tio li direktiĝis supren per lifto. Post tio li malfermis la pordon de la ĉambro, ŝlosis ĝin, kaj kuŝiĝis sur la liton. Post tio li metis la manojn sub la kapon. Post tio li rigardis la plafonon. Post tio li ekdormis, ne rimarkinte, ke super la eksan kortegan parkon descendis nokto. Poste li dormis, dormis.

(1981)

CIP – Каталогизација у публикацији  
Народна библиотека Србије, Београд

821.163.41-31(0.034.2)

КАРОР, Момо, 1937–2010

Una [Elektronski izvor] / Момо Карор = (Момо Капор) ;  
[tradukis Jovano Zarkoviĉo, Zlatoje Martinov]. – Beograd  
: Удружење научних и стручних преводаца Србије,  
2026 ([Beograd] : Службени гласник). – 1 USB fleš  
memorija ; 1 x 3 x 8 cm. – (Serio de serba literaturo)

Sistemska zahtevi: Nisu navedeni. – Nasl. sa naslovnog  
ekrana. – Prevod dela: Уна. – Tiraž 50. – Str. 5–6:  
Antaŭparolo / Zlatoje Martinov.

ISBN 978-86-917873-9-4

COBISS.SR-ID 193090569



**Удружење научних и стручних преводилаца Србије**  
**Репрезентативно удружење у култури**

[www.prevodi.rs](http://www.prevodi.rs)

ISBN 978-86-917873-9-4



9 788691 787394